MANLIBRO PRI KATALOGADO. MONOGRAFIOJ

ANA MANERO
Versio: 01. 2024

MANLIBRO PRI KATALOGADO

MONOGRAFIOJ

Ana Manero

(Versio: 01)

2024

Verkis: Ana Mª Manero García (biblioteko@esperanto.es)

Helpis per reviziado: Marc Vanden Bempt kaj Ruben Fernández

Tabelo de enhavo

Tabelo de enhavo ... 3
Antaŭparolo ... 13
Enkonduko en la katalogan teknikon ... 15
Enkonduko en RDA ... 22
Enkonduko en MARC 21 ... 33
Pri ĉi manlibro ... 36
1. KREADO DE BIBLIOGRAFIAJ RIKORDOJ ... 38
1.1. Enkonduko ... 39
1.2. Tipo de priskribo ... 39
1.3. Kernaj elementoj ... 39
1.4. Alternativoj, elekteblaj aldonoj, elekteblaj preterlasoj ... 39
1.5. Mastrumsistemo ... 39
1.6. Bibliografia priskribo. ... 40
1.6.1. Ĝeneralaj instrukcioj ... 40
1.6.1.1 Lingvo kaj skribo ... 40
1.6.1.2 Transskribo kaj majuskloj ... 40
1.6.1.3 Datenoj prenitaj de ekster la risurco kaj interpolaĵoj ... 40
1.6.1.4 Interpunkcio ... 40
1.6.1.5 Diakritaĵoj ... 41
1.6.1.6 Simboloj ... 41
1.6.1.7 Interspacoj en inicialoj kaj sigloj ... 41
1.6.1.8 Literoj aŭ vortoj legendaj pli ol unu fojon. ... 42
1.6.1.9 Mallongigoj ... 42
1.6.1.10 Neĝustaĵoj ... 42
1.6.1.11 Numeroj kaj datoj ... 42
1.6.2. Informfontoj ... 43
1.6.2.1 Determino de la ĉefa informfonto ... 43
1.6.2.1.1. Integra priskribo ... 43
1.6.2.1.2. Analiza priskribo ... 44
1.6.2.2 Preferata fonto de informo ... 44
1.6.3. Priskribo ... 45
1.6.3.1 Identigilo de la eldonaĵo ... 45
1.6.3.1.1. Informfontoj ... 45

1.6.3.1.2. Kopirajta aŭ leĝa deponnumero ... 46
1.6.3.1.3. ISBN ... 46
1.6.3.1.4. Aliaj identigiloj ... 47
1.6.3.2 Titolo ... 47
1.6.3.2.1. Transskribo de la titolo ... 48
1.6.3.2.2. Ĉeftitolo ... 49
1.6.3.2.3. Paralela titolo ... 51
1.6.3.2.4. Titolaldono ... 52
1.6.3.2.5. Paralela titolaldono ... 53
1.6.3.2.6. Titolvarianto ... 54
1.6.3.3 Mencio pri respondeco ... 56
1.6.3.3.1. Mencio pri respondeco rilata al la ĉeftitolo ... 56
1.6.3.3.2. Paralela mencio pri respondeco rilata al la ĉeftitolo ... 58
1.6.3.4 Mencio pri eldono ... 58
1.6.3.4.1. Informfontoj ... 58
1.6.3.4.2. Registro de la mencio pri eldono ... 59
1.6.3.4.3. Paralela mencio pri eldono ... 60
1.6.3.4.4. Mencio pri respondeco rilata al la eldono ... 60
1.6.3.5 Mencio pri publikigo (eldondatenoj) ... 60
1.6.3.5.1. Informfontoj ... 61
1.6.3.5.2. Registro de la mencio pri publikigo ... 61
1.6.3.5.3. Loko de publikigo ... 61
1.6.3.5.4. Paralela loko de publikigo ... 62
1.6.3.5.5. Nomo de la eldoninto ... 62
1.6.3.5.6. Paralela nomo de la eldoninto ... 64
1.6.3.5.7. Dato de publikigo ... 64
1.6.3.6 Mencio pri fabrikado (presdatenoj) ... 65
1.6.3.6.1. Registro de la mencio pri fabrikado ... 65
1.6.3.7 Dato de kopirajto ... 66
1.6.3.8 Amplekso ... 66
1.6.3.8.1. Paĝoj ... 67
1.6.3.8.2. Folioj ... 67
1.6.3.8.3. Kolumnoj ... 67
1.6.3.8.4. Pluraj sekvencoj ... 67
1.6.3.8.5. Formo de la numeroj ... 67
1.6.3.8.6. Sekvencoj kun literoj ... 68

1.6.3.8.7. Nenumeritaj paĝoj, ktp. ... 68
1.6.3.8.8. Ŝanĝoj en la formo de numerado ... 68
1.6.3.8.9. Neĝusta paĝnumerado ... 68
1.6.3.8.10. Komplika aŭ neregula paĝnumerado ... 69
1.6.3.8.11. Paĝoj, ktp., numeritaj kiel parto de pli granda sekvenco ... 69
1.6.3.8.12. Bildaj paĝoj aŭ folioj ne inkluditaj en la paĝnumerado. ... 69
1.6.3.8.13. Falditaj folioj ... 69
1.6.3.8.14. Duobla paĝnumerado ... 69
1.6.3.8.15. Paĝoj numeritaj en malsamaj direktoj ... 70
1.6.3.8.16. Flugfolio ... 70
1.6.3.8.17. Teko, ujo, skatolo, ktp. ... 70
1.6.3.9 Ilustraĵoj ... 71
1.6.3.9.1. Ĉefe ilustrita ... 71
1.6.3.9.2. Ĉio ilustrita ... 71
1.6.3.9.3. Kolora enhavo ... 72
1.6.3.10 Dimensioj ... 72
1.6.3.10.1. Registro de la dimensioj ... 72
1.6.3.10.2. Dimensioj de la ujo ... 72
1.6.3.11 Akompana materialo ... 73
1.6.3.11.1. Registro de la akompana aŭ aldona materialo ... 73
1.6.3.12 Tipo de enhavo ... 73
1.6.3.13 Tipo de medio ... 74
1.6.3.14 Tipo de portilo ... 74
1.6.3.15 Mencio pri serio ... 75
1.6.3.15.1. Informfontoj ... 75
1.6.3.15.2. Ĉefitolo de la serio ... 76
1.6.3.15.3. Paralela titolo de la serio ... 76
1.6.3.15.4. Titolaldono de la serio ... 77
1.6.3.15.5. Mencio pri respondeco rilata al la serio ... 77
1.6.3.15.6. ISSN de la serio ... 77
1.6.3.15.7. Numerado de la serio ... 77
1.6.3.15.8. Ĉefitolo de la subserio ... 78
1.6.3.15.9. Paralela titolo de la subserio ... 79
1.6.3.15.10. Titolaldono de la subserio ... 79
1.6.3.15.11. Mencio pri respondeco rilata al la titolo de la subserio ... 79
1.6.3.15.12. ISSN de la subserio ... 79

1.6.3.15.13. Numerado de la subserio 79
1.6.3.16 Notoj 80
1.6.3.16.1. Notoj pri la titolo 80
1.6.3.16.2. Pliaj ĝeneralaj notoj 80
1.6.3.16.3. Citaĵ-notoj 81
1.6.3.16.4. Alispecaj notoj 81
1.7. Alirpunktoj 84
1.7.1. Tipoj de alirpunktoj 84
1.7.1.1 Persona aŭtoro 84
1.7.1.2 Korporacia aŭtoro 84
1.7.1.3 Titolo de verko 85
1.7.1.3.1. Preferataj titoloj por anonimaj verkoj: rektaj alirpuntoj 86
1.7.1.3.2. Preferataj titoloj por verkoj kun konata aŭtoro persona aŭ korporacia: nerektaj alirpunktoj 86
1.7.1.3.3. Preferataj titoloj por tradukoj 87
1.7.1.3.4. Ĉeftitolo kiel ĉefa alirpunkto 87
1.7.2. Elekto de alirpunktoj 88
1.7.2.1 Anonimaj verkoj 89
1.7.2.2 Verkoj kreitaj de unu aŭtoro 89
1.7.2.3 Kompilaĵoj de verkoj de unu aŭtoro 90
1.7.2.4 Verkoj kreitaj de pli ol unu aŭtoro 91
1.7.2.4.1. Verkoj en kunlaboro 92
1.7.2.4.2. Kompilaĵoj de verkoj de malsamaj aŭtoroj 93
1.7.2.5 Verko kaj traduko publikigitaj kune 94
1.7.2.6 Unu parto aŭ pli da partoj de iu verko 94
1.7.2.6.1. Unu parto 94
1.7.2.6.2. Du aŭ pli da partoj 94
1.7.2.7 Adaptaĵoj kaj revizioj 95
1.7.2.8 Komunikoj de spiritoj 95
1.7.2.9 Verkoj de aŭtoro, kiu nomas sin anonima 96
1.7.2.10 Kongresoj 96
1.7.2.10.1. Ĝenerala regulo 96
1.7.2.10.2. Unuopaj prelegoj 96
1.7.2.10.3. Verkoj pri kongreso 97
1.7.2.10.4. Pluraj kongresoj okazintaj samtempe 97
1.7.3. Formo de la alirpunktoj 97

1.8. Rilataj agantoj 97
1.9. Rilataj verkoj 99
1.9.1. Rilatoj de tuto-parto 99
1.9.2. Rilatoj de verkoj derivitaj 101
1.9.3. Rilatoj de akompanaj verkoj 101
1.9.4. Rilatoj de sinsekvo 102
1.10. Rilataj eldonaĵoj 102
1.10.1. Eldonaĵoj en malsamaj formatoj 102
1.10.2. Reproduktaĵoj aŭ faksimiloj de aliaj eldonaĵoj 102
1.10.3. Depresoj 103
1.10.4. Eldonaĵoj, kiuj donas aliron al retaj risurcoj 103
1.10.5. Aliro al bitigita ekzemplero de la eldonaĵo 104
1.11. Kompleksaj MARC-kampoj kaj kampoj de numeroj 104
1.12. Specialaj kazoj 106
1.12.1. Plurvolumaj monografioj 106
1.12.1.1 Koncepto 106
1.12.1.2 Informfontoj 106
1.12.1.3 Tipo de priskribo 106
1.12.1.3.1. Integra priskribo 106
1.12.1.3.2. Analiza priskribo 107
1.12.1.4 Bibliografia priskribo 108
1.12.1.4.1. Titolo 108
1.12.1.4.2. Mencio pri respondeco 109
1.12.1.4.3. Mencio pri eldono 110
1.12.1.4.4. Mencio pri publikigo, ktp. 110
1.12.1.4.5. Amplekso 111
1.12.1.4.6. Dimensioj 113
1.12.1.4.7. Mencio pri serio 113
1.12.1.4.8. Notoj 115
1.12.2. Elektronikaj monografioj 118
1.12.2.1 Informfontoj 118
1.12.2.2 Priskribo 118
1.12.2.2.1. Amplekso 118
1.12.2.2.2. Aliaj fizikaj karakterizaĵoj 119
1.12.2.2.3. Dimensioj 119
1.12.2.2.4. Tipo de medio 119

1.12.2.2.5. Tipo de portilo 119
1.12.2.2.6. Teknikaj detaloj de la bita dosiero 119
1.12.2.2.7. Noto pri la fonto de la ĉeftitolo 121
1.12.2.2.8. Noto pri enhavo 121
1.12.2.2.9. Noto pri la postuloj de la programo 121
1.12.2.3 Kompleksaj MARC-kampoj kaj kampoj de numeroj 121
1.12.2.4 Bitigitaj risurcoj 123
2. KREADO DE AŬTORITATAJ RIKORDOJ 125
2.1. Enkonduko 126
2.2. Strukturo de aŭtoritata rikordo 126
2.3. Ĝeneralaj instrukcioj 127
2.3.1. Majuskloj 127
2.3.2. Numeroj esprimitaj kiel ciferoj aŭ vortoj 127
2.3.3. Diakritaĵoj 127
2.3.4. Streketoj 127
2.3.5. Interspacoj en inicialoj kaj sigloj 128
2.3.6. Mallongigoj 128
2.3.7. Identigiloj 129
2.4. Personoj 129
2.4.1. Elekto de la preferata formo 130
2.4.1.1 Informfontoj por elekto de la preferata nomo 130
2.4.1.2 Ĝeneralaj kriterioj 130
2.4.1.3 Lingvo 130
2.4.1.4 Nomoj en aliaj skriboj 131
2.4.1.5 Pseŭdonimoj 131
2.4.2. Konstruo de alirpunktoj por personoj 132
2.4.2.1 Unuvortaj nomoj 132
2.4.2.2 Nomoj enhavantaj familinomojn 132
2.4.2.3 Artikoloj, prepozicioj kaj prefiksoj en la nomoj 133
2.4.2.4 Nomoj kiuj konsistas el inicialoj 135
2.4.2.5 Nomoj, kiuj enhavas nobelan titolon 135
2.4.2.6 Kromnomoj, kaj nomoj, kiuj indikas devenon 135
2.4.2.7 Nomoj de reĝoj kaj aliaj personoj el la reĝaro 135
2.4.2.8 Papoj 136
2.4.2.9 Episkopoj kaj aliaj ekleziaj rangoj 136
2.4.2.10 Sanktuloj 136

2.4.2.11 Spiritoj ... 136
2.4.2.12 Solvo de homonimoj ... 137
2.4.2.13 Variantaj formoj de la nomoj ... 137
2.4.2.14 Pseŭdonimoj ... 138
2.4.2.15 Konstruo de alirpunktoj por familioj ... 139
2.5. Korporacioj ... 139
2.5.1. Elekto de la preferata formo ... 140
2.5.1.1 Informfontoj por elekto de la preferata nomo ... 140
2.5.1.2 Transskribo de la preferata nomo ... 140
2.5.1.3 Nomoj en malsamaj formoj ... 141
2.5.1.4 Nomo en malsamaj lingvoj ... 141
2.5.2. Konstruo de alirpunktoj por korporacioj ... 142
2.5.2.1 Ĝenerala regulo ... 142
2.5.2.2 Administraciaj korporacioj ... 142
2.5.2.3 Religiaj korporacioj ... 142
2.5.2.4 Subordigitaj korporacioj ... 143
2.5.2.5 Ŝtatestroj ... 144
2.5.2.6 Jurisdikcioj ... 145
2.5.2.7 Aldonaĵoj al la preferata nomo ... 146
2.6. Kongresoj kaj aliaj portempaj korporacioj ... 147
2.6.1. Elekto de la preferata formo ... 147
2.6.2. Konstruo de alirpunktoj por kongresoj ... 148
2.6.2.1 Variantoj ... 148
2.6.2.2 Aldonaĵoj ... 149
2.6.2.3 Tipoj de rikordoj ... 149
2.7. Verkoj ... 150
2.7.1. Elekto de la preferata formo ... 150
2.7.1.1 Ĝeneralaj kriterioj ... 150
2.7.1.2 Informfontoj ... 150
2.7.2. Konstruo de la alirpunktoj por verkoj ... 151
2.7.2.1 Preferata titolo por anonimaj verkoj ... 151
2.7.2.2 Preferata titolo por verkoj kun konata aŭtoro ... 151
2.7.2.2.1. Personoj ... 151
2.7.2.2.2. Korporacioj ... 151
2.7.2.2.3. Kongresoj ... 152
2.7.2.3 Preferata titolo por tradukoj ... 152

2.7.2.4 Preferata titolo por parto(j) de verko 152
2.7.2.4.1. Unu parto 153
2.7.2.4.2. Du aŭ pli da partoj 153
2.7.2.5 Specialaj kazoj 154
2.7.2.5.1. Sanktaj libroj 154
2.7.2.5.2. Traktatoj 155
2.8. Noto pri konsultitaj fontoj 155
2.8.1. Ĝeneralaĵoj 155
2.8.2. Redaktado de la notoj 156
2.8.2.1 Citado de la fontoj 156
2.8.2.2 Redaktado de la trovita informo 157
2.8.2.3 Ekzemploj 158
3. KREADO DE RIKORDO PRI LA EKZEMPLERO EN KOHA 160
3.1. Enkonduko 160
3.2. Kampo 952 de Koha 161
3.3. Specialaj kazoj 164
3.3.1. Faktaj volumoj 164
3.3.2. Plurvolumaj eldonaĵoj 165
Apendico: Informfontoj en monografioj 168
Apendico: Risurcoj en nelatinaj skriboj 170
La plej simpla solvo 170
Transliterita rikordo 170
Rikordoj en pluraj skriboj 171
Alirpunktoj 173
Apendico: Terminoj kaj kodoj pri funkcioj 174
Praktikaj ekzemploj 178
Bibliografiaj rikordoj 178
KAZO 1: Okuloj 178
KAZO 2: Alico en Mirlando 184
KAZO 3: Du junaj fraŭlinoj 188
KAZO 4: Vulkanismo kaj la vulkana regiono de Olot 192
KAZO 5: La divina commedia 195
KAZO 6: El la Biblio 199
KAZO 7: La aventuroj de Huckleberry Finn 201
KAZO 8: Plena vortaro de Esperanto 203
KAZO 9: Impresoj kaj raportoj 205

KAZO 10: Du amosentaj noveloj 207
KAZO 11: La faraono 208
KAZO 12: La mastro de l' ringoj 211
KAZO 13: Historio de Esperanto. Deveno kaj komenco, 1887-1900 216
KAZO 14: Ulenspieghel 218
KAZO 15: Judita 219
Aŭtoritataj rikordoj 221
Personoj 221
Nura alirpunto 221
Kompleta rikordo 221
KAZO 1: Pluraj nomovariantoj 221
KAZO 2: Pseŭdonimoj 222
KAZO 3: Homonimoj 224
Verkoj / Tradukoj 225
Nura alirpunkto 225
KAZO 1: Traduko de anonima verko 225
KAZO 2: Traduko de verko kun konata persona aŭtoro 225
KAZO 3: Traduko de verko kun korporacia aŭtoro 226
Kompleta rikordo 226
KAZO 1: Originala verko ricevis malsaman ĉeftitolon en malsamaj eldonoj 226
KAZO 2: Traduko de verko ricevis malsaman ĉeftitolon en malsamaj eldonoj 227
KAZO 5: Verko atribuita al pluraj aŭtoroj 227
Korporacioj 228
Nura alirpunkto 228
Kompleta rikordo 229
Kazo 1: Antaŭaj kaj postaj korporacioj 229
Kazo 2: Papo aganta oficiale nome de la Eklezio 229
Kongresoj 230
Kompleta rikordo 230
KAZO 1: Kongreso kies nomo enhavas la nomon de la organiza korporacio 230
KAZO 2: Kongreso kies nomo ne enhavas la nomon de la organiza korporacio 231
Nura alirpunkto 232
KAZO 1: Kongreso kies nomo enhavas la nomon de la organiza korporacio 232
KAZO 2: Kongreso kies nomo ne enhavas la nomon de la organiza korporacio 232
Glosaro 233

Antaŭparolo

En la jaro 2011 mi verkis la manlibreton *Ĝenerale pri katalogado*[1], kun la celo helpi neprofesiajn prizorgantojn de Esperanto-bibliotekoj, kiuj havas antaŭ si la taskon okupiĝi pri la librokolektoj de siaj grupoj. Ricevinte plurajn helpopetojn pri katalogado, mi pensis, ke estus ja utile por la tiamaj helpopetantoj kaj por la eventualaj estontaj, krei bazan gvidilon enhavantan la minimumajn instrukciojn por plenumi tiun taskon. Tiam, Biblioteko Juan Régulo Pérez kaj aliaj bibliotekoj de hispanaj grupoj, uzis la mastrumsistemon Openbiblio. Tial, komplemente al la manlibreto, mi verkis plian dokumenton *Katalogado per Openbiblio*[2], por instrui pri la uzado de tiu programo.

Poste evidentiĝis, ke la mastrumsistemo Koha estas multe pli konvena. Biblioteko Juan Régulo Pérez ekuzis ĝin en 2016, kaj poste pluraj aliaj Esperanto-bibliotekoj. Tiam mi pensis revizii la manlibron, aldonante pli da instrukcioj pri, interalie, kontrolo de aŭtoritatoj, bazaj nocioj pri MARC21 kaj uzado de la programo Koha, ĉar la unuaj gvidiloj jam ne sufiĉis por la nova situacio .

Sed intertempe la nova kataloga regularo, RDA[3] (*Resource Description and Access* = Priskribo kaj Aliro al Risurcoj), aperinta en 2010, estis jam sufiĉe disvastiĝinta en la bibliotekista mondo. *Ĝenerale pri katalogado* sekvis la lastan konsoliditan eldonon de ISBD[4] (*International Standard Bibliografic Description* = Internacia Norma Bibliografia Priskribo) de 2011 por la bibliografia priskribo. Ĉar Openbiblio ne permesis kontroli aŭtoritaton, la gvidilo ne donis multajn instrukciojn pri elekto kaj formo de la alirpunktoj, sed tiujn minimumajn sekvis la hispanan katalogan regularon *Reglas de catalogación*[5], siavice bazitan sur AACR2[6] (*Anglo-American Cataloging Rules, 2nd ed.* = Angla-Amerika Kataloga Regularo, 2a eld.). Do, ĉe mi estiĝis la dubo ĉu revizii la manlibron laŭ la normoj sur kiuj ĝi baziĝas aŭ verki novan manlibron bazitan sur RDA.

Ĉar ambaŭ vojoj havis avantaĝojn kaj malavantaĝojn, mi ne havis klaran ideon pri tio, kio estas pli konvena por la prizorgantoj de Esperanto-bibliotekoj (kelkaj el kiuj estas aŭ estis bibliotekistoj kaj, do, memstaraj ĉi-rilate) kaj, ĉar mi ne plu ricevis helpopetojn pri katalogado, mi pensis, ke la decido ne tiom urĝas kaj la projekto simple stagnis.

Ĝis denove, en 2023, estiĝis en la listo *Bibliotekoj*[7] la demando pri uzado de komuna regularo inter la diversaj Esperanto-bibliotekoj kaj mi ricevis rektan peton verki manlibron pri katalogado. La vigla, kvankam ne multe partoprenata diskuto en la listo, montris, ke estus preferinde krei novan manlibron surbaze de RDA anstataŭ revizii la antaŭan. Mi aparte dankas la interesajn alportojn de Ruben Fernández kaj Marc Vanden Bempt, kiuj helpis min preni la decidon, volonte reviziis la malnetojn kaj faris oportunajn sugestojn. La ĉasado de mistajpoj kaj lingvaj eraroj realigita de Marc, certe altigis la lingvan kvaliton de la teksto. Restantaj aŭ enŝoviĝintaj postaj misoj falas nur sur mia respondeco.

RDA ne estas libere alirebla normo. Oni devas aboni ĝin. Tamen, la rezultaj "profiloj" , konkretigoj de la tre ĝenerala refenckadro pri katalogado, kiu estas RDA, ofte kreitaj de la responda nacia biblioteko de iu lando, kiu ja pagas la abonon, kutime estas metitaj senpage je la dispono de aliaj bibliotekoj. Tiel okazis en Hispanio. Kiam mi laboris en la Nacia Biblioteko de Hispanio *(Biblioteca Nacional de España, BNE)*, mi estis parto de la labora skipo, kiu redaktis la Profilon de aplikado de RDA por modernaj monografioj en la Nacia Biblioteko de Hispanio *(Perfil de aplicación de RDA para monografías*

[1] https://hdl.handle.net/11013/64
[2] https://hdl.handle.net/11013/85
[3] https://www.rdatoolkit.org/
[4] https://www.bne.es/sites/default/files/repositorio-archivos/isbd-cons_20110321.pdf
[5] https://www.bne.es/sites/default/files/repositorio-archivos/reglas-catalogacion_0.pdf
[6] Ne diponebla rete
[7] https://groups.google.com/g/bibliotekoj/about

modernas de la Biblioteca Nacional de España)[8]. Paralele, oni kreis diversajn profilojn por la diversaj tipoj de materialoj[9]. Ĉi manlibro por Esperanto-bibliotekoj baziĝas, do, sur la profiloj kreitaj de BNE, profitante ilian retan disponeblon kaj mian sperton. Mi tre dankas la Bibliotekon pro la disponigo de tiuj utilaj labordokumentoj. Sed mi deziras aparte esprimi mian dankon al miaj ekskunlaborantoj Ricardo Santos Muñoz, estro de la Departemento de Teknika Procezo *(Departamento de Proceso Técnico),* al Ana González Ribot, estrino de la Servo pri Katalogado *(Servicio de Normalización*), kaj al Roberto Gómez Prada, estro de la Servo pri Normigado *(Servicio de Normalización)*, pro ilia apogo dum la redaktado de ĉi manlibro.

Jen ĝi do. Espereble, ĉi manlibro helpos la prizorgantojn de Esperanto-bibliotekoj plenumi sian celon.

[8] https://www.bne.es/sites/default/files/repositorio-archivos/perfil_rda-monomoder.pdf
[9] https://www.bne.es/es/servicios/servicios-para-bibliotecarios/rda

Enkonduko en la katalogan teknikon

Katalogi konsistas en la sistema kreado de bibliografiaj rikordoj kiuj kunaj rezultigas la katalogon.

Bibliografia rikordo estas norma kaj resuma reprezento de iu risurco (libro, revuo, disko, video…), nome, nova dokumento multe pli mallonga, kiu entenas, laŭ difinitaj konvencioj, certajn datenojn el la originala risurco, kiuj reprezentas ĉi lastan kaj ebligas senprobleme identigi kaj ne konfuzi ĝin kun iu alia.

Bibliografiaj rikordoj prezentiĝis laŭ la historio en tre diversaj formatoj: libroforma listo, kartona slipo, diskedo, mikrofilmo… En la nunaj tempoj bibliografiajn rikordojn oni kreas kaj stokigas per bibliotekaj mastrumsistemoj, kiuj permesas ankaŭ disponigi la katalogojn rete.

Kiam uzanto traserĉas katalogon, la ĉefaj celoj estas:

- trovi materialojn respondajn al serĉkriterioj (ekzemple, pri specifa temo, konkreta verko)
- identigi ilin, por ke tiuj materialoj alĝustiĝu al tio serĉata (ekzemple, distingi inter du verkoj kun la sama titolo)
- elekti tion, kio taŭgas por liaj bezonoj (ekzemple, certa lingvo)
- obteni aliron al tiuj materialoj (ekzemple, per prunto, per interreta aliro)
- navigi tra la katalogo.

1a fazo: Katalogado

Por tion atingi, en la bibliografiaj rikordoj devas aperi tri tipoj de informoj:

- *Bibliografia priskribo*. Temas pri la fakta reprezento de la originala risurco, per kiu oni identigas ĝin.
- *Alirpunktoj*. Ili permesas ordigi la rikordojn ene de katalogo kaj retrovi ilin per la diversaj indeksoj: titoloj, aŭtoroj, korporacioj, temoj, ktp.
- *Signaturo*. Ĝi indikas la fizikan lokon ene de la biblioteka bretaro, kie troviĝas la risurco.

Katalogi, do, konsistas baze en priskribi risurcon por certigi ties identigeblon; elekti la alirpunktojn, kiuj permesos ordigi kaj retrovi ĝin en la indeksoj de la katalogo; kaj doni la bezonatajn indikojn por trovi la originalan risurcon ene de la kolekto.

Por la du unuaj taskoj oni uzas katalogan regularon, kiu preskribas kiun informon doni kaj kiel oni devas doni tiun informon.

2a fazo: Indeksado kaj klasifikado

Parto de la elekto de alirpunktoj estas la tem-indeksado kaj klasifikado. Post katalogado eblas aldoni aliajn alirpunktojn pri temoj bazitajn sur listoj de kontrolitaj tem-terminoj aŭ tezaŭroj. Ekzistas ankaŭ la ebleco uzi nekontrolitajn terminojn.

Lasta fazo estus klasifikado, se oni trovas tion utila, per unu el la diversaj sistemoj ekzistantaj: UDC[10] (*Universal Decimal Clasification* = Universala Dekuma Klasifiko), DDC[11] (*Dewey Decimal Classification* = Dekuma Klasifiko de Dewey), ktp. En Esperanto ekzistas specifa sistemo, Klasifo de Esperantaj Temoj[12], de M.C. Butler, publikigita en 1950.

Temindeksado kaj klasifikado havas apartajn trajtojn kaj regulojn, ne konsiderataj en la katalogaj regularoj. En ĉi manlibro, nur supraĵe ni parolos pri ili.

Kaj fine, oni devas registri la informon necesan por retrovi la risurcon en la bretaro. Por tio oni donas al ĝi signaturon kaj eventuale strikodon.

[10] https://udcsummary.info/php/index.php?lang=en
[11] https://www.oclc.org/en/dewey.html
[12] https://biblbut.wordpress.com/klasifo-de-esperantaj-temoj/

Signaturo estas kodo presita sur etikedo fiksita al la ekstero de objekto en biblioteka kolekto, kutime al la malsupra parto de spino de libro (aŭ alispeca materialo), kiu povas esti ankaŭ presita aŭ manskribita sur etikedo ene de la objekto. Ĝi informas pri la ĝusta loko sur la breto de la specifa kopio de la risurco, kiun disponas la biblioteko.

Signaturoj sur la spino de libroj

Strikodo estas surgluebla presita etikedo enhavanta maŝinlegeblajn datenojn (plej ofte temas pri litera-cifera kodo, unika por ĉiu ekzemplero, kiu identigas ĝin) ĉifritajn en vertikalaj linioj de egala longo sed varia dikeco, kiuj povas esti legitaj per optika skanilo. Strikodoj estas uzitaj, ĉefe en bibliotekoj, por identigi la ekzemplerojn kaj faciligi ilian pruntadon per elektronikaj rimedoj. Tiu kodo anstataŭas la registro-numeron, uzitan kiam oni realigis la registradon de ekzempleroj mane. Nuntempe, kelkaj mastrumsistemoj permesas generi ĝin aŭtomate, Koha inter ili .

Surglueblaj strikodoj

Uzado de strikodo por pruntado

Depende de la mastrumsistemo kaj ties eblecoj, tiuj tri taskoj realiĝas per la kreado de unu, du aŭ tri malsamaj tipoj de rikordoj, kiuj konstituas la datenbankon:

1. Bibliografiaj rikordoj
2. Aŭtoritataj rikordoj
3. Rikordoj pri la ekzempleroj

La bibliografiaj rikordoj entenas ĉiujn necesajn datenojn por priskribi kaj identigi difinitan eldonon. Estas tre bazaj sistemoj, kiel *Openbiblio*, kiuj nur permesas redakti bibliografiajn rikordojn kaj kvankam ja eblas krei alirpunktojn, ne eblas fari kontrolon de aŭtoritatoj. Vidu suban alineon.

Por la ĝusta identigo de aŭtoroj, verkoj, korporacioj, ktp., oni kreas aŭtoritatajn rikordojn. La afero funkcias tiel, ke por ĉiu alirpunkto de la bibliografia rikordo estas aŭtoritata rikordo, kie oni starigas la

preferatan nomon kaj aldonas tiujn nomovariantojn kaj alitipan informon necesan por ne konfuzi ilin kun aliaj samnomaj sed malsamaj. Tiu tasko estas nomata kontrolo de aŭtoritatoj. La aŭtoritataj rikordoj permesas do identigi la aŭtorojn (kaj ceterajn bibliografiajn entojn) kaj strukturi kaj doni koheron al la datenbanko. Por ke la afero funkciu, la alirpunkto de la aŭtoritata rikordo devas esti la sama ol la ĉefa alirpunkto de la bibliografia rikordo. Ambaŭ rikordoj, bibliografiaj kaj aŭtoritataj, restas



3a fazo: informo pri la ekzemplero kaj signaturo

interne ligitaj en la katalogo. Ĉiuj profesiecaj mastrumsistemoj disponas de la tiel nomata “modulo de aŭtoritatoj”, *Koha* inter ili, kio konstituas la ĉefan atuton de ĉi programo proponata por la Esperanto-bibliotekoj.

La ebleco krei rikordojn por la ekzemplero ne ekzistas en ĉiuj bibliotekaj mastrumsistemoj. Kiam la programo disponas ĝin, tio permesas redakti tre detalan rikordon pri la specimenoj de tiu konkreta eldono posedataj de la biblioteko. Sed multaj sistemoj, eĉ profesiecaj kiel *Koha*, anstataŭe kontrolas la informon pri la ekzemplero per speciala loka kampo propra de la programo, entenata en la bibliografia rikordo.

Jen baza skizo pri tio, kiel tiuj tri tipoj de rikordoj rilatas inter si en la mastrumsistemo:



Kaj jen skizo pri mastrumsistemo kun informo pri la ekzemplero entenita en la bibliografia rikordo:



La bibliotekaj mastrumsistemoj funkcias interne pere de iu informadika formato, kiu permesas strukturi la datenojn tiel, ke ili estu legeblaj kaj interpreteblaj de la maŝino. La plej ofta formato en bibliotekaj medioj por krei katalogojn estas MARC 21 (*MARC, Machine Readable Cataloging* = Maŝinlegebla Katalogado) aŭ unu el ties derivaĵoj. MARC estas ankaŭ formato de interŝanĝo de rikordoj inter bibliotekoj.



Por ĉia rikordo ekzistas speciala MARC-formato, kiu gvidas la kodigon de la koncernaj datenoj:

- Formato MARC 21 por bibliografiaj rikordoj[13]
- Formato MARC 21 por aŭtoritataj rikordoj[14]
- Formato MARC 21 por rikordoj de ekzempleroj[15]

Ĉi manlibro traktos tiujn kampojn el la bibliografiaj kaj aŭtoritataj formatoj necesaj por katalogado, kun konsidero al la lokaj kampoj por la ekzempleroj specifaj de *Koha*.

En ĉi manlibro, ni vidos kiel oni katalogas per RDA uzante la formaton MARC 21. En RDA ŝanĝiĝas la fona teorio, la strukturo de la rikordoj kaj la uzata terminologio respekte de la tradicia. Sed tiom longe, kiom RDA devos uzi la formaton MARC-21 por kodigi la informon, la aspekto de la rikordoj tre similos al tiuj kreitaj per antaŭaj regularoj.

Kaj por fini, jen kelkaj konsideroj pri la nivelo de katalogado. Ne ekzistas universala solvo por katalogi risurcon valida por ĉiuj katalogoj. Katalogado devas adaptiĝi al la ebloj kaj bezonoj de ĉiu organizaĵo. Tial, oni komprenu, ke temas pri fleksebla tasko, ĉar ĉio-ampleksa katalogado verŝajne estas ne necesa en malgranda biblioteko kaj ĝi postulas tempon, kiun oni prefere dediĉu al aliaj laboroj. Male, biblioteko kun abunda aŭ faka enhavo povas bezoni pli detalan katalogadon por rekuperi la maksimuman informon de iu risurco. Kaj ankaŭ povas okazi, ke la sama biblioteko traktas malsamajn tipojn de risurcoj laŭ malsimilaj niveloj de priskribo. Tial, ĉiu biblioteko devas analizi siajn bezonojn. La plej bona katalogado ne estas la plej datenabunda, sed tiu, kiu plej bone adaptiĝas al la kolekto, al la

[13] MARC 21 format for bibliographic data: https://www.loc.gov/marc/bibliographic/
[14] MARC 21 format for authority data: https://www.loc.gov/marc/authority/
[15] MARC 21 format for holdings data: https://www.loc.gov/marc/holdings/

uzantoj kaj al la disponeblaj rimedoj. RDA ne parolas pri nivelo de detalo, sed pri “kernaj” elementoj, kiuj ĉiam enestu en iu rikordo, kaj kiujn ni povas similigi al tiuj tradiciaj elementoj, kiuj konstituis la bazan nivelon de katalogado en aliaj regularoj. Tiuj kernaj elementoj estos indikataj laŭlonge de la manlibro.

Enkonduko en RDA

Laŭ la oficiala difino, RDA (Resource Description and Access = Priskribo kaj Aliro al Risurcoj) estas pakaĵo de datenelementoj, gvidlinioj kaj instrukcioj celantaj krei metadatenojn por risurcoj el bibliotekoj kaj aliaj institucioj zorgantaj la kulturan heredaĵon, kiuj estas bone formitaj laŭ internaciaj modeloj por aplikoj en ligitaj datenoj fokuzitaj en la uzanto.

Do, RDA ne estas regularo per si mem, sed referenckadro por katalogado. En ĝi estas skizitaj la instrukcioj (kun alternativoj kaj diversaj opcioj en kelkaj kazoj), kiujn ĉiu biblioteko devas konkretigi per la t. n. "profiloj de aplikado". La sola kondiĉo estas, ke la profiloj estu koheraj kun la ĝenerala kadro. Sekve, do, ne ĉiuj rezultaj profiloj estas samaj eĉ se ĉiuj sekvas la instrukciojn de RDA, kaj la sama risurco katalogita laŭ la instrukcioj de du malsamaj RDA-profiloj povas prezenti konsiderindajn malsamecojn. En tiu senco, la normo estas tre fleksebla.

RDA anstataŭas la iaman regularon AACR2 (American Cataloging Rules, 2nd ed. = Angla-Amerika Kataloga Regularo, 2a eld.), sur kiu baziĝis multaj landaj regularoj. Dum la revizia laboro, entreprenita post la Internacia Konferenco pri la Principoj kaj Estonta Evoluo de AACR (International Conference on the Principles and Future Development of AACR), okazinta en Toronto en 1997, kiu komence rezultigus AACR3, oni decidis tute ŝanĝi la fokuson kaj, post pluraj jaroj da diskutoj, la nova normo RDA estis publikigita en 2010. Tiun ŝanĝon de vidpunkto motivigis la ŝanĝoj en la teknologia medio kaj la percepto de bezono pri konverĝo de bibliotekoj kun aliaj memorinstitucioj, kiel ekzemple arĥivoj kaj muzeoj. Tamen, tiu konverĝo kun la arĥivista komunumo montriĝis ĝis nun malfacila.

RDA estas dizajnitaj por la cifereca mondo. La normo konsistas el aro da instrukcioj por ĉiuj specoj de enhavoj kaj medioj.

Ĉi enkonduko celas nur montri ĝeneralan bildon pri RDA, ĉar ĉiam oportunas koni la teorian fonon por pli bone kompreni la praktikan aplikon. Tamen, eblas rekte iri al la kataloga instrukciaro kaj apliki ĝin senplie. Ĉio estos laŭeble klarigata en la koncernaj ĉapitroj de la manlibro.

Kvankam RDA estas konstruita sur la fundamentoj de AACR2, ĝi baziĝas sur la konceptaj modeloj evoluigitaj en la lastaj jaroj fare de IFLA[16] (*International Federation of Library Associations and Institutions* = Internacia Federacio de Bibliotekaj Asocioj kaj Institucioj)[17].

La datenmodelo Bibframe[18] (*Bibliographic Framework* = Bibliografia Kadro), aplikebla al ligitaj datenoj, kiel natura formato por la katalogado per RDA, estas nuntempe en disvolvo. Sed fakte RDA estas sendependa de kiu ajn kodigsistemo kaj nuntempe plej ofte kodigita per MARC21.

RDA ankaŭ ne preskribas uzendan interpunkcion. Ĝi fokusiĝas sur la registrendaj elementoj kaj donas neniun gvidilon pri tio, kiel montri ilin al la uzanto. Sed ISBD plu validas kiel ebla formato de vidigo, plej taŭga por MARC 21, kaj RDA havas specifan apendicon pri ĝi.

La normo RDA estas evoluigita kaj plutenata de la Komuna Direktanta Komitato por la Evoluo de RDA (*Joint Steering Committee for the Development of RDA*)[19].

---

[16] https://www.ifla.org/

[17] Ĉefe FRBR[17] (*Functional Requirements for Bibliographic Records* = Funkciaj Postuloj por Bibliografiaj Rikordoj) kaj FRAD[17] (*Functional Requirements for Authority Data* = Funkciaj Postuloj por Aŭtoritataj Datenoj), kiuj provizas la abstraktan kadron necesan por ke RDA estu sufiĉe fleksebla kaj adaptebla.

[18] https://bibframe.org/

[19] http://www.rda-rsc.org/archivedsite/

Ni komencu, do, per la teorio. FRBR, sur kiu baziĝas la normo, estas koncepta modelo, kiu priskribas la bibliografian universon. Ĝi baziĝas sur la modelo ento/rilato por la kreado de rilataj datenbankoj. La modelo

- identigas la entojn (klasojn), kiuj konstituas la bibliografian mondon,
- specifas la atributojn aŭ karakterizaĵojn de tiuj entoj, kaj
- starigas la rilatojn (asociadojn) inter la entoj pli gravaj por la uzantoj.

La pritakso de la graveco de atributoj kaj rilatoj determinas la rekomendojn aŭ postulojn por baznivela bibliografia rikordo, kiu devas kontentigi la celojn aŭ taskojn de la uzanto: trovi, identigi, elekti kaj obteni, kiujn ni vidis en la antaŭa rubriko .

Por tio, FRBR difinas tri tipojn de entoj, ĉiuj kun siaj propraj atributoj, kaj la rilatoj, kiujn eblas starigi inter ili.

ENTOJ

Entoj de la 1a grupo.

Al la entoj de la unua grupo apartenas la produktoj de la intelekta kaj arta penadoj: *Verko*, *Esprimo*, *Manifestiĝo* kaj *Ekzemplero*.

Verko: Diferencigita intelekta aŭ arta kreaĵo. Temas pri io abstrakta, la ideo, kiu svarmas en la kapo de la aŭtoro. Ezemple:



Cervantes Saavedra, Miguel de

Don Quijote de la Mancha

Verko *realiĝas per* iu esprimo (aŭ pluraj).

Esprimo: Intelekta aŭ arta realigo de verko en litera-cifera formo, muzika notacio, sono, bildo, objekto, ktp., aŭ ajna kombinaĵo de tiuj formoj. Ankaŭ abstrakta, ĝi ne ekzistas materiece. Ekzemple: aparta versio de Don Kiĥoto en difinita lingvo.

Cervantes Saavedra, Miguel de

Don Quijote de la Mancha. Esperanto

Esprimo *materiiĝas en* iu manifestiĝo (aŭ pluraj manifestiĝoj)

Manifestiĝo: Tuŝebla konkretigo de esprimo de verko: aro da ekzempleroj produktitaj (nur unu en manuskriptoj, multoblaj en presaĵo: la eldono).

Manifestiĝo *estas ekzempligita de* ekzemplero

Ekzemplero: konkreta ekzemplero de iu manifestiĝo, la kopio, kiun posedas nia biblioteko.

Kutime oni katalogas manifestiĝojn, foje ekzemplerojn (en la kazo de manuskriptoj). Oni katalogas surbaze de la kopio, kiun oni havas en la mano.

Entoj de la 2a grupo

La entoj de ĉi grupo reprezentas la responsulojn de la intelekta aŭ arta enhavo, de la materieca produktaĵo kaj ĝia disvastigo aŭ de la prizorgado de la entoj de la unua grupo. La entoj de la dua grupo konsistas ĉefe el *persono* (individuo) kaj *korporacio* (organizaĵo aŭ grupo de individoj kaj/aŭ organizaĵoj).

Ĉi tiu baza prezento poste evoluis pro la difino de novaj kategorioj, kaj fine la entoj de la 2a grupo difinas sin jene:

- Aganto (ento kapabla starigi respondecajn rilatojn al verko, esprimo, manifestiĝo kaj ekzemplero).

    - Persono (individua homo)
    - Kolektiva aganto (aro aŭ organizaĝo de personoj, kiuj havas propran nomon kaj agas kiel unuo)
        - Korporacio
        - Familio

Entoj de la 3a grupo

Temas pri aldona aro de entoj, kiuj povas esti uzataj kiel temo de iu verko. La grupo inkludas, krom la entoj de la du antaŭaj grupoj, ankaŭ *koncepton* (abstraktan ideon), *objekton* (ion materiecan), *eventon* (okazaĵon) kaj *lokon*.

Alivorte, iu verko povas temi pri, ekzemple, kritiko kaj interpreto de alia verko (ento de la unua grupo); pri biografio de persono aŭ historio de asocio (entoj de la dua grupo); aŭ pri paco (abstrakta ideo), la katedralo de Parizo (io materieca), la unua Mondmilito (okazaĵo) aŭ turisma gvidilo pri Ĉinio (loko), ĉiuj entoj de la tria grupo.

Kunmetaĵoj kaj Komponantoj

Cetere, la entoj de la unua grupo povas esti:

- Integraj unuoj (nome, unuopaj verkoj sendepende publikigitaj, ekzemple, La tempesto, de William Shakespeare)
- Kunmetaĵoj
    - Aro de individuaj verkoj kunmetitaj de eldonisto aŭ editoro (ekzemple: Du amosentaj noveloj, tradukitaj de Alfred Bader)
    - Seria eldonaĵo (ekzemple: periodaĵoj, gazetoj)
    - Kolekto de dokumentoj el persona arĥivo
- Komponantoj
    - Partoj de verko kun propra titolo
    - Artikoloj

La strukturo de la modelo permesas reprezenti la kunmetaĵajn kaj komponantajn entojn sammaniere, kiel oni reprezentas la integrajn unuojn. Tio signifas, ke el logika perspektivo, la ento "verko", ekzemple, povas reprezenti aron da individuaj verkoj kunmetitaj de editoro aŭ eldonisto sub la formo de antologio, aron da individuaj monografioj kunigitaj de eldonisto por konstitui serion, aŭ kolekton de privataj dokumentoj organizitaj kiel tuto de iu arĥivo.

Same, la ento verko povas reprezenti apartan intelektan aŭ artan komponanton el pli granda verko, kiel ĉapitron de raporto, artikolo de gazeto, ktp.

Por la celoj de la modelo, la entoj kunmetaĵo kaj komponanto funkcias same kiel la integraj unuoj, ili estas difinitaj per la samaj terminoj, kundividas la samajn karakterizaĵojn kaj rilatas inter si same, kiel la integraj unuoj.

Ekzemple: *Du amosentaj noveloj* estas kunmetaĵo de du verkoj: *Imenlago*, de Theodor Storm kaj *Maruŝka*, de Mela Escherich. El la vidpunkto de katalogado, la kunmetaĵo *Du amosentaj noveloj* ankaŭ estas konsiderata verko.

ATRIBUTOJ

Ĉiu ento kunhavas aron de karakterizaĵoj aŭ **atributoj**, kiuj en RDA ricevas ankaŭ la nomon de **elementoj**.

Kiam la uzanto serĉas informon, faras demandojn pere de ili: titolo, dato, lingvo, eldono, etc.

Ili estas ĝenerale dividitaj en du larĝaj kategorioj:

- Tiuj propraj al la ento (portilo, mezuroj, mencioj etikeditaj sur la kovrilo aŭ ujo, ktp.)
- Tiuj asignitaj de ekstere al la ento (strikodo, signaturo, skribita dediĉo, ktp.)

Ĉefaj atributoj de verko[20]

Titolo: vorto, frazo aŭ aro de karaktroj, kiuj nomas ĝin.

Formo: klaso al kiu ĝi apartenas (novelo, teatraĵo, biografio…)

Dato: en kiu ĝi kreiĝis (la plej malnova konata dato ligita al la verko, ofte temas pri la dato de la unuafoja publikigo en la originala lingvo).

Antaŭvidita fino: planita aŭ nedifinita (ĉefa diferenco inter plurvoluma monografio, en kiu oni scias de la komenco, kiom da volumoj konstituos la eldonon, kaj seriaĵoj, kiel ĵurnaloj kaj gazetoj, kies fino ne estas antaŭplanita).

Loko: en kiu ĝi kreiĝis

Identigilo de la verko (norma numero aŭ URI, kiu identigas la verkon, ofte provizata de la respondaj Naciaj Bibliotekoj).

Ili estas registritaj en la aŭtoritata rikordo kaj reprezentitaj en la bibliografia rikordo.

- Rimarku, ke "aŭtoro" ne estas atributo de verko, sed rilato inter la verko kaj iu ento (persono aŭ korporacio) de la grupo 2.

Por nomi verkon necesas deklari ĉi rilaton kun la nomo de la kreinto, sed konservante ilin kiel apartajn entojn.

Ekzemple:



Tiu rilato estas reprezentata en la rikordoj jene:

Cervantes Saavedra, Miguel de. **Don Quijote de la Mancha**

Ĉefaj atributoj de esprimo

Titolo[21]

Formo: teksto, parolo, sono…

Dato: kiam oni verkis aŭ reviziis difinitan tekston de verko…

[20] Estas pliaj atributoj specifaj por muzikaj kaj kartografiaj verkoj ne listigitaj ĉi tie. Same okazas en la suba punkto pri la atributoj de esprimoj.
[21] Kelkaj atributoj, kiel titolo, ripetiĝas en kelkaj entoj, sed ne nepre ili samas.

Lingvo

Modelo de sinsekvo (seriaĵoj): kia estas la skemo de numerado de la numeroj/volumoj

Antaŭvidita reguleco (seriaĵoj): regula aŭ neregula

Ofteco (seriaĵoj)

Identigilo de la esprimo

Enhavo

Kelkajn el tiuj atributoj oni registras en la aŭtoritata rikordo sed havas ankaŭ reprezenton en la bibliografia rikordo.

Ĉefaj atributoj de manifestiĝo

Titolo: ĉeftitolo, titolaldono, paralela titolo, ŝlosila titolo (en seriaĵoj)

Mencio pri respondeco

Mencio pri eldono

Eldondatenoj, ktp.: loko, eldonisto, dato, presisto

Mencio pri serio

Formo, amplekso kaj mezuroj de la portilo (fizikaj karakterizaĵoj)

Identigilo de la manifestiĝo: ISBN, ISSN…

Numerado (seriaĵo)

Postuloj de la sistemo (por elektronikaj risurcoj)

Tipo de medio

Tipo de portilo

Ĉiuj el ili transskribitaj aŭ registritaj en la bibliografia rikordo.

Ĉefaj atributoj de ekzemplero

Identigilo: strikodo, signaturo

Deveno: registro de la antaŭaj posedantoj

Stato de la ekzemplero: difektita kovrilo, difektita bindaĵo, acida papero…

Limigo de aliro: nur en la sidejo, nur por la membroj...

RILATOJ

La rilatoj permesas navigi tra la bibliografia universo kaj ili estas la perilo por starigi ligojn inter la entoj de la sama aŭ malsama grupo.

En la rikordo estas diversaj manieroj esprimi ilin: kunĉenado de atributoj de unu ento kun la atributoj de la rilata ento, aldonante alirpunkton, aŭ per uzado de notoj. Ni vidos kiel ĉio funkcias en la koncernaj ĉapitroj.

Rilatoj inter la entoj de la unua grupo

La rilatoj inter la entoj de la unua grupo (primaraj aŭ esencaj) estas hierarkia:



Entoj de la unua grupo kaj primaraj rilatoj

Verko povas *realiĝi per* unu aŭ pluraj esprimoj. Esprimo povas *materiiĝi en* unu aŭ pluraj manifestiĝoj. Manifestiĝo povas esti *ekzempligita de* unu aŭ pluraj ekzempleroj.

Kaj reciproke, la kopio, kiun mi legas de la Kiĥoto (tiu gardata en Biblioteko Juan Régulo Pérez, ekzemple) *ekzempligas* difinitan manifestiĝon aŭ eldonon (tiun de Fundación Esperanto de 1977), kiu *materiigas* difinitan esprimon (la tradukitan litera-ciferan tekston en Esperanto), kiu *realigas* la verkon de Cervantes.

Estas do gradigo de tio plej abstrakta al tio plej konkreta, kiun oni kutime reprezentas per la siglo WEMI (Work, Expression, Manifestation, Item), laŭ la esprimo en la angla, VEME en Esperanto.

Modelo pri kunmetita manifestiĝo: Du junaj fraŭlinoj kaj Korneliino

Rilatoj inter la entoj de la unua kaj la dua grupoj

La suba skemo montras la respondecajn rilatojn, kiuj povas ekzisti inter la entoj de la unua kaj la dua grupoj. Ekzemple, unu verko povas esti kreata de unu aŭ pli ol unu persono kaj/aŭ unu aŭ pli ol unu korporacio, kaj inverse, unu persono aŭ korporacio povas krei unu aŭ pli ol unu verkon. La afero funkcias simile kun la ceteraj rilatoj kaj entoj.



Ĉi rilatoj estas esprimitaj en la rikordo per la mencioj pri funkcio.

Temrilatoj

La suba skemo montras la temrilatojn inter verko kaj la entoj de la aliaj grupoj. Tio estas, verko povas havi kiel temon, kiun ajn el la entoj el la unuaj du grupoj, kaj kiu ajn el la entoj el la unuaj du grupoj povas esti temo de iu verko.



La entoj de la 3a grupo estas nur skizitaj en FRBR kaj disvolvitaj en FRSAD[22] (*Functional Requirements for Subject Authority Data* = Funkciaj Postuloj por Temaj Aŭtoritataj Datenoj).

Krom la jam menciitaj ankaŭ estas du aliaj larĝaj tipoj de rilatoj inter la entoj de la unua grupo, tiuj koncernantaj la enhavon (derivitaj, ekvivalentaj, priskribaj) kaj la strukturaj (de tuto-parto, sekvencaj, akompanaj).

Jen nur kelkaj ekzemploj ĉar ĉio estos poste klarigata en la koncernaj ĉapitroj.

- Rilatoj verko-verko: resumoj, adaptaĵoj, komplementoj, daŭrigo, dramigo… (ekzemple, iu verko povas esti adaptaĵo aŭ resumo de alia)
- Rilatoj tuto-parto de la sama verko: partoj dependaj (tekstaj ilustraĵoj, prologo…), partoj sendependaj (ĝenerale kun propraj titoloj, kiel parto de trilogio)
- Rilatoj inter esprimoj de la sama verko: reviziitaj aŭ pligrandigitaj eldonoj, tradukoj…
- Rilatoj tuto-parto de la sama manifestiĝo: unu volumo de plurvoluma eldono
- Rilatoj manifestiĝo-manifestiĝo: reproduktaĵoj, faksimiloj, eldonoj en pli ol unu formato (papera kaj bita, ekzemple)…

[22] https://www.bne.es/sites/default/files/repositorio-archivos/frsad-final-report.pdf

- Rilatoj ekzemplero-ekzemplero: kunbindita kun, reproduktaĵo, faksimilo…

Jen sube resuma bildo pri RDA. La bibliografia mondo konsistas el verkoj (bluaj kadroj). La verkoj realiĝas per malsamaj esprimoj, ekzemple diversaj lingvaj versioj, inkluzive de la originala (verdaj kadroj), kaj materiiĝas per konkretaj eldonoj (oranĝkolora kadro), kiuj estas la tradiciaj obĵektoj de la bibliografiaj rikordoj. Fine, la manifestiĝoj ekzempliĝas de la konkretaj kopioj disponeblaj en la bibliotekoj (ruĝa kadro).

Cetere, estas rilatoj kun aliaj verkoj (grizaj linioj): la muzikalo kun libreto de Wasserman, diversaj filmoj, monografioj, kies temo estas la verko de Cervantes…



LASTAJ KONSIDEROJ

La emfazo de RDA pri la transskribado de elementoj kongruas kun la principo de reprezentado de la Internaciaj Katalogaj Principoj, tio estas: *reprezentu la risurcon tiel, kiel ĝi reprezentas sin*. Ĉi tio signifas la forigon de la reguloj de antaŭaj normoj pri mallongigoj, majuskloj, ciferoj kaj simboloj, kaj pri la korektado de malĝustaj datenoj, kiel preseraroj. Por transskribado de informo, do, "*Prenu tion, kion vi vidas*" kaj "*akceptu tion, kion vi havas*" krom kiam specifaj instrukcioj diras ion alian.

RDA ĝenerale preferas ne ŝanĝi tion, kio estas sur la risurco dum la transskribado de informoj, kio povus eventuale ankaŭ faciligi la permaŝinan ĉerpadon de datenoj. Sed en bibliotekoj, kiuj ne faras tiun aŭtomatan ĉerpadon, estas konsilinde sekvi la normalan uzon de la lingvo por transskribado.

Ekzemple, jen du versioj de kvar transskribitaj elementoj: la ĉeftitolo, titolaldono, mencio pri responceco kaj mencio pri eldono. La unua versio montras la uzon de majuskloj ĝuste kiel ili aperas sur la risurco. La uzo (aŭ ne) de majusklaj literoj ne influas serĉadon kaj retrovon en plej multaj mastrumsistemoj, do ambaŭ aliroj estas akcepteblaj. Sed preferindas la dua solvo, se ĝi eblas.

Akceptebla

245 10 $a Cairo : $b THE CITY VICTORIOUS /
$c Max Rodenbeck.
250 ## $a FIRST VINTAGE DEPARTURES EDITION.

Konsilinda

245 10 $a Cairo : $b the city victorious /
$c Max Rodenbeck.
250 ## $a First Vintage Departures edition.

Krom la emfazo pri la graveco konkretigi la ĝeneralan instrukciaron per la kreado de profiloj de aplikado, RDA ankaŭ emfazas la juĝon aŭ opinion de la kataloganto por preni decidojn dum la procezo de katalogado. En la manlibro vi vidos plurajn kazojn, en kiuj la decido registri certajn datenojn aŭ krei kromajn alirpunktojn dependas de la pritakso de la kataloganto.

Vi trovos ĝeneralajn instrukciojn por la registrado de la atributoj, kiuj aplikeblas al ĉiuj subelementoj kaj specifajn instrukciojn por la subelementoj mem. La ekzemploj estas laŭeble realaj el la esperanta bibliografia mondo.

Ĉar Koha funkcias per MARC 21 estas aparta gvidilo por klarigi ĝin. Ankaŭ estas aparta gvidilo pri la rekomendata interpunkcio en ĉiu MARC-kampo kaze de bezono, sed verŝajne la indikoj en la manlibro sufiĉos ĉi-rilate.

Enkonduko en MARC 21

Kiel vidite, Koha estas sendependa de kiu ajn sistemo de kodigo, sed ĉar preskaŭ ĉiuj manstrumsistemoj, inkluzive de Koha, funkcias per la formato MARC 21, estas konsilinde havi minimumajn nociojn pri ĝi.

MARC (*Machine Readable Cataloging* = Maŝinlegebla Katalogado) estas internacia norma komputila formato por faciligi la katalogadon, stokadon kaj interŝangon de bibliografiaj informojn. Ĝi permesas strukturi la datenojn tiel, ke ili estu legeblaj kaj interpreteblaj de la maŝino. Temas pri grava ilo, kiu celas atingi optimuman gradon de normigado kaj kongrueco. Ĝi ankaŭ permesas kunlaboron kaj dividon de rimedoj kaj servoj inter bibliotekoj.

Ekzistas pluraj formatoj bazitaj sur MARC, la plej ofta estas MARC 21, kiu inkludas, i.a., normojn por krei bibligrafiajn, aŭtoritatajn kaj priekzemplerajn rikordojn

Ĉi-ĉapitre ni vidos la strukturon de MARC-rikordo. En la aparta dokumento *Formato MARC 21*, la manieron labori per ĝi kaj klarigojn pri tio, kiel plenigi la diversajn kampojn de la malsamaj rikordoj, kun mencio de la bezonata interpunkcio. Kredeble, la manlibro ĝenerale sufiĉos, sed povas esti okazoj, kiam la kataloganto bezonos pli detalan konsulton.

En la formato MARC 21 la rikordoj (bibliografiaj, aŭtoritataj aŭ priekzempleraj) havas tri ĉefajn elementojn:

- Kapo[23]: la unua kampo (000) de la rikordo. Ĝi konsistas el 24 karaktroj. Provizas al la sistemo bazan informon pri la rikordo (amplekson, staton, nivelon de priskribo, tipon de materialo...). Ĝi enhavas du specojn de informoj, unu aŭtomate generitan kaj alian provizitan de la kataloganto.

- Dosierujo[24]: kreita kaj plutenita de la sistemo, ĝi konsistas el segmentoj kun fiksa longeco (12 karaktroj), tiom da, kiom da kampoj havas la rikordon. La kataloganto ne povas modifi ĝin. Ĝi permesas al la sistemo trovi la datenojn rapide kaj efike.

- Areo de datenoj

    - Kontrolkampoj: Enhavas kodigitan informon identigeblan per ties pozicio. Ĉiuj komenciĝas per 00X kaj ne estas ripeteblaj. Ili ne havas indikilojn aŭ subkampojn

    - Datenkampoj: Enhavas bibliografian, aŭtoritatan aŭ priekzempleran informon, depende de la tipo de rikordo. Ilia longeco varias kaj ili estas grupigitaj laŭ niveloj (1XX, ĉefaj alirpunktoj; 7XX, sekundaraj alirpunktoj, ktp.), kiuj povas esti ripeteblaj aŭ ne depende de la informtipo en ili kodigebla. En ili distingeblas la sekvaj elementoj:

        - Etikedoj: 3 ciferoj

        - Indikiloj: Ili estas du, kaj utilas por kvalifiki la etikedon. Ilia valoro dependas de la kampo al kiu ili estas ligitaj.

[23] *Leader* en la angla.
[24] *Directory* en la angla.

- Kodoj de subkampoj: Intermetitaj en la teksto: $a, $b, ktp., antaŭas kaj identigas la elementojn de la diversaj kampoj al kiu ili estas asociitaj kaj de kiuj dependas ties valoroj.

- Rikorda disigilo: montras al la sistemo, ke la registro finiĝis kaj komenciĝas nova.

Jen sube la aspekto de bibliografia MARC-rikordo tiel, kiel ĝi stokiĝas en la datenbanko. En ruĝo, la kapo; en verdo, la dosierujo kaj en nigro, la datenkampoj.

```
01203nam a2200313 i 4500
003000900000005001700009008004100026017001700067020001800084040003300102041001300135080
0220014810000420017024000470021224500990025926000510035830000270040933600220043633700220
0458490003000480500005100510655003000561655002800591700003800619942001300657952010500670
952010500775999000900880_ES-MaBJR_20231217203738.0_150214s1985    spaa|||| |||| 00| f
epo d_   _aB 22864-1985_   _a84-398-3623-6_   _aES-MaBJR_bepo_cES-MaBJR_erdc_1 _aepo_hspa_
_a821.134.2-31"19" _1 _aCela, Camilo José_92_eaŭtoro_4aut_13_a[La familia de Pascual
Duarte._lEsperanto]_13_aLa familio de Pascual Duarte /_cCamilo José Cela ; el la hispana
tradukis Fernando de Diego _   _aBarcelona :_bBarcelona Esperanto-Centro,_c1985_   _a163
p. :_bil. ;_c19 cm_   _aTEKS_2isbdcontent_   _aSENPER_2isbdmedia_0 _a(Hispana literaturo
;_v1)_   _aOriginala titolo: La familio de Pascual Duarte_ 4_950_aRomanoj hispanlingvaj_
4_aTradukoj esperantaj_951_1 _93_aDiego, Fernando de_etradukinto_   _2udc_cLIB_
_00_10_2udc_40_70_8HEF_aES-MaBJR_d2015-02-14_l0_o2896_plbx0000hef002896yy_r2015-02-
14_w2015-02-14_yLIB_   _00_10_2udc_40_70_8MEL_aES-MaBJR_d2015-02-
14_l0_o0743_plbx0000mel000743yy_r2015-02-14_w2015-02-14_yLIB_   _c1_d1__
```

Sed la aspekto de tiu rikordo, en vido komprenebla por la homo estas jena:

000 01203nam a2200313 i 4500
003 ES-MaBJR
005 20231217203738.0
008 150214s1985 spaa|||| |||| 00| f epo d
017 ## $aB 22864-1985
020 ## $a84-398-3623-6
040 ## $aES-MaBJR$bepo$cES-MaBJR$erda
041 1# $aepo$hspa
020 ## $a821.134.2-31"19"
100 1# $aCela, Camilo José$eaŭtoro$4aut
240 13 $aLa familia de Pascual Duarte.$lEsperanto
245 13 $aLa familio de Pascual Duarte /$cCamilo José Cela ; el la hispana tradukis Fernando de Diego
264 #1 $aBarcelona :$bBarcelona Esperanto-Centro,$c1985
300 ## $a163 paĝoj :$bilustraĵoj. ;$c19 cm
336 ## $aTeksto$2rdacontent
337 ## $asenpera$2rdamedia
338 ## $avolumo$2rdacarrier
490 0# $aHispana literaturo ;$v1
655 #4 $aRomanoj hispanlingvaj
655 #4 $aTradukoj esperantaj
700 1# $aDiego, Fernando de$etradukinto$4trl

En bluo, la marc-kampoj uzitaj en ĉi rikordo; en ruĝo, la indikiloj necesaj en ĉiuj kampo. La signon # oni uzas por indiki, ke temas pri blanka spaco (la signon mem oni ne skribas en la rikordo[25]), tio estas, ke

[25] En Koha estas du kvadratetoj en ĉiu kampo, kiun oni plenigas aŭ ne, depende de tio ĉu iu valoro estas bezonata en iu indikilo.

oni ne bezonas indikilon en tiu pozo, sed foje la manko de indikilo ankaŭ havas signifon por la maŝino. En verdo, la kodoj de la subkampoj.

Rimarku, ke la ekzemplojn mi montras laŭ la kutima maniero, kiel oni esprimas la kodigon de la MARC-formato kaj kiu celas komprenigi la konceptojn.

En la praktiko, ĝenerale ne necesas tajpi la kampojn kaj subkampoj por katalogi (tio dependas de la sistemo), ĉar la mastrumsistemoj provizas formularojn por ĉiuj kampoj kaj necesas nur skribi la valorojn de la indikilojn kaj la datenojn. Cetere, kelkaj el tiuj datenoj, depende de la mastrumsistemo, povas esti aŭtomate plenigitaj aŭ prenitaj el malfaldebla menuo se oni tion agordas.

Jen la aspekto de la formularo de Koha por la kampo 245 pri la titolo kaj mencio pri respondeco en bibliografia rikordo:



Jes ja, endas scii en kiuj kampoj kaj subkampoj kodigi la koncernajn informojn kaj kiujn valorojn de la indikiloj uzi en ĉiu kazo. Tio estos detale montrata en la manlibro. Tamen, kaze de dubo aŭ se estiĝas antaŭ vi malofta kazo ne konsiderata en la manlibro, eblas konsulti la informilon pri MARC 21 aŭ rekte la originalan retejon de la formato.

Bone notu, ke la unua ISBD-interpunkcia signo ligita al iu subkampo devas esti ĉiam kodigita fine de la antaŭa subkampom krom el kazo de parentezo, kies kodigon vi trovos en la koncernaj ekzemploj .

Pri ĉi manlibro

Mi provis adapti laŭeble la manlibron al la tipoj de materialoj plej oftaj en Esperanto-biblioteko, havante kiel bazon la kolekton de Biblioteko Juan Régulo Pérez, kiun mi pli bone konas. Ekzemple, ne aperas en la manlibro instrukcioj pri tio, kiel katalogi leĝajn kaj similaj eldonaĵoj, ĉar laŭ mia sperto, ili ne estas publikigataj en Esperanto. Tamen, povus ja esti, ke mia kono pri la bibligrafia Esperanto-produktado estas limigita kaj povas okazi, kie iu biblioteko bezonos iam instrukciojn ne inkluditan en la nuna manlibro. Se tiel, mi petas kontakti min kaj mi kompletigos la instrukciaron en postaj eldonoj. Ankaŭ mi dankus avertojn pri nekongruoj aŭ nesufiĉaj klarigoj de konceptoj.

En ĉi gvidilo troviĝas multaj ekzemploj, plej multaj el kiuj estas prenitaj el la realo. Nur kiam mi ne sukcesis trovi esperantajn ekzemplojn, ili estas neesperantaj aŭ inventitaj.

Por faciligi la konsultadon, anstataŭ strikte sekvi la RDA-skemon pri entoj, atributoj kaj rilatoj, mi sekvas la tradician skemon pri datenoj rilataj al bibliografia priskribo kaj alirpunktoj, kun indiko de la respondaj MARC-kampoj kaj interpunkcio en ĉiu kazo. Trovu pli detalajn informojn, se necese, en la akompanajn informiloj pri tiuj du temoj. Ankaŭ mi provis adapti laŭeble la RDA-teminaron, foje iom malhela, al komunuza lingvaĵo kun la celo fari ĝin pli klara por nefakulo, espereble, sen tro perfidi la spiriton de RDA. Ekzemple, anstataŭ pri “manifestiĝo”, mi parolas pri “eldonaĵo” kaj anstataŭ pri “esprimo”, mi parolas larĝasence pri “traduko” (ĉar la verko ja estis unuafoje esprimita en la originala lingvo). Sed estas aliaj terminoj, kiel la diversaj tipoj de titoloj, kiujn ne eblas simpligi. Por pli bone klarigi ĉiujn konceptojn, trovu en la fino glosaron.

Ĉi unua eldono de la manlibro enfokusigas la katalogadon de monografioj (libroj). Espereble, venonta kompletigita eldono enhavos instrukciojn por katalogi ankaŭ alispecajn materialojn: seriaĵojn, sonregistraĵojn, videojn...

Ĉar plej probable la uzanto de ĉi manlibro katalogos per iu mastrumsistemo kun MARC 21 kiel metadatena strukturo, la instrukcioj aperos kiam eble laŭ la ordo de MARC-kampoj ene de ĉiu apartaĵo, jen en la bibliografia, jen en la aŭtoritata rikordoj.

En la ĉapitro pri *Kreado de bibliografiaj rikordoj*, vi trovos klarigojn pri tio, kiel

- elekti la preferatan fonton de informo
- plenigi la kompleksajn MARC-kampojn de la bibliografia rikordo
- fari la bibliografian priskribon
- elekti la bezonatajn alirpunktojn
- starigi rilatojn inter la katalogata verko kaj aliaj verkoj, agantoj kaj eldonaĵoj, se necese.

Vi trovos ankaŭ instrukciojn por katalogi plurvolumajn aŭ elektronikajn monografiojn en la rubriko *Specialaj kazoj*.

En la sekcio pri *Kreado de aŭtoritataj rikordoj*, troviĝas la instrukcioj por krei normigitajn alirpunktojn (personoj, korporacioj, kongresoj kaj verkoj), validajn por ĉiaspecaj materialoj.

Estas ankaŭ ĉapitro pri la registrado de la informo pri la ekzemplero en KOHA.

Venas poste serio de apendicoj:

- ✓ Preferataj informfontoj por monografioj
- ✓ Risurcoj en nelatinaj skriboj

- ✓ Terminoj kaj kodoj pri funkcioj

Estas ankaŭ ĉapitro pri Praktikaj ekzemploj kaj, fine, Glosaro.

Kiel ĝenerala proceduro por krei bibliografian rikordon, mi konsilas sekvi jenan skemon:

- Unue, starigu la tipon de rikordo uzota (por monografioj, ĉi-kaze) per kodigo de la bezonataj valoroj de la kapo (000). Tio egalas deklari la tipon de katalogata materialo kaj permesas al la sistemo proponi la ĝustan 008 bezonata por tiu materialo.
- Due, registru la datenojn, kiuj konstituas la bibliografian priskribon.
- Trie, kreu la alirpunktojn surbaze de la datenoj, kiujn vi registris en la priskribo.
- Fine, kodigu la informon de la kompleksaj MARC-kampoj kaj la kampoj de numeroj, ĉar kiam la registro estas jam redaktata, estas multe pli facile registri la valorojn taŭgajn por ĉi kampoj.

Nu, kaj por fini, jen lasta rekomendo. Katalogado estas iom kompleksa sed ja lernebla laboro. Ĝia pleja malfacilo ŝuldiĝas al la bezono interpreti regulojn (ĉar neniu regularo povas enhavi ĉiajn eblajn kazojn ekzistantajn), kaj al la normigado de alirpunktoj. Tial, foje vi dubos. Kaj povas okazi, ke hodiaŭ vi pensas pri unu solvo kaj morgaŭ vi emas pensi, ke ja preferindas alia por la sama problemo. Tio tute normalas eĉ por profesiaj bibliotekistoj. Do, ne senkuraĝiĝu kaj pensu, ke neperfekta katalogado pli bonas ol nenia katalogado. Ek do al la laboro!

1. KREADO DE BIBLIOGRAFIAJ RIKORDOJ

1.1. Enkonduko

Trovu en ĉi sekcio gvidilon por la katalogado de unuvolumaj presitaj monografioj. Por plurvolumaj presitaj mononografioj aŭ monografioj en elektronika formato, konsultu respektive la sekciojn *Plurvolumaj monografioj* kaj *Elektronikaj monografioj*.

Antaŭ o krei novan bibliografian rikordon certiĝu per diversaj serĉoj en la katalogo, ke la risurco, kiun vi deziras katalogi ne troviĝas jam katalogita. Tiu rekomendo estas aparte grava se oni partoprenas en projekto de komuna katalogo.

1.2. Tipo de priskribo

Ekzistas du tipoj de bibliografia priskribo: **integra**, kiam oni decidas katalogi la risurcon kompleta, kaj **analiza**, por katalogi nur unu parton de tiu risurco.

Oni uzas la integran priskribon por katalogi:

- Unuvolumajn monografiojn
- Pluvolumajn monografiojn, kies volumojn oni decidas katalogi kune.

Oni uzas la analizan priskribon por katalogi:

- Unu volumon el plurvoluma monografio, kiun oni decidas katalogi aparte.
- Unu monografian komponantan parton (ekzemple, ĉapitron de monografio kun propra titolo, artikolon de gazeto).
- Unu numeron de seriaĵo (ekzemple, monografian numeron de gazeto)

1.3. Kernaj elementoj

RDA starigas aron de kernaj, nome, devigaj elementoj, kiujn oni devas inkludi, se aplikeblaj, en ĉiuj bibliografiaj rikordoj. Cetere, estas aliaj konsilindaj elementoj, registrendaj se bezonate. Ambaŭ tipoj de elementoj estos indikitaj laŭlonge de la manlibro.

1.4. Alternativoj, elekteblaj aldonoj, elekteblaj preterlasoj

En pluraj instrukcioj, RDA permesas malsimilajn aplikojn: alternativojn, elekteblajn aldonojn, elekteblajn preterlasojn. Oni mencios nur la plej konsilindajn por la Esperanto-bibliotekoj, krom en tiuj kazoj, kiam la aplikado de malsamaj instrukcioj povos esti iel utila al kataloganto depende de la trajtoj de ties biblioteko**.**

1.5. Mastrumsistemo

La profilo estas redaktata kun Koha kiel referenca mastrumsistemo, sed por ke ĝi estu utila ankaŭ por bibliotekoj uzantaj aliajn sistemojn, estos eksplicite menciate tio, kio aplikeblas nur al Koha.

1.6. Bibliografia priskribo.

La bibliografia priskribo kolektas tiujn datenojn rilatajn ĉefe al la eldono, ekzempligita de la ekzemplero, kiun vi havas en la mano. Malsamaj eldonoj postulas malsamajn bibliografiajn rikordojn.

Konsideru, ke temas pri malsama eldono kaj redaktu, do, novan bibliografian rikordon se estas ŝanĝoj en:

- la titolo aŭ mencio pri respondeco
- la mencio pri eldono
- la mencio pri publikigo
- la serio
- la enhavo (ekzemple: reviziita aŭ ampleksigita teksto, aldono de antaŭparolo, indekso, ilustraĵoj, bibliografio, ktp.).

Ĝenerale, sed ne ĉiam, la ĉefaj ŝanĝoj rimarkeblos en la fizika priskribo.

La diferencoj en la bindaĵoj (mola, plasta, rigida, ilustrita…) ne postulas malsaman rikordon se neniu el la antaŭaj datenoj ŝanĝiĝas. La informon pri la tipo de bindaĵo registru en la rikordo pri la ekzemplero.

1.6.1. Ĝeneralaj instrukcioj

1.6.1.1 Lingvo kaj skribo

Registru la priskribajn elementojn (titolon, mencion pri respondeco, mencion pri eldono, datenojn de publikigo, serion) en la lingvo kaj skribo en kiuj ili aperas en la respondaj fontoj. En la kazo de nelatinaj skriboj, vidu la Apendicon: *Risurcoj en nelatinaj skriboj.*

Registru la ceterajn elementojn (inkluzive de la notoj) en Esperanto[26], krom citaĵojn prenitajn el la risurco se ili estas en alia lingvo.

1.6.1.2 Transskribo kaj majuskloj

Transskribu la diversajn elementojn sekvante la normojn de la respondaj lingvoj. Same por la uzado de majuskloj.

245 10 $aHistorieto de Esperanto /$cLudovikito

[En la fonto: historieto de esperanto / ludovikito]

1.6.1.3 Datenoj prenitaj de ekster la risurco kaj interpolaĵoj

Registru interkrampe ([]) kiun ajn elementon aŭ subelementon prenitan de ekster la eldonaĵo. Uzu la krampojn ankaŭ por interpolaĵon.

1.6.1.4 Interpunkcio

Transskribu la interpunkcion tiel, kiel ĝi aperas en la fonto.

26 Aŭ en la lingvo de via katalogo, se vi decidis, ke ĝi estas alia ol Esperanto.

245 10 $a...Kun siaspeca spico!

Sed se ĝi povas okazigi konfuzon, preterlasu aŭ modifu la interpunkcion por pli bona komprenigo de la teksto.

264 #1 $aBoston, Mass.

[En la fonto: Boston, [Mass.]. La krampoj indikas datenojn prenitajn ekster la risurco aŭ interpolaĵojn de la kataloganto, tial ne transskribu ilin. Ankaŭ eblas anstataŭi ilin per parentezo, se la interpunkcio bezonatas por la taŭga komprenado de la informo laŭ la opinio de la kataloganto.]

1.6.1.5 Diakritaĵoj

Aldonu la diakritaĵojn forestajn el la fonto laŭ la komuna uzo de la koncerna lingvo.

245 14 $aLes misérables

[En la fonto: LES MISERABLES]

Alternative: Transskribu diakritaĵojn tiel, kiel ili aperas en la fonto.

1.6.1.6 Simboloj

Transskribu la simbolojn reprodukteblan. Kreu kroman alirpunkton por faciligi la rekuperadon. Vidu ankaŭ la sekcion *Titolvariantoj*.

245 13 $aLa enigmo de l' ar@neo

246 3# $aLa enigmo de l' araneo

Anstataŭu la simbolojn ne reprodukteblajn per interkrampa priskribo de tiu simbolo. Redaktu klarigan noton se vi trovas tion necesa.

245 13 $aLa [suno] hispana

500 ## $aAnstataŭ la vorto “suno”, aperas desegnita suno

[En la fonto: La ☼ hispana]

Preterlasu aŭ ŝanĝu reprodukteblan signon per iu alia kun simila signifo, kiam, laŭ la opinio de la kataloganto, ties transskribado povus okazigi konfuzon.

245 02 $aA history of French-speaking countries

[En la fonto: A history of French=speaking countries. La signo “=” en la ISBD-interpunkcion markas la paralelajn informojn]

1.6.1.7 Interspacoj en inicialoj kaj sigloj

Se en la fonto aperas sigloj aŭ inicialoj kun spacoj inter ili, forigu tiujn spacojn.

264 #1... : $bALA

[En la fonto: A L A]

264 #1... : $bS.J. Perelman

[En la fonto: S. J. Perelman]

1.6.1.8 Literoj aŭ vortoj legendaj pli ol unu fojon.

Se unu vorto aŭ litero aperas nur unu fojon, sed la dizajno de la fonto klare indikas, ke la intenco estas legi ĝin pli ol unu fojon, ripetu tiun vorton aŭ literon.

245 00 $aCanadian citations = $bCitations canadiennes

[En la fonto: "Canadian CITATIONS canadiennes"]

1.6.1.9 Mallongigoj

Ne mallongigu vortojn el la transskribendaj elementoj. Uzu nur tiujn mallongigojn trovitajn en la fonto.

245 10 $aSt. Murphy's commandments

[En la fonto: "St. Murphy's commandments"]

1.6.1.10 Neĝustaĵoj

Transskribu la neĝustaĵojn aŭ preserarojn tiel, kiel ili aperas en la fonto, krom se la instrukcioj por la transskribo de difinita elemento diras la malon.

Redaktu noton korektante la neĝustaĵon se vi trovas tion grava por la identigo de la risurco aŭ ĝia retrovo en la katalogo.

245 14 $aKongresa libro de la 29-a Internacia Juoulara Kongreso

246 1# $iKorektita titolo: $aKongresa libro de la 29-a Internacia Junulara Kongreso

100 1# $aCumbreras, Isabel$eaŭtoro

245 10 $aEsperanto kaj interreto / $cIsabel Contreras

500 ## $aLa mencio pri respondeco enhavas eraron: "Isabel Contreras" fakte estas "Isabel Cumbreras"

1.6.1.11 Numeroj kaj datoj

Transskribu la numerojn en la elementoj titolo, mencio pri respondeco kaj mencio pri eldono (kaj ĉiuj ĝiaj subelementoj), tiel, kiel ili aperas en la fonto.

Por la registrado de numeroj en ĉi aliaj elementoj:

- datoj de produktado, eldono, distribuo, fabrikado kaj kopirajto
- numerado de la serio kaj subserio,
- dato de prezentado de disertacio

sekvu la subajn instrukciojn:

Formo de la numeroj

Registru la numerojn tiel, kiel ili aperas en la fonto.

490 0#...; $vvolumo III

En la kazo de la romanaj ciferoj, registru ilin ĉiam majuskle, sendepende la formo en kiuj ili aperas en la fonto.

490 0#...; $vXVII

[En la fonto la numerado de serio aperas minuskle: xvii]

Numeroj esprimitaj vorte

Anstataŭu per numeraloj la numerojn esprimitaj vorte:

245 00 $aSnapshots of infidelity.$nVolume 3

[En la fonto: "Volume Three"]

Inkluzivaj numeroj

Registru kompletaj ambaŭ numerojn.

264 #1 ...$c1972-1974

Ne

264 #1 ...$c1972-74

Ordinaloj

Registru la ordinalojn per ciferoj kaj indiku ke temas pri ordinaloj sekvante la norman uzon de la responda lingvo (1a, 2º, 3rd, 第8, ktp.).

1.6.2. Informfontoj

1.6.2.1 Determino de la ĉefa informfonto

La informfontoj provizas la bezonatajn datenojn por fari la priskribon kaj oni ne povas elekti ilin arbitre. Preferindas la internaj fontoj ol la eksteraj, ĉar ĝenerale ili estas pli fidindaj.

La elekto de la ĉefa informfonto estas antaŭa fazo al la taskoj de priskribo kaj elekto de alirpunktoj, kaj ĝi estas tre grava por taŭga katalogado.

Antaŭ katalogota risurco, oni devas unue konsideri la tipon de eldonaĵo, kiun ni havas en la mano kaj la tipon de priskribo, kiu plej taŭgas al ĝi, por decidi la ĉefan fonton de informo sur kiu baziĝos la katalogado.

Kiel ĝenerala regulo, la preferata informfonto estas la titolpaĝo, sed povas esti kazoj, en kiuj preferindas alia fonto de informoj.

1.6.2.1.1. Integra priskribo

En la kazo de integra priskribo, ĉu temas pri unuopa ĉu pri plurvoluma monografio, **elektu tiun informfonton, kiu identigas la risurcon kiel tuton**.

Se la risurco enhavas plurajn verkojn, preferu informfonton kun **kolektiva titolo**. Se tiu informfonto ne estas la titolpaĝo redaktu noton indikante de kie vi prenis la titolon.

245 10 $aNoveloj

500 ##$aTitolo prenita el la kovrilo

[En la titolpaĝoj aperas la individuaj titoloj de la noveloj, en la kovrilo, la kolektiva titolo]

Se ne estas kolektiva titolo, konsideru la tipon de eldonaĵo:

En unuvoluma monografio:

- Se ne estas fonto, kiuj identigas la tuton, sed estas fonto, kiu identigas la ĉefan enhavon, elektu tiun fonton. Preskaŭ ĉiam ĝi estos la titolpaĝo.
- Se ne estas fonto por la tuto kaj ankaŭ ne por iu ĉefa parto, traktu la informfontojn, kiuj identigas la individuajn enhavojn kiel kolektivan fonton por la tuta risurco. Ekzemple, en publikaĵo enhavanta du verkojn kun inversita enpaĝigo[27], ambaŭ same gravaj kaj ambaŭ kun propra titolpaĝo kaj kovrilo. En tiuj kazoj, konsideru, ke ambaŭ titolpaĝoj konstituas unu solan fonton de informo.

En plurvoluma monografio:

- Se ne estas fonto, kiu identigas la tuton kaj la volumoj estas numeritaj, elektu la fonton, kiu identigas la unuan volumon.
- Se la volumoj ne estas numeritaj aŭ ties numerado ne permesas ordigi ilin, elektu la fonton kiu identigas la volumon kun la plej malnova dato, t.e., la unue publikigita.
- Last-rimede, elektu tiun fonton, kiuj identigas la unuan disponeblan parton kaj registru noton indikante la volumon sur kiu baziĝas la priskribo. Ekzemple, se oni ne disponas la unuan volumon el trivoluma eldonaĵo, bazu la priskribon sur la dua volumo.

588 ## $aPriskribo bazita sur: volumo 2

1.6.2.1.2. Analiza priskribo

Kiam vi faros analizan priskribon de unu individua parto de risurco, same se temas pri unuopa aŭ plurvoluma monografio, **elektu tiun informfonton, kiu identigas la individuan parton**, kiun vi priskribas.

245 1# $aAdverboj en Esperanto /$cProbal Daŝgupto

500 ##$aTitolo prenita el la paĝo 119

[Temas pri eseo de Probal Daŝgupto publikigita en la dua volumo de Serta gratulatoria in honorem Juan Régulo. La titolo aperas sur paĝo 119. Se ni dezirus katalogi ĉi eseon, la preferata fonto de informo estus tiu paĝo, ĉar en ĝi troviĝas la titolo de la katalogota parto.]

1.6.2.2 Preferata fonto de informo

Prenu la titolpaĝon kiel preferatan fonton de informo. Ĝi estos la plej ofta cirkonstanco. Konsideru ankaŭ la sekvajn kazojn senecese:

Se ne estas titolpaĝo:

Prenu la informon el la sekvaj fontoj, laŭ ordo de prefero:

[27] En la franca kaj angla: *tête-bêche*; en la hispana, *contrapuestos.* Eldono ĝenerale de dulingva teksto, en kiu ĉiu versio komenciĝas je malsama flanko de la libro kaj ambaŭ finiĝas meze, do la leganto devas turni la libron por iri de unu versio al alia.

1. Kovrilo aŭ jaketo
2. Dorso de la titolpaĝo, kolofono kaj aliaj antaŭtekstoj
3. Alia fonto ene de la risurco

Se estas pli ol unu titolpaĝo:

Se estas pli ol unu titolpaĝo en pluraj lingvoj aŭ skriboj, elektu la fonton laŭ la suba ordo de prefero:

1. La fonto en la lingvo de la enhavo de la risurco *(ekzemple: estas titolpaĝo en du lingvoj, sed la enhavo nur en unu)*.
2. La fonto en la lingvo de la ĉefa enhavo de la risurco *(ekzemple: estas titolpaĝo kaj enhavo en du lingvoj, sed en unu el ili estas ankaŭ enkonduko)*.
3. La fonto en la lingvo de la traduko, se montri la tradukon estas la celo de la risurco.
4. La unua aperanta fonto.
5. La fonto en Esperanto se la risurco havas inversitan enpaĝigon aŭ similan formaton *(komencu la priskribon per la esperantaj datenoj kaj donu la alilingvajn kiel paralelajn)*.

Se neniu el la antaŭaj kategorioj aplikeblas, elektu iun ajn el la informfontoj.

Se estas pluraj titolpaĝoj aŭ fontoj kun malsamaj datoj, elektu tiun kun la plej moderna dato.

Se, en faksimiloj aŭ reproduktaĵoj, **estas unu fonto por la originalo kaj alia por la reproduktaĵo**, elektu tiun de la reproduktaĵo kiel ĉefan.

Se en la risurco ne estas fonto kun sufiĉe da informoj por identigi ĝin:

Prenu la informon, kiun vi trovos el la sekvaj fontoj (laŭ ordo de prefero) kaj transskribu ĝin interkrampe:

1. Aldona materialo
2. Publikigita priskribo de la risurco
3. Ujo ne publikigita kun la risurco (ekzemple, skatolo pretigita de la posedanto)
4. Kiu ajn alia fonto disponebla (ekzemple, referenca fonto)

Ĉiam redaktu noton indikante la fonton de kie la titolo estas prenita, se ne temas pri la titolpaĝo.

1.6.3. Priskribo

La sekcio estas organizita sekvante laŭeble la ordon de kampoj en MARC 21 anstataŭ la enan logikon de registrado de atributoj laŭ la entoj de RDA, ĉar la mastrumsistemoj prezentas la katalogan formularon sekvante la ordon de la formato.

1.6.3.1 Identigilo de la eldonaĵo

1.6.3.1.1. Informfontoj

La tuta risurco estas fonto por ĉi tiuj elementoj. Prenu la identigilojn de kiu ajn parto de la eldonaĵo, kie ili aperas.

1.6.3.1.2. Kopirajta aŭ leĝa deponnumero

MARC 21: 017 $a

En multaj landoj, la leĝa deponnumero utilas por krei la naciajn bibliografiojn kaj ofte estas la naciaj bibliotekoj, kiuj surprenas tiun taskon.

Registru ĉi numerojn, laŭ via opinio kiel kataloganto, se vi trovas la informon utila por la identigo de la eldono.

017 ## $aDL 80-0-1524

[Ekzemplo de kanada leĝa deponnumero]

017 ## $aLE 746-2015

[Ekzemplo de hispana leĝa deponnumero]

017 ## $aPA 1-060-81

[Ekzemplo de usona kopirajta numero]

1.6.3.1.3. ISBN

KERNA

MARC 21: 020 $a (ISBN) $q (kvalifikilo)

Registru ISBN-on tiel, kiel ĝi aperas en la informfonto. Respektu la streketojn se ili enestas.

020 ## $a978-0-379-00550-9

020 ## $a978841437615X

Registru ĉiujn ISBN-ojn ĉeestajn en la risurco se ili rilatas al la katalogata eldono. Ne registru numerojn rilatajn al antaŭaj eldonoj.

Kvalifikiloj

Kiam necesos registri plurajn ISBN-ojn en la sama bibliografia rikordo, uzu kvalifikilojn por distingi ilin. La kvalifikiloj povas rilati al la tipo de bindaĵo, nomoj de eldonintoj (en la kazo de kuneldonoj), unuopaj volumoj aŭ kompleta verko[28], portilo, enhavo, ktp.

Transskribu la kvalifikilojn tiel, kiel ili aperas en la fonto. Ne mallongigu la kvalifikilon, krom se ĝi aperas mallongigita en la fonto. Se la kvalifikilo ne aperas en la fonto, havigu iun taŭgan en Esperanto se vi disponas tiun informon kaj vi trovas ĝin necesa por identigi la eldonaĵon.

Ne enmetu la kvalifikilojn inter parentezoj.[29]

020 ## $a9780778554660 $qpaperback

[en la angla en la fonto]

[28] En plurvolumaj verkoj, laŭnorme, devas ekzisti po unu ISBN por volumo kaj unu plia por la volumaro, sed ofte la regulon oni ne plenumas, aŭ plenumas nur parte.

[29] Kvankam la ISBD-instrukcio en rilato al la kvalifikiloj estas meti ilin inter parentezoj, pro praktikaj kialoj kaj ĉar tio ne malutilos la rekuperadon aŭ la komprenon, la rekomendo estas ne sekvi ĝin ĉi-kaze.

020 ## $a978-1-4094-4207-3 $qebk – PDF

[mallongigita en la fonto]

020 ## $aa978-0-379-00550-9 $qkompleta verko

020 ## $aa978-0-379-00551-X $qvolumo 1

020 ## $aa978-0-379-00552-2 $qvolumo 2

[duvoluma eldonaĵo]

020 ## $a978-1-1184-5893-4 $qMondial

020 ## $a978-84-2365-562-0 $qPro Esperanto

[imagita kuneldono de Mondial kaj Pro Esperanto]

Se iu ISBN bezonas plurajn kvalifikilojn, la ordo de registrado estas jena: eldoninto aŭ loko de publikigo, komponanta parto, tipo de bindaĵo

020 ## $a978-1-1184-5891-4 $qMondial ; $qkompleta verko; $qkartona bindaĵo

020 ## $a978-1-1184-5892-X $qMondial ; $qvolumo 1; $qkartona bindaĵo

020 ## $a978-1-1184-5893-2 $qMondial ; $qvolumo2; $qkartona bindaĵo

020 ## $a978-1-1184-5894-6 $qMondial ; $qkompleta verko; $qbroŝurita

020 ## $a978-1-1184-5895-2X $qMondial ; $qvolumo 1; $qkartona bindaĵo

1.6.3.1.4. Aliaj identigiloj

MARC 21: 8# 024 $a

Registru aliajn normigitajn identigilojn[30], laŭ via juĝo kiel kataloganto, se vi trovas ĉi informon utila por la identigo de la eldono.

Ekzemple: NIPO (Identiga Numero de Oficialaj Publikaĵoj)[31]

024 7# $aNIPO 032-16-002-5 $2nipo

Ĉi kampo aplikeblas nur al normigitaj identigiloj. Registru kiel noton aliajn identigilojn ne normigitajn. Ekzemple, numeroj de la katalogoj de Stojan aŭ Pabst.

500 ## $aNumero en la katalogo de Stojan: 5626

1.6.3.2 Titolo

MARC 21: 245-246

Subelementoj:

- Ĉeftitolo *KERNA*

[30] https://www.loc.gov/standards/sourcelist/standard-identifier.html
[31] Número de Identificación de las Publicaciones Oficiales (NIPO), kodo uzata en Hispanio de la Ŝtata Ĝenerala Administracio por identigi la oficialajn eldonaĵojn.

- Paralela titolo *KERNA se ĝi aperas en la sama fonto, kiel la ĉeftitolo*
- Titolaldono *KERNA se ĝi aperas en la sama fonto, kiel la ĉeftitolo*
- Paralela titolaldono *KERNA se ĝi aperas en la sama fonto, kiel la ĉeftitolo*
- Titolvarianto

1.6.3.2.1. Transskribo de la titolo

Transskribu titolon tiel, kiel ĝi aperas en la titolpaĝo.

1.6.3.2.1.1. Mallongigo de longaj titoloj

Mallongigu longan titolon nur se tio eblas sen perdo de esenca informo. Uzu la markon de preterlaso (…) por indiki la mallongigon. Neniam preterlasu unu el la kvin unuaj vortoj de la titolo.

> 245 12 $aA booke of cookerie and the order of meates to bee serued to the table ...
>
> *[En la informfonto: A booke of cookerie and the order of meates to bee serued to the table, both for flesh and fish dayes, with many excellent wayes for the dressing of all vsuall sortes of meates, both bak't, boyld or rosted, of flesh, fish, fowle, or others, with their proper sawces, as also many rare inuentions in cookery for made dishes, with most notable preserue of sundry sorts of fruits, likewise for making many precious waters, with diuers approved medicines for grieuous diseases, with certaine points of husbandry how to order oxen, horses, sheepe, hogges, &c., with many other necessary points for husbandmen to know]*

1.6.3.2.1.2. Preseraroj kaj neĝustaĵoj en la titolo

Transskribu la preserarojn kaj neĝustaĵojn tiel, kiel ili aperas en la fonto. Redaktu noton por registri la ĝustan formon de la titolo.

Konsultu ankaŭ la sekcion *Titolvarianto*.

1.6.3.2.1.3. Nomoj de personoj, familioj kaj korporacioj en la titolo

Se titolo enhavas nomon, kiun normale oni devus trakti kiel parton de mencio pri respondeco aŭ kiel la nomon de eldonisto, ktp., kaj tiu nomo estas integra parto de la titolo, registru la nomon kiel parto de la titolo. Ne ripetu en $c la saman nomon kiel mencion pri respondeco krom se estas plia sendependa mencio pri respondeco en la risurco.

> 245 10 $aVerkoj de prezidanto Maŭ Zedong
>
> 245 10 $aFabloj de I.A. Krilov
>
> *[En la fonto: Fabloj de I. A. Krilov]*
>
> Sed:
>
> 245 10 $aFabloj de I.A. Krilov /$cI.A. Krilov
>
> *[En la fonto: I. A. Krilov - Fabloj de I. A. Krilov]*

1.6.3.2.1.4. Enkondukaj vortoj

La juĝo de kataloganto determinos ĉu nomo de korporacio, kiu aperas antaŭ la titolo devas esti transskribita aŭ ne kiel parto de la titolo. Por tio, konsideru la sinsekvon de la vortoj, la prezenton kaj la tipografion ĉe la informfonto por decidi ĉi tiu nomo estas aŭ ne parto de la titolo.

Se oni transskribas ĝin kiel parton de la titolo, registru la titolon sen ĝi kiel titolvarianton, se vi trovas tion utila:

245 10 $aReuters our world now

246 13 $aOur world now

Se oni ne transskribas ĝin kiel parton de la titolo, registru la nomon de la korporacio en noto se vi trovas tion utila:

500 ## $aAntaŭ la titolo: Sennacieca Asocio Tutmonda

1.6.3.2.2. Ĉeftitolo

KERNA ELEMENTO

MARC 21: 245 $a, $n, $p

Rekomendo: ĉar la kodigo de la kampo 245 estas sufiĉe kompleksa, konsilindas ankaŭ konsulti la kampon 245 en la gvidilo *Formato MARC 21.*

La ĉeftitolo estas la titolo propra de la risurco, nome, la titolo en la formo, kiun ĝi havas en la preferata fonto de informo de la eldonaĵo. La ĉeftitolo povas inkludi alternativajn titolojn kaj la numeron de la parto aŭ sekcio kaj la nomon de ĉi lasta, sed ne paralelajn titolojn aŭ titolaldonojn.

En la risurcoj enhavantaj plurajn sendependajn verkojn oni konsideras, ke la ĉeftitolo estas la kolektiva titolo. En la risurcoj enhavantaj plurajn sendependajn verkojn en kiuj ne estas kolektiva titolo, la titolo de la unua verko funkcias kiel ĉeftitolo de la tuta risurco.

1.6.3.2.2.1. Informfontoj

Prenu la ĉeftitolon el la titolpaĝo aŭ alia informfonto laŭ la indikita ordo en la sekcio *Preferata fonto de informo*.

En multaj kazoj, la ĉeftitolo koincidas kun la preferata titolo de la verko, sed temas pri malsamaj konceptoj. Konsultu la sekciojn *Titolo de la Verko* kaj *Elekto de la preferata formo* de la verko.

1.6.3.2.2.2. Registro de la ĉeftitolo

Registru la ĉeftitolon sekvante la ĝeneralajn instrukciojn indikitajn en la sekcio *Titolo* de ĉi dokumento. Krome, prikonsideru jenon:

Majuskloj:

Skribu majuskle la unuan vorton de la titolo kaj, se tiu estas la kazo, ankaŭ de la titolo de parto, sekcio aŭ suplemento. Skribu majuskle ankaŭ aliajn vortojn ene de la titolo laŭ la norma uzo de la lingvo de la titolo.

245 00 $aSepa oficiala aldono al la Universala Vortaro

245 00 $aHistòria de l'esperanto als països catalans

245 12 $aA supplement to the Esperanto-English dictionary of Millidge

245 10 $aKonkordanco al la Krestomatio.$nUnua parto,$pLa participoj

245 10 $aEtimologia vortareto pragmata de Esperanto.$pSuplemento

Ne kutimaj majuskloj

Por titoloj kun nekutimaj majuskloj, transskribu ilin tiel, kiel ili aperas en la informfonto.

245 10 $aeBay bargain shopping for dummies

245 10 $aSympoTIC '06

Ĉi ekzemploj rompas la regulojn skribi la unuan literon de la vorto majuskle kaj la ceteraj minuskle. Temas en tiuj kazoj pri nekutima uzo, kiun oni rekomendas respekti: eBay anstataŭ Ebay por la retejo; SympoTIC anstataŭ Sympotic por la kongreso.

Artikoloj:

Skribu la artikolon komence de la titolo kaj indiku la nombron de karaktroj, kiuj ne alfabetigas (tio inkluzivas la spacon post la artikolo) en la dua indikilo de la kampo 245, laŭ tio specifita en la formato MARC 21 por bibliografiaj rikordoj.

245 0**3** $a**An** old man's fable!

245 1**4** $a**Die** Ermittelung des Datumtages im christlichen Zeitalter

245 1**3** $a**La** liberiĝo de la juĝisto

1.6.3.2.2.3. Facsimiloj kaj reproduktaĵoj

Kiam la ĉeftitolo de la reproduktaĵo estas malsimila al tiu de la originala eldono, elektu la titolon de la reproduktaĵo kiel ĉefan titolon.

Se ambaŭ aperas en la sama fonto, registru la ĉefan titolon de la originalo:

a) jen kiel paralelan titolon, se estas en lingvo malsimila al tiu de la faksimilo,
b) jen kiel titolaldonon,
c) aŭ jen kiel la titolon de rilata eldonaĵo.

1.6.3.2.2.4. Alternativa titolo

Alternativa titolo estas dua titolo de verko kunigita al la unua pere de la konjunkcio "aŭ”, aŭ ties ekvivalento en aliaj lingvoj.

Traktu alternativan titolon kiel parton de la ĉeftitolo.

245 10 $aMaja nokto aŭ La dronintino

Decidu, laŭ via juĝo kiel kataloganto, ĉu la alternativa titolo postulas aŭ ne alirpunkton.

246 30 $aLa dronintino

Konsultu ankaŭ la sekcion *Titolvarianto*.

1.6.3.2.2.5. Kolektiva titolo

La kolektiva titolo identigas risurcon enhavantan kolekton de pluraj sendependaj verkoj, ĉiu el ili kun sia propra titolo.

Se la risurco havas informfonton kun kolektiva titolo kaj individuaj titoloj, registru la kolektivan titolon kiel la ĉeftitolon.

Registru la individuajn titolojn en kampo 505 se vi trovas ilin gravaj por la identigo de la risurco aŭ la aliron al ĝi. Por vidi la instrukciojn pri la registrado de la rilataj verkoj kaj esprimoj (kampoj 700 de la ekzemplo), vidu la sekcion *Rilataj verkoj* .

245 00 $a**Du amosentaj noveloj**

505 0# $aImenlago / Theodor Storm. Maruŝka / Mela Escherich

100 10$aTolstoj, Lev Nikolaevič

243 10$aNoveloj.$kElektaĵo

245 10$a**Tri rakontoj** /$cLev Nikolajeviĉ Tolstoj

505 0#$aPer kio la homoj vivas ; Kie estas amo, tie estas Dio ; Du maljunuloj

1.6.3.2.2.6. Risurcoj sen kolektiva titolo

Se ne estas kolektiva titolo, registru la unuan titolon aperantan en la fonto kiel la ĉeftitolon de la tuta risurco. La subkampo 245$a enhavu la unuan titolon de tiuj sendependaj verkoj. Registru la ceterajn titolojn en $b aŭ $c, depende de tio, kiel estas prezentataj la datenoj en la informfonto (vidu sube du ekzemplojn). En kazo de dubo pri kodigo aŭ interpunkcio, konsultu la gvidilojn *Formato MARC 21* kaj *Interpunkcio*.

245 00 $a**In praise of older women** /$cStephen Vizinczey. Feramontov / Desmond Cory. The graveyard shift / Harry Patterson

[La risurco enhavas tri verkojn de malsamaj aŭtoroj sen kolektiva titolo. La titolo de la unua verko, registrita en 245$a funkcias kiel ĉeftitolo de la manifestiĝo]

100 10 $aKivi, Aleksis

243 10 $aTeatro.$kElektaĵo

245 13 $a**La fianĉiĝo** ;$bLea : du teatraĵoj /$cAleksis Kivi

[La risurco enhavas du verkojn de la sama aŭtoro sen kolektiva titolo. La titolo de la unua verko, registrita en 245$a funkcias kiel ĉeftitolo de la eldonaĵo]

1.6.3.2.3. Paralela titolo

KERNA ELEMENTO se oni prenas ĝin el la sama fonto kiel la ĉeftitolo.

La paralelaj titoloj prenitaj el aliaj fontoj ne estas devigaj.

MARC 21: 245 $b aŭ, ĉar ĉi subkampo ne estas ripetebla, alia subkampo kun la konvena ISBD-interkpunkcio (=)

Rekomendo: ĉar la kodigo de la kampo 245 estas sufiĉe kompleksa, konsilindas ankaŭ konsulti la kampon 245 en la gvidilo *Formato MARC 21.*

Paralela titolo estas la sama titolo en alia lingvo aŭ skribo prezentata kiel sama aŭ ekvivalenta al la ĉeftitolo, sendepende de tio, ĉu la verko troviĝas aŭ ne en ambaŭ lingvoj ene de la risurco.

Registru ĉiam la paralelajn titolojn, kiuj troviĝas en la sama fonto kiel la ĉeftitolo.

Registru la paralelajn titolojn, kiuj aperas en aliaj fontoj ene de la risurco, se vi trovas ilin gravaj por la identigo de la risurco.

245 13 $aLa morto kaj la kuracisto **=$bA halál és az orvos**

245 10 $aMi inventas la mondon **=$b(Obmyślam świat)**

Se vi trovas tion necesa, registru la paralelajn titolojn laŭ la indikoj de la sekcio *Titolvarianto*.

1.6.3.2.4. Titolaldono

KERNA ELEMENTO se oni prenas ĝin el la sama fonto kiel la ĉeftitolo.

MARC 21: 245 $b aŭ, ĉar ĉi subkampo ne estas ripetebla, alia subkampo kun la konvena ISBD-interkpunkcio (:)

Rekomendo: ĉar la kodigo de la kampo 245 estas sufiĉe kompleksa, konsilindas ankaŭ konsulti la kampon 245 en la gvidilo *Formato MARC 21.*

La titolaldono aŭ komplementa informo pri la titolo estas vorto aŭ frazo aŭ aro de karaktroj, kiuj aperas en rilato aŭ subordigitaj al la ĉeftitolo de la risurco kaj kompletigas aŭ precizigas ĝin. La titolaldono povas ankaŭ aperi en rilato aŭ subordigita a la paralelaj titoloj, al la variantoj de la ĉeftitolo, al la titoloj de la partoj kaj al la titoloj de la unuopaj verkoj enhavataj en la risurco. Aliaj titolaldonoj povas kvalifiki, klarigi aŭ komplementi la titolon al kiu ili aplikeblas, aŭ indiki ties karakteron, enhavon, ktp., de la risurco aŭ la verkoj en ĝi enhavataj, aŭ montri la kialon aŭ okazon, kiam ĝi publikiĝis. Ĝi inkludas subtitolojn kaj antaŭtitolojn, sed ne inkludas titolvariantojn.

Registru titolaldonon se ĝi troviĝas en la sama fonto kiel la ĉeftitolo.

245 10 $aMarvirinstrato **:$boriginalaj noveloj en Esperanto**

245 10 $aEsperanto and its rivals **:$bthe struggle for an international language**

Se ekzistas pluraj titolaldonoj, kiel ĝenerala normo registru ĉiujn. Se vi opinias, ke estas tro da ili, registru nun tiujn, kiujn vi taksas gravaj por la identigo de la risurco. Registru ĉiujn elementojn en la sama kampo 245$b, disigante ilin per ISBD-interpunkcio (spaco, dupunkto, spaco), laŭ la ordo de sinsekvo, prezento kaj tipografio en la informfonto.

245 10 $aNapolo kaj ties ĉirkaŭaĵoj **:$b(historio, arto, folkloro) : gvidlibro**

245 10 $aRaporto pri publika preleg-kunveno de la 100-a Japana Esperanto-Kongreso **:$bEsperanto en Japanio, Japanio en la Esperanto-movado : lerni de historio por estontaj perspektivoj**

Se estas titolo de parto, sekcio aŭ suplemento, registru la titolaldonon de la komuna titolo per noto.

245 13 $aLa fido en praktiko.$nParto 1

500 ## $a“Lecionoj el la vivo de Georgo Muller”

[En la fonto: La fido en praktiko / Lecionoj el la vivo de Georgo Muller/ Parto 1. La titolaldono rilatas al la titolo de la tuta verko, ne al la parto 1]

Se vi dubas pri tio ĉu iu frazo estas parto de la titolaldono aŭ de la mencio pri respondeco, konsideru ke dateno indikanta la naturon de la verko, kiu aperas kune kun la mencio pri respondeco, ĝenerale oni konsideras mencion pri respondecon. La prezento de la informo helpas preni la decidon.





245 14 $aThe coming of the night **/$ca novel by John Rechy**

[En la fonto “a novel by” aperas kune en la sama alineo]

sed

245 10 $aMarilyn’s daughter **:$ba novel** /$cby John Rechy

[En la fonto “a novel” kaj “by” aperas en malsamaj alineoj]

1.6.3.2.5. Paralela titolaldono

MARC 21: 245 $b aŭ, ĉar ĉi subkampo ne estas ripetebla, alia subkampo kun la konvena ISBD-interkpunkcio (:)

Rekomendo: ĉar la kodigo de la kampo 245 estas sufiĉe kompleksa, konsilindas ankaŭ konsulti la kampon 245 en la gvidilo *Formato MARC 21.*

Se estas paralelaj titoloj:

Prenu la paralelan titolaldonon el la sama fonto kiel la paralelan titolon. Registru la titolaldonon en la sama ordo de la paralela titolo al kiu ĝi respondas. Alivorte, grupigu la informerojn laŭ lingvaj blokoj.

245 10 $aKolce życia **:$baforyzmy z ekologia w tle** = Pikiloj de vivo **: aforismoj kun ekologio fone**

Se ne estas paralelaj titoloj:

Registru titolaldonon en alia lingvo aŭ skribo kiel paralelan titolaldonon.

245 14 $aThe Zazoo **: $bI don't know what to wear! = Je ne sais pas quoi mettre!**

[La risurco ne havas paralelan ĉeftitolon en la franca]

1.6.3.2.6. Titolvarianto

MARC 21: 246 $a, $b, $i, $n, $p (la kampo 246 povas funkcii jen kiel noto, jen kiel alirpunkto, depende de la indikiloj); 500 $a

Registru per noto la korektitan titolon, kiam enestos iu neĝustaĵo aŭ tipografia eraro en la ĉeftitolo.

245 10 $aHeirarchy in organizations

246 1# $iKorektita titolo: $aHierarchy in organizations

Transskribu alian titolon, kiu diferencas de la ĉeftitolo si vi trovas ĝin grava por identigi aŭ aliri la risurcon. Temas pri titoloj el aliaj fontoj, partoj de la titolo, titolvariantoj devenantaj el anstataŭo de numeraloj per vortoj, ktp.

Transskribu la titolvariantojn same kiel la ĉeftitolon, kun komencaj artikoloj.

La sekva tabelo estas simpligita gvidilo por la kodigo de titolvariantoj en la kampo 246.

Ind. 1	Ind.2	SPECO DE TITOLO	Ligita etikedo[32]
0 *(Se oni konsideras, ke noto bezonatas)*	#	-$iKorektita titolo *(kiam estas eraro en la ĉeftitolo)* -$iSubtitolo de la kovrilo -$iTitolo de la kolofono -$iParalela titolo el la kovrilo -$iTitolo de la paĝo 4 de la kovrilo. -$iTitolo de la aldona titolpaĝo en la rumana -$iTitolo el la etikedo *(aŭ aliaj fontoj de elektronikaj risurcoj)*	La sistemo generas neniun etikedon implicite. Oni uzas kiel etikedon, tiun ligitan al la noto kodigita per $i.
1 *(Se oni konsideras, ke noto kaj aldona alirpunkto bezonatas)*	#		
3	#	- Numeraloj kiel parto de la titolo, kiuj ne estas datoj. - La titolo estas jaro. - Romanaj ciferoj kiel parto de la titolo - Ordinaloj, kiam, laŭ la prijuĝo de kataloganto, estos utilaj.	La sistemo generas neniun etikedon
3	0	- Alternativa titolo. - Parto de titolo *($b aŭ $p signifaj)*. - Formo mallongigita aŭ ampleksa de titolo kun ekvivalenta valoro en la sama fonto, kiu aperas en 245 $b.	La sistemo generas neniun etikedon.
3	1	- Paralela titolo *(jam priskribita en 245)*	La sistemo generas neniun etikedon.

32 La ligitaj etikedoj por vidigo en ĉi kampo ne ĉiam estas bone mastrumitaj de la sistemoj. Koha nur generas kelkajn el ili kaj plej ofte la etikedo de vidigo estas nur *Plia titolo*. Tamen, oni bone sekvu la suprajn instrukciojn, ĉar tio, kio gravas estas bona kodigo laŭ la formato. Sistemoj estas akcesoraj kaj interŝangeblaj. Ili ne devus kondiĉigi kvalitan kodigadon.

Ind. 1	Ind.2	SPECO DE TITOLO	Ligita etikedo[32]
1	3	- Titolvarianto *(Oni uzos ĝin esceptokaze: kiam oni ne povos identigi la fonton per iu el la ceteraj indikiloj).*	Generita etikedo de la sistemo: Titolvarianto.
1	4	- Titolo de la kovrilo	Generita etikedo de la sistemo: Titolo de la kovrilo.
1	5	- Titolo de la aldona titolpaĝo	Generita etikedo de la sistemo: Titolo de la aldona titolpaĝo
1	6	- Titolo de la kapo	Generita etikedo de la sistemo: Titolo de la kapo.
1	7	- Titolo de la marĝeno	Generita etikedo de la sistemo: Titolo de la marĝeno
1	8	- Titolo de la spino	Generita etikedo de la sistemo: Titolo de la spino

Jen kelkaj ekzemploj pri uzado de ĉi kampo:

245 10 $aIdeas para el día a día

246 1# $iParalela titolo ĉe la kovrilo:$aIdeoj por la ĉiutaga vivo

245 00 $a4 sezonoj :$bhajkoj en 4 lingvoj

246 3# $aKvar sezonoj

245 10 $a1905 :$bprologo de la estontaj grandaj eventoj, ŝanĝintaj la sorton de Rusio kaj la mondo

246 3# $aMil naŭcent kvin

245 13 $aLa enigmo de l' ar@neo

246 3# $aLa enigmo de l' araneo

245 10 $aTiel okazis aŭ Mistero minora

246 30 $aMistero minora

245 00 $aEkumena diserva libro.$n2a kajero,$pDiservoj

246 30 $aDiservoj

245 10 $aStudoj pri la internacia lingvo =$bÉtudes sur la lange internationale = Studies on international Language

246 31 $aÉtudes sur la lange internationale

246 31 $aStudies on international Language

245 10 $aEl la sonoraj soloj :$bpoemoj 1992-1995

246 14 $aEl miaj sonoraj soloj

Rimarku, ke la kampo 246 validas nur por variantoj de titolo jam registrita en 245 $a. Uzu la kampon 500 por registri titolvariantojn kiam la diversaj ebloj de la kampo 246 ne taŭgas por tio.

245 10 $aLa homo, konkere al sia destino :$b(eltiraĵo el la ĉapitroj I, IV, V kaj VI) /$cOmraam Mikhaël Aïvanhov ; el la franca tradukis teamo

500 ## $a"Rigardo paca kaj harmonia al nia planedo"—Kovrilo

[En la paĝo 3 aperas la vera titolo de la enhavata verko: La homo, konkere al sia destino; en la kovrilo aperas kiel titolo "Rigardo paca kaj harmonia al nia planedo", kiu havas neniun rilaton al la vera titolo de la enhavata verko]

1.6.3.3 Mencio pri respondeco

Enhavas KERNAJN ELEMENTOJN

MARC 21: 245 $c

Subelementoj:

- Mencio pri respondeco rilata al la ĉeftitolo *KERNA*
- Paralela mencio pri respondeco rilata al la ĉeftitolo

1.6.3.3.1. Mencio pri respondeco rilata al la ĉeftitolo

KERNA ELEMENTO

MARC 21: 245 $c

Rekomendo: ĉar la kodigo de la kampo 245 estas sufiĉe kompleksa, konsilindas ankaŭ konsulti la kampon 245 en la gvidilo *Formato MARC 21.*

Mencio pri respondeco povas:

- Nomi unu aŭ pli da agantoj, aŭ nomi neniun konkretan kaj esti ĝenerala frazo.

  245 03 $a… /$cverkis la lernantoj (5-jaraj) de la infanklaso de Prelles, kunlabore kun sia instruistino M.-L. Lagier-Bruno

  245 00 $a… /$ckompilis Kansai Ligo de Esperanto-Grupoj

- Inkludi aŭ ne substantivojn aŭ substantivajn sintagmojn, kiuj aperas kune kun la responsulo:

  245 14 $a… / $ca novel by John Rechy

  [En la fonto: "a novel by" aperas en unu alineo kaj "John Rechy" aperas sube en malsama alineo]

- Inkludi aŭ ne la funkciojn (rolojn) de la responsuloj. Kiam oni bezonos, laŭ la opinio de kataloganto, klarigi la funkcion de aganto, aldonu vortojn aŭ frazon interkrampe

  245 00 $a… /$ckompilita de Tazuo Nakamura kaj Miyamoto Masao ; prezentita de Clelia Conterno Guglielminetti

245 00 $a… /$c[kompilis] Isaj Dratwer

- Konsisti nur el la funkcio, sen mencio de la responsulo.

245 00 $a… /$ctradukita el la franca

1.6.3.3.1.1. Informfontoj

Sekvu ĉi ordon de prefero por elekti la informfonton:

a) la sama fonto kiel la ĉeftitolo
b) alia fonto ene de la risurco
c) unu el la aliaj fontoj specifitaj en *Preferata fonto de informo*

1.6.3.3.1.2. Registro de mencio pri respondeco rilate al la ĉeftitolo

1.6.3.3.1.2.1. Ĉefa mencio pri respondeco

La ĉefa mencio pri respondeco rilatas al la kreintoj de la intelekta aŭ arta enhavo de la verko. Kutime temas pri la aŭtoro de la teksto, sed, ekzemple, en ĉefe ilustrita verko, la kreinto povas esti fotisto aŭ desegnisto.

Registru la ĉefan mencion pri respondecoj prenante ĝin el kiu ajn fonto.

Registru la ceterajn menciojn en la ordo indikita de la sinsekvo, la prezento aŭ la tipografio en la sama fonto.

Transskribu ilin tiel, kiel ili aperas en la informfonto.

- Inkludu la terminojn esprimantajn devenon, titolon, profesion, postenon aŭ rangon.
- Kaze de tro ampleksa ĉefa mencio pri respondeco, sensignifa por identigi la risurcon, mallogigu ĝin se tio ne signifas perdon de esenca informo. Ne uzu la markon de preterlaso (…) por indiki ĝin.

245 13 $a… /$cparolado eldirita de D-ro Juan Régulo Pérez kaj la respondoj de S-ro Gumersindo Trujillo Fernández kaj S-ro Pedro González y González

[En la fonto: parolado eldirita la 26-an de oktobro 1984, en la publika akceptado kiel adoptita filo de la urbo kaj de la eldona omaĝo de la Universitato, de Prof-ro S-ro D-ro Juan Régulo Pérez kaj la respondoj de Moŝta Rektoro Grandanima S-ro Gumersindo Trujillo Fernández kaj de Tre Klera S-ro Urbestro S-ro Pedro González y González]

245 14 $... /$cDr. José María Pedrajas Navas, Dra. Sara Ibáñez García

[En la fonto: Dr. José María Pedrajas Navas, Servicio de Medicina Interna, Hospital Clínico Universitario San Carlos, Madrid, Grupo de Trabajo FEMI de Enfermedad Tromboembólica, Dra. Sara Ibáñez García, Servicio de Farmacia Hospitalaria, Hospital General Universitario Gregorio Marañón, Madrid]

- Kiel ĝenerala normo, transskribu ĉiujn ĉefajn responsulojn, sendepende de ilia nombro. Se la nombro estas tro granda, mallongigu ĝin nur se estas pli ol tri responsuloj. Transskribu la unuan nomon kaj indiku la preterlason de la ceteraj per interpolado en Esperanto, interkrampe, de la nombro de responsuloj ne cititaj.

245 10 $a... / $cBrüder Grimm [kaj dek pliaj]

1.6.3.3.1.2.2. Aliaj mencioj pri respondeco

Eblas registri neĉefajn menciojn pri respondecoj (tradukintojn, kompilintojn, editorojn, ilustrintoj, ktp.) se vi trovas ilin gravaj por identigi la risurcon. Registru ilin en la ordo indikita de la sinsekvo, prezento aŭ tipografio de la fonto. Se la ordo ne klaras, registru ilin en la plej logika ordo. Mallongigu neĉefajn menciojn pri respondeco se tio ne signifas perdon de esenca informo. Ne uzu la markon de preterlaso (…) por indiki ĝin.

Se neĉefa mencio pri respondeco nomas pli ol tri agantojn por la sama funkcio transskribu la unuan nomon kaj indiku la preterlason de la ceteraj per interpolado en Esperanto, interkrampe, de la nombro de responsuloj ne cititaj.

245 10$a… /$cAnton Ĉeĥov ; el la rusaj originaloj tradukitaj en Esperanton de A. Birjulin [kaj naŭ pliaj]

1.6.3.3.1.2.3. Mencio pri respondeco en pli ol unu lingvo aŭ skribo

Registru la mencion en la lingvo aŭ skribo de la ĉeftitolo. Se tiu kriterio ne aplikeblas, registru la mencion unue aperanta.

245 10 $aTin prices, 1956-1973 : $bLondon and Penang /$cInternational Tin Council

[En la risurco la mencio pri respondeco aperas en la franca, la hispana, la rusa kaj la angla]

1.6.3.3.2. Paralela mencio pri respondeco rilata al la ĉeftitolo

Prenu la paralelajn menciojn pri respondeco el la sama fonto kiel la responda paralela titolo.

245 14 $aDie posaunen von Jericho :$bdie ersten sechs Kapitel aus dem Buch Josua in spanischen Trochäen : auf Deutsch und Esperanto /$cmusik, Felicitas Kukuck ; text, Richard Schulz ; vignetten, Ernst Schomer = La trombonoj de Jeriko : la unuaj ses ĉapitroj de la Biblia libro pri Josuo en trokeo-kvaroj : Esperante kaj en la Germana lingvo / muziko, Felicitino Kukuko ; teksto, Rikardo Ŝulco ; vinjetoj, Ernesto Ŝomero

[En la fonto troviĝas la ĉeftitolo (kaj titolaldono) kaj la mencio pri respondeco en la germana, kun paralelaj titolo, titolaldono kaj mencio pri respondeco en Esperanto.

1.6.3.4 Mencio pri eldono

Enhavas KERNAJN ELEMENTOJN

MARC 21: 250

RDA priskribas ok subelementojn rilatajn al la mencio pri eldono. Ĉar la terminologio estas tro peza kaj iom konfuza, ĉi-ĉapitre la instrukcioj iom apartiĝos disde tiu terminologio por faciligi komprenadon.

1.6.3.4.1. Informfontoj

Sekvu ĉi ordon de prefero por elekti la informfonton:

a) la sama fonto kiel la ĉeftitolo
b) alia fonto ene de la risurco

c) unu el la aliaj fontoj specifitaj en Preferata fonto de informo

1.6.3.4.2. Registro de la mencio pri eldono

KERNA

MARC 21: 250$a

Transskribu mencion pri eldono tiel, kiel ĝi aperas en la preferata informfonto.

250 ## $a2a eldono

250 ## $aDua eldono reviziita kaj kompletigita

250 ## $a1a eldono: 2018

250 ## $aDeuxième edition revue

250 ## $a3rd. Ed.

250 ## $aDato de eldono: 2017

Kaze de dubo pri tio, ĉu iu mencio estas aŭ ne mencio pri eldono, konsideru la ĉeeston de ĉi vortoj aŭ frazoj kiel evidenton de tio, ke ja estas mencio pri eldono:

a) vortoj kiel eldono, lanĉo, stato, aktualigo, versio (aŭ iliaj ekvivalentoj en aliaj lingvoj)
b) mencio indikanta:
    a. malsameco en la enhavo
    b. malsameco en la lingvo
    c. malsameco en la adresata publiko
    d. malsameco en la formato aŭ aparta prezento
    e. malsameco en la dato ligita al la enhavo

Atentu: mencio, kiu detaligas la nombron de presitaj kopioj ne estas mencio pri eldono. Eblas registri ĉi datenon en noto (500 ## $a), se vi trovas tion grava por la identigo de la eldono.

1.6.3.4.2.1. Registro de eldono sen akompana vorto

Se iu mencio pri eldono konsistas en unu aŭ pluraj literoj kaj/aŭ ciferoj sen alia akompana vorto, aldonu interkrampe la taŭgan terminon.

250 ## $a3a [eldono]

250 ## $aTercera [edición]

250 ## $a[Versio] 1.1

250 ## $a2a reviziita [eldono]

Registru mencion pri represo se ĝin faris la sama eldonanto. Registru ankaŭ la informon en la kampo 008. Konsultu por tio la kampon 008 en la gvidilo *Formato MARC 21.*

250 ## $aRepreso de la eldono de 1931

Se la represon faris malsama eldonanto, registru ĝin en noto sekvante la instrukciojn de *Reproduktaĵoj aŭ faksimiloj de aliaj eldonaĵoj.*

Se iu mencio pri eldono estas integra parto de la ĉeftitolo, titolaldono aŭ mencio pri respondeco, aŭ la mencio estas gramatike ligita al kiu ajn el tiuj elementoj, registru la mencion pri eldono kiel integran parton de la elemento al kiu ĝi estas ligita. Ne registru ĝin denove, kiel mencion pri eldono en 250 $a.

245 13 $aLa floroj de l' malbono :$b**kompleta eldono** aranĝita lau nova ordo kaj sekvata de la defalaĵoj kaj de fragmentoj rilataj al "La floroj de l' malbono"

245 10 $aTito kaj la nealianciteco /$cRanko Petković ; redaktoro de la **esperanta eldono**, Senad Čolić

1.6.3.4.2.2. Pli ol unu mencio pri eldono

Registru la menciojn en malsamaj kampoj, sekvante la ordon indikitan de la sinsekvo, la prezento aŭ la tipografio de la mencioj en la informfonto.

250 ## $aDua eldono

250 ## $aInternacia eldono

1.6.3.4.3. Paralela mencio pri eldono

MARC 21: 250 $b, apliku la respondan ISBD-interpunkcion (=)

Registru la paralelan mencion pri eldono nur se ĝi aperas en la sama preferata fonto kiel la mencio pri eldono.

250 ## $a1a eldono **=$b1. Auflagen**

250 ## $a2. edizione speciale **=$b2a speciala eldono**

250 ## $aUnua eldono, januaro 2022 **=$bPrimera edició, gener 2022**

1.6.3.4.4. Mencio pri respondeco rilata al la eldono

MARC 21: 250 $b, apliku la respondan ISBD-interpunkcion (/)

Registru la mencion pri respondeco rilata al la eldono nur se ĝi aperas en la sama fonto kiel la mencio pri eldono.

250 ## $aDua reviziita eldono **/$aMarcos Cruz kaj Antonio Valén**

1.6.3.5 Mencio pri publikigo (eldondatenoj)

Enhavas KERNAJN ELEMENTOJN

MARC 21: 264

Subelementoj:

- Loko de publikigo *KERNA*
- Paralela loko de publikigo
- Nomo de la eldoninto *KERNA*
- Paralela nomo de la eldoninto
- Dato de publikigo *KERNA*

1.6.3.5.1. Informfontoj

Sekvu ĉi ordon de prefero por elekti la fonton de la subelementoj loko de publikigo, nomo de la eldoninto kaj dato:

a) la sama fonto kiel la ĉeftitolo
b) alia fonto ene de la risurco
c) unu el la aliaj fontoj specifitaj en *Preferata fonto de informo*

Por la ceteraj subelementoj, elektu unuavice la fonton de la nomo de la eldoninto, krom se oni indikas ion alian en la responda instrukcio.

Registru interkrampe iun ajn subelementon prenitan de ekster la eldonaĵo.

1.6.3.5.2. Registro de la mencio pri publikigo

Transskribu la lokojn de publikigo, la nomojn de la eldonintoj kaj la daton de publikigo tiel, kiel ili aperas en la informfonto. Apliku la ĝeneralajn instrukciojn pri transskribado kaj numeroj.

264 #1 $aLa Laguna :$bJuan Régulo Eldonisto,$c1973

264 #1 $aBerlin :$bEsperanto-Verlag Ellersiek & Borel G.M.B.H.,$c1923

264 #1 $a[Vieno] :$bProEsperanto,$c[1993]

Se iu el la kernaj elementoj ne aperas en la risurco, havigu interkrampe konatan aŭ probablan elementon se tio eblas.

1.6.3.5.3. Loko de publikigo

KERNA

MARC 21: 264 **#1** $a

1.6.3.5.3.1. Registro de la loko de publikigo

Registru la lokon de publikigo tiel, kiel ĝi aperas en la informfonto.

Inkludu, se ĝi troviĝas en la informfonto:

a) la lokon (urbon, vilaĝon, ktp.):

264 #1 $aKöln

b) la nomon de la pli ampleksa jurisdikcio (ŝtato, provinco, ktp., kaj/aŭ lando):

264 #1 $aAldershot, Hampshire, England

c) kiun ajn prepozicion aperantan kun la nomo de la loko, se ĝi estas necesa por ke la mencio estu sencohava:

264 #1 $aV Praze

1.6.3.5.3.2. Pli ol unu loko de publikigo

Se pli ol unu loko de publikigo estas menciataj en la informfonto, registru ilin laŭ la ordo indikita de la sinsekvo, prezento aŭ tipografio de la nomoj en la fonto.

264 #1 $aToronto ;$aMontréal

264 #1 $aNew York : $bDutton ; $aToronto : $bClarke, Irwin

Escepto: ne apliku la antaŭan instrukcion kiam la logoo de la eldoninto inkludas siajn plurajn sidejojn. En tiuj kazoj, registru nur la realan lokon de publikigo.

264 #1 $aBuenos Aires : $bPanamericana

[En la titolpaĝo: Buenos Aires, Bogotá, Caracas, Madrid, México, Sao Paulo. En la dorso de la titolpaĝo: Buenos Aires (reala loko de publikigo)]

1.6.3.5.3.3. Loko de publikigo ne identigita en la informfonto

Se la loko de publikigo ne aperas en la risurco, registru interkrampe, laŭ la sekva ordo de prefero:

1. la lokon, se oni konas ĝin:

   264 #1 $a[Vieno]

   264 #1 $a[Roterdamo]

2. probablan lokon, markitan per demandosigno:

   264 #1 $a[Jekaterinburgo?]

   264 #1 $a[Ames, Iowa?]

3. sekvan formulon por indiki, ke ne eblis identigi la lokon:

   264 #1 $a[Loko de publikigo ne identigita]

1.6.3.5.4. Paralela loko de publikigo

MARC 21: 264 #1 $a, apliku la respondan ISBD-interpunkcion (=).

Registru paralelan lokon de publikigo se ĝi aperas en la sama fonto kiel la loko de publikigo.

264 #1 $aLondono **= London**

1.6.3.5.5. Nomo de la eldoninto

KERNA

MARC 21: 264 **#1** $b

1.6.3.5.5.1. Registro de la nomo de la eldoninto

Registru la nomon de la eldoninto tiel, kiel ĝi aperas en la fonto. Ne forigu terminojn indikantajn eldonejon.

264 #1 $aBerlin **:$bEsperanto-Verlag Ellersiek & Borel G.M.B.H**

264 #1 $aRotterdam **:$bUniversala Esperanto-Asocio, Eldona Fako**

264 #1 $aMilevsko **:$bIKEF, Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo**

264 #1 $aNovjorko **:$bMondial**

Ne konsideru mencio pri publikigo la logoon, anagramojn, retejojn, simbolojn, kaj desegnojn aperantaj kiel eldondatenoj. En tiuj kazoj, prenu la nomon de alia fonto.

264 #1 … : $bOnada Edicions

[En la fonto: onadaeditions.com]

Registru la vortojn aŭ frazojn indikantajn funkcion (malsaman ol tiu de publikigado) realigitan de alia aganto tiel, kiel ili aperas en la informfonto.

264 #1 $aOpava **:$bDistrikta Popola Biblioteko en kunlaboro kun Esperanto-Rondeto de la Uzina klubo Ostroj**

Se la nomo de la eldoninto, kiu aperas en la risurco estas fikcia aŭ bezonas klarigon, redaktu noton por havigi la realan nomon de la eldoninto.

254 #1 $aByblos :$Je la ŝildanonco de "L' Acacio"

500 ## $aLoko kaj nomo de eldoninto fikciaj. Publikigita en La Laguna de J. Régulo

1.6.3.5.5.2. Pli ol unu eldoninto

Se en la informfonto aperas menciata pli ol unu eldoninto, registru la nomojn de la eldonintoj en la ordo indikita de la sinsekvo, prezento aŭ tipografio de la nomoj. Se ili estas gramatike ligitaj, transskribu ilin tiel, kiel ili aperas.

264 #1 $aMadrid **:$bGram :$bFederación Española de Esperanto**

264 #1$aPartizánske **:$bILEI kaj E@I pere de Espero**

264 #1$aParis **:$bSAT** ;$aMadrid **:$bAsociación Izquierda y Esperanto-SATeH**

1.6.3.5.5.3. Eldoninto ne identigita en la manifestiĝo

Se la nomo de la eldoninto ne aperas en la manifestiĝo, prenu ĝin el ekstera fonto kaj registru ĝin interkrampe:

264 #1 $aRoterdamo **:$b[Universala Esperanto-Asocio]**

Se ne eblas identigi la eldoninton, ne havigu probablan nomon kaj uzu la formulon “[eldoninto ne identigita]”.

264 #1 $a[Edinburgh] **:$b[eldoninto ne identigita]**

1.6.3.5.5.4. Memeldonoj

Se la eldoninto ne estas identigita en la risurco, sed eblas dedukti, ke temas pri la aŭtoro mem (aŭ la tradukinto, aŭ kompilinto, ktp.), registru ties nomon interkrampe.

264 #1 … **:$b[Ho Phuong]**

[En la dorso de la titolpaĝo: ©Ho Phuong]

Se la eldoninto estas la aŭtoro mem kaj tiel estas indikite en la eldonaĵo, ne sekvu la antaŭan regulon kaj registru la mencion pri publikigo tiel, kiel ĝi aperas en la risurco.

264 #1 $a… **:$bMemeldono**

264 #1 $a… **:$bEldono de la aŭtoro**

264 #1$a… **:$bLa aŭtoro**

264 #1$a… **:$bF. Szilágyi**

[En la risurco F. Szilágyi aperas menciita kiel kompilinto kaj eldoninto]

1.6.3.5.6. Paralela nomo de la eldoninto

MARC 21: 264 #1 $b, aplique la puntuación ISBD correspondiente (=).

Registru paralelan nomon de eldoninto se ĝi aperas en la sama fonto kiel la nomo de la eldoninto.

245 #1 $aStockholm :$bEsperantoförlaget **= Eldona Societo Esperanto**

1.6.3.5.7. Dato de publikigo

KERNA

MARC 21: 264 #1 $c

1.6.3.5.7.1. Registro de la dato de publikigo

Registru la daton laŭ la bazaj instrukcioj indikitaj en *Numeroj kaj datoj*.

264 #1..., $c2011

264 #1..., $cMay 2000

Se la dato aperas en romanaj ciferoj, registru ĝin tiel, kiel ili aperas en la fonto. Aldonu interkrampe la daton laŭ la gregoria kalendaro

264 #1..., $cMCM [1900]

Se oni scias, ke la dato aperanta en la eldonaĵo estas fikcia aŭ erara, registru ĝin tiel, kiel ĝi aperas en la fonto kaj redaktu noton por havigi la realan noton. En la koncernaj pozicioj de la kampo 008, registru la realan daton.

264 #1 …,$c1969

500 ##$aDato de publikigo fikcia. Publikigita en 1965.

264 #1 …,$c1923

500 ##$aDato de publikigo erara. Publikigita en 1932.

1.6.3.5.7.2. Dato de publikigo ne identigita en la manifestiĝo

Se en la risurco ne aperas eksplicita mencio pri la dato de publikigo, ne anstataŭu ĝin senplie per iu alia dato troviĝanta en la eldonaĵo (presdato, dato de kopirajto aŭ dato de leĝa depono). Havigu daton interkrampe surbaze de la sekvaj instrukcioj:

- Dato deduktita de aliaj datenoj de la manifestiĝo (presdato, dato de kopirajto aŭ dato de leĝa depono):

  264 #1..., $c[2013]

  [En la dorso de la titolpaĝo: ©2013]

Dato konata per ekstera fonto (ekzemple, la Aŭstria Nacia Biblioteko):

264 #1..., $c[2011]

Konata dato inter du nesinsekvaj jaroj:

264 #1..., $c[inter 1902 kaj 1905]

Necerta dato inter du sinsekvaj jaroj:

264 #1..., $c[1971 aŭ 1972]

Verŝajna dato:

264 #1..., $c[2011?]

Verŝajna dato inter du nesinsekvaj jaroj:

264 #1..., $c[inter 1887 kaj 1900?]

Dato pli malnova aŭ lasta dato, kiam la risurco povintus esti publikata:

264 #1..., $c[ne post 1909]

Se tute ne eblas havigi daton de publikigo uzu la formulon: [dato de publikigo ne identigita]. Sed evitu laŭ eble la uzon de ĉi formulo kaj klopodu trovi daton laŭ unu el la antaŭaj instrukciojn.

264 #1..., $c[dato de publikigo ne identigita]

1.6.3.6 Mencio pri fabrikado (presdatenoj)

MARC 21: 264 **#3** $a, $b, $c

Subelementoj:

- Loko de fabrikado
- Nomo de la fabrikinto
- Dato de fabrikado

La eventualajn paralelajn lokon de fabrikado kaj nomon de fabrikinto oni ne registras.

1.6.3.6.1. Registro de la mencio pri fabrikado

Registru mencion pri fabrikado se vi disponas la informon en jenaj kazoj:

- Memeldonoj:

  264 #1 $a[Madrid] : $bLa aŭtoro, $c[2017]

  264 #3 $aPresita en Madrid :$bpor Gráficas IMAX, $c2017

- Kiam mankas iu el la kernaj elementoj de la mencio pri publikigo:

  264 #1 $aMadrid :$b[eldoninto ne identigita],$c1920

  264 #3 $aMadrid : $bPresejo San Lucas, $c1920

  [La nomoj de la eldoninto kaj distribuinto ne aperas en la risurco, la nomo de la presisto (fabrikinto) aperas en la kolofono]

Ĉiam, kiam vi registros iun datenon pri fabrikado, registru la mencion kompletan kun la subelementoj loko, nomo kaj dato se la informo disponeblas, eĉ se la dato aŭ la loko koincidas kun la dato kaj la loko de publikigo kaj aŭ distribuado.

Por registri la lokon de fabrikado, sekvu la instrukciojn rilataj al la *Registro de la loko de publikigo*.

Por registri la nomon de la fabrikinto, sekvu la instrukciojn rilatajn al la *Registro de la nomo de la eldoninto*.

Por registri la daton de fabrikado, sekvu la instrukciojn rilatajn al la *Registro de la dato de publikigo*.

  264 #1 $aMadrid $b[A. Guedes], $c2020

  264 #3 $a[Madrid] : $bVillena Artes Gráficas, $c[2020]

  [La nomo de la fabrikinto aperas en la preferata fonto de informo; la daton oni deduktas el aliaj datenoj de la manifestiĝo; la lokon oni ekhavas el ekstera fonto (ne el la loko de eldono, kvankam ĉi kaze ambaŭ koincidas)]

1.6.3.7 Dato de kopirajto

MARC 21: 264 **#4** $c

Registru la daton de kopirajto se ĝi troviĝas en la manifestiĝo. Se estas pli ol unu dato de kopirajto, registru tiun respondan al la eldono, kiun vi nun katalogas (kies datenoj estis registritaj en 264 #1 $a $b $c).

Registru la daton de kopirajto post la simbolo ©.

  264 #1 $aMadrid : $bEdiciones Akal, S.A., $c2007

  264 #4 $c©2007

  [En la fonto: © Deutsche Taschenbuch Verlag, 2004, © Ediciones Akal, S.A., 2007]

1.6.3.8 Amplekso

KERNA

MARC 21: 300 $a (Amplekso)

Registru la amplekson de la risurco kiel paĝoj, folioj aŭ kolumnoj laŭ la tipo de sinsekvo uzata en la risurco.

1.6.3.8.1. Paĝoj

Registru la lastan numeritan paĝon de la risurco, sekvata de “paĝoj” (aŭ “paĝo”), se la risurco havas foliojn numeritajn ambaŭflanke:

300 ## $a327 paĝoj

1.6.3.8.2. Folioj

Regitru la terminon“folioj” (aŭ “folio”) anstataŭ la terminon “paĝoj” se la risurcoj konsistas el folioj mumeritaj nur en unu flanko:

300 ## $a321 folioj

1.6.3.8.3. Kolumnoj

Registru la terminon “kolumnoj” anstataŭ la terminon “paĝoj” se la risurco konsistas el paĝoj kun numeritaj kolumnoj.

300 ## $a381 kolumnoj

1.6.3.8.4. Pluraj sekvencoj

Se la risurco havas plurajn sekvencojn de paĝoj, folioj aŭ kolumnoj, registru ilin en la sama ordo, en kiuj ili aperas en la risurco. Registru la lastan numeron de ĉiu sekvenco sekvata de la taŭga termino.

300 ## $a27 paĝoj, 300 folioj

Se estas pluraj samtipaj sekvencoj, registru la numerojn de tiuj sekvencoj kunaj, sekvataj de la taŭga termino.

300 ## $a15, 323 paĝoj

300 ## $a12, 43 folioj

300 ## $aX, 24 paĝoj, 15 bildaj folioj

1.6.3.8.5. Formo de la numeroj

Registru la paĝojn, foliojn aŭ kolumnojn kiel numeralojn, uzante la formon en kiuj ili aperas (romanaj, arabaj ciferoj, ktp.).

300 ## $aXVII, 323 paĝoj

[Estas du sekvencoj de paĝoj: I-XVII kaj 1-323]

Registru arabajn ciferojn se en la manifestiĝo aperas paĝoj, folioj aŭ kolumnoj numeritaj per vortoj.

300 ## $a32 paĝoj

[En la fonto: Tridek du]

1.6.3.8.6. Sekvencoj kun literoj

Se la paĝoj, folioj aŭ kolumnoj estas nomataj per literoj anstataŭ per ciferoj, registru la rangon de literoj de ĉiu sekvenco uzante la formo de la literoj, kiuj aperas en la risurco.

300 ## $aPaĝoj A-W

1.6.3.8.7. Nenumeritaj paĝoj, ktp.

Se la risurco nur havas paĝojn, foliojn aŭ kolumnojn ne numeritajn, registru ilin laŭ jena ordo de prefero:

a) La ĝustan ciferon (se facile kalkulebla) sekvata de "nenumeritaj paĝoj".

300 ## $a93 nenumeritaj paĝoj

b) Laŭtaksa cifero antaŭata de "proksimume".

300 ## $aProksimume 600 paĝoj

Se la risurco konsistas el sekvencoj de paĝoj, folioj aŭ kolumnoj numeritaj kaj nenumeritaj, kiel ĝenerala normo, registru nur la numeritajn.

Registru ankaŭ la sennumeritan sekvencon se temas pri la plej granda parto de la risurco.

300 ## $a20 paĝoj, 150 nenumeritaj paĝoj

Ne registru nenumeritajn sekvencojn de anoncoj, blankaj paĝoj aŭ alispeca negrava materialo.

1.6.3.8.8. Ŝanĝoj en la formo de numerado

Se la numerado ene de sekvenco de paĝoj, folioj aŭ kolumnoj estas kontinua sed ŝanĝiĝas la formo de la ciferoj, registru la numeron tiel, kiel ĝi aperas en la lasta paĝo de la sekvenco kaj ignoru kiun ajn alia formo. Ekzemple, se la paĝoj aperas numeritaj jene: "i, ii, iii, 4, 5 … 50", registru:

300 ## $a50 paĝoj

1.6.3.8.9. Neĝusta paĝnumerado

Se la numero de la lasta paĝo, folio aŭ kolumno de iu sinsekvo ne reprezentas la totalan nombron de paĝoj, folioj aŭ kolumnoj, registru la neĝustan numeron krom se tio donas tre malveran bildon pri la amplekso de la manifestiĝo. En la kazoj, kiam vi korektos neĝustan numeron, registru ĝin tiel, kiel ĝi aperas en la lasta paĝo, folio aŭ kolumno sekvata de "nome" kaj la ĝusta numero.

300 ## $a48, nome, 96 paĝoj

300 ## $a329, nome, 392 paĝoj

Sed

300 ## $a48 paĝoj

[La risurco konsistas fakte el 46 paĝoj sed la lasta paĝo estas numerita per 48]

1.6.3.8.10. Komplika aŭ neregula paĝnumerado

Se la risurco havas komplikan aŭ neregulan paĝnumeradon, registru la nombron de paĝoj laŭ unu el la sekvaj metodoj laŭ la juĝo de kataloganto:

300 ## $a500 paĝoj en pluraj paĝnumeradoj

300 ## $aProksimume 700 paĝoj en pluraj paĝnumeradoj

300 ## $a560, 223 paĝoj, 217 paĝoj kun varia paĝnumerado

1.6.3.8.11. Paĝoj, ktp., numeritaj kiel parto de pli granda sekvenco

Se la paĝoj, ktp., estas numeritaj kiel parto de pli ganda sekvenco (ekzemple, volumo katalogata sendepende apartenanta al pluvoluma eldonaĵo kun kontinua paĝnumerado, depreso, ktp.), registru la unuan kaj lastan ciferojn antaŭatajn de la taŭga termino.

300 ## $aPaĝoj 713-797

1.6.3.8.12. Bildaj paĝoj aŭ folioj ne inkluditaj en la paĝnumerado.

Registru la sekvencon de bildaj folioj aŭ paĝoj (sendepende de tio, ĉu ili aperas kunaj aŭ disaj en la risurco) fine de la sekvenco aŭ sekvencoj de paĝnumerado.

a) Bildaj folioj aŭ paĝoj numeritaj:

300 ## $a246 paĝoj, 32 bildaj paĝoj

300 ## $aX, 73 folioj, 1 bilda folio

a) Bildaj paĝoj aŭ folioj nenumeritaj:

300 ## $a10 nenumeritaj paĝoj, 16 nenumeritaj bildaj paĝoj

300 ## $aXVI, 249 paĝoj, 12 nenumeritaj bildaj folioj

Se la risurco havas ambaŭ (bildajn foliojn kaj paĝojn) registru la totalan nombron sekvatan de “bildaj paĝoj” aŭ “bildaj folioj” depende de tio, kio pli abundas:

300 ## $a323 paĝoj, 19 nenumeritaj bildaj paĝoj

[La risurco havas 16 bildajn paĝonj kaj 3 bildajn foliojn]

1.6.3.8.13. Falditaj folioj

Se la folioj estas falditaj, indiku tion.

300 ## $a538 paĝoj, 3 nenumeritaj falditaj folioj

300 ## $a230 paĝoj, 25 bildaj folioj (kelkaj falditaj)

1.6.3.8.14. Duobla paĝnumerado

Se la paĝnumerado estas duobla (ekzemple, en libro kun paralelaj tekstoj) registru ambaŭ paĝnumeradojn en la sama ordo, kiel ili aperas en la risurco. Redaktu klarigan noton se vi trovas tion necesa.

300 ## $aXI, 185, 189 paĝoj

500 ## $aDulingva vortaro hungara-Esperanto kaj Esperanto-hungara kun malsama paĝnumerado.

1.6.3.8.15. Paĝoj numeritaj en malsamaj direktoj

Registru sekvencoj de paĝoj numeritaj en malsamaj direktoj en la sama ordo kiel ili aperas en la risurco, komencante de la titolpaĝo elektita kiel fonto por la priskribo. Redaktu klarigan noton se vi trovas tion necesa. Uzu la kampon 500 por noti informon nur pri la fizika priskribo kaj la kampon 546 se vi bezonas ankaŭ doni informon pri la lingvo.

300 ## $aIV, 127, 135, VII paĝoj

500 ## $aTitolpaĝo kaj teksto kontraŭmetitaj

[La kontraŭmetitaj partoj enhavas malsamajn tekstojn en la sama lingvo]

300 ## $aIV, 127, 127, IV paĝoj

546 ## $aTitolpaĝo kaj teksto kontraŭmetitaj en la korea

[La kontraŭmetita parto enhavas la saman tekston tradukitan]

1.6.3.8.16. Flugfolio

Registru la amplekson de manifestiĝo konsistantan el nur unu folio kiel “1 folio”. Se la folion oni dizajnis por legi ĝin faldita, registru ĝin kiel “1 faldita folio” sekvata de la nombro de paĝoj, kiuj aperas en la folio, parenteze.

300 ## $a1 folio

300 ## $a1 faldita folio (6 paĝoj)

1.6.3.8.17. Teko, ujo, skatolo, ktp.

Registru la taŭgan terminon por la ujo, kiam la ĉefa enhavata materialo (sen konsideri akompanajn materialojn) ne havas ekskluzive formon de volumo.

300 ## $a1 skatolo

Elektebla aldono:

Indiku parenteze la numeron kaj tipon de subunuoj (ekzemple, paĝoj, folioj, kolumnoj, ktp.) post la termino, kiu nomas la ujon.

300 ## $a1 teko (24 folioj)

[La risurco konsistas el 24 flugfolioj enhavataj en unu teko]

300 ## $a1 teko (30 paĝoj, 2 folioj)

[La risurcoj konsistas el 15 flugfolioj kun paĝnumerado en ambaŭ flankoj kaj 2 fugfolioj kun paĝnumerado nur en unu flanko]

Se iu el la subunuoj havas formon de volumo, registru ankaŭ ties paĝnumeradon.

300 ## $a1 skatolo (2 volumoj (15, 10 paĝoj), 90 kartoj)

[La risurco konsistas el 2 broŝuroj kun respektive 15 kaj 10 paĝoj kaj 90 kartojn]

1.6.3.9 Ilustraĵoj

MARC 21: 300 $b (Aliaj fizikaj detaloj)

KERNA se aplikebla

Se la risurco enhavas ilustraĵojn (escepte de tabeloj, titolpaĝaj ilustraĵoj, portretoj de aŭtoroj, minoraj ilustraĵoj, ktp., krom se oni konsideras ilin gravaj por la identigo de la risurco), registru unu aŭ plurajn terminojn el la suba listo[33], laŭ pleja konveno:

- diagramoj
- fotografaĵoj
- grafikoj
- mapoj
- muziko
- planoj
- portetoj

300 ##... : $bfotografaĵoj (koloraj)

Se vi dubas pri la taŭga termino aŭ vi opinias, ke ne penvaloras doni specifan terminon, registru ***ilustraĵoj***.

300 ##... : $bilustraĵoj (blankanigraj)

Registru kromajn tipojn de ilustra enhavo krom ***"ilustraĵoj"*** se vi konsideras tion grava por identigi la risurcon.

300 ##... : $bilustraĵoj, mapoj (koloraj)

1.6.3.9.1. Ĉefe ilustrita

Se la risurco konsistas ĉefe el ilustraĵoj, registru **"ĉefe ilustraĵoj"**, aŭ la plej taŭgan terminon.

Se risurcoj ne restas taŭge reprezentitaj per nur unu tipo de enhavo, tiam registru la necesajn tipojn de enhavo en la kampo 336 (vidu ankaŭ priajn instrukciojn sube).

300 ##... **: $bĉefe ilustraĵoj (koloraj)**

336 ## **$aBildo senmova$aTeksto** $2rdacontent

1.6.3.9.2. Ĉio ilustrita

Se la risurco konsistas preskaŭ ezkluzive el ilustraĵoj, regristru ***"ĉio ilustraĵoj",*** aŭ la plej taŭgan terminon.

La tipo de enhavo estu kongrua.

300 ##... : **$aĉio fotografaĵoj (koloraj)**

336 ## **$aBildo senmova** $2rdacontent

[33] La RDA-listo estas pli longa sed por esperantaj eldonaĵoj verŝajne sufiĉas ĉi terminoj.

1.6.3.9.3. Kolora enhavo

Registru la koloran enhavon kiel aldonon al la ilustra enhavo

300 ##... : $bilustraĵoj (blankanigraj)

300 ##... : $bmapoj (koloraj)

300 ##... : $bfotografaĵoj (blankanigraj kaj koloraj)

Se estas pluraj tipoj de ilustraĵoj kaj la kolora enhavo koincidas por ĉiuj, registru ĝin en la fino.

300 ## … :$bfotografaĵoj (koloraj), mapoj (blankanigraj)

sed

300 ##... : $bfotografaĵoj, mapoj (koloraj)

Ne registru aliajn terminojn. Se neniu el ambaŭ plene taŭgas, registru la terminon laŭ unu el la sekvaj modeloj:

300 ##... : $bfotografaĵoj (blankanigraj)

[La fotografaĵoj estas sepiaj]

300 ##... : $bilustraĵoj (koloraj)

[La ilustraĵoj estas nur bluaj kaj ruĝaj]

1.6.3.10 Dimensioj

KERNA

MARC 21: 300 $c (Dimensioj)

1.6.3.10.1. Registro de la dimensioj

Registru la alton de la volumo (mezuritan laŭlonge de la spino) en centimetroj, altigante la ciferon se estas decimaloj ĝis la sekva cifero kaj uzante la metrikan simbolon “cm”.

300 ##...;$c18 cm

[La alto de la libro estas 17,2 cm]

Se la alto estas pli malgranda ol 10 cm, registru ĝin en milimetroj, uzante la metrikan simbolon “mm”.

300 ##...;$c75 mm

Se la risurco estas kvadrata aŭ pli larĝa ol alta donu ankaŭ la mezuron de la larĝo post la mezuro de la alto.

300 ##...; $c20 × 32 cm

1.6.3.10.2. Dimensioj de la ujo

Se la risurco estas gardita en ujo, menciu tion en noto. Registru ankaŭ la dimensiojn de la ujo se vi trovas tion grava por la identigo aŭ la aliro.

300 ## $a5 volumoj ; $c17 cm

500 ## $aGarditaj en skatolo (25 x 30 x 10 cm)

1.6.3.11 Akompana materialo

KERNA se aplikebla

MARC 21: 300 $e (Akompana aŭ aldona materialo)

1.6.3.11.1. Registro de la akompana aŭ aldona materialo

Registru la numeron de unuoj kaj taŭgan terminon por la tipo de akompana materialo. Preferindas komunuza termino (eĉ se temus pri komerca nomo). Por bitaj portiloj uzu ĉi terminojn: CD-ROM, DVD-ROM, CD-Audio, DVD-Video, USB-poŝmemorilo kaj retrisurco.

Se la akompana materialo estas presaĵo indiku ankaŭ la nombron de paĝoj.

300 ## $a302 paĝoj : $bmapoj ; $c26 cm **+ $e1 DVD-ROM + 1 broŝuro (15 paĝoj)**

Registru la dimensiojn nur se ili pli grandas ol tiuj de la ĉefa portilo

300 ## $a342 paĝoj: $bilustraĵoj (koloraj) ; $c34 cm + $e1 CD-ROM

300 ## $a23 paĝoj ; $c70 mm **+ $e1 CD-ROM (12 cm)**

Redaktu noton por priskribi la akompanan materialon se vi trovas tion grava por la identigo de la risurco.

500 ## $aTitolo de la aldona materialo: Lokoj kaj tempoj de la poemo / Clelia Conterno Guglielminetti

1.6.3.12 Tipo de enhavo

KERNA

MARC 21: 336 $a (Nomo de la tipo de enhavo) $2 (Fonto)

Registru la tipon de enhavo uzante terminojn el la suba listo kun majuskla inicialo[34]:

- Bildo kartografia *(por mapoj)*
- Bildo senmova *(por ilustraĵoj kiel desegnoj, fotografaĵoj, grafikoj, ktp.)*
- Bildo pertuŝa *(por bildoj tuŝeblaj, simila sistemo al brajlo)*
- Muziko notita pertuŝa *(por partituroj brajlaj)*
- Muziko notita *(por partituroj)*
- Teksto pertuŝa *(por teksto brajla)*
- Teksto *(por normala teksto)*

Por presitaj monografioj tiu valoro estos preskaŭ ĉiam ***$aTeksto*.** Registru ankaŭ la fonton[35] de kie la termino estas prenita: ĉi-kaze ĉiam **$2rdacontent** (en la kazo de Koha eblas agordi la sistemon por registri ambaŭ valorojn aŭtomate).

[34] La RDA-listo estas pli ampleksa, sed por esperantaj monografioj, tiuj terminoj sufiĉas.
[35] MARC-kodo, kiu identigas la terminaron, regularon aŭ skemon al kiu apartenas la termino aŭ kodo uzita por registri la informon pri la tipo de enhavo: https://www.loc.gov/standards/sourcelist/genre-form.html.

336 ## $aTeksto $2rdacontent

Se iu risurco havas malsamajn tipojn de enhavoj sed saman tipon de medio (vidu suban rubrikon) por tiuj enhavoj (ekzemple, en la kazo de komiksoj aŭ ĉefe ilustritaj verkoj) uzu la saman kampon 336 por registri la tipojn de enhavoj.

336 ## $aBildo senmova$aTeksto$2rdacontent

Se la eldonaĵo havas akompanan materialon kun malsama tipo de enhavo, kiel ĝenerala normo, ne konsideru ĉi lastan kaj registru nur la tipon de medio aplikeblan al la ĉefa parto de la risurco.

1.6.3.13 Tipo de medio

KERNA

MARC 21: 337 $a (Nomo de la tipo de medio) $2 (Fonto)

Registru la tipon de medio uzante terminojn el la suba listo[36]:

- komputila
- mikroforma
- senpera
- stereografia

Por presitaj monografioj tiu valoro estos ĉiam ***$asenpera*.** Registru ankaŭ la fonton[37] de kie la termino estas prenita: ĉi-kaze ĉiam **$2rdamedia** (en la kazo de Koha eblas agordi la sistemon por por registri ambaŭ valorojn aŭtomate).

300 ## $a164 paĝoj

337 ## $asenpera $2rdamedia

Se la eldonaĵo havas akompanan materialon kun malsama tipo de medio, kiel ĝenerala normo, ne konsideru ĉi lastan kaj registru nur la tipon de medio aplikeblan al la ĉefa parto de la risurco.

1.6.3.14 Tipo de portilo

KERNA

MARC 21: 338 $a (Nomo de la tipo de portilo) $2 (Fonto)

Registru la tipon de portilo uzante terminojn el la suba listo[38], specifa por tiu portiloj , kiuj ne bezonas perilon:

- folio
- karto
- volumo
- aliaj

[36] La RDA-listo estas pli longa sed por esperantaj monografioj verŝajne sufiĉas tiuj terminoj.
[37] MARC-kodo, kiu identigas la terminaron, regularon aŭ skemon al kiu apartenas la termino aŭ kodo uzita por registri la informon pri la tipo de medio: https://www.loc.gov/standards/sourcelist/genre-form.html.
[38] La RDA-listo estas pli longa sed por esperantaj monografioj verŝajne sufiĉas tiuj terminoj.

Por presitaj monografioj tiu valoro estos preskaŭ ĉiam ***$avolumo*.** Registru ankaŭ la fonton[39] de kie la termino estas prenita: ĉi-kaze ĉiam **$2rdacarrier** (en la kazo de Koha eblas agordi la sistemon por por registri ambaŭ valorojn aŭtomate).

300 ## $a164 paĝoj

338 ## $avolumo $2rdacarrier

Se la eldonaĵo havas akompanan materialon kun malsama tipo de portilo, kiel ĝenerala normo, ne konsideru ĉi lastan kaj registru nur la tipon de portilo aplikeblan al la ĉefa parto de la risurco.

1.6.3.15 Mencio pri serio

Enhavas KERNAJN ELEMENTOJN

MARC 21: 490 0#

La serioj de esperantaj monografioj kutime ne estas tre kompleksaj, sed kaze ke vi bezonas ilin, jen la kompleta listo de subelementoj, kiujn vi povas trovi en eldonaĵoj.

Subelementoj:

- Ĉefitolo de la serio *KERNA*
- Paralela titolo de serio
- Titolaldono de la serio
- Mencio pri respondeco rilata al la serio
- ISSN de la serio
- Numerado de la serio *KERNA*
- Titolo de la subserio *KERNA*
- Paralela titolo de la subserio
- Paralela titolaldono de la subserio
- Mencio pri respondeco rilata al la subserio
- ISSN de la subserio
- Numerado de la subserio *KERNA*

Iu eldonaĵo povas:

- Aparteni al pli ol unu serio. En tiu kazo, oni registras ĉiun serion en malsama kampo 490.
- Aparteni al serio, kiu ne aperas en la risurco. En tiu kazo, oni registru ĝin interkrampe, se vi konas la datenon, sed ne necesas aktive serĉi ĝin.

1.6.3.15.1. Informfontoj

Sekvu ĉi ordon de prefero por elekti la informfonton de la subelemento Ĉefitolo de la serio:

a) la titolpaĝo de la serio
b) alia fonto ene de la risurco
c) unu el la aliaj fontoj specifitaj en Preferata fonto de informo

[39] MARC-kodo, kiu identigas la terminaron, regularon aŭ skemon al kiu apartenas la termino aŭ kodo uzita por registri la informon pri la tipo de medio: https://www.loc.gov/standards/sourcelist/genre-form.html.

Por la ceteraj subelementoj elektu unuavice la fonton de la Ĉeftitolo de la serio, krom se oni indikas ion alian.

Registru interkrampe iun ajn subelementon prenitan de ekster la eldonaĵo.

Ne enmetu mencion pri serio inter parentezoj.[40]

1.6.3.15.2. Ĉefitolo de la serio

KERNA

MARC 21: 490$a

1.6.3.15.2.1. Registro de la ĉeftitolo de la serio

Registru la ĉeftitolon de la serio sekvante la samajn instrukcciojn kiel por la registro de la *Ĉeftitolo*.

Ne registru kiel parton de la ĉeftitolo de la serio enkondukajn vortojn, kiel "Kolekto" aŭ "Serio", kiuj ne apartenas al la ĉeftitolo.

490 0# $aLiteratura dramática

[En la fonto: Serie: Literatura dramática]

Por decidi ĉu unu el tiuj enkondukaj vortoj apartenas aŭ ne al la ĉeftitolo de la serio, rimarku ĉu ĝi aperas en la sama alineo kaj havas la saman tipografiojn kiel la ĉeftitolo aŭ estas gramatika ligo inter ili. Interpunkcio kia dupunkto indikas, ke la enkonduka vorto ne apartenas al la ĉeftitolo de la serio.

490 0# $aSerio oriento-okcidento

[En la fonto: Serio oriento-okcidento]

Se la titolo de la serio inkludas la numeradon kiel integran parton de la ĉeftitolo, transskribu la numeradon kiel parton de la ĉeftitolo de la serio. Tiukaze ne aldone uzu $v por registri la numeradon.

490 0# $aPublicación número 1074 de la Institución Fernando el Católico

Escepte: Se tiu numerado inkludas pli ol unu numeron preterlasu la numeradon kiel parton de la titolo de la serio. Uzu la markon de preterlaso (…) kaj registru la numeradon en $v.

490 0# $aPublicación número … de la Institución Fernando el Católico ;$v107-108

1.6.3.15.3. Paralela titolo de la serio

MARC 21: 490 $a, registru la respondan ISBD-interkpunkcio (=) antaŭ la subkampo.

Registru paralelan titolon de la serio se ĝi aperas en la sama fonto kiel la ĉeftitolo de la serio.

Se estas pli ol unu paralelaj titoloj de la serio, registru nur la unuan laŭ la ordo indikita de la sinsekvo, prezento aŭ tipografio de la mencioj en la informfonto.

490 0# $aSkarby muzeïv Ukraïny =$aSokrovishcha muzeev Ukrainy

Transskribu la paralelan titolon de la serio laŭ la instrukcioj por la registro de la Paralela titolo.

[40] Kvankam la ISBD-instrukcio en rilato al la mencio pri serio estas meti ĝin inter parentezoj, pro praktikaj kialoj kaj ĉar tio ne malutilos la rekuperadon aŭ la komprenon, la rekomendo estas ne sekvi ĝin ĉi-kaze.

1.6.3.15.4. Titolaldono de la serio

MARC 21: 490 $a, apliku la respondan ISBD-interpunkcion (:)

Registru la titolaldonon de serio nur se vi konsideras ĝin grava por la identigo de la serio.

490 0# $aEsperanto : kolekto de “La Revuo”

1.6.3.15.5. Mencio pri respondeco rilata al la serio

MARC 21: 490 $a, apliku la respondan ISBD-interpunkcion (/)

Registru la mencion pri respondeco rilata al serio nur se vi trovas tion nepra por la identigo de la risurco.

490 0# $aEsperantaj kajeroj / Centra Universitato

1.6.3.15.6. ISSN de la serio

MARC 21: 490 $x

Registru la ISSN de la serio se ĝi aperas en la risurco. Transskribu ĝin tiel, kiel ĝi aperas, inkludante la strekon sed sen la siglo.

490 0#...,$x0065-017X

Se en la risurco aperas kaj la ISSN de la serio kaj la ISSN de la subserio, registru ambaŭ, ĉiu el ili tuj post la responda titolo.

Vidu ekzemplojn en la rubriko ISSN de la subserio.

1.6.3.15.7. Numerado de la serio

KERNA

MARC 21: 490 $v (;)

Registru la numerojn, literojn, aliajn karaktrojn, datojn, tiel, kiel ili aperas en la fonto, krom se la numeroj estas esprimitaj per vortoj. Se tiel, registru ilin per arabaj ciferoj.

490 0#...; $v100

[kaj ne]

490 0#...; $vCent

490 0#...; $v1a

[kaj ne]

490 0#...; $vUnua

Transskribu ankaŭ la vortojn aŭ literojn, kiuj aperas ligitaj al la numerado.

490 0# $aBolsillo Blackie ; $vBOB5

Se la numerado konsistas el jaro kaj numero, registru ambaŭ. Se la numero estas divido de la jaro, registru la jaron unue.

490 0#...$vvolume 3, number 2 (September 1997)

490 0#...; $v2000, n-ro. 3

[En la fonto: n-ro. 3, 2000]

Se vi scias, ke la numerado estas erara, transskribu ĝin tiel, kiel ĝi aperas en la fonto kaj redaktu noton kun la ĝusta numero.

500 ## $aĜusta numero de la serio: v. 25

Se la numero ne aperas en la risurco, sed eblas dedukti ĝin, registru la numeron interkrampe.

490 0#...; $v[n-ro. 3]

Inkludu tiujn frazojn utilajn por diferencigi malsamajn sinsekvojn de numeradoj ene de la sama serio.

490 0#...; $vnova serio, n-ro 3

Se la ĉeftitolo de la serio inkludas la numeradon kiel integran parton de la titolo, transskribu la numeradon kiel parton de la ĉeftitolo de la serio. Tiukaze ne aldone uzu $v por registri la numeradon.

490 0# $aPublicación número 1074 de la Institución Fernando el Católico)

1.6.3.15.8. Ĉefitolo de la subserio

KERNA

MARC 21: 490$a

Se vi registris ISSN aŭ numeradon de la ĉefa serio, uzu novan subkampon $a:

490 0# $aEsperantista dokumentaro ;$v26. **$aI, Oficiala parto. Sekcio A, Kongresoj** ;$v10

Se vi ne registris ISSN aŭ numeradon de la ĉefa serio uzu la saman subkampon $a kaj apliku la respondan ISBD-interpunkcion: punkto (.):

490 0# $aStafeto**. Belliteratura serio** ;$v27-28

Se la eldonaĵo apartenas al ĉefa serio kaj subserio, registru ambaŭ kiel subelementojn de la sama mencio pri serio. Se vi dubas pri tio, ĉu iu titolo estas subserio aŭ alia ĉefa serio, registru ambaŭ kiel titoloj de malsamaj serioj.

490 0# $aKolekto esperanta aprobita de Dº Zamenhof

490 0# $aKolekto hispana

Registru la titolon de la subserio laŭ la samaj instrukcioj sekvendaj por la registro de la Ĉeftitolo de la serio.

Konsideru ke subserio povas konsisti el titolo, numera nomado de parto aŭ kombino de ambaŭ:

490 0# $aMéthodes "Assimil"**. Série "Sans peine"**

490 0# $aInternaciaj seminarioj**. Serio 1**

490 0# $aIltis-serioj**. I, Beletro originala**

1.6.3.15.9. Paralela titolo de la subserio

MARC 21: 490 $a, la subkampon devas antaŭi la responda ISBD-interkpunkcio (=)

Registru paralelan titolon de la subserio se ĝi aperas en la sama fonto kiel la titolo de la subserio.

Se estas pli ol unu paralelaj titoloj de la subserio, registru nur la unuan laŭ la ordo indikita de la sinsekvo, prezento aŭ tipografio de la mencioj en la informfonto.

Transskribu la paralelan titolon de la subserio laŭ la samaj instrukcioj sekvendaj por la registro de la Paralela titolo de la serio.

1.6.3.15.10. Titolaldono de la subserio

MARC 21: 490 $a, apliku la respondan ISBD-interpunkcion (:)

Registru la titolaldonon de la subserio nur se vi trovas tion nepra por la identigo de la subserio.

1.6.3.15.11. Mencio pri respondeco rilata al la titolo de la subserio

MARC 21: 490 $a, apliku la respondan ISBD-interpunkcion (/)

Registru la mencion pri respondeco rilata al la ĉeftitolo de la subserio nur se vi trovas tion nepra por la identigo de la subserio.

1.6.3.15.12. ISSN de la subserio

MARC 21: 490 $x

Registru la ISSN de la subserio se ĝi aperas en la risurco. Transskribu ĝin tiel, kiel ĝi aperas, inkludante la strekon.

490 0#..., $x0065-017X

Se en la risurco aperas kaj la ISSN de la serio kaj la ISSN de la subserio, registru ambaŭ, ĉiu el ili tuj post la responda titolo.

Ĉefa serio kun ISSN:

490 0# $aAmerican education today**,$x0177-6559**.$aDevelopments in elementary education

Subserio kun ISSN:

490 0# $aElectrical engineering studies. Electrostatics applications series**,$x0177-0112**

Serio kaj subserio kun po ISSN:

490 0# $aBiblioteca de arte**,$x0177-3211**.$aArtes aplicadas**,$x0177-6510**

1.6.3.15.13. Numerado de la subserio

KERNA

MARC 21: 490 $v

Registru la numeradon de la subserio laŭ la instrukcioj sekvendaj por la *Registro de la numerado de la serio*.

Se en la risurco aperas kaj la numerado de la serio kaj la numerado de la subserio, registru ambaŭ, ĉiu el ili tuj post la responda titolo.

Ĉefa titolo numerita

490 0# $aAmerican education today **;$v44**.$aDevelopments in elementary education

Subserio numerita:

490 0# $aElectrical engineering studies. Electrostatics applications series **;$vno. 9**

Serio kaj subserio numeritaj:

490 0# $aBiblioteca de arte **;$vno. 8**.$aArtes aplicadas **;$v2**

1.6.3.16 Notoj

La celo de la notoj estas kompletigi la informon, kiun ne eblis registri en iu el la aliaj rikordaj kampoj.

La notoj havas la saman interpunkcion kiel la elemento al kiu ĝi rilatas.

1.6.3.16.1. Notoj pri la titolo

MARC 21: 246 (Titolvarianto), 500 (Ĝenerala noto),

La titolo estas la ĉefa kaj plej grava informo pri iu eldonaĵo, tial, se en la kampo 245 ne restas sufiĉe klarigita ĉio pri ĝi, bezonatas kompletigi la informojn pere de notoj. En la kazoj de la titolo, estas du eblaj kampoj: 246 (kiu povas funkcii kiel noto aŭ/kaj kiel alirpunkto, depende de la indikiloj) kaj 500.

Pri tio, kiel oni kodigas informon pri la titolo en 246, vidu la sekcion Titolvarianto. Ekzemploj de notoj pri la titolo kodigendaj en 500 troviĝas laŭlonge de la sekcio Titolo.

1.6.3.16.2. Pliaj ĝeneralaj notoj

Multaj el la ĝeneralaj notoj estas jam klarigitaj en la teksto mem. Jen kelkaj alispecaj notoj eventuale utilaj:

500 ## $aAŭtoro prenita el la katalogo de la Aŭstria Nacia Biblioteko

[Se la informo pri aŭtoreco ne aperas en la eldonaĵo mem, oni indikas per noto de kie oni prenis la informon.]

500 ## $aPublikigita en Oslo

[Loko de publikigo tiel, kiel ĝi aperas en la fonto kaj transskribita en 264 $a: Christiania. Oslo estas la nuna nomo de Christiania]

500 ## $aInversitaj tekstoj kun duobla paĝnumerado.

500 ## $aGardita en teko

500 ## $aFolioj falditaj kiel akordeono

500 ##$aDepreso el: Menade bal püki bal : festlibro por Reinhard Haupenthal

1.6.3.16.3. Citaĵ-notoj

Redaktu noton citante informojn el iu fonto ene de la risurco se vi konsideras ĝin grava. Indiku la fonton el kiu vi prenis la citaĵon se ĝi ne estas la titolpaĝo.

500 ## $a"Kraków, urbo de Jubilea Kongreso 1912"--Kovrilo

[La informo aperas en la kovrilo]

500 ## $a"(28 diciembre 1906)"

[La informo aperas en la titolpaĝo]

1.6.3.16.4. Alispecaj notoj

1.6.3.16.4.1. Noto pri disertacio

MARC 21: 502 $a, 500 $a

Se la verko estas originala disertacio oficiale publikigita, indiku tion specifante la institucion kaj la daton, kiam la disertacio estis prezentita.

502 ## $aDisertacio--Université Paris 5 René Descartes, 1981

Se la verko suferis ian modifon respekte de la laboro prezentita kiel disertacio, indiku tion en ĝenerala noto:

500 ## $aBazita sur la disertacio de la aŭtoro.

Se la disertacio ne suferis modifon, sed ne temas pri la oficiala eldono, indiku tiun cirkonstancon per ĝenerala noto.

500 ## $aOrigine publikigita kiel disertacio.

1.6.3.16.4.2. Noto pri bibliografio

MARC 21: 504 $a

Se la risurco enhavas bibliografion registru ĝin laŭ la subaj modeloj, se vi opinias tiun datenon grava por la identigo de la risurco:

Bibliografiaj referencoj:

504 ## $aBibliografiaj referencoj

[se ili estas dismetitaj laŭlonge de la libro]

504 ## $aBibliografio: paĝoj 859-910

504 ## $aBibliografio: paĝo 351

505 ## $aBibliografio: 1 nenumerita paĝo

[se ili aperas kunaj en la sama sekcio de la monografio]

Bibliografiaj referencoj kaj indeksoj:

504 ## $aBibliografiaj referencoj kaj indekso

504 ## $aBibliografio: paĝoj 859-910. Indekso

Nur indeksoj:

500 ## $aIndekso

500 ## $aIndeksoj

Filmografio aŭ diskografio

La kampo uzeblas por registri alispecajn datenojn el la sama tipo

504 ## $aFilmografio: paĝoj 123-125

504 ## $aDiskografio: paĝo 68

1.6.3.16.4.3. Noto pri lingvo

MARC 21: 546 $a

Se la informo donita en la kampo 008 ne sufiĉas por identigi ĉiujn lingvojn de la risurco kaj vi kodigis informon en la kampo 041, kompletigu tiun informon per noto.

546 ## $aTeksto en Esperanto kaj la rusa

546 ## $aTitolpaĝo kaj teksto kontraŭmetitaj en la araba

546 ## $aTeksto en la itala; traduko, enkonduko kaj notoj en Esperanto

546 ## $aTeksto en la ĉina, angla kaj Esperanto; resumoj en la angla

1.6.3.16.4.4. Noto pri enhavo

MARC 21: 505 $a

La ĉefa utilo de ĉi noto estas registri titolojn de sendependaj verkoj enhavataj en iu risurco aŭ partojn de unuopaj verkoj se ili disponas proprajn titolojn.

245 00 $aTri unuaktaj komedioj

505 0# $aLa malfeliĉuloj / Louis Schneider laŭ A. v. Kotzebue ; esperantigis Leopold Elb. Tie ĉi oni parolas esperante / de T. Williams (1859) ; tradukita kaj aranĝita de M. Hankel. La renkonto / Marie Hankel

Por pli detale scii pri la kodigo de la noto el la vidpunto de la formato, vidu la kampon 505 en la gvidilo *Formato MARC 21.*

1.6.3.16.4.5. Noto pri premioj

MARC 21: 586 $a

Registru la premiojn ricevitajn de la verko se la informo disponeblas en la risurco kaj ĝi ne jam aperas en alia parto de la priskribo. Se la informo ne disponeblas en la risurco, ne serĉu ĝin aktive.

586 ## $aUnua premio en la Konkurso de Belga Esperantisto, Antverpeno 1911

586 ## $aPremio Celya de Poesía "homenaje a León Felipe", 2003 = Premio Celya de Poezio "omaĝo al León Felipe, 2003

Sed

245 00 $aPoesia da tutti i cieli :$bantologia del Premio - Terza edizione 2016 = Poezio el ĉiuj ĉieloj : antologio de la Premio - Tria eldono 2016 /$ca cura di = redaktis, Giuseppe Campolo

[La mencio pri la premio jam aperas en la titolo, ne necesas plia noto]

1.7. Alirpunktoj

La alirpunktoj utilas por lokalizi kaj identigi bibliografian rikordon ene de la katalogo pere de diversaj indeksoj.

Grava parto de katalogado estas, do, decidi kiuj el la datenoj, nomoj aŭ terminoj konsignitaj en la bibliografia priskribo konstituos la alirpunktojn. Tiu tasko nomiĝas *Elekto de la alirpunktoj*.

Ankaŭ gravas scii la formon, kiun devas prezenti tiuj alirpunktoj, ĉar ili estas submetitaj al normigado. Normigado tre gravas ĉar ĝi permesas la ĝustan identigon de aŭtoroj, verkoj, korporacioj, ktp., ene de la katalogoj kaj konstituas gvidilon por la kataloganto. La tasko starigi la aŭtoritatan formon de la alirpunktoj, nomiĝas kontrolo de aŭtoritatoj kaj por realigi ĝin oni kreas la tiel nomatajn aŭtoritatajn rikordojn pere de la modulo pri aŭtoritatoj en la mastrumsistemoj disponantaj ĝin.

Se via mastrumsistemo ne havas tiun modulon, endas tamen starigi la alirpunktojn en la bibliografia rikordo. Malavantaĝo en tiu kazo estas la malfacilo aŭ eĉ neeblo realigi la kontrolon de aŭtoritatoj.

1.7.1. Tipoj de alirpunktoj

Estas tri tipoj de alirpunktoj[41]:

1. Persona aŭtoro
2. Korporacia aŭtoro
3. Titolo de verko

Inter la diversaj alirpunktoj, kiujn povas havi bibliografia rikordo, nur unu el ili estas ĉefa; la aliaj, sekundaraj.

1.7.1.1 Persona aŭtoro

MARC 21: 100, 700

Persona aŭtoro estas kiu ajn persono respondeca tute aŭ parte de la intelekta aŭ arta enhavo de verko. Oni kodigas ĝin en la kampo 100 de MARC 21 se temas pri la ĉefa alirpunkto.

```
100 1#$aAuld, William$eaŭtoro
```

Se nomo de persono devas konstitui sekundaran alirpunkton, kodigu ĝin en la kampo 700.

```
700 1# $aKalocsay, Kálmán$etradukinto
```

1.7.1.2 Korporacia aŭtoro

MARC 21: 110, 710, 111, 711

Korporacia aŭtoro estas tiu aganto, konsistanta el homoj organizitaj por kolektiva celo, respondeca pri la kreado aŭ publikigo de verko. Temas pri organizoj, entreprenoj, institucioj, ktp., kiuj havas nomon per kiuj ili estas ĝenerale konataj kaj kiuj agas kiel unuoj. Oni kodigas ilin en la kampo 110 se temas pri la ĉefa alirpunkto.

[41] Ni ne konsideros ĉi tie la alirpunktojn rilatajn al la temo de la verko (kampoj 6XX de la formato).

110 2# $aUniversala Esperanto-Asocio$eaŭtoro

Rimarku, ke korporacio povas esti konsiderata ĉefa aŭtoro de la verko nur en jenaj kazoj:

- Verkoj de administra naturo, kiuj temas pri:
  - Ĝiaj internaj politikoj, proceduroj, financoj, ktp.
  - Ĝiaj oficejoj, laboristoj kaj membraroj (ekzemple, adresaroj)
  - Ĝiaj risursoj (ekzemple, katalogoj, inventaroj)
- Verkoj, kiuj registras la kolektivan penson de la korporacio (raportoj, oficialaj deklaroj, regularoj).
- Verkoj informantaj la kolektivan agadon de kongreso (aktoj, kompilaĵoj de prelegoj), ekspedicion aŭ eventon (ekspozicion, foiron, festivalon).
- Verkoj resultantaj de la kolektiva agado de grupo de interpretistoj aŭ aktoroj, kiuj agas kiel tuto, kie la respondeco de la grupo iras preter la nura intrepretado aŭ ludado (muzikaj ensembloj).
- Leĝaj verkoj *(maloftaj en Esperantujo)*:
  - Leĝoj
  - Dekretoj de ŝtatestro, aŭ reganto
  - Leĝaj prokejtoj
  - Administraciaj reglamentoj
  - Konstitucioj
  - Juraj proceduroj, sentencoj de tribunaloj
- Artverkoj de du aŭ pli da artistoj agantaj kiel korporacio *(maloftaj en Esperantujo)*.

110 2# $aUniversala Esperanto-Asocio$eaŭtoro

245 10 $aStatuto kaj regularo de Universala Esperanto-Asocio

110 2# $aSennacieca Asocio Tutmonda$eaŭtoro

245 10 $aAdresaro de Sennacieca Asocio Tutmonda

En kiu ajn aliaj kazoj, la korporacia alirpunkto estas ĉiam sekundara.

245 00 $aVojaĝo al Hirosima /$ctradukis kaj eldonis Hirosima Esperanto-Centro

710 2# $aHirosima Esperanto-Centro$etradukinto$erespondeca korporacio

Kiam temas pri **portempaj korporacioj**, kiel en la kazo de kongresoj, eblas kodigi ilin jen en kampo 110, jen en kampo 111 laŭ certaj reguloj, kiujn ni vidos poste.

111 2#$aIberia Kongreso Esperantista$n(3a.$d1925.$cKordovo),$jaŭtoro

110 2#$aInternacia Fervojista Esperanto-Federacio.$bKongreso$n(22a.$d1970.$cRimini)$eaŭtoro

Same kiel en la antaŭa kazo, korporacioj kaj kongresoj povas konstitui sekundarajn alirpunktojn. Kodigu ilin en unu el ĉi kampoj laŭbezone: 710, 711.

1.7.1.3 Titolo de verko

MARC 21: 130, 100 (+240 aŭ 243), 245 0, eventuale ankaŭ 110 aŭ 111 (+240 aŭ 243)

Titolo estas la “vorto aŭ vortoj per kiuj risurco estas konata, kiu ofte referas al ties enhavo”. En la kunteksto RDA, la alirpunkto pri titolo rilatas al la titolo de la enhavata verko en la risurco, kies formo povas aŭ ne koincidi kun la ĉeftitolo de la eldonaĵo. Normigita titolo de verko estas nomata “preferata titolo”. En antaŭaj regularoj oni nomis ĝin “unuforma titolo” kaj MARC 21 plu uzas tiun terminologion.

Por kodigi la titolon de verko ezkistas diversaj kampoj. Vidu la suban skemon:

1.7.1.3.1. Preferataj titoloj por anonimaj verkoj: rektaj alirpuntoj

Kampo 130 – La preferata titolo estas la ĉefa alirpunkto de la bibliografiaj rikordo, plej ofte ĉar la risurco enhavas nur tiun verkon.

130 0# $aEgils saga Skallagrímssonar

Kampo 730 – La preferata titolo rolas kiel sekundara alirpunkto, ekzemple, en la kazoj, kiam en la risurco enestas pluraj verkoj.

730 02 $aEgils saga Skallagrímssonar

1.7.1.3.2. Preferataj titoloj por verkoj kun konata aŭtoro persona aŭ korporacia: nerektaj alirpunktoj

Kampo 240 – Preferata titolo de unuopa verko de unu aŭtoro

Kampo 243 – Kolektiva preferata titolo por kolektoj aŭ kompilaĵoj de verkoj de unu aŭtoro

Ĉi tiuj du kampoj ne povas aperi solaj, ili bezonas la ĉeeston de ĉefa alirpunkto de persono aŭ korporacia aŭtoro (100, 110, 111). Koha kaj multaj aliaj programoj ne bone mastrumas ĉi nerektajn aŭ “tranĉitajn” alirpunktojn. En la praktiko, nur la parton respondan al la aŭtoro ligiĝas al la bibliografia rikordo, tamen, kreado de aŭtoritata rikordo pri la verko povas esti utila por la kontrolo de la preferata titolo, kiu ĉiel ajn devas esti normigita.

Ni prenu kiel ekzemplon la verkon *A midsummer night's dream*, de Shakespeare. La verkon oni identigas per la kombino: aŭtoro + verko:

Shakespeare, William. A midsummer night's dream

Se tiu verko konstituas la ĉefan alirpunkton de rikordo, la informo devas aperi dividita en du kampoj: 100 + 240.

100 1# $aShakespeare, William$eaŭtoro

240 12 $aA midsummer night's dream

Sed, se la verko konstituas sekundaran alirpunkton, la informo aperas kunigita en la sama kampo 700.

700 12 $aShakespeare,William.$tA midsummer night's dream

La afero funkcias same se temas pri kolektiva preferata titolo. Ni imagu eldonaĵon de la kompleta verkaro de L. L. Zamenhof. La kompilaĵo mem estas ankaŭ konsiderata “verko”, sed ĝi ne havas identigeblan titolon, ĉar ne temas pri titolo kiun la aŭtoro mem donis, sed pri titolo decidita de la eldoninto. Do, oni kreas kolektivan titolon por identigi la kompilaĵon.

Jen preferata kolektiva titolo kiel ĉefa alirpunkto:

100 1# $aZamenhof, L. L.$eaŭtoro

243 10 $aVerkaro

Kaj jen ĝi kiel sekundara:

700 12 $aZamenhof, L .L.$tVerkaro

1.7.1.3.3. Preferataj titoloj por tradukoj

La antaŭaj kampoj utilas ankaŭ por kodigi la titolojn de tradukoj de verkoj.

Por identigi tradukon sufiĉas aldoni al la kampoj, kie oni kodigis la titolon de la verko, la subkampon $l, kun la lingvo de la traduko.

Ni revenu al la anonima verko. La normigita formo de la traduka titolo en Esperanto estas:

Egils saga Skallagrímssonar. Esperanto

130 0# $aEgils saga Skallagrímssonar.$lEsperanto

730 02 $aEgils saga Skallagrímssonar.$lEsperanto

Kaj en la kazo de Shakespeare, la normigita formo de la traduka titolo en Esperanto estas:

Shakespeare, William. Hamlet. Esperanto

Oni kodigas tion respektive kiel ĉefan aŭ sekundaran alirpunkton jene:

100 1# $aShakespeare, William$eaŭtoro

240 12 $aA midsummer night's dream.$lEsperanto

700 12 $aShakespeare,William.$tA midsummer night's dream.$lEsperanto

En ĉi lasta ekzemplo, ni konsideru ankaŭ la kampon 245, kiu enhavas la ĉeftitolon, tiun de la eldonaĵo. Rimarku kiel la tri titoloj rilatas inter si en la bibliografia rikordo:



Sed estas ankoraŭ unu plia ebleco: uzi la ĉeftitolon kiel ĉefa alirpunkto.

1.7.1.3.4. Ĉeftitolo kiel ĉefa alirpunkto

Preferindas uzi ĉi eblecon kiam la ĉeftitolo, nome, la titolo de la eldonaĵo, koincidas kun la preferata titolo de la verko. Tio ofte okazas, kiam oni katalogas la verkon en sia originala lingvo.

Ni prenu sekvan ekzemplon:

Kvaropo / W. Auld, J.S. Dinwoodie, J. Francis, R. Rossetti ; antaŭparolo de G. Waringhien

Temas pri kompilaĵo de verkoj de kvar aŭtoroj, sekve do, ne eblas asigni la ĉefan aŭtorecon al neniu el ili, kaj tial oni traktas la verkon kiel anonima, ĉar ne ekzistas alirpunkto en kampo 100 en la rikordo.

La preferata titolo por la kompilaĵo estas:

Kvaropo

Kaj, laŭ RDA, ĝi devus esti kodigita en la kampo 130:

130 0# $aKvaropo

245 10 $aKvaropo /$cW. Auld, J.S. Dinwoodie, J. Francis, R. Rossetti ; antaŭparolo de G. Waringhien

Ĉar la titoloj en 130$a kaj 245$a , *Kvaropo*, samas, eblas ne kodigi la kampon 130 kaj, en tiu kazo, la titolo kodigita en 245$a konstituas la ĉefan alirpunkton:

245 00 **$aKvaropo** /$cW. Auld, J.S. Dinwoodie, J. Francis, R. Rossetti ; antaŭparolo de G. Waringhien

La afero funkcias simile se temas pri unuopa verko de persona aŭ korporacia aŭtoro, kvamkam en ĉi kazo, la ĉefa alirpunkto estus persona aŭ korporacia.

Ekzemple, la preferata titolo de la verko *Arto kaj naturo* de Reto Rossetti estas:

Reto Rossetti. Arto kaj naturo

Kaj ĝi estus kodigita laŭ RDA per kombino de campoj 100 + 240.

100 1# $aRossetti, Reto

240 10 $aArto kaj naturo

245 10 $aArto kaj naturo :$beseoj /$cReto Rossetti

Same kiel en la antaŭa ekzemplo, la titoloj kodigitaj en 240$a kaj 245$a samas: *Arto kaj naturo*. Eblas do, ne uzi la kampon 240, kaj en ĉi kazo la preferata titolo de la verko estas reprezentata de la kombino de la kampoj 100 + 245$a.

100 1# $aRossetti, Reto

245 10 **$aArto kaj naturo** :$beseoj /$cReto Rossetti

Cetere, en ambaŭ kazoj, ĉar la titolo de la eldonaĵo estas en la originala lingvo de la verko, kaj en tiuj kazoj oni ne aldonas informon pri la lingvo, la titolo de la tri entoj, verko, esprimo kaj manifestiĝo koincidas[42].

1.7.2. Elekto de alirpunktoj

Ĉefa alirpunkto

KERNA

MARC 21: 130, 100 (+240 aŭ 243), 110, 111

[42] Ĉi tiu eblo ne registri la preferatan titolon de verko en la koncernaj kampoj ŝuldiĝas al la strukturo de la MARC-formato, kiu estonte permesos per manipulado de la datenoj rekrei la ĉenojn de karaktroj necesajn por ĝuste identigi la diversajn RDA-entojn en la kazo, ke iam vi decidos migrigi vian datenbankon al alia sistemo ne funkcianta per MARC 21 sed per Bibframe aŭ simila.

Sekundaraj alirpunktoj

En esperantaj bibliotekoj, konsilindas almenaŭ jenaj: tradukintoj, editoroj, kompilintoj kaj aŭtoroj de prologoj aŭ epilogoj.

MARC 21: 700, 710, 711, 730

1.7.2.1 Anonimaj verkoj

Kiam la risurco enhavas nur unu anoniman verkon, la ĉefa alirpunkto estas la preferata titolo de tiu verko.

130 0# $aEgils saga Skallagrímssonar.$lEsperanto

245 10 $aSagao de Egil

Se temas pri kompilaĵo de du aŭ pli anonimaj verkoj, aŭ de verkoj el kiuj almenaŭ unu estas anonima, sekvu la instrukciojn por Kompilaĵoj de verkoj de malsamaj aŭtoroj.

1.7.2.2 Verkoj kreitaj de unu aŭtoro

Kiam la respondeco pri iu risurco estas nur de unu persono aŭ korporacio, la ĉefa alirpunkto estos la nomo de tiu persono aŭ korporacio. En la kazo de persono, eĉ kiam la nomo ne aperas en la risurco kaj oni devas preni la datenon el eksteraj fontoj.

100 1# $aSteele, Trevor$eaŭtoro

245 10 $aApenaŭ papilioj en Bergen-Belsen :$originala romano pri Germanio /$cTrevor Steele

100 1# $aHemingway, Ernest$eaŭtoro

240 14 $aThe old man and the sea.$lEsperanto

245 13 $aLa oldulo kaj la maro /$cErnest Hemingway ; el la uson-angla tradukis Fernando de Diego ; ilustraĵoj de C.F. Tunnicliffe kaj Raymond Sheppard

100 1# $aCervantes Saavedra, Miguel de$eaŭtoro

240 10 $aDon Quijote de la Mancha.$lEsperanto

245 10 $aDonkiĥoto

[La nomo de la aŭtoro, Cervantes, ne aperas en la eldonaĵo]

110 2# $aKatolika Eklezio. Papo (1963-1978: Paŭlo la 6a)$eaŭtoro

240 10 $aEcclesiam suam.$lEsperanto

245 10 $aLa vojoj de la Eklezio :$bencikliko de Lia Papa Moŝto Paŭlo VI

111 2# $aKoncilio Vatikana$n(2ª.$d1962-1965)

240 10 $aConstitutio dogmatica de Ecclesia.$lEsperanto

245 10 $aDogma konstitucio pri la Eklezio

1.7.2.3 *Kompilaĵoj de verkoj de unu aŭtoro*

La ĉefa alirpunkto estu la nomo de tiu aganto respondeca pri la verkoj.

Estas pluraj kazoj:

- La propra aŭtoro donis nomon al la kompilaĵo. Eblas konjekti, ke la aŭtoro donis nomon al la kompilaĵo (aŭ konsentis la proponitan de la eldoninto) se la kompilaĵo estis unuafoje eldonita dum la vivo de la aŭtoro.

  100 1# $aCatalán, Miguel$eaŭtoro

  240 10 $aSuma breve

  245 10 $aSuma breve : $bpensamiento breve reunido, (2001-2018) / $cMiguel Catalán

  [Preferata titolo, kiun la aŭtoro decidis por eldonaĵo kuniganta liajn verkojn inter 2001 kaj 2018]

- La kompilaĵo estas konata per difinita titolo en la referencfontoj aŭ ĝi estas ĉiam la sama en la diversaj eldonoj.

  100 1# $aCervantes Saavedra, Miguel de$eaŭtoro

  240 10 $aNovelas ejemplares

En kiu ajn alia kazo, registru konvencian kolektivan titolon por identigi la kompilaĵon. La termino uzata kiel konvencian kolektivan titolon dependas de la enhavo de le eldonaĵo:

a. Se ĝi inkludas aŭ pretendas inkludi la tutan verkaron de aŭtoro, registru la terminon:

   Verkaro

   100 1# $aNadal, Rafael$eaŭtoro

   243 10 $aVerkaro

   245 10 $aVerkaro de Rafael Nadal

b. Se ĝi inkludas verkoj en nur unu formo, registru unu el la subaj terminoj:
   Poezio
   Teatro
   Romanoj
   Noveloj
   Fabeloj
   Eseoj
   Korespondaĵoj
   Artikoloj
   Prozo

   100 1# aLu, Xuneaŭtoro

   243 10 $aNoveloj.$lEsperanto

   245 10 $aNoveloj de Lusin :$bplena kolekto

c. Se ĝi enhavas du aŭ pli da verkoj sed ne ĉiujn en unu formo, registru la respondan konvencian kolektivan titolon sekvatan de la termino:
   Elektaĵo

100 1# $aSchiller, Friedrich

243 10 $aPoezio.$kElektaĵo.$lEsperanto

245 10 $aElektitaj poemoj /$cFriedrich Schiller

100 1# $aSartre, Jean Paul

243 10 $aTeatro.$kElektaĵo.$lEsperanto

245 10 $aSen eliro ; kaj La respektema p… /$cJean Paul Sarte

d. Se ĝi enhavas du aŭ pli da verkoj, sed ne ĉiujn, en pluraj formoj, registru la terminon: **Verkaro. Elektaĵo**

100 1# $aZamenhof, L. L.$eaŭtoro

243 10 $aVerkaro.$kElektaĵo

Redaktu krome sekundarajn analizajn alirpunktojn de la enhavataj verkoj, se vi trovas tion necesa por la identigo aŭ aliron de la risurco, laŭ la instrukcioj de la sekcio *Rilataj verkoj*.

100 1# $aRadakoviĉ, Branko M.$eaŭtoro

243 10 $aNoveloj

245 10 $aDu noveloj /$averkis Branko M. Radakoviĉ

500 0# $aĈe la malnova fajrero ; Silvia

700 12 $aRadakoviĉ, Branko M.$tĈe la malnova fajrero

700 12 $aRadakoviĉ, Branko M.$tSilvia

100 1# $aCervantes Saavedra, Miguel de$eaŭtoro

240 10 $aNovelas ejemplares.$kElektaĵo.$lEsperanto

245 10 $aDu junaj fraŭlinoj ;$bkaj Korneliino : du noveloj el la bonekzemplaj /$cde Miĥaelo de Cervantes ; tradukitaj de Julio Mangada Rosenörn

700 12 aaCervantes Saavedra, Miguel de.$tLas dos doncellas.$lEsperanto

700 12 aaCervantes Saavedra, Miguel de.$tLas señora Cornelia.$lEsperanto

1.7.2.4 Verkoj kreitaj de pli ol unu aŭtoro

En risurcoj en kiuj aperas pli ol unu kreintoj, unue determinu ĉu la risurco enhavas verkon kreitan kunlabore aŭ kompilaĵon de verkoj de malsamaj aŭtoroj.

Kiam temas pri **kunlabora verko**, du aŭ pli da agantoj kune respondecas pri la kreado de la verko.

En **kompilaĵo** estas du aŭ pli da sendependaj verkoj, ĉiu kun propraj respondecaj agantoj.

Jen kelkaj kriterioj, kiuj helpas distingi ĉu temas pri kunlabora verko aŭ kompilaĵo:

Kunlabora verko	Kompilaĵo
Oni ne distingas pri kiu parto respondecas ĉiu el la kreintoj.	La risurco klare indikas pri kiu parto responsas ĉiu kreinto.

	Ne eblas kunlaboro (ĉar la kreintoj vivis en malsamaj epokoj, ekzemple).
	Ĉeesto de editoro aŭ kompilinto.

Kaze de dubo, pensu ke temas pri kunlabora verko.

1.7.2.4.1. Verkoj en kunlaboro

La ĉefa alirpunkto estas la nomo de la ĉefa responsulo de la kreado de la verko. Se ne ekzistas ĉefa responsulo, la nomo de tiu nomata unuavice en la informfonto[43].

Redaktu sekundarajn alirpunktojn por la ceteraj kreintoj. Starigu ilian rilaton kun la verko sekvante la instrukcioj de la sekcio *Rilataj agantoj*.

100 1# $aGrosjean-Maupin, Émile$eaŭtoro

245 10 $aPlena vortaro de Esperanto /$cverkita de Profesoro E. Grosjean-Maupin, direktoro de la sekcio "Komuna Vortaro" ĉe la Esperantista Akademio, A. Esselin, S. Grenkamp-Kornfeld, Prof. G. Waringhien, membroj de la Lingva Komitato

700 1# $aEsselin, Albert$eaŭtoro

700 1# $aGrenkamp-Kornfeld, S.$eaŭtoro

700 1# $aWaringhien, Gaston$eaŭtoro

La kunlaboro povas ankaŭ okazi laŭ jenaj formoj:

1. **Kunlaboro inter verkisto kaj artisto (pentristo, desegnisto, fotografisto, ktp.)**

100 1# $aGoscinny, René$eaŭtoro

245 10 $aAsteriks la gaŭlo /$ateksto, Goscinny ; desegnaĵoj, Uderzo ; Esperanto-versio, internacia tradukrondo

700 1# $aUderzo, Albert,$artisto

100 1# $aScherer, Kees$efotografisto

245 10 $aNederlando /$cfotolibro de Kees Scherer ; kun teksto de Jaap Romijn

700 1# $aRomijn, Jaap$eaŭtoro de la aldona teksto

2. **Konversacioj, intervjuoj, debatoj, etc.**

Se en la teksto ne aperas la rektaj respondoj de la intervjuitoj, la ĉefa alirpunkto estas la nomo de tiu, kiu donas literaturan formon al la laboro, la redaktinto de la teksto. Redaktu sekundarajn alirpunktojn por la intervjuitoj.

100 1# $aLópez Garrido, Isabel$eintervjuinto

245 10 $aLa movado en Galegio $bintervjuoj kun lokaj esperantistoj

700 1# $aMoinhos, Manel$eintervjuito

[43] Tio estas gravas difereco respekte de regularoj bazitaj sur AACR. Antaŭe, se la kunlaborantoj estis pli ol tri, oni traktis la verkon kiel anonima. Prikonsideru tion, se vi ĉerpas rikordojn el katalogo, kiu ne sekvas RDA.

700 1# $aGonzález, Antonio$eintervjuito

700 1# $aAlonso, Sara$eintervjuito

Se la teksto reproduktas krude la respondojn de la intervjuitoj sen ajna redaktado, la ĉefa alirpunkto estos la nomo de la intervjuito, se estas nur unu. Se estas du aŭ pli da intervjuitoj, konsideru, ke ne estas kunlaboro, sed kompilaĵoj de verkoj de malsamaj aŭtoroj. Redaktu ĉiam sekundaran alirpunkton por la intervjuinto.

245 00 $aDu intervjuoj :$cinterparoloj kun Kálmán Kalocsay kaj William Auld /$cReinhard Haupenthal

700 1# $aKalocsay, Kálmán$eintervjuito

700 1# $aAuld, William$eintervjuito

100 1# $aHaupenthal, Reinhard$eintervjuinto

3. Leteraroj

Se la eldonaĵo kompilas la leterojn de unu persono kaj la senditajn al li aŭ ŝi de pluraj aliaj personoj, la ĉefa alirpunkto estas la nomo de tiu persono. Redaktu sekundarajn alirpunktojn por la aliaj personoj, se vi trovas tion necesa.

100 1# $aZamenhf, L.L.$eaŭtoro

243 10 $aKorespondaĵoj

245 10 $aLeteroj de L.-L. Zamenhof :$bla tragedio de lia vivo rivelita de lia ĵus retrovita korespondo kun la francaj eminentuloj /$cprezentado kaj komentado de G. Waringhien

Se la eldonaĵo enhavas la leterojn, kiujn du aŭ pli da personoj interŝanĝis, apliku la ĉefan instrukcion por *Verkoj en kunlaboro*.

Se la eldonaĵo enhavas la leterojn de du aŭ pli da personoj senditaj al la sama adresato, apliku la instrukcion por *Kompilaĵoj de verkoj de malsamaj aŭtoroj*.

1.7.2.4.2. Kompilaĵoj de verkoj de malsamaj aŭtoroj

La ĉefa alirpunktoj en ĉi kazoj estas la ĉeftitolo de la eldonaĵo. Redaktu krome sekundarajn analizajn alirpunktojn de la enhavataj verkoj, se vi trovas tion necesa por la identigo de la risurco, laŭ la instrukcioj de la sekcio *Rilataj verkoj*.

245 00 $a**Du amosentaj noveloj** /$cel germana lingvo tradukis Alfred Bader

500 0 # $aImenlago / Theodor Storm. Maruŝka / Mela Escherich

700 12 $aStorm, Theodor.$tImmensee.$lEsperanto

700 12 $aEscherich, Mela.$tMaruŝka.$lEsperanto

245 00 **$aSagao de Egil** ;$bFrithjof-sagao

730 02 $aEgils saga Skallagrímssonar.$lEsperanto

730 02 $aFrithiofs saga.$lEsperanto

1.7.2.5 Verko kaj traduko publikigitaj kune

En la kazoj de verko kaj ĝia traduko publikigitaj kune, registru la titolon de la verko kiel ĉefan alirpunkton. Faru sekundaran alirpunkton por la traduko. Same se temas pri anonima verko.

100 1# $aDante Alighieri$eaŭtoro

240 13 $aLa divina commedia

245 13 $aLa divina commedia =$bLa dia komedio

700 1# $aDante Alighieri$tLa divina commedia.$lEsperanto

100 1# $aSzilágyi, Ferenc$eaŭtoro

240 13 $aLa liberiĝo de la juĝisto

245 13 $aLa liberiĝo de la juĝisto =$bLa liberación del juez

700 1# $aSzilágyi, Ferenc $tLa liberiĝo de la juĝisto.$lHispana

1.7.2.6 Unu parto aŭ pli da partoj de iu verko

Se ne kompleta verko, sed nur parto aŭ pluraj partoj de ĝi konstituas la eldonaĵon, sekvu subajn instrukcioj depende de la kazoj. Same se temas pri anonima verko.

1.7.2.6.1. Unu parto

Se la parto havas identigan titolon, tiu estu la ĉefa alirpunkto.

100 1# $aCervantes Saavedra, Miguel de$eaŭtoro

240 14 $aEl curioso impertinente.$lEsperanto

[Titolo per kiu estas konataj la ĉapitroj 33-35 de la verko Don Quijote de la Mancha]

Se la parto ne havas identigan titolon, uzu la komunan titolon sekvatan de la termino por identigi la parton se ĝi ekzistas, en la sama lingvo kiel la titolon, kaj registru la numeron de la parto per arabaj ciferoj.

100 0# $aHomero$eaŭtoro

240 13 $aOdiseado.$nKanto 1

100 1# $aVergilio$eaŭtoro

240 10 $aBucolica.$n4

1.7.2.6.2. Du aŭ pli da partoj

Se la partoj estas sinsekve numeritaj, registru la terminon por nomi la partojn en singularo kaj en la sama lingvo kiel la titolon, kun la sinsekva numerado en arabaj ciferoj.

100 0# $aHomero$eaŭtoro

240 13 $aOdiseado.$nKanto 1-6

100 1# $aLucrecio Caro, Tito$eaŭtoro

240 10 $aDe rerum natura. $nLiber 1-3

100 1# $aVergilio$eaŭtoro

240 10 $aBucolica.$n3-4

Se la partoj ne estas numeritaj aŭ la numerado ne estas sinsekva aŭ ili ne koincidas kun la originala disdivido de la aŭtoro (temas pri fragmentoj aŭ kombinaĵo de fragmentoj kaj ĉapitroj), registru la titolon de la verko sekvatan de la konvencia kolektiva titolo ***Elektaĵo*** por identigi la partojn.

100 0# Molière$eaŭtoro

240 10 $aGeorge Dandin.$kElektaĵo.$lEsperanto

100 1# Lermontov, Mihail$eaŭtoro

240 10 #$aGeroj našego vremeni.$kElektaĵo.$lEsperanto

130 0# $aTill Eulenspiegel.$kElektaĵo.$lEsperanto

1.7.2.7 Adaptaĵoj kaj revizioj

Kiam la adaptaĵo aŭ revizio ŝanĝas esence la naturon aŭ la enhavon de verko, oni konsideras, ke tiu adaptaĝo aŭ revizio estas nova verko. La ĉefa alirpunkto estas la nomo de la responsulo de la nova verko.

Redaktu ankaŭ alirpunkton por la antaŭa verko, laŭ la instrukcioj de la rubriko *Rilatoj de verkoj derivitaj*, en la sekcio *Rilataj verkoj*.

100 1# $aMorrison, William$eaŭtoro

245 10 $aBardell kontraŭ Pickwick :$bproceso eltirita el la romano "Pickwick Papers" de Charles Dickens /$cdramigita kaj esperantigita de William Morrison

700 1# $iAdaptaĵo de (verko):$aDickens, Charles.$tBardell and Pickwick

1.7.2.8 Komunikoj de spiritoj

La ĉefa alirpunkto en la komunikoj de spiritoj estas la nomo de la spirito. Redaktu sekundaran alirpunkton por la nomoj de la mediumo aŭ la persono, kiu registras la komunikon.

100 0# $aAndré Luiz,$c(spirito)$eaŭtoro

245 10 $aAgo kaj reago /$cFrancisco Cândido Xavier ; diktita de la spirito Andreo Ludoviko ; el la portugallingva originalo esperantigis L. C. Porto Carreiro Neto

700 1# $aXavier, Francisco Cândido$emediumo

1.7.2.9 Verkoj de aŭtoro, kiu nomas sin anonima

Oni ne uzas la vortojn Anonima, Anonimulo aŭ iliaj variantoj en aliaj lingvon kiel alirpunkto, eĉ se tiuj vortoj aperas en la preferata informfonto. La ĉefa alirpunkto estas la preferata titolo aŭ la nomo de la aganto, se oni konas ĝin. Se ne, traktu la verkon kiel anonima.

100 1# $aBass, Cyrus$eaŭtoro

245 10 $aHow I answered Joe McCarthy /$cby Anonymous

[Oni scias, per aliaj fontoj, la nomon de la aŭtoro]

245 00 **$aPlaying the game** /$cby Anonymous

1.7.2.10 Kongresoj

La eldonaĵoj pri kongresoj estas tre oftaj en la Esperanto-movado. Estas pluraj tipoj: kongreslibroj, kongresprogramoj, prelegaroj, unuopaj prelegoj eldonitaj aparte, verkoj pri difinitaj kongresoj, ktp.

1.7.2.10.1. Ĝenerala regulo

La ĉefa alirpunkto en preskaŭ ĉiuj kazoj estas la nomo de kongreso mem, ĉar oni konsideras, ke la kongreso estas la aŭtoro de la verko.

111 2# $aHispana Kongreso de Esperanto$n(64a.$d2005.$cAlcalá de Henares),$jaŭtoro

245 10 $aDonkiĥoto parolas esperanton =$cDon Quijote habla esperanto /$caktoj de la 64a Hispana Esperanto-Kongreso

111 2# $aUniversala Kongreso de Esperanto$n(70a.$d1985.$cAugsburg),$jaŭtoro

245 10 $aKongresa libro /$c70a Universala Kongreso de Esperanto, Augsburg, 3-10 aŭgusto 1985

111 2# $aIberia Kongreso Esperantista$n(3a.$d1925.$cKordovo),$jaŭtoro

245 10 $aImpresoj kaj raportoj :$aldono al la kongreslibro /$cIIIa Iberia Kongreso Esperantista, Kordovo, 10-12a de majo 1925

246 14 $aRaporto de la III Iberia Kongreso Esperantista

110 2# $aInternacia Fervojista Esperanto-Federacio.$bKongreso$n(22a.$d1970.$cRimini)

245 10 $a22a IFEF-Kongreso, Rimini (Italio), 16-22 majo 1970

1.7.2.10.2. Unuopaj prelegoj

Se oni publikigas aparte unuopan prelegon prezentitan en kongreso, la ĉefa alirpunkto estas la nomo de la preleganto. Sed oni devas ankaŭ redakti sekundaran alirpunkton por la kongreso.

100 1# $aRosals, Johano$eaŭtoro

245 10 $Vulkanismo kaj la vulkana regiono de Olot (Katalunlando) :$bparolado farita dum IV Kongreso de K.E.F. okazinta en Olot 1913a /$cJohano Rosals

711 2# $Kataluna Kongreso de Esperanto (4a. 1913. Olot),$jrespondeca korporacio

1.7.2.10.3. Verkoj pri kongreso

Kiam oni katalogas risurcon, kies temo estas iu kongreso, la ĉefa alirpunkto estas la nomo de la aŭtoro. La kongreso konstituas priteman alirpunkton.

100 1# $aHankel, Marie$eaŭtoro

245 10 $aBilder vom dritten Esperanto-Kongreß in Cambridge :$bim August 1907 /$cvon Marie Hankel

611 24 $aUniversala Kongreso de Esperanto$n(3a.$d1907.$cKembriĝo)

1.7.2.10.4. Pluraj kongresoj okazintaj samtempe

En tiuj kazoj, apliku la regulon pri *Verkoj en kunlaboro*.

111 2# $aHispana Kongreso de Esperanto$n(77a.$d2018.$cMadrido)

245 10 $aKongreslibro /$c77a Hispana Kongreso de Esperanto, 20-22 julio, 51a Kongreso de ILEI, 21-28 julio, Madrido, 2018

710 2# $aInternacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.$bKongreso (51a.$d2018.$cMadrido)

1.7.3. Formo de la alirpunktoj

La alirpunktoj en bibliografia rikordo devas havi la saman formon kiel la ĉefa alirpunkto de la aŭtoritata rikordo.

Mastrumsistemoj kun modulo de aŭtoritatoj, kiel Koha, ekzemple, permesas ĉerpi bezonatan alirpunkton jam kreitan el la aŭtoritata datenbanko aŭ krei novan se ĝi ne ankoraŭ troviĝas en tiu datenbanko.

Ĉar la kreado de alirpunkto estas antaŭa al ĝia uzado en bibliografia rikordo, vidu la instrukciojn de la sekcio *Kreado de aŭtoritataj rikordoj*, por scii kian formoj devas havi la alirpunktoj en ĉiu kazo.

1.8. Rilataj agantoj

Kiel parto de la personaj aŭ korporaciaj alirpunktoj, estas la kodigita informo pri la rilato (rolo aŭ funkcio), kiun tiuj agantoj havas respekte de la verko. Plej ofte, tiu informo jam aperas nestrukturite en la mencio pri respondeco, sed RDA postulas ankaŭ kodigi ĝin en la alirpunktoj por pli klare priskribi la rilaton inter la aganto kaj la risurco.

Tiu rilato estas esprimita, do, per la kombino de:

- La alirpunkto pri la rilata aganto
- La termino, kiu identigas la rilaton ($e aŭ $j se la alirpunkto estas 111 aŭ 711)
- La kodo de tiu termino ($4)

La termino kaj la kodo ne estas parto de la alirpunkto mem, kio signifas, ke oni ne devas inkludi ilin en la responda rikordo pri aŭtoritato de la aganto. La proceduro, do, estas ĉerpi la alirpunkton el la datenbanko de aŭtoritatoj kaj aldoni la terminon kaj la kodon nur en la bibliografia rikordo.

La kodo provizas universalan lingvaĵon por la maŝinoj kaj estas utila en la kazo de partopreno en internacia katalogaj projektoj, por ke la funkcio estu senerare komprenita, ĉar la terminon oni kodigas en la lingvo de la katalogo. Malgrandaj bibliotekoj povas senprobleme ne uzi la kodojn de la terminoj.

Trovu simpligitan liston de terminoj kaj kodoj en la apendico *Terminoj kaj kodoj pri funkcioj*. Se vi bezonas terminon ne aperantan en tiu listo, prenu ĝin de la originala MARC-listo[44].

La termino ofte estas montrata en la normala vido de rikordo; la kodo, kutime aperas nur en la MARC-vido. Sed tio dependas de la taŭga agordado de la sistemo.

100 1# $aSienkiewicz, Henryk$eaŭtoro$4aut

700 1# $aBein, Kazimierz$etradukinto$4trl

700 1#$aMorita, Akira$eeditoro$4edt

700 1#$aDaŝgupta, Probal$eaŭtoro de la epilogo$4aft

110 2# $aVjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio$eaŭtoro$4aut

710 2# $aAkademio de Esperanto$erespondeca korporacio$4isb

Uzu tiom da terminoj kaj kodoj, kiom necesaj por bone identigi la rilaton de aganto kun la verko, krom se laŭ la opinio de kataloganto, iu(j) el ili estas negravaj. Kodigu ilin en malsamaj subkampoj $e kaj $4.

100 1# $aWendell, Lehman$etradukinto$eaŭtoro$eilustrinto$4trl$4aut$4ill

700 1# $aBlanke, Detlev$etradukinto$eaŭtoro de la epilogo$4aut$4aft

Koha ne montras la konvencian interpunkcion por la subkampo $e, kiu estas komo (,). Anstataŭe, ĝi montras la terminon interkrampe. Tial, oni ne tajpu la interpunkcion rilatan al $e dum katalogado.

Jen kiel oni kodigas la subkampojn $e kaj $4 en la kataloga formularo de Koha:



Kaj jen kiel oni vidas tion en la normala vido de la retkatalogo:

[44] https://www.loc.gov/marc/relators/relaterm.html

1.9. Rilataj verkoj

En ĉi ĉapitro la vorto “verko” estas uzata same por paroli sendistinge pri la verko en sia originala lingvo kaj pri ĝiaj tradukoj en aliaj lingvoj.

Eblas registri la rilaton inter rilataj verkoj laŭ tri malsamaj manieroj:

Rilat-indikilo + alirpunkto (700, 710, 711, 730)

La rilat-indikilo, kodigita en subkampo $i, antaŭos la alirpunkton, krom en analizaj alirpunktoj, en kiuj la dua indikilo kun valoro “2” (kun la signifo “enhavata”) igas la rilat-indikilon nenecesa. Vidu: *Rilatoj de tuto-parto*.

700 1# $iParodio de (verko): $aCarroll, Lewis.$tAlice's adventures in Wonderland

700 1# $iEnhavata en (verko): $aDurrell, Lawrence. $tThe Alexandria quartet

700 12 $aMolina, Tirso de. $tEl burlador de Sevilla

[La valoro 2 de la 2a indikilo signifas, que la risurco enhavas tiun verkon]

Strukturita noto

Eblas uzi anstataŭe strukturitan noton por starigi rilaton kun la katalogata verko. En tiu kazo, uzu la ISBD-interpunkcion, se necese, taŭgan por ĉiu kazo.

500 ## $aAdaptaĵo de: The adventures of Tom Sawyer / Mark Twain

500 ## $aBazita sur: Naruto / Kishimoto, Masashi

500 ## $aDepreso de: Klaro kaj elasto

Nestrukturita noto

Noto libere redaktita de la kataloganto.

500 ## $aBazita sur la disertacio de la aŭtoro

Ĉi tri formoj registri rilaton ne estas ekskluzivaj kaj eblas redakti noton kiam la rilato esprimita pere de la alirpunkto ne estas sufiĉe klara.

245 13 $aLa infano de la 21a jarcento

500 ## $aEnhavas (paĝoj 23-26): Deklaracio de la rajtoj de infanoj

710 22 $aUnuiĝintaj Nacioj.$bĜenerala Asembleo.$tDeclaración de los derechos del niño

1.9.1. Rilatoj de tuto-parto

Tuto-parto

La bibliografia rikordo reprezentas la **tuton** kaj oni deziras starigi la rilaton kun la komponentaj partoj. Traktu la risurcon jen kiel kompilaĵon de verkoj de unu aŭtoro, jen kiel kompilaĵon de verkoj de malsamaj aŭtoroj, laŭ la kazoj.

Redaktu, krome, noton pri enhavo (505) por specifi la enhavatajn verkojn, krom se ili jam aperas en la kampo 245.

245 00 $Premiitaj tezoj

505 0# $aLa grava signifo de l' Nova Testamento en Esperanto / de A. J. Edmonds. La graveco de Esperanto por la blinduloj / de W. Phillimore

700 12 $aEdmonds, A. J..$tLa grava signifo de l' Nova Testamento en Esperanto

700 12 $aPhillimore, W.$tLa graveco de Esperanto por la blinduloj

100 1# $aKivi, Aleksis$eaŭtoro

243 10 $aTeatro.$kElektaĵo.$lEsperanto

245 13 $aLa fianĉiĝo ;$bLea : du teatraĵoj /$cAleksis Kivi ; kun permeso tradukitaj de Hilma Hall

700 12 $aKivi, Aleksis.$tKihlaus.$lEsperanto

700 12 $aKivi, Aleksis.$tLea.$lEsperanto

En trilogioj kaj similaj verkoj, en kiuj la titolo, kiu reprezentas la tuton, implicite reprezentas ankaŭ ĉiun parton, oni ne redaktas sekundarajn alirpunktojn por la partoj.

100 1# $aTolkien, John Ronald Reuel$eaŭtoro

240 14 $aThe lord of the rings.$lEsperanto

245 13 $aLa mastro de l' ringoj /$cJohn Ronald Reuel Tolkien ; tradukis el la angla lingvo William Auld

505 0# $aUnua parto. La kunularo de l' ringo (543 paĝoj, 1 mapo) -- Dua parto. La du turegoj (429 paĝoj) -- Tria parto. La reveno de la reĝo (399 paĝoj)

Parto-tuto

La bibliografia rikordo reprezentas **unu parton** kaj oni deziras starigi la rilaton kun la tuto.

Registru la ĝeneralan titolon per citaĵnoto indikante en kiu parto de la risurco ĝi troviĝas, se temas pri alia fonto ol la titolpago. Kreu sekundaran alirpunkton por la ĝenerala verko kaj starigu la rilaton per la rilat-indikilo: *$iEnhavata en (verko)*[45].

100 1# $aDurrell, Lawrence$eaŭtoro

240 10 $aJustine.$lEsperanto

245 10 $aJustine /$cLawrence Durrell ; tradukita de Aurora García

500 ## "La Aleksandria kvarteto, 1"

700 1# $iEnhavata en (verko):$aDurrell, Lawrence.$tThe Alexandria quartet

100 1# $aTolkien, John Ronald Reuel$eaŭtoro

240 14 $aThe fellowship of the ring.$lEsperanto

245 13 $aLa kunularo de l' ringoj :$bla unua parto de La mastro de l' ringoj /$cJohn Ronald Reuel Tolkien ; tradukis el la angla lingvo William Auld

700 1# $iEnhavata en (verko):$aTolkien, John Ronald Reuel.$tThe lord of the rings

[45] RDA donas du eblecojn por pritrakti la komunan titolon de plurvoluma verko en analiza priskribo, jen kiel verko, jen kiel serio (kiel faras AACR). Ĉi lasta miksas la konceptojn plurvoluma verko kaj serio. Mi proponas la unuan formon, ĉar ĝi estas mule pli logika kaj sekvas la ĝeneralan nunan tendencon en la biblitekista mondo.

[En ĉi kazo ne necesas citaĵnoto por doni la ĝeneralan titolon de la traduko, ĉar ĝi aperas jam kiel titolaldono]

1.9.2. Rilatoj de verkoj derivitaj

Registru la rilaton de la priskribata verko kun la verko el kiu ĝi estas derivita se vi havas la informon en la katalogata risurco. Elektu la rilat-indikilon el la sekva listo:

Rilato	Noto
Bazita sur (verko)	Estas la plej ĝenerala rilat-indikilo. Uzu ĝin kiam taŭgas neniu el la subaj aŭ kiam laŭ la opinio de la kataloganto ne penvaloras precizigi la rilaton.
Resumo de (verko)	Por verkoj resumitaj sen ŝanĝi la signifon aŭ la prezenton de la originalo.
Adaptaĵo de (verko)	Por verkoj modifitaj por malsama celo aŭ uzo.
Imitaĵo de (verko)	Por verkoj, kies stilon aŭ enhavon oni kopiis en la derivitan verkon.
Parodio de (verko)	Por verkoj, kies stilon aŭ enhavon oni kopiis en la derivitan verkon por ricevi komikan efikon.
Ampleksigita versio de (verko)	Por verkoj uzataj kiel bazo por derivita verko, kiu ampleksigas la enhavon de la originalo.

Esta pli da rilat-indikiloj, sed tiuj estas la plej uzataj.

100 1# $aHorváth, Tibor Cs.$eaŭtoro

245 14 $aB. Prus, La faraono /$cla bildarkonton verkis Tibor Cs. Horváth ; desegnis Attila Fazekas ; la esperantan tekston kompilis (uzante la tekston de Kabe) Vilmos Benczik

700 1# $iAdaptaĵo de (verko):$aPrus, Bolesław.$tFaraon

1.9.3. Rilatoj de akompanaj verkoj

Registru la rilaton de la priskribata verko kun la verko, kiu ĝin akompanas aŭ iel kompletigas, se vi havas la informon en la katalogata risurco. Elektu la rilat-indikilon el la sekva listo:

Rilato	Noto
Apendico de (verko)	Por verkoj, kiuj ampleksigas aliajn verkojn per neesenca materialo kiel listo de referencoj, statistikaj tabeloj, klariga materialo, kiam ĝi estas publikigita aparte de la ĉefa verko.
Konkordanco de (verko)	Por verkoj uzitaj kiel bazo de koncordanco, nome, indekso de la vortoj de la ĉefa verko.
Indekso de (verko)	Por verkoj, kiuj estas sistema alfabeta gvidilo por la enhavo de la ĉefa verko, ĝenerale kun indiko de la paĝnumeroj aŭ aliaj referenckodoj.
Suplemento de (verko)	Por verkoj, kiuj ĝisdatigas la ĉefan verkon.
Komplementita de (verko)	Por verkoj parigitaj, kiam neniu el ili povas esti konsiderata superrega.

Esta pli da rilat-indikiloj, sed tiuj estas la plej uzataj. Eblas ampleksigi la liston kaze de neceso.

245 10 $aKonkordanco de "Ekzercaro" de dro L. L. Zamenhof /$cellaboris Alfred E. Wackrill ; kun antaŭparolo de E. Boirac

700 1# $iKonkordanco de (verko):$aZamenhof, L. L.$tEkzercaro

245 10 $aElektitaj paroladoj kaj prelegoj : (suplemento al Retoriko) / Ivo Lapenna

700 1# $aSuplemento de (verko):$aLapenna, Ivo.$tRetoriko

1.9.4. Rilatoj de sinsekvo

Registru la rilaton de la priskribata verko kun la verko, kiu ĝin sekvas aŭ antaŭas se vi havas la informon en la katalogata risurco. Elektu la rilat-indikilon el la sekva listo:

Rilato	Noto
Sekvo de (verko)	Por verkoj, kiu daŭrigas antaŭan verkon sub nova titolo.
Daŭrigo de (verko)	Por verkoj, kies rakontado estas daŭrigita de posta verko.
Antaŭdaŭrigo[46] de (verko)	Por verkoj, kies rakontado estas etendita malantaŭen en la tempo de posta verko.

700 1# $iDaŭrigo de (verko): $aAtwood, Margaret $d(1939-)$tThe handmaid's tale

1.10. Rilataj eldonaĵoj[47]

Registru la rilaton inter eldonaĵoj laŭ la plej konvena el la subaj manieroj:

1.10.1. Eldonaĵoj en malsamaj formatoj

Se la sama eldono estas publikigita en malsamaj formatoj, registru tiun cirkonstancon per noto. Se via biblioteko disponas ambaŭ formatojn, donu la informon reciproke en ĉiu rikordo.

530 ## $aPublikigita ankaŭ kiel PDF

530 ## $aPublikigita ankaŭ kiel presaĵo

1.10.2. Reproduktaĵoj aŭ faksimiloj de aliaj eldonaĵoj

Kiam iu eldonaĵo estas uzata kiel bazo por identa reproduktaĵo registru tiun cirkonstanco per struktutita noto se vi disponas de la originalajn eldondatenojn.

264 1# $aZaragozo:$bEldonejo Atlaso, $c1984

[46] Antaŭdaŭrigo (kelkfoje ankaŭ antaŭepizodo aŭ praepizodo) estas verko (filmo, libro, kaj simile) kiu estas eldonita post alia verko, sed kronologie okazas antaŭ la pli frue eldonita verko. Multaj lingvoj uzas la anglan *prequel,* kiu estas vortokunfando el *pre* = antaŭ kaj *sequel* = daŭrigo (Vikipedio).

[47] Eblus registri ĉi rilatojn ankaŭ pere de rilat-indikilo + iu rilata MARC-kampo. Tio permesus navigi inter rikordoj se la biblioteko disponas ambaŭ eldonaĵoj, sed Koha ne bone mastrumas tiun navigadon.

534 ## $pReproduktaĵo de la eldono de:$cMadrid : Santiago Burgos, 1905

008/06 r 008/04-14 19841932

245 00 $aEspaña húmeda

264 1# $aSevilla:$bEditorial Cosmos,$c2015

534 ## $pReproduktaĵo de:$tPaisaje en la España húmeda$cMadrid : Librería Hernando, 1922

008/06 r 008/04-14 20151922

Uzu tiun kampon ankaŭ kiam temas pri represo farita de malsama eldonanto.

264 1# $a[Kioto] :$bL'Omnibuso, $c1984

534 ##$pRepreso de la: $b1a eld.$cEkrelo, 1932

008/06 r 008/04-14 19841932

Se temas pri represo de la sama eldonanto registru tiun cirkonstancon kiel mencion pri eldono en la kampo 250.

Registru la rilaton per nestrukturita noto de libera redakto, se vi ne disponas aŭ ne ekzistas originalaj eldondatenoj.

500 ## $aFaksimilo de originala manuskripto kaj ĝia kompostita teksto

1.10.3. Depresoj

Registru la rilaton per strukturita noto en la kampo 500 se vi konas la datenojn de la devena eldonaĵo.

500 ## $aDepreso el: Klaro kaj elasto : fest-libro por la 80a naskiĝ-tago de Fernando de Diego

1.10.4. Eldonaĵoj, kiuj donas aliron al retaj risurcoj

Estas ĉiam pli ofta apero de monografioj, kiuj inkludas informon pri tio, kiel aliri retan version (jen kompletan jen partan) aŭ alian retan rilatan risurcon. Starigu la rilaton pere de noto kaj la kampo 856 laŭ la sekvaj indikoj:

Eldonaĵoj, kiuj donas aliron al la kompleta reta versio

530 ## $aDisponibla ankaŭ rete

856 4**2** $yReta versio $uhttps://www…

Eldonaĵoj, kiuj donas aliron nur al parto de la risurco

530 ## $aFotogalerio disponebla ankaŭ rete per rapidresponda kodo

856 4**1** $3Fotogalerio $uhttp://…

Eldonaĵoj, kiuj donas alliron al rilata reta risurco.

500 ## $aRetaliro al la kantoj

856 4**3** $3Kantoj$uhttp://…

Registru la retadreson en la kampo 856 nur se laŭ la opinio de la kataloganto, ĝi estas findinda kaj antaŭvideble persista en la tempo. Se ne, sufiĉas la informo ĉe la noto.

1.10.5. Aliro al bitigita ekzemplero de la eldonaĵo

Eblas doni aliron al bitigita ekzemplero de iu eldonaĵo pere de la kampo 856. Registru tiun informon nur se, laŭ la opinio de la kataloganto, ĝi estas findinda kaj antaŭvideble persista en la tempo. Estas fidindaj fontoj de aliroj al bitigitaj risurcoj, ekzemple, la Aŭstria Nacia Biblioteko kaj aliaj naciaj bibliotekoj, Bitoteko kaj similaj projektoj.

856 4**1** $yDisponebla en la Aŭstria Nacia Biblioteko$u https://digital.onb.ac.at/RepViewer/viewer.faces?doc=DTL_7277642&order=1&view=SINGLE

856 4**1** $yDisponebla en Bitoteko$u https://hdl.handle.net/11013/5437

1.11. Kompleksaj MARC-kampoj kaj kampoj de numeroj

Temas pri tiuj kampoj de la formatoj plej teknikaj, kiuj ebligas la taŭgan funkciadon de la programo. En la kazo de monografioj, endas kodigi jenajn:

000-Kapo (Vidu ankaŭ la ĝeneralan informon pri 000-Kapo en la responda sekcio de la gvidilo *Formato MARC 21*).

Jen la valoroj, kiujn havu la kampo 000 en ties diversaj pozicioj por katalogado de monografioj laŭ kompleta nivelo:

000 - Leader

0-4 Record size	(auto-filled)
5- Record status	n- New
6- Type of record	a- Language material
7- Bibliographic level	m- Monograph/item
8- Type of control	No specific type
9- Character coding scheme	a - UCS/Unicode (auto-filled)
10-16 indicator/subfields/size	(auto-filled)
17- Encoding level	Full level
18 - Descriptive cataloging form	i- ISBD punctuation included
19 - Multipart resource record level	Not specified or not applicable
20-24 entry map & lengths	(auto-filled)

En ordo Nuligu

Se biblioteko decidas uzi nur la kernajn elementojn dum katalogado, la valoro de la pozicio 17 devas esti 7 (minimuma nivelo). Ankaŭ se uzante kompletan priskribon oni decidis ne redakti pritemajn alirpunktojn.

Estas aliaj du valoroj uzeblaj: 3 (mallongigita nivelo) kaj 5 (parta aŭ prepara nivelo). Per la valoro 3 oni deklaras, ke la rikordo ne plenumas la minimumajn postulojn de katalogado, sed la biblioteko ne intencas estonte kompletigi ĝin; per la valoro 5 oni deklaras, ke la rikordo estas daŭre redaktata, kaj kvankam nun ĝi ne plenumas la minimumajn postulojn de katalogado, la biblioteko ne konsideras, ke tiu estas la fina versio de la rikordo kaj havas la intencon iam kompletigi ĝin.

Ekzemple, biblioteko, kiu kreas rikordon nur kun la kampoj pri titolo kaj mencio pri respondeco, publikigado kaj fizika priskribo. La valoro 3 indikas, ke la rikordo restos tia, dum la valoro 5 indikas, ke iam oni kompletigos la rikordon, jen je minimuma jen je kompleta nivelo.

En la kazo de plurvolumaj risurcoj, eblas ankaŭ indiki en la pozicio 19 ĉu oni faris integran aŭ analizan priskribon kaj, en ĉi lasta kazo, ĉu la titolo de la parto katalogita estas dependa aŭ sendependa.



Por Esperanto-katalogo, sufiĉas la implicita opcio de la sistemo: *Ne specifita aŭ ne aplikebla*, sed kataloganto sciu, ke eblas plidetaligi la tipon de priskribo kaze de bezono.

008- Informkodoj de fiksa longeco. Ĝenerala informo

La kampo 008 enhavas ĉefe, escepte de la ses unuaj pozicioj, bibliografian informon. Tial multaj bibliotekoj havas dubojn pri tio ĉu plenigi ĝin tute aŭ ne. Tion decidas la bibliotekoj, depende de la utilo aŭ intereso, kiun tiu informo havas por siaj katalogoj. Tamen, estas kelkaj informeroj, kiujn konsilindas ĉiam doni en ĉi kampo: **tipo de dato** (pozicio 06), **dato** (pozicioj 07-10, se estas unika dato kaj ankaŭ pozicioj 11-14 se estas pluraj datoj), **loko de publikigo** (pozicioj 15-17)**, kaj lingvo de la teksto** (pozicioj 35-37).

Por scii pli detale pri la uzo de la kampo, vidu la koncernan informon en la kampo 008 en la responda sekcio de la gvidilo *Formato MARC 21*.

020 – ISBN

Ni jam vidis en la rubriko ISBN de la manlibro, kiel uzi ĝin. Pli da informo trovu en la la kampo 020 en la responda sekcio de la gvidilo *Formato MARC 21*.

041 – Lingvokodo (se necese)

En la kampo 041 oni registras la kodojn de la lingvoj asociitaj al iu risurco, kiam la indiko en 008/35-37 ne sufiĉas por doni kompletan informon. Oni povas ankaŭ registri la lingvon en la 546 en formo de noto.

La kampo 041 uzatas, do, kune kun 008/35-37. La kodon registritan en 008/35-37 oni indikas ankaŭ en 041 kiel unua kodo en subkampo $a.

Por scii pli detale pri la uzo de la kampo, vidu la koncernan informon en la kampo 041 en la responda sekcio de la gvidilo *Formato MARC 21*.

1.12. Specialaj kazoj

1.12.1. Plurvolumaj monografioj

1.12.1.1 Koncepto

Plurvoluma monografio: Risurco publikigita en du aŭ pli da volumoj (jen samtempe jen sinsekve) kompletigita aŭ kun la intenco esti kompletigita per finohava nombro da partoj (ekzemple, duvoluma vortaro).

En ĉi ĉapitro, oni indikos la instrukciojn, kiuj estas malsamaj de tiuj indikitaj en la ĝenerala instrukciaro.

Ĝenerale, **preferu la integran priskribon** de la risurco se vi disponas ĝin kompleta aŭ vi esperas iam kompletigi ĝin. En ĉi lasta kazo, la rikordo restos malferma tiom longe, kiom mankus iu el la volumoj kaj oni devas modifi ĝin por kompletigi la informon al la nova cirkonstanco kreita de la alveno de plia volumo. Uzu ĝin nepre kiam la malsamaj volumoj ne havas titolon de parto.

Tamen, uzu la **analizan priskribon** por katalogi

1. trilogiojn (ekzemple, *La kunularo de l' ringo*),

2. kolektojn de verkoj en kiuj ĉiu volumo havas malsaman aŭtoron,

3. la individuajn volumojn se vi ne disponas la risurcon kompleta aŭ se iu alia cirkonstanco de via biblioteko tion rekomendas.

1.12.1.2 Informfontoj

Por katalogi plurvoluman risurco, prenu kiel preferanta fonto de informo, tiun sur kiu aperas kolektiva titolo aŭ, se ne estas kolektiva titolo, tiun, kiu identigas la tutan risurcon. Se ne ekzistas tiu fonto, elektu tiun, kiu identigas la unuan volumon, aŭ manke de ĝi, tiun unue publikigita. Kiel lasta ŝanco, tiun kiu identigas la unuan disponeblan volumon.

Trovu pli da informoj en *Determino de la ĉefa informfonto* kaj *Preferata fonto de informo*.

1.12.1.3 Tipo de priskribo

En plurvoluma risurco eblas trovi diversajn titolojn. Ĉiam estas titolo, kiu identigas la tutan risurcon, kaj foje estas ankaŭ titoloj, kiuj identigas la diversajn partojn. Cetere, povas esti mencioj pri respondeco rilataj al la tuto kaj mencioj pri respondeco rilataj nur al iu specifa parto. Ĉion ĉi oni devas prikonsideri, kiam oni elektas unu aŭ alian tipon de priskribo.

1.12.1.3.1. Integra priskribo

Kiam oni faras integran priskribon, la komuna titolo rolas kiel ĉeftitolo de la eldonaĵo. La menciojn pri respondeco rilatajn al tiu komuna titolo oni kodigas en 245 $c.

Se estas, krome, titolojn de la partoj kaj mencioj pri respondeco rilataj al tiuj partoj, oni registras ilin en noto de enhavo. Ankaŭ en tiu noto oni registras tiujn datenojn specifajn de la partoj, kiel la paĝnumeradon.

245 13 $aLa faraono : romano /$cB. Prus ; el la pola tradukis Kazimierz Bein (Kabe)

300 ## $a3 volumoj (194, 238, 198 paĝoj)

245 13 $aSerta gratulatoria in honorem Juan Régulo

300 ## $a4 volumoj

505 0# $aI. Filología (766 paĝoj) -- II. Esperantismo (790 paĝoj) -- III. Geografía e Historia (897 paĝoj) -- IV. Arqueología y Arte. Miscelánea (730 paĝoj)

1.12.1.3.2. Analiza priskribo

Kiam oni katalogas unuope la volumojn de pluvoluma risurco, oni devas konsideri ĉu la titoloj komunaj kaj de la parto aperas en la sama informfonto kaj ĉu ĉi lasta estas sufiĉe signifa per si mem.

Titoloj de partoj, sekcioj kaj suplementoj.

- Se la titolo de unu volumo aperas en la informfonto **sen la titolo komuna** por ĉiuj partoj, registru la titolon de la parto kiel ĉeftitolon, eĉ se ĝi ne sufiĉas por plene identigi la parton.

  Registru la komunan titolon kiel citaĵon en noto se ĝi aperas en alia informfonto de la risurco.

  245 00 $aEnglish history, 1914-1945

  500 ## $a"Oxford history of England"--Kovrilo

- Se la titolo de unu volumo aperas en la informfonto **kun la titolo komuna** por ĉiuj partoj, konsideru:
  - Se la titolo de la parto **ne sufiĉas** por identigi ĝin, tiu titolo estas fakte **dependa titolo**. Registru ĝin tuj sekve de la titolo komuna ĉar ambaŭ kune konstituas la ĉeftitolon:

    245 10 $aEtimologia vortareto pragmata de Esperanto.$pSuplemento

    ["Suplemento", per si mem, ne estas plensignifa kaj bezonas la komunan titolon por ke ĝi akiru plenan sencon]

    Ĉi-kaze, la ĉeftitolo povas enhavi ankaŭ la numeradon de la parto. Redaktu la titolon de la parto, sekcio aŭ suplemento en la kampo 246 havigante alirpunkton se vi trovas tion necesa:

    245 10 $aKonkordanco al la Krestomatio.$nUnua parto,$pLa participoj

    246 30 $aLa participoj

    [La titolo de la parto "La participoj", ĉi-kaze ne sufiĉas por identigi la risurcon ĉar sen la komuna titolo eblus pensi, ke la verko temas pri gramatikaĵo anstataŭ pri konkordanco al alia verko]

  - Se la titolo de la parto **sufiĉas** por identigi la risurcon, kiel okazas en la kazo de trilogioj, registru ĝin tiel ĉeftitolon.

    Registru la komunan titolon kiel citaĵon en noto, se ĝi ne aperas jam en alia parto de la priskribo.

    245 13 $aLa kunularo de l' ringo

    500 ## $a"La unua parto de La mastro de l' ringoj"

[Ĉi-kaze, la komuna titolo aperas en la kovrilo sendepende de la titolo de la parto]

245 13 $aLa kunularo de l' ringo :$bla unua parto de La mastro de l' ringoj

[Ĉi-kaze, la komuna titolo aperas en la titolaldono]

1.12.1.4 Bibliografia priskribo

1.12.1.4.1. Titolo

1.12.1.4.1.1. Ŝanĝoj en la ĉeftitolo

Se la ĉeftitolo de plurvoluma risurco ŝanĝiĝas en unu aŭ pluraj partoj post tiu, sur kiu baziĝas la priskribo, regustru la novan titolon per noto:

245 00 $aHistorie de l'Anglaterre

246 1# $Titolo de la volumo 4: $aHistorie de la Grande Anglaterre

1.12.1.4.1.2. Ŝanĝoj en la paralela titolo.

Se oni aldonas, ellasas aŭ ŝanĝas paralelan titolon en unu aŭ pluraj partoj post tiu, sur kiu baziĝas la priskribo, registru tiun ŝanĝon per noto se vi opinias tion grava por la uzanto.

245 00 $aBai wei xiang : $bJueyuan su shi pu

246 1# $iParalela titolo de la volumo II: $aHundred-flavor cuisine

1.12.1.4.1.3. Ŝangoj en la titolaldono

Se la titolaldono de plurvoluma risurco ŝanĝiĝas en la partoj post tiu, sur kiu baziĝas la priskribo, eblas registri tiun ŝanĝon per noto se vi opinias tion grava por la uzanto. Alternative, eblas redakti ĝeneralan noton dirante, ke la titolaldono varias en la malsamaj volumoj.

245 13 $aLa columna vertical : $bevaluación clínica y aproximaciones terapéuticas

246 0# $iTitolaldono de la volumo 2: $aSíndromes clínicos y su tratamiento manipulativo

500 ## $aLa titolaldono varias

1.12.1.4.1.4. Titolaldono de la komuna titolo

Kiam la ĉeftitolo konsistas el komuna titolo plus dependa titolo, la titolaldonon de la dependa titolo oni registras tuj sekve de ĝi. La titolaldonon de la komuna titolo oni donas per noto

245 $aJigsaw puzzles. $pChildren's art : $ba decade of examples

500 ## $a"A visual survey"

[En la fonto: Jigsaw puzzles / A visual survey / Children's art /A decade of examples]

Oni ne prikonsideru tion, kiam la dependa titolo konsistas el numero rilata al la fizika priskribo, ne al la intelekta enhavo de la verko. Alivorte, la numeradon donis la eldonisto kaj ne respondas al la divido de la verko pensita de la aŭtoro. Ĉi kaze, registru la titolaldonon post la ĉeftitolo:

245 $aLos bosques de Navarra :$becosistemas perdurables.$nTomo I

245 $aNoventa y tres : $bnovela histórica original.$nVolumen II

1.12.1.4.2. Mencio pri respondeco

1.12.1.4.2.1. Integra priskribo kun noto de enhavo

La menciojn pri respondeco rilataj al la tuta verko (aŭtorojn, editorojn, tradukintojn, kompilintojn, ktp.) oni kodigas en 245 $c.

La menciojn pri respondeco de ĉiu parto oni kodigas sekve de ĉiu titolo en la noto pri enhavo.

245 00 $aHistorio de Hispanio /$cRosa López García (kunordigo)

505 0# $a[1]. La keltoj / Juan Antonio López Fuentes -- [2]. La iberoj / Joaquín Martín González, Antonio Sastre Pérez

245 00 $aLa pentrarto de la 20ª jarcento

505 0# $a1. Ĝis 1950 / Javier Alonso – 2. La avangardoj / Maite del Corral

Se temas pri kolekto de verkoj (ne pri komponentaj partoj de la sama verko) redaktu la respondajn alirpunktojn tiel, kiel ni indikas en *Rilatoj de tuto-parto*.

1.12.1.4.2.2. Integra priskribo sen noto de enhavo

En ĉi kazo, la volumoj ne havas proprajn titolojn. Registru en 245$c la menciojn pri respondecoj komunajn al la tuta risurco aŭ tiujn aperantajn en la informfonto elektita por la priskribo.

Se mencio pri respondeco estas aldonita aŭ forigita en la sekvaj volumoj, registru la ŝanĝojn per noto

245 00… / $cFederico Martín de Juanes

500 ## $aVolumo II verkita de: María Rodríguez Díaz

Redaktu tiom da notoj, kiom da malsamaj funkcioj endas registri.

500 ## $aVolumo 2 verkita de Julián Romero de la Torre; volumo 3 verkita de Marta Sánchez

500 ## $aVolumo 3 kunordigita de David Juárez

Se la ŝanĝoj estas troaj aŭ la kataloganto opinias, ke ne penvaloras registri tiom da ŝanĝoj, redaktu ĝeneralan noton.

500 ## $aLa mencio pri respondeco varias

1.12.1.4.2.3. Analiza priskribo kun dependa titolo

Kiam la titolon men konstituas komuna kaj dependa titoloj, registru la menciojn pri respondeco rilatajn al la dependa titolo en 245$c.

Registru la menciojn pri respondeco rilataj al la ĝenerala verko per noto, se vi trovas tion grava por la uzanto.

245 10 $aCasos clínicos. $pSuplemento /$cMaría Estévez

500 ## $aDirektoro de la ĝenerala verko: Pedro Hernández

245 00 $aHistoria de las civilizaciones. $pSiglos VI-III a.C.

500 ## $aKunordiginto de la ĝenerala verko: Marc Smith

1.12.1.4.2.4. Analiza priskribo kun titolo de parto

Kiam la ĉeftitolo estas la titolo propra de la volumo katalogata sendepende, registru la menciojn pri respondeco rilataj al tiu titolo en 245$c.

Registru la menciojn pri respondeco rilataj al la ĝenerala verko per noto, se vi trovas tion grava por la uzanto:

245 10 $aHistorio de Pollando /$cEmily Dogson

500 ## $a"Historio de Eŭropo, IV"

500 ## $aEditoro de la ĝenerala verko: Peter Lawson

1.12.1.4.3. Mencio pri eldono

Ĝenerale, oni ne devas miksi malsamajn eldonojn de plurvoluma verko en la sama rikordo, krom en la kazo de eldonaĵojn nekompletajn se ni certas, ke la malsamaj eldonoj neniam kompletiĝos. En tiu kazo, la mencio pri eldono de la volumoj sekvantaj la unuan oni registras per noto.

250 ## $aUnua eldono

500 ## Volumo 2, tria eldono

Neniam miksu eldonojn se vi apartenas al projekto pri kolektiva katalogo.

1.12.1.4.4. Mencio pri publikigo, ktp.

1.12.1.4.4.1. Loko de publikigo kaj nomo de la eldoninto

Se la loko de publikigo aŭ produktado ŝanĝiĝas en la sekvaj volumoj kompare al tiu sur kiu baziĝas la priskribo, registru tiun informon per noto, se vi opinias ĝin grava por la uzanto.

Agu same se ŝanĝiĝas la nomo de la eldoninto aŭ presisto

500 ## $aVolumo 2 publikigita de Mondial

500 ## $aVolumo 2 publikigita en Berlino

500 ## $aVolumoj 3-4 publikigitaj de: Madrido : SAT-eH

Se la ŝanĝoj estas multaj, registru ĝeneralan noton:

500 ## $aLa mencio pri publikigo varias

1.12.1.4.4.2. Dato de publikigo, ktp., aŭ kopirajto

Kiam oni priskribas la kompletan risurcon, oni donas la datojn de publikigo de la unua kaj lasta publikigitaj volumoj disigitaj per streko.

264 #1 ..., $c1996-1999

Se la dato de kopirajto varias en la diversaj volumoj kaj vi faras integran priskribon, registru nur la plej ĵusan.

264 #4 $c©1999

[La datoj de kopirajtoj en la 3 volumoj de la eldonaĵo estas 1996, 1998 kaj 1999 respektive]

1.12.1.4.4.3. Publikigataj risurcoj

Tamen, se ni lasas la rikordon provizore malferma, ĉar la eldonaĵo estas ankoraŭ en publikigado, la informo registrita en $c povas rimarkinde varii, depende de la disponeblaj volumoj. Oni uzas angulajn parentezojn por indiki, ke la informo estas provizora, kaj ĝi varios laŭ la ricevado de la mankantaj volumoj de la verko.

Ĉi proceduro ankaŭ utilas, kiam ĉiuj volumoj de la verko estas jam publikigitaj sed nia biblioteko ne disponas ĉiujn kaj preferas lasi la rikordon malferma, kaze ke eblos iam kompletigi la volumaron.

Ekzemple, ni imagu verkon en 4 volumoj publikigitaj en la jaroj 1996, 1997, 1998 y 1999.

Volumoj ricevitaj	Registro de la koncerna dato
Ni disponas nur la 1an volumon	264 1# ...$c1996-
Ni disponas la 1an volumon kaj alia(j)n meza (j)	264 1# ...$c1996-<1997>
Ni disponas la unuajn 3 volumojn	264 1# ...$c1996-<1998>
Ni disponas nur unu mezan volumon	264 1# ...$c<1997>
Ni disponas unu mezan volumon kaj la lastan	264 1# ...$c<1997>-1999
Ni disponas du mezajn volumojn	264 1# ...$c<1997-1998>
Ni disponas nur la lastan volumon	264 1# ...$c-1999

Se oni devas registri daton interkrampe, la anguloj iras ĉirkaŭe:

264 1# ...,$c<[2004]>

Se ni havas du datojn kaj ambaŭ devas iri interkrampe, sed nur unu el ili estas provizora, la krampo enhavu ambaŭ kaj la anguloj restu interne:

264 1# ...,$c[2001-<2005>]

Vidu ankaŭ la kampon 008 por vidi kiel oni registras la informon en ĉiu kazo.

Foje, la dato de publikigo de la unua volumo estas pli ĵusa ol tiu de la ceteraj volumoj numerigitaj kiel postaj. Se vi konsideras, ke la dato de tiu unua volumo gravas, registru ĝin per noto.

500 ## $aVolumo 1 publikigita en 2009

1.12.1.4.5. Amplekso

Por priskribi plurvoluman monografion registru la amplekson havigante la nombron de volumoj.

300 ## $a3 volúmenes

Se la volumoj estas enhavataj en ujo, redaktu noton por indiki tiun cirkonstancon.

500 ## $aGarditaj en teko

1.12.1.4.5.1. Volumoj kun kontinua paĝnumerado

Se la volumoj havas kontinuan paĝnumeradon, indiku parenteze la paĝnumeradon, post la nombro da volumoj.

300 ## $a8 volumoj (894 paĝoj)

300 ## $a3 volumoj (420 paĝoj)

Se ĉiu volumo havas sekvencon de antaŭtekstaj paĝoj disigitaj de la kontinua paĝnumerado, ignoru la sekvencojn de paĝoj respondaj al la antaŭtekstoj de la volumoj post la unua.

300 ## $a3 volumoj (XX, 800 paĝoj)

[Paĝnumeradoj: 1a volumo: I-XX, 1–201; 2a volumo: I-XX, 202–513; 3a volumo I-XX, 514–800]

1.12.1.4.5.2. Volumoj kun sendependa paĝnumerado

Se la volumoj havas sendependajn paĝnumeradojn kaj oni ne redaktos noton de enhavo, registru la nombron da volumoj kaj indiku la nombron de paĝoj, folioj aŭ kolumnoj de ĉiu volumo. Registru tiun informon parenteze disigante per punktokomo (;) la infomon respondan al ĉiu volumo. Se la risurco havas pli ol ses volumoj, konsideru, ke la paĝnumerado de ĉiu volumo ne gravas kaj regisitru nur la nombron de volumoj.

300 ## $a2 volumoj (XVI, 329 ; XX, 412 paĝoj)

300 ## $a10 volumoj

Se ĉiuj volumoj havas la saman nombron de paĝoj, indiku tion perenteze.

300 ## $a10 volumoj (po 30 paĝoj)

300 ## $a5 volumoj (po 40 paĝoj proksimume)

Se vi redaktos noton de enhavo, registru la paĝnumeradon de ĉiu volumo sekve de responda titolo.

300 ## $a4 volumoj

505 0# $a1. Filología (766 paĝoj) -- 2. Esperantismo (790 paĝoj) -- 3. Geografía e Historia (897 paĝoj) -- 4. Arqueología y Arte. Miscelánea (730 paĝoj)

1.12.1.4.5.3. Risurcoj en publikigado

Se la risurco estas en publikigado, la amplekson oni registras per la termino “volumoj”

300 ## $avolumoj

Per angulaj parentezoj registru la ĝis nun ricevitajn volumojn se ili estas numeritaj. Tio indikas, ke la informo estas provizora kaj ĝi varios laŭ la ricevado de la mankantaj volumoj. Ekzemple:

Ricevitaj volumoj	Registro de la amplekso
Ni disponas nur la 1an volumon	300 ##$avolumoj <1>
Ni disponas la 1an volumon kaj alia(j)n meza (j)	300 ##$avolumoj <1, 3>

Ni disponas la unuajn 3 volumojn	300 ##$avolumoj <1-3>
Ni disponas nur unu mezan volumon	300 ##$avolumoj <2>
Ni disponas unu mezan volumon kaj la lastan (el kvar-voluma risurco)	300 ##$avolumoj <2, 4>
Ni disponas du mezajn volumojn	300 ##$avolumoj <2-3>
Ni disponas nur la lastan volumon (el kvar-voluma risurco)	300 ##$avolumoj <4>

Registru la paĝojn, laŭ tio indikite en antaŭaj instrukcioj:

300 ## $avolumoj <1> (325 paĝoj)

300 ## $avolumoj <1, 3-4> (325, 412, 147 paĝoj)

Se la volumoj ne estas numeritaj, registru nur “volumoj”

300 ## $avolumoj

1.12.1.4.6. Dimensioj

1.12.1.4.6.1. Risurcoj garditaj en ujo (teko, skatolo, ktp.)

La dimensio registrenda en 300$c estas tiu de la volumo. Kiam la volumoj estas garditaj en ujo kaj la dimensioj de ĉi lasta estas konsiderinde malsama, registru ĝin per noto

300 ## $a2volumoj**; $c24 cm** + $e1 CD-ROM

500 ## $aGarditaj en skatolo de **35 x 25 x 15 cm**

300 ## $a4 volumoj (1245 paĝoj) : $bilustraĵoj (koloraj) **; $c28 cm**

500 ## $aGarditaj en teko de **35 cm**

1.12.1.4.6.2. Volumoj de malsama grando

Se la dimensioj de risurco en pluraj volumoj ŝanĝiĝas, registru la plej malgrandan kaj la plej grandan disigitaj per streko.

300 ## … $c20-30 cm

[Dimensioj de la plej malgranda kaj la plej granda el la volumoj de risurco konsistanta el 6 volumoj de malsamaj altoj]

1.12.1.4.7. Mencio pri serio

1.12.1.4.7.1. Numerado de la volumoj ene de la serio

1.12.1.4.7.1.1. Sinsekva numerado

Se la numerado de la volumoj estas sinsekva ene de la serio, oni registras la numeradon de la unua kaj lasta volumo disigita per streko.

490 0# $aTitolo de la serio ;$v4-7

490 0# $aTitolo de la serio ;$vvolumo 11-12

En la kazo de malferma rikordo ĉar ni ne disponas la kompletan risurcon aŭ ĝi troviĝas ankoraŭ en publikigado, registru la provizoran informon pri la numerado, interkrampe. Jen kelkaj eblecoj:

Unua volumo de la risurco, kiu estas la volumo 10 de la serio

```
300 ## $avolumoj <1>
490 0# $aTitolo de la serio; $v10
```

Lasta volumo de risurco en kvin volumoj, kiu estas la volumo 15 de la serio.

```
300 ## $avolumoj <5>
490 0# $aTitolo de la serio ;$v15
```

Meza volumo de la risurco, ek., la dua, kiu estas la volumo 11 de la serio

```
300 ## $avolúmenes <2>
 490 0# $aTítulo de la serie ;$v<11>
```

Volumoj 1 kaj 2 de la risurco kaj 11 kaj 12 de la serio

```
300 ## $avolumoj <1-2>
490 0# $aTitolo de la serio; $v11-<12>
```

Volumoj 2, 3 kaj 4 de la risurco kaj 12, 13 kaj 14 de la serie

```
300 ## $avolumoj <2-4>
490 0# $aTitolo de la serio; $v<12-14>
```

1.12.1.4.7.1.2. Ne sinsekva numerado

Se la numerado de la serio ne estas sinsekva, registru la numeradon de ĉiu volumo disigitaj per komo.

```
490 0# $aTitolo de la serio; $v2, 6, 13
490 0# $aTitolo de la serio; $vvolumo 131, 145, 152
```

Kaze, ke ni devas lasi la rikordon malferma, jen kelkaj ekzemplaj eblecoj:

Ni disponas la volumojn 1 kaj 3 de kompleta risurco en kvar volumoj, kiuj respondas al la numeroj 20 kaj 30 de la serio

```
300 ## $avolumoj <1, 3>
490 0# $aTitolo de la serio; $v20, <30>
```

Ni disponas la volumojn 2 kaj 4 de risurco en kvin volumoj, kiuj estas la numeroj 41 kaj 47 de la serio:

```
300 ## $avolumoj <2, 4>
490 0# $aTitolo de la serio; $v<41, 47>
```

1.12.1.4.7.1.3. Kelkaj numeroj sinsekvaj kaj aliaj ne

Apliku al ĉiu sekcio la taŭgan el la antaŭaj kriterioj.

```
490 0# $aTitolo de la serio; $v4-7, 10
490 0# $aTitolo de la serio; $vv. 11, 14-16
```

Kaj se oni devus lasi la rikordon malferma:

Ni disponas la volumojn 1, 3 kaj 4 de risurco en kvin volumoj respondaj al la numeroj 9, 12, 15 kaj 16 de la serio:

300 ## $avolumoj <1, 3-4>

490 0# $aTitolo de la serio; $v9, <15-16>

1.12.1.4.7.1.4. Numerado sen mencio de serio

Kiam estas numero de serio, sed en la risurco ne aperas mencio pri serio, registru tiun informon per noto.

500 ## $aEn la spino de la volumo 5: 7

1.12.1.4.7.2. Kelkaj volumoj apartenas al unu serio kaj la sekvaj al la alia

Se kelkaj volumoj apartenas al unu serio kaj la sekvaj al alia, registru la datenojn respondajn al ĉiu serio en malsama kampo 490, indikante pere la subkampo $3 kiuj volumoj apartenas al kiu serio.

490 0# **$3Volumoj 1-3:** $aPublications de la Casa de Velázquez; $v22-24

490 0# **$3Volumoj 4-6**: $aCollection Casa de Velázquez; $v25-27

[En ĉi kazo temas pri la sama serio, kun ŝanĝoj en la titolo]

490 0# **$3 Volumoj 1-4:** $aTeknikaj informoj

490 0# **$3 Volumoj 5-<7>:** $aStudoj

[Malsama serio laŭlonge de la eldonado]

1.12.1.4.8. Notoj

1.12.1.4.8.1. Noto pri bibliografio

Kiam la bibliografio troviĝas nur en unu el la volumoj:

504 ## $aBibliografio: volumo 5, paĝoj 90-108

Se estas bibliografio aŭ bibliografiaj referencoj en ĉiuj volumoj:

504 ## $aBibliografiaj referencoj

1.12.1.4.8.2. Noto pri enhavo

La kampo 505 utilas por kodigi la normigitan noton pri enhavo, kiu povas rilati jen al la verko jen al la eldonaĵo. En multaj okazoj la intelekta disdivido de iu verko koincidas kun la divido en volumoj, kiun faras la eldonanto, sed ne ĉiam okazas tiel. Ezkemple, la verko de Cervantes, Don Quijote de la Mancha, estas koncipita de la aŭtoro en du partoj, sed eldonanto povas publikigi ĝin en unu volumo, en du aŭ eĉ en dek se tio kongruas pli bone kun siaj planoj. Rimarku, ke, teorie, terminoj kiel parto kaj tomo kutime rilatas al la divido de la verko kaj volumo, al la divido de la eldonaĵo, sed en la praktiko ĉiuj el tiuj terminoj povas indiki sendistinge unu aŭ alian dividon.

Per ĉi noto oni priskribas la titolojn proprajn de la volumoj kaj la menciojn pri ties responsuloj disigitaj per klinita streko, se oni konsideras ilin gravaj por krei ilian alirpuntoj. Fine de ĉiu parto, registru la la paĝnumeradojn se ili estas sendependaj por ĉiu volumo. La informon de la malsamaj volumoj oni disigas per duobla streko.

245 00 $aHistoria de Venezuela

505 0 $avol. 1. Período prehispánico y colonial / Armando Rico (256 paĝoj) -- vol. 2. Independencia y siglo XIX / Virginia Iturralde (256 paĝoj) -- vol. 3. Siglo XX: dictadura y democracia / Mariana Delgado (256 paĝoj) -- vol. 4. Colofón, siglo XX, albores siglo XXI / Juan José García Pérez (288 paĝoj)

Se la volumoj estas numeritaj, skribu la numeron antaŭ la respondaj titoloj.

245 10 $aHistorio de Esperanto :$b(movado kaj literaturo) : (1887-1960) /$cLeón Courtinat

505 0# $I. (1887-1913) -- II. (1914-1933) -- III. (1934-1960)

Uzu por nomi la partojn la terminojn kuj aperas en la risurco kaj en ties lingvo (vol., tomo, Band., book., no. parte., ktp.). Respektu la mallongigoj se ili enestas.

245 00 $aTra la mondo :$binternacia legolibro /$ckolektita kaj prilaborita de Paul Bennemann

505 0 $a1a parto. Por komencantoj, kun multaj bildoj kaj muziknotoj (96 paĝoj) -- 2a parto. Por progresintoj, kun aldono de 4 komponaĵoj (144 paĝoj)

Se la volumoj ne estas numeritaj, ordigu ilin laŭ la plej kohera maniero:

505 0# $aDeveno kaj komenco, 1887-1900 (74 paĝoj) -- La movado, 1900-1927 (199 paĝoj)

Ankaŭ eblas asigni numeron al la volumoj se tio plifaciligas la mastrumadon de la signaturoj. En tiu kazo, skribu la asignitan numeron interkrampe.

505 0# $a[1]. Deveno kaj komenco, 1887-1900 (74 paĝoj) -- [2]. La movado, 1900-1927 (199 paĝoj)

1.12.1.4.8.2.1. Nekompletaj risurcoj

Se ne ĉiuj volumoj estas haveblaj, ĉar ili ne estis publikigitaj aŭ ankoraŭ ili ne estis akiritaj de la biblioteko kaj vi lasas la rikordon malferma, la uzenda unua indikilo havas la valoron 1.

245 00 $aSerta gratulatoria in honorem Juan Régulo

300 ## **$avolumoj <1-3>**

505 **1**# $aI. Filología (766 paĝoj) -- II. Esperantismo (790 paĝoj) -- III. Geografía e historia (897 paĝoj)

Vidu la kampon 505 por la uzo de la malsamaj indikiloj en la responda sekcio de la gvidilo *Formato MARC 21*.

1.12.1.4.8.3. Noto pri la parto uzita kiel bazo por la priskribo

Uzu ĉi kampon, kiam la priskribo ne estas bazita sur la unua volumo, ĉar ĝi ankoraŭ ne publikiĝis aŭ la biblioteko ne disponas ĝin. Se poste oni ricevas la unuan volumon, modifu la priskribon, se bezonate, por adapti ĝin al tiu volumo kaj forigu la noton

588 ## $aPriskribo bazita sur: volumo 3

1.12.2. Elektronikaj monografioj

Antaŭ ol katalogi elektronikan risurcon konsideru, ke la enhavo determinos la tipon de redaktota rikordo.

Trovu en ĉi sekcio la instrukcion por la katalogado de **tekstaj** kaj **plurmediaj materialoj** (tekstoj, videoj, sonregistraĵoj, ktp., en la sama portilo). Se temas pri elektronikaj risurcoj, kiuj enhavas nur videojn aŭ nur sonregistraĵojn, ne temas pri monografioj kaj bezonatas specifaj insktrucioj por ĉi tipoj de risurcoj ne konsideratаj en ĉi unua eldono de la manlibro.

Cetere, konsideru ke ĉi ĉapitro donas instrukciojn por katalogi **publikigitajn** elektronikajn risurcojn. Por bitigitaj monografioj vidu sube la rubrikon Bitigitaj risurcoj.

1.12.2.1 Informfontoj

Se la risurco konsistas el nur unu teksta dosiero komparebla al presita teksto (dosiero .doc, bildo-prezentaĵo de PowerPoint, PDF, ktp.), prenu kiel preferata fonto de informo la bildon de la titolpaĝo en tiu dokumento. Se la dokumento ne disponas ĝin, prenu kiel fonto la bildon de la kovrilo.

En la ceteraj kazoj, elektu kiel preferata fonto de informo tiun, kiu identigas la risurcon kiel tuton laŭ la sekva ordo:

a. Teksta fonto apartenanta al la portilo de la risurco (ekzemple, la etikedo de CD-ROM), ne konsiderante la ujon aŭ la aldonan materialon.
b. Interna fonto, kiu formale prezentas titolon (ekzemple, ekrano de titolo, paĝo de kreditoj, ktp.
c. Fonto en la ujo aŭ en la akompana materialo.

1.12.2.2 Priskribo

Sekvu la ĝeneralajn instrukciojn pri katalogado de monografioj por labibliografia Priskribo, kun subaj konsideroj al la apartaĵoj de la elektronikaj risurcoj.

1.12.2.2.1. Amplekso

Registru la taŭgan terminon por la risurco. Preferu komunuzan terminon, eĉ komercajn se ĝi aplikeblas. Jen la plej oftaj[48]:

- CD-ROM
- DVD-ROM
- USB-poŝmemorilo
- Memorkarto
- Ekstera durdisko
- Retrisurco

300 $a1 CD-ROM

300 $a2 DVD-ROM

300 $a1 USB-poŝmemorilo

[48] La RDA-listo estas pli longa sed por esperantaj risurcoj verŝajne sufiĉas tiuj terminoj.

300 $a1 memorkarto

Se la risurco konsistas el nur unu teksta dosiero komparebla al presita teksto (dosiero .doc, bildo-prezentaĵo de PowerPoint, PDF, ktp.), aldonu la amplekson parenteze. Aldonu nenion se la risurco enhavas pli ol unu dosiero aŭ temas pri teksta dosiero ne komparebla al presita teksto (epub, html aŭ simila). Se la paĝoj en la dosieroj estas numeritaj, registru tiun paĝnumeradon. Se ne, registru la nombron de realaj paĝoj, kiun indikas la programo leganta la dosieron.

300 ## $a1 CD-ROM (XV, 345 páginas)

1.12.2.2.2. Aliaj fizikaj karakterizaĵoj

En tekstaj risurcoj sekvu la ĝeneralajn instrukcioj por monografioj pri ilustraĵoj.

300 ## $a1 USB-poŝmemorilo (237 paĝoj) : $bilustraĵoj (koloraj)

En plurmediaj risurcoj, indiku ĉu ili enhavas koloron aŭ sonon.

300 ## $a1 CD-ROM : $bsono, koloro

1.12.2.2.3. Dimensioj

En la kazo de optikaj diskoj, registru la diametron en centimetroj (plej ofte 12 cm). Por USB-memoriloj kaj memorkartoj, registru la longon.

300 ## $a1 CD-ROM : $bsono, koloro ; $c12 cm

1.12.2.2.4. Tipo de medio

Registru la terminon “komputilo”.

337 ## $akomputilo $2rdamedia

1.12.2.2.5. Tipo de portilo

Registru la tipon de portilo uzante terminon specifan por elektronikaj portiloj el la suba listo[49].

- Komputila disko
- Komputila karto
- Alia (por portiloj ne antaŭviditaj en la listo, kiel USB-memoriloj)

1.12.2.2.6. Teknikaj detaloj de la bita dosiero

MARC 21: 347 $a,$bv

Specifu la teknikajn detalojn pri la tipo kaj la formato de la dosiero se vi disponas la informon.

1.12.2.2.6.1. Tipo de bita dosiero

Prenu la valoron en la suba listo:

- Daten-dosiero

[49] La RDA-listo estas pli longa sed por esperantaj risurcoj verŝajne sufiĉas tiuj terminoj.

- Bilda dosiero
- Programdosiero
- Teksta dosiero
- Videa dosiero
- Sondosiero

347 ## $aTeksta dosiero

Se ekzistas pli ol unu tipo de dosiero, registru la tipon enhavantan la plej gravan informon. Se ne eblas identigi la plej gravan, registru ĉiujn tipojn de dosieroj enhavataj, gravaj el via vidpunkto de kataloganto, por identigi la risurcon.

La tipo de dosiero rialtas ekskluzive al la bitdosiero mem kaj ne nepre respondas al la valoro registrita kiel tipon de enhavo (336).

336 ## $aTeksto

347 ## $aBilda dosiero $bJPG

[La risurco estas CD-ROM, kiu enhavas bitigitajn bildojn en JPG-formato el la paĝo de libro]

1.12.2.2.6.2. Formato de la bita dosiero

Registru ĝin nur kiam ĝi estos facile identigebla. Jen kelkaj plej oftaj valoroj:

Teksto	Bildoj	Sono	Video	Datenoj	Spacaj daten.
ASCII HTML Megadots MS Word PDF RTF SGML TeX Word Perfect XHTML XML	BMP GIF JEPG2000 JPEG PDF[50] PNG TIFF	CD-Audio DVD-Audio DAISY MP3 RealAudio SACD WAV	Blu-Ray DVD-video Flash HD-DVD MP4 QuickTime RealVideo SVCD VCD Windows media	Access Excel Lotus XML	ArcInfo BIL BSQ CAD DEM E00 MID/MIF

Ĉi listo estis proponitaj en antaŭaj versioj de RDA. Nuntempe RDA ne proponas kontrolitan terminaron por la formato de la bita dosiero, do, se la bezonata termino ne troviĝas en la listo, vi tamen povas uzi ĝin.

Se ne eblas facile identigi la formaton, registru “formato ne identigita”

347 ## $aVidea dosiero$bformato ne identigita

Registru malsaman kampon 347 por ĉiu tipo de dosiero.

347 ## $aTeksta dosiero$bPDF

347 ## $aBilda dosiero$bJPG

Se enestas unu tipo de dosiero kaj diversaj tipoj de formatoj, ripetu nur la subkampon $b

347 ## $aArchivo de texto $bPDF$bEPUB

[50] Kodigu la formaton PDF kiel formaton por bilda dosiero nun kiam ĝi enhavas ekskuzive bildojn, sen ajna teksto.

[Du tekstaj dosieroj en malsamaj formatoj]

1.12.2.2.7. Noto pri la fonto de la ĉeftitolo

Citu ĉiam la fonton de kie vi prenis la ĉeftitolon.

Jen la plej oftaj formoj pri la mencio de la fonto (valida ankaŭ por la kampo 246).

500 ## $aTitolo prenita… (aŭ 246 $iTitolo…):

- el la titolekrano
- el la ĉefa menuo
- el la paĝo de kreditoj
- el la dosiero *Legu min*
- el la etikedo
- el la disko-kovrilo
- el la ujo

500 ## $aTitolo prenita el la titol-ekrano

500 ## $aTitolo prenita el la disko-kovrilo.

1.12.2.2.8. Noto pri enhavo

Redaktu noton pri enhavo same kiel oni farus por kiuj ajn presita monografio.

1.12.2.2.9. Noto pri la postuloj de la programo

MARC 21: 538

Donu ĉi informon se ĝi disponeblas en la risurco. La noto komenciĝu per la enkonduka frazo: “Necesa programaro:” kaj kopiu la informon el la risurco. Se la informo estas disigita en pluraj fontoj disigu la diversajn datenojn per punktokomo (;).

538 ## $aNecesa programaro: Adobe Acrobat Reader

538 ## $aNecesa programaro: DVD-ROMo, retumilo subtenanta SHTML 1.0

538 ## $aNecesa programaro: Windows 95/98/ME/2000/XP, Pentium 100 MHz, 16 Mb de RAM-memoro, 27 MB de libera spaco en durdisko, grafikkarto SVGA, sonkarto kaj fakultative, mikrofono

1.12.2.3 Kompleksaj MARC-kampoj kaj kampoj de numeroj

Jen la valoroj registrendaj por ambaŭ tipoj de risurcoj en la kompleksaj MARC-kampoj

Kapo

	Tekstaj	Plurmediaj
000/06 (tipo de rikordo)	**a** (teksta materialo)	**m** (komputila dosiero)

006

La kampon 006 oni registros nur en la kazo de tekstaj materialoj. Registru nepre sekvajn poziciojn. Registru la ceterajn pozicion laŭ via opinio de kataloganto

006	Tekstaj	Plurmediaj
/00 - Formo de la materialo	**a** (teksta materialo)	--
/06 - Formo de la eldonaĵo	Registru la saman valoron kiel en 008/23	--
/11 – Oficiala eldonaĵo	Registru la saman valoron kiel en 008/28, se vi registris ĝin.	--

007

La kriterioj estas la samaj por ambaŭ tipoj de risurcoj. Depende de la materialo, elektu la plej taŭgan el la subaj valoroj por la responda pozicio. Registru la ceterajn pozicion laŭ via opinio de kataloganto.

007	Tekstaj	Plurmediaj
/00 – Tipo de materialo	**a** (elektronica risurco)	**a** (elektronica risurco)
/01 – Specifaĵoj de la materialo.	**o** – Optika disko (CD-ROM, DVD-ROM) **b** – USB-poŝmemorilo	**o** – Optika disko (CD-ROM, DVD-ROM) **b** – USB-poŝmemorilo
/03 – Koloro de la enhavo	**b** – Blanka-nigra **c** - Plurkolora	**b** – Blanka-nigra **c** – Plurkolora
/04 – Dimensioj	**g** – 12 cm (preskaŭ ĉiuj CD-ROM, DVD-ROM, ktp.) **z** – Alia (USB-memoriloj, durdiskoj)	**g** – 12 cm (preskaŭ ĉiuj CD-ROM, DVD-ROM, kaj similaj) **z** – Alia (USB-memoriloj, durdiskoj)
/05 - Sono	**a** – Sona **#** – Sensona	**a** – Sona **#** – Sensona

008

Registru la kampon 008 laŭ la specifaĵoj de ĉiu tipo de materialoj (vidu la kampon 008 en la sekcio pri MARC 21), konsiderante la pozicion 23 en la kazo de tekstaj risurcoj kaj la pozoj 23 kaj 26 en la kazo de plumediaj risurcoj.

008	Tekstaj	Plurmediaj
Tipo de 008	*Libroj*	*Komputilaj dosieroj*
/23 – Tipo de eldonaĵo	**s** – Elektronika	**s** – Elektronika
/26 – Tipo de komputila dosiero	--	**i** – Plurmedia

Se temas pri teksta risurco, plenigu la ceterajn poziciojn de 008 laŭ la instrukcioj por libroj.

Se temas pri plurmedia risurco, plenigu la ceterajn poziciojn laŭ la instrukcioj por komputilaj dosieroj.

Por la kampoj de numeroj sekvu la ĝeneralajn instrukciojn.

1.12.2.4 Bitigitaj risurcoj

Estas malsamaj aliroj por la katalogado de bitigitaj risurcoj. Bibliotekoj elektas unu sistemon aŭ alian depende de siaj bezonoj kaj la disponeblaj rimedoj.

Nova eldonaĵo.

La unua ebleco estas konsideri bitigitan risurcon tute nova eldonaĵo, ĉar la datenoj pri produktado (la kreintoj de la bitdosiero) ŝanĝiĝas disde la originala. En ĉi kazo, bibliotekoj traktas la elektronikan dosieron kiel reproduktaĵon de la presita monografio kaj oni kreas alian bibliografian rikordon por ĝi. El teoria vidpunkto, probable ĉi aliro estas la plej ĝusta.

Jen ekzemplo[51] prenita el la *Biblioteca Virtual Miguel de Cervantes*:

Ĉi biblioteko konsideras, ke ĉar ĝi publikigas (igas publika) la bitan risurcon, la biblioteko devas aperi kiel eldonanto en la rikordo. La datenoj pri la originala eldonanto aperas en kampo 534.

264 1# $aAlicante :$bBiblioteca Virtual Miguel de Cervantes,$c2016

534 ## $pBiteldono surbaze de:$cMadrid : Presejo Torrent, 1927

Plia ekzemplero.

La alia ebleco estas konsideri ĝin plia ekzemplero, en malsama formato, de la presita eldono. Simile oni traktus fotokopiojn, ekzemple, aŭ mikrofilmojn neeldonitajn. Oni ne kreas novan bibliografian rikordon por la bitigita risurco kaj en la rikordo pri la ekzemplero oni donas la informon pri tio, ke ĝi estas bitigita (aŭ fotokopiita aŭ mikrofilmita).

Jen inventita ekzemplo en Koha de bitigita ekzemplero gardita en durdisko kun pliaj same bitigitaj verkoj.

Speco de ekzemplero	Aktuala biblioteko	Kolekto	Signaturo	Numero de kopio	Statuso	Notoj
Elektronika risurco	Biblioteko Juan Régulo Pérez	Kolekto de HEF	5675(3) (Foliumu breton)	3	Havebla/j	Bitigita kaj gardita en durdisko kune kun aliaj bitigitaj verkoj
Libro	Biblioteko Juan Régulo Pérez	Kolekto de HEF	3266 (Foliumu breton)	1	Havebla/j	
Libro	Biblioteko Juan Régulo Pérez	Kolekto de MEL	0110 (Foliumu breton)	2	Havebla/j	

Retaliro al la bitigita risurco

[51] https://www.cervantesvirtual.com/obra/du-junaj-fraulinoj--kaj-korneliino--du-noveloj-el-la-bonekzemplaj-de-mihaelo-de-cervantes-tutmondfama-autoro-de-kihoto/

Tamen, bibliotekoj, kiuj disponas retajn bitdeponejon (naciaj bibliotekoj,ekzemple, aŭ Biblioteko Juan Régulo Pérez kun Bitoteko), uzas la kampon 856 por doni aliron al la reta bitigita risurco, kiel ekzempla specimeno de la tuta eldono kaj ne kreas apartan rikordon pri la ekzemplero por la bitigita risurco. Jen ekzemplo:

264 #1 $aMadrid, Hispanujo :$b[eldoninto ne identigita],$c[1927]

264 #3 $aMadrido-Hispanujo :$bPresejo Torrent kaj Kompio.,$c1927

856 41 $uhttp://hdl.handle.net/11013/4434$yDisponebla en Bitoteko

Kaj por fini, aliaj bibliotekoj, preferas doni aliron per la kampo 856 (ankaŭ disponebla en la MARC-formato por la ekzemplero) nur al la konkrete bitigita ekzemplero:

852 ## $aM-JRP $bMEL$j171 $zFondo de Esperanto Liceo de Madrid.

856 41 $uhttps://hdl.handle.net/11013/4357 «z»Bitoteko

Ĉi lasta ebleco ne estas oportuna en Koha, ĉar kvankam ja eblas registri la ligilon en la rikordo pri la ekzemplero, ĝi ne montriĝas en la retkatalogo. Solvi tion verŝajne postulos manipuladon de la XSLT-folioj.

2. KREADO DE AŬTORITATAJ RIKORDOJ

2.1. Enkonduko

Grava parto de katalogado estas decidi kiuj el la datenoj registritaj en la priskribo konstituos la alirpunktojn, kiuj permesos retrovi ilin en la diversaj indeksoj de la katalogo. La alirpunktoj povas esti nomoj de personoj, de korporacioj (inkludante kongresojn), kaj verkoj (aŭ esprimoj se temas pri tradukoj)[52].

Sed gravas ne nur decidi kiuj estos la alirpuntoj por difinita bibliografia rikordo (vidu*: Elekto de alirpuntoj)*, sed ankaŭ starigi ilian normigitan formon. Tiu tasko nomiĝas kontrolo de aŭtoritatoj, kaj ĝi permesas unuecigi la diversajn nomoformojn de iu ento en la katalogo kaj montri la rilaton inter ili.

La celo de la kontrolo de aŭtoritatoj estas plifaciligi la identigon kaj rekuperadon de la risurcoj, evitante la konfuzojn ŝuldataj al homonimoj, sinonimoj aŭ la variecoj de nomoj ekzistantaj por difinita persono, korporacio, verko aŭ koncepto.

La kontrolo realiĝas per la redaktado de aŭtoritata rikordo. En ĝi oni starigas la preferatan nomoformon, kiun oni uzos kiel alirpunkton por ĉiuj bibliografiaj rikordoj en kiuj ĝi estos uzata. Krome, oni starigas ĉiujn necesajn referencojn por ke la uzanto uzu ĉiam la saman formon por serĉi en la indeksoj, eĉ se en la bibliografiaj prikriboj restas la varieco de formoj. Ĝi ankaŭ estas grava helpilo por la kataloganto, ĉar konstituas gvidilon por elekti ĉiam la preferatan formo.

La granda avantaĝo kontroli aŭtoritaton per la responda modulo de biblioteka mastrumsistemo estas, ke kiu ajn ŝanĝo farita en la ĉefa alirpunkto de la aŭtoritata rikordo aŭtomate aplikatas al la alirpunktojn de la ligitaj bibliografiaj rikordoj. Tio signifas grandan ŝparon da tempo en la ĝustigo de eraroj kaj la polurado de la katalogo, kaj krome evitas tajperarojn en la alirpunkpuntoj, kio garantias pli efikan rekuperadon de la informo.

Ambaŭ rikordoj estas ligitaj en Koha per la loka kampo $9 de la koncerna alirpunto en la bibliografia rikordo. Jen ĉerpaĵo el bibliografia rikordo:



Trovu sube la instrukciojn por redakti aŭtoritatajn rikordojn por personoj, korporacioj, kongresoj kaj verkoj. La indeksado aŭ kontrolo de aŭtoritatoj en rilato al la pritema enhavo de risurco havas apartan karakterizaĵon kaj ĝi ne estas klarigata en ĉi manlibro.

Antaŭ o krei novan aŭtoritatan rikordon certiĝu per diversaj serĉoj, laŭ diversaj eblaj nomoformoj, ke la aŭtoritato, kiun vi deziras krei ne troviĝas jam en la datenbanko. Tiu rekomendo estas aparte grava se oni partoprenas en projekto de komuna katalogo.

2.2. Strukturo de aŭtoritata rikordo

Aŭtoritata rikordo konsistas el jenaj elementoj

- Aŭtoritata alirpunkto *KERNA*
- Variantoj de la aŭtoritata alirpunto *Kerna se bezonata (en la kazoj de homonimoj, pseŭdonimoj kaj korporacioj, kiuj ŝanĝas sian nomon laŭ la tempo).*

[52] Estas aliaj alirpunktoj rilataj al la temoj de la eldonaĵo (geografiaj nomoj, kronologiaj terminoj, terminoj pri ĝenro/formo kaj temterminoj), pri kiuj ni ne parolos en ĉi manlibro, krom se bezonate por klarigo de aliaj konceptoj.

- Aliaj datenoj pri la aŭtoritato, kiu helpas identigi ĝin.
- Notoj

Kvankam RDA emfazas la gravecon de la kontrolo de aŭtoritatoj, en malgrandaj bibliotekoj ofte sufiĉos la kreado de la aŭtoritataj alirpunktoj, sen la bezono plene redakti la rikordon. Fakte, estas multaj datenoj asocieblaj al la malsamaj alirpunktoj kaj pluraj rilatoj inter la malsamaj entoj (personoj, familioj kaj korporacioj), kiujn ni ne vidos en ĉi manlibro, ĉar ne necesaj por la efika kontrolo de aŭtoritatoj en malgrandaj bibliotekoj.

2.3. Ĝeneralaj instrukcioj

Kreu la aŭtoritatajn rikordojn de agantoj (personoj, korporacioj, kongresoj) kaj de verkoj, kiuj ne jam ekzistas en via katalogo se ili estas bezonataj por la kontrolitaj alirpunktoj de la bibliografia rikordo kiun vi redaktas.

Kiel supre dirite, la minimuma deviga elemento por ĉiuj rikordoj estas la **aŭtoritata alirpunkto**. Registru la ceterajn elementojn laŭ la disponebla informo aŭ la bezonoj de via katalogo.

2.3.1. Majuskloj

Respektu la ortografion propran al ĉiu lingvo.

2.3.2. Numeroj esprimitaj kiel ciferoj aŭ vortoj

Registru ilin en la formo, kiun ili prezentas en la informfonto.

Cent kapricaj raketoj

Todo el esperanto por 15 céntimos

2.3.3. Diakritaĵoj

Registru la diakritaĵojn tiel, kiel ili aperas en la informfonto. Aldonu ilin se estas konstato, ke la nomo devas havi la diakritaĵojn sed ilin oni ne aldonis en la fonto de kie oni prenas la nomon.

Éliphas Lévi

Física y química

[En la respektivaj fontoj: Eliphas Levi, FISICA Y QUIMICA]

2.3.4. Streketoj

Konservu la streketon inter la propraj nomoj se la persono kutime uzas ĝin.

Ann-Marie Ekengren

R.-J. Ahlers

Inkludu la streketojn en la transliteritaj nomoj se la translitersistemo tion postulas.

Chʻoe Sin-dŏk

Abutsu-ni

Blo-bzaṅ-rab-gsal

2.3.5. Interspacoj en inicialoj kaj sigloj

Nomoj de personoj aŭ familioj:

a. Se la inicialo reprezentas propran nomon aŭ familinomon, kaj la inicialon sekvas alia inicialo aŭ nomo, lasu spacon post la punkto sekvantan inicialon.
b. Se la nomo konsistas tute aŭ ĉefe el apartigitaj literoj, lasu spacon inter la literoj, sendepende de tio, ke ilin sekvas punkto aŭ ne.
c. Se la nomo inkludas inicialojn aŭ mallongigojn, kiuj formas parton de titolo, lasu spacon post la inicialo aŭ mallongigo.

Rowling, J. K.

Franco G. S., José Fernando

A. Hafiz Anshary A. Z.

A. E. I. O. U.

A. M. do R. A.

DJ Q

DJ I. C. O. N.

[La inicialoj "DJ" en la nomo estas mallongigo de la termino "Disc jockey"]

Nomoj de korporacioj:

a. Se la nomo de la korporacio enhavas inicialojn kun puntojn ne lasu spacon inter ili.
b. Se la literoj aŭ inicialoj aperas en la informfonto apartigitaj kaj sen punktoj, registru la literojn sen spacoj inter ili.

J.A. Folger and Company

Robert A.M. Stern Architects

B.B.C. Symphony Orchestra

[En la fonto: B. B. C. Symphony Orchestra]

IEEE

[En la fonto: I E E E]

Verkoj:

Ne lasu spacon inter iu punkto kaj la inicialo ĝin sekvanta. Se ne estas punktoj inter la inicialoj, forigu la spacojn.

ABZ de amo

A.B.C. de sennaciismo

2.3.6. Mallongigoj

En la kazo de personoj, kiel normo, disvolvu la mallongigoj. Rimarku, ke ne temas ĉi-instrukcie pri inicialoj. Por la uzo de sigloj kaj akronimoj en korporacioj, vidu la respondan rubrikon.

García Aramburu, **María** Dolores

*[En la fonto: **Mª** Dolores García Aramburu]*

En la kazo de verkoj uzu nur la mallongigojn, kiuj estas intregra parto de la verko.

La paco universala aŭ La Esperanto de l' **Dro**. Zamenhof

Informe presentado al **Exmo Sr.** Ministro de Educación Nacional, en cumplimiento de las conclusiones aprobadas por el XIII Congreso Español de Esperanto

2.3.7. Identigiloj

MARC 21 pri aŭtoritatoj: 024

Registru la diversajn identigilojn de iu aganto en la kampo 024 de la formato se vi trovas ilin necesaj por la identigo.

Jen kelkaj el ili:

- VIAF
- ISNI
- Wikidata

Registru la identigilojn en formo de URL.

024 7# $ahttp://viaf.org/viaf/73885295$2viaf

024 7# $ahttps://isni.org/isni/0000000109153407$2isni

024 7# $ahttps://www.wikidata.org/wiki/Q11758$2wikidata

100 1# $aZamenhof, L. L.

2.4. Personoj

La nomo de iu persono estas la vorto, karaktro aŭ grupo de vortoj kaj/aŭ karaktroj per kiuj iu persono estas konata.

Nomo de persono povas esti:

- Reala nomo
- Pseŭdonimo
- Titolo de nobeleco
- Kromnomo
- Frazo
- Inicialoj de propra nomo kaj/aŭ familinomo

Tiuj formoj povas esti jen la preferata nomo de la persono aŭ nomo-varianto.

Kiel ĝenerala regulo, elektu unikan formon kiel aŭtoritatan alirpunkton en la katalogo por ĉiu persono. Uzu la aliajn variantojn de la nomo, kiu respondas al tiu bibliografia personeco, kiel referencojn (“Vidu:…”, kampo 400). Nur en la kazo de la pseŭdonimoj povas esti pli ol unu formo akceptita por la sama persono. Starigu inter ili la referenco “Vidu ankaŭ:…”, kampo 500.

2.4.1. Elekto de la preferata formo

2.4.1.1 Informfontoj por elekto de la preferata nomo

Konsideru la ĉefajn informfontojn por ĉiu tipo de risurco. En presita teksto, preferu la titolpaĝon, ĉar en tiu fonto la aŭtoro kutime havas pli grandan decidopovon kaj tial ĝi pli bone reprezentas ties deziron kiel esti konata. Male, la kovrilo, klapoj, ktp., en la libroj, estas deciditaj de la eldonanto, kun malpli da interveno de la aŭtoro, tial oni ne opinias ilin reprezentaj de la volo de la aŭtoro. Sed tiuj fontoj povas enhavi nomovariantojn, kiujn oni povas registri ankaŭ en la rikordo.

Ĝenerale, preferu kiel fonto risurcojn, kie la aŭtoro estas la ĉefa aŭ sola aŭtoro. Tamen preferu referencfontojn (ekzemple, reta PIV) por la elekto de preferataj nomoj en la kazo de klasikaj aŭ mezepokaj aŭtoroj.

Ju pli da verkoj de iu aŭtoro estas konsultataj, des pli da certeco pri tio, kiel la aŭtoro deziras konigi sin.

En la kazo de neesperantaj aŭtoroj, akceptu la formon, kiu aperas en la responda nacia biblioteko. Eblas koni tiun preferatan formon pere de VIAF[53] *(Virtual International Authority File* = Virtuala Internacia Aŭtoritata Datenaro). Se temas pri aŭtoro, kies nomo estas en kirila alfabeto, konsilindas elekti la transliteritan formon de la Nacia Biblioteko de Francio, ĉar ĝi uzas la ISO-Normon. Eblas aldoni variantojn transliteritajn laŭ aliaj normoj por faciligi la rekuperadon.

2.4.1.2 Ĝeneralaj kriterioj

La baza principo estas respekti la intencon de la aŭtoro pri la nomo per kiu li/ŝi deziras esti konata. Ĝenerale, oni prenas la nomon per kiu la aŭtoro konigas sin en la verkoj eldonitaj en sia propra lingvo.

> Miguel de Cervantes Saavedra anstataŭ Miĥaelo Cervantes aŭ Cervanto

Se ne eblas klare determini la formon per kiu la aŭtoro deziras esti konata, elektu, laŭ ordo de prefero:

- Tiun, kiu aperas pli ofte en la eldonaĵoj
- Tiun, kiu aperas pli ofte en la referencfontoj
- La lastan, kiun la aŭtoro uzis

Se la persono uzis kompletajn kaj ne kompletajn formojn de la nomo kaj neniu el ili estas pli ofta aŭ sinprezentas kiel la preferata, prenu la plej kompletan formon de la nomo.

2.4.1.3 Lingvo

Se la nomo de iu persono aperis en malsamaj lingvaj formoj en la risurcoj ligitaj al tiu persono, elektu kiel preferatan nomon, la lingvan formon de la plej granda parto de la risurcoj.

> Rikardo Ŝulco
>
> sed
>
> Jorge Camacho
>
> ne Georgo Kamaĉo

[53] https://viaf.org/

[Camacho nur en siaj plej fruaj verkoj esperantigis sian nomon]

Tamen, elektu, se ĝi ekzistas, la esperantan formon, aŭ la formon aperantan en esperantaj ĵusaj eldonaĵoj aŭ en esperantaj referencfontoj, en jenaj kazoj:

- Malnovgrekaj kaj latinaj aŭtoroj

  Sofoklo

  Platono

  Lukiano

- Nomoj de reĝoj aŭ, papoj, imperiestroj aŭ princoj.

  Johano Paŭlo la 2ª

  Francisko

- Personoj konataj per sia propra nomo aŭ per nomo kaj kromnomo, se ekzistas esperanta formo sufiĉe konata.

  Patrino Teresa

  Francisko el Asizo

Kreu laŭeble variantajn alirpuntojn por la neelektitaj formoj.

2.4.1.4 Nomoj en aliaj skriboj

Elektu la esperantan formon pli ofte aperanta en esperantaj eldonoj de ties verkoj aŭ en la esperantaj referencverkoj. Se ekzistas pluraj esperantaj formoj, elektu tiun pli ofte aperanta en la plej ĵusaj verkoj.

En la ceteraj kazoj, transliteru la nomon laŭ la responda ISO-normo por tiu skribo.

Kreu laŭeble variantajn alirpuntojn por la neelektitaj formoj.

2.4.1.5 Pseŭdonimoj

Pseŭdonimo aŭ kaŝnomo estas fikcia personeco per kiu aŭtoro kaŝas la respondecon pri iu verko.

En la katalogo ambaŭ nomoj, la reala kaj la fikcia devas aperi kiel du malsamaj bibliografiaj identecoj.

Tamen, ne temas pri pseŭdonimo se:

- En la titolpaĝo de la eldonaĵo aperas kune la reala kaj la fikcia nomoj identigante la saman personon. Ĉi-kaze, la pseŭdonimo rolas nur kiel kromnomo.

  Leopoldo Alas, Clarín

  [Clarín, pseudonimo uzata de la autoro en ĵurnaloj, aperas apud la reala nomo de la aŭtoro en libraj eldonaĵoj]

- Kiam la pseŭdonimo ne kaŝas la realan nomon de la aŭtoro, sed ĝin nur mallongigas aŭ simpligas, ne temas pri vera pseŭdonimo. Sed oni elektos ĝin kiel preferatan alirpunkton se ĝi estas la formo plej uzata de la aŭtoro.

  Sole

  [La nomo de la aŭtorino estas Soledad Gutiérrez sed ŝi subskribas siajn verkojn kiel Sole]

En ambaŭ kazoj, ne plenumiĝas la kondiĉoj por pseŭdonimoj kaj, sekve, ne temas pri malsamaj bibliografiaj identecoj. Oni akceptos nur unu el la formoj kaj faros variantan alirpunkton por la alia.

Se iu persono uzas sian veran nomon kaj ankaŭ unu aŭ pli da pseŭdonimoj, konsideru, ke li aŭ ŝi posedas pli ol unu identecon kaj kreu aŭtoritatan rikordon por ĉiu el ili. Sed se iu persono uzas nur unu pseŭdonimon kaj ne uzas sian veran nomon, kreu nur unu rikordon, registru la pseŭdonimon kiel preferatan alirpunkton kaj la veran nomon kiel varianton.

Vidu sube kiel redakti la rilaton inter la reala nomo kaj la pseŭdonimo de aŭtoro.

2.4.2. Konstruo de alirpunktoj por personoj

KERNA

MARC 21 pri aŭtoritatoj: 100

2.4.2.1 Unuvortaj nomoj

Se la preferata nomo konsistas el nur unu vorto (persona nomo, familia nomo, kromnomo…) konstruu la alipunkto surbaze de ĝi. En tiu kazo, la unua indikilo de la kampo 100 havas la valoron 0.

```
100 0# $aĜanfranko
100 0# $aAdi
100 0# $aOuida
100 0# $aŬoago
```

Se la unua elemento estas simbolo aŭ grafika elemento, klopodu respekti la intencon de la aŭtoro se temas pri reproduktebla simbolo kaj ne malhelpas la rekuperadon:

```
100 0# $a@axebra
```

2.4.2.2 Nomoj enhavantaj familinomojn

Se la preferata formo de nomo enhavas familinomon, registru ĝin kiel unuan elementon. Registru la ceterajn elementojn (personajn nomojn, inicialojn) post komo. La valoro de la unua indikilo estu 1.

```
100 1# $aZamenhof, L. L.
100 1# $aHaupenthal, Reinhard
100 1# $aBoulton, Marjorie
100 1# $aMiyamoto, Masao
100 1# $aBerlin, Z. I.
100 1# $aBieliński, Józef Paweł
```

Se la nomo enhavas plurajn familinomojn, ĝenerale prenu la unuan kiel unua elemento, escepte se la aŭtoro estas portulaga aŭ brazila, en kies kazo prenu la lastan familinomon kiel unuan elementon, krom se estas sciate, ke la aŭtoro volas konigi sin alimaniere:

```
100 1# $aGutiérrez Adúriz, Miguel
100 1# $aPujulà i Vallès, Frederic
```

100 1# $aMartins, João Oliveira

100 1# $aPicasso, Pablo *[nomo: Pablo Ruiz Picasso]*

100 1# $aMartín, Sara F. *[nomo: Sara Fernández Martín]*

Se la familinomo estas reprezentata per inicialo kaj la ceteraj partoj de la nomo esta kompletaj, registru la inicialon, kiu reprezentas la familinomon kiel unuan elementon:

100 1# $aG., Michael

Se la nomo per kiu persono estas konata konsistas nur el familinomo kaj ĝi estas asociita al vorto aŭ frazo, jen en la risurcoj jen en la referencfontoj, traktu la vorton aŭ frazon asociitan al la nomo kiel integran parton de la nomo. Registru la familinomon sekvatan de komo kaj la vorto aŭ frazo.

100 1# $aSarpy**,$cSinjorino**

2.4.2.3 Artikoloj, prepozicioj kaj prefiksoj en la nomoj

En la kazo de nomoj kun partikuloj, sekvu la regulojn de la responda lingvo. Jen kelkaj ekzemploj:

Anglaj nomoj: La prepozicio aŭ artikolo estu la komenca elemento.

100 1# $aDos Passos, John

100 1# $aDe Quincey, Thomas

100 1# $aL'Amtour

Francaj nomoj: Komencu per la artikolo aŭ ties kunfandiĝo kun prepozicio. Prepoziciojn postmetu.

100 1# $aLa Brière, Yves de

100 1# $aDu Bos, Charles

100 1# $aGaulle, Charles de

Ĉehaj kaj slovenaj nomoj: Kiam la familinomo estas nomo de loko en genitivo antaŭata de *z*, komencu per la parto de la nomo, kiu sekvas la partikulon.

100 1# $aZerotína, Karel z

Germanaj nomoj: Postmetu la prepozicion aŭ prepozicion plus artikolon, escepte se temas pri kunfandiĝo de ambaŭ.

100 1# $aBeethoven, Ludwig van

100 1# $aHagen, Friedrich von der

100 1# $aVom Berg, Fritz

Hispaniaj: postmetu ĉiujn prepoziciojn, akompanataj aŭ ne de artikolo. La artikolo estu la komenca elemento se ne ekzistas prepozicio.

100 1# $aIglesia, Álex de la

100 1# $aCabezón, Antonio de

100 1# $aOrs, Eugeni d'

100 1# $aLas Hayas, Rubén

Italaj nomoj: La komenca elemento estas la partikulo, escepte se temas pri *de, d', degli, de li*, en aŭtoroj antaŭ la 19ª jarcento.

100 1# $aDi Bari, Nicola

100 1# $aD'Annunzio, Gabriele *(aŭtoro inter 19a kaj la 20a jarcentoj)*

100 1# $aMedicis, Lorenzo de *(aŭtoro de la 15a jarcento)*

Nederlanda kaj flandraj nomoj. Postmetu la partikulon, escepte *ver*

100 1# $aBergh, George van den

100 1# $aBrink, Jan ten

100 1# $aVer Huell, Carel Johan

Portugalaj nomoj: Komencu per la parto de la nomo, kiu sekvas la partikulon

100 1# $ Figueiredo, Fidelino de

100 1# $aAlmeida, Julio Lopes de

100 1# $aSantos, João dos

Rumanaj nomoj: Komencu per la partikulo, krom se temas pri *de*

100 1# $aA Mariel, Vasile

100 1# $aPuscariu, Emil de

Skandinaviaj nomoj: Komencu per la parto de la nomo, kiu sekvas la partikulon se ĝi estas skandinav- aŭ germandevena, escepte de la nederlanda aŭ flandra partikulo *de*. Postmetu la partikulojn kun aliaj devenoj.

100 1# $aLinné, Carl von

100 1# $aHallström, Gunnar Johannes af

100 1# $aLa Cour, Jens Lassen

100 1# $aDe Geer, Gerard

Se la prefikso aŭ partikulo ne estas artikolo aŭ prepozicio aŭ kunfandiĝo de ambaŭ, registru la prefikson kiel unuan elementon

100 1# $aʿAbd al-Ḥamīd, Aḥmad

100 1# $aAbū Zahrah, Muḥammad

100 1# $aĀl Yāsīn, Muḥammad Ḥasan

100 1# $aAp Gwilym, Owain

100 1# $aBen Harosh, Mosheh

100 1# $aFitz Gerald, Gregory

100 1# $aMac Murchaidh, Ciarán

100 1# $aÓ Faoláin, Dónal

Se la prefikso estas gramatike aŭ perstreke ligita al familinomo, registru ĝin kiel unuan elementon.

100 1# $aFitzGerald, Colin

100 1# $aMacDonald, William

100 1# $aTer-Horst, Joannes Hermannus

100 1# $aDebure, Guillaume

100 1# $aFon-Lampe, A. A.

2.4.2.4 Nomoj kiuj konsistas el inicialoj

Registru nomon, kiu konsistas nur el inicialoj en rekta ordo. La valoro de la unua indikilo estas 0.

100 **0**# $aA. M. R.

100 **0**# $aR. S. de M.

2.4.2.5 Nomoj, kiuj enhavas nobelan titolon

Se la preferata nomo de aŭtoro estas nobela titolo, registru la nomon de la titolo kiel unuan elementon de la alirpunkto. Poste, indiku la personan nomon en rekta formo sekvata de la ranga termino. Metu komojn antaŭ la nomo kaj la rangon laŭ la subaj ekzemploj:

100 1# $aByron, George Gordon Byron,$cbaron

100 1# $aPompadour, Jeanne Antoinette Poisson, $cmarquise de

Registru kiel varianto la nomoformon kun la familinomo kiel unua elemento.

2.4.2.6 Kromnomoj, kaj nomoj, kiuj indikas devenon

En la kazo de propraj nomoj akompanataj de kromnomoj, laŭlandaj nomoj aŭ terminoj indikantaj geografian devenon, redaktu la alirpunkton per tiu nomo akompanata de la ceteraj elementoj.

100 0# $aBirgita de Svedio,$cSankta

100 0# $aTaleso el Mileto

En la kazo de ĉeesto de familinomoj, registru la kromnomoj, kiam ĝi kutime akompanas la nomon de la aŭtoro.

100 1#$aAlas, Leopoldo,$cClarín

2.4.2.7 Nomoj de reĝoj kaj aliaj personoj el la reĝaro

En la kazo de kia ajn regantaj suverenoj, la komenca elemento estu la nomo sub kiuj ili regis, en sia esperanta formo, se ĝi ekzistas, sekvata de la responda ordinalo kaj la rango en esperanto, se ĝi ekzistas.

100 0# $aNapoleono$bla 3ª,$cImperiestro de Francio

En la kazo de reĝedz(in)oj, aldonu la frazon *Reĝedz(ino) de* (aŭ la responda termino laŭ la rango) kaj la nomo de la suvereno.

100 0# $aFilipo,$cReĝedzo de Elizabeto la 2ª, Reĝino de Britio

100 0# $aEugenia,$cImperiestredzino de Napoleono la 3ª, Imperiestro de Francio

Oni konsideras, ke temas pri malsamaj bibliografiaj identecoj depende de tio ĉu ŝtatestroj agas aŭ ne en la ekzercado de sia aŭtoritato.

Endas starigi la rilaton inter ambaŭ alirpunkoj.

100 0# $aJuan Carlos$bla 1a, $cReĝo de Hispanio

510 1# $aHispanio. $bReĝo (1975-2014: Juan Carlos la 1a)

2.4.2.8 Papoj

Registru la nomon en Esperanto, se ĝi ekzistas, sekvata de la responda ordinalo kaj la termino *Papo*.

100 0# $aJohano Paŭlo$bla 2a,$cPapo

Oni konsideras, ke temas pri malsamaj bibliografiaj identecoj depende de tio ĉu papoj agas aŭ ne en la ekzercado de sia aŭtoritato.

Endas starigi la rilaton inter ambaŭ alirpunkoj en la aŭtoritaj rikordoj de ambaŭ identecoj.

100 0# $aJohano$bla 23a,$cPapo

510 1# $aKatolika Eklezio.$bPapo (1958-1963: Johano la 23a)

110 2# $aKatolika Eklezio.$bPapo (1958-1963: Johano la 23a)

500 0# $aJohano$bla 23a,$cPapo

2.4.2.9 Episkopoj kaj aliaj ekleziaj rangoj

Registru aliajn ekleziajn titolojn kiel parto de la alirpunkto nur kiam ili aperas kutime ligita al la preferata nomo. Registru la terminojn *episkopo, ĉefepiskopo kaj kardinalo* en Esperanto. Registru la ceterajn terminojn en sia propra lingvo.

100 0# $aCipriano, $cSankta, Episkopo de Kartago

100 0# $aPierre, $cabbé

2.4.2.10 Sanktuloj

Oni sekvu la ĝeneralajn regulojn, aldonante la terminon *Sankta* al la preferata nomo, escepte se temas pri reĝo, reĝino, papo aŭ imperiestro.

100 0# $aFrancisko el Asizo,$cSankta

100 1# $aEscrivá de Balaguer, Josemaría,$cSankta

2.4.2.11 Spiritoj

Se iu risurco anoncas, ke la teksto estas transskribo de la vortoj diktitaj de spirito, ktp., akceptu la nomon de tiu supozata personeco kaj aldonu *spirito* parenteze, kiel lasta parto de la alirpunkto.

100 1# $aÂngelis, Joanna de$c(spirito)

100 0# $aAndré Luiz$c(spirito)

100 1# $aTagore, Rabindranath$c(spirito)

100 0# $aEmmanuel$c(spirito)

2.4.2.12 Solvo de homonimoj

Ĉar la nombro de esperantaj aŭtoroj ne estas granda kompare kun la nombro de aŭtoroj en aliaj lingvoj, kaj ili estas tre disaj en la mondo, homonimoj ne oftas. Tamen, tio povas ja okazi.

Kaze de konflikto inter pluraj personoj kun samaj aŭ tre similaj nomoj, kiuj povas okazigi problemojn de identigo, aldonu unu el la subaj elementoj al almenaŭ unu el la nomoj. Sekvu ĉi ordon de prefero:

- Dato de naskiĝo, morto aŭ periodo de aktiveco de la persono

100 1# $aDumas, Alexander$d(1802-1870)

100 1# $aDumas, Alexander$d(1824-1895)

100 1# $aWang, Wei$d(1985-)

- Disvolvita formo de la nomo

Registru nur la datenojn strikte necesajn por identigi la aŭtoron.

Se la preferata formo inkludas proprajn nomojn reprezentitajn per inicialoj, disvolvu ilin:

100 1# $aCaballero, M.$q(Miguel).
100 1# $aGarcía Sánchez, J. M. $q (José María).

Se necesas aldoni plian familinomon por eviti sanmomecon, registru ilin:

100 1# $aRodríguez, Pilar $q(Rodríguez Rodríguez)
100 1# $aRodríguez, Pilar $q(Rodríguez Alonso)

- Profesio aŭ okupo

100 1# $aSmith, Carol$c(profesorino)

2.4.2.13 Variantaj formoj de la nomoj

KERNA se bezonata

MARC 21 pri aŭtoritatoj: 400 (en la katalogo de aŭtoritatoj, la vidigo de la rilato inter la preferata formo kaj la variantoj estas: *Vidu:)*

Kiel ĝenerala normo, redaktu variantojn de tiuj nomoformoj malsamaj de la elektita kiel preferata, kiuj aperas en la malsamaj eldonaĵoj de la aŭtoro, kiuj troviĝas en via biblioteko. Eblas redakti ankaŭ variantojn de la formoj cititaj en referencfontoj kaj de tiuj formoj, per kiu oni supozas, ke la uzanto povas serĉi en la katalogo.

100 1# $aCamacho, Jorge

400 1# $aKamaĉo, Georgo

100 1# $aŜefer, Adela

400 1# $aŜefer, Ad.

Eblas redakti variantojn de la deklinaciitaj formoj de nomoj.

Por aŭtoroj kun nomoj en ne latinaj alfabetoj, faru variantajn formojn el la diversaj transskriboj en kiuj aperis iliaj nomoj.

100 1# $aŠarapova, Anna

400 1# $aŠarapov, Anna

400 1# $aŜarapova, Anna

400 1# $aSharapova, Anna

400 1# $aŠarapova, Anna Nikolaevna

400 1# $aШарапова, Анна

Ĉiel ajn, rekomendidas la redakto de variantaj formoj en jenaj kazoj, eĉ se ne ekzistas eldonaĵoj kun tiuj variantoj:

- Aŭtoroj, kiuj subskribas per la inicialo de siaj nomoj (varianto kun la inicialo disvolvita se oni konas ĝin)

  100 1# $aStettler, Ed.

  400 1# $aStettler, Eduard

- Aŭtoroj, kiuj susbskribas per sia persona nomo kaj laŭlanda nomo (varianto en inversa ordo)

  100 0# $aFrancisko el Asizo,$cSankta

  400 1# $aAsizo, Francisko el,$cSankta

- En la kazo de klasikaj aŭtoroj, redaktu variantojn de la formoj per kiuj ili estas konataj en aliaj lingvoj, se laŭ la opinio de kataloganto tio helpos rekuperi ilin en la katalogo.

  100 0# $aPlatono

  400 0# $aPlato

  400 0# $aPlatón

  400 0# $aΠλάτων

Se estis bezonate uzi datojn asociitajn al la nomo en la preferata alirpunkto ($d), ĉiuj variantoj devas ankaŭ havi ĝin.

100 1# $aCervantes Saavedra, Miguel de$d(1547-1616)

400 1# $aCervantes Saavedra, M. de$d(1547-1616)

400 1# $aCervantes, Miĥaelo$d(1547-1616)

400 1# $aCervantes Saavedra, Mikaelo de$d(1547-1616)

2.4.2.14 Pseŭdonimoj

KERNA se la biblioteko disponas de verkoj sub ambaŭ personecoj

MARC 21 pri aŭtoritatoj:

500 (en la katalogo de aŭtoritatoj, la vidigo de la rilato inter la preferata formo kaj la variantoj estas: *Vidu ankaŭ:)*

663 $a $b (starigas la rilaton inter ambaŭ preferataj alirpunktoj)

Kiel ni vidis antaŭe, oni konsideras, ke la reala nomo de aŭtoro kaj ties pseŭdonimoj konstituas malsamajn bibliografiajn identecojn. Ili postulas do, malsamajn aŭtoritatajn rikordojn.

Registru la pseŭdonimon aŭ realan nomon respektive en kampo 500 de la rikordo pri la aŭtoro aŭ pseŭdonimo.

Registru en la kampo 663 $a klarigan noton kaj donu en $b la alian akceptitan alirpunkton.

Jen ekzemplo, kiu bildigas la manieron redakti ambaŭ aŭtoritatajn rikordojn de aŭtoro, por la reala nomo kaj por la pseŭdonimo:

Rikordo pri la reala nomo de la aŭtoro:

100 1# $aGutiérrez Adúriz, Miguel

500 1# $aDek, Liven

663 ## $aPor verkoj de ĉi aŭtoro verkitaj sub pseŭdonimo, vidu ankaŭ:$bDek, Liven

Rikordo pri la pseŭdonimo:

100 1# $aDek, Liven

400 0# $aLiven Dek

500 1# $aGutiérrez Adúriz, Miguel

663 ## $aPor verkoj de ĉi aŭtoro verkitaj sub reala nomo, vidu ankaŭ:$bGutiérrez Adúriz, Miguel

2.4.2.15 Konstruo de alirpunktoj por familioj

KERNA

MARC 21 pri aŭtoritatoj: 100

Nomo de familio povas esti:

- Komuna nomo uzata de la membroj de familio.
- Nomo de dinastio aŭ reĝa familio.
- Nomo de klano, ktp.

Uzu la preferatan nomon de la familio kiel bazon por la preferata alirpunkto. Aldonu parenteze la terminon *Familio*. Valoro de la unua indikilo, 3.

100 **3**# $aZamenhof (Familio)

400 **3**# $aFamilio Zamenhof

Same kiel en la kazo de personoj, eblas redakti variantajn formojn, se bezonate. Ankaŭ eblas starigi rilatojn inter la familio kaj siaj membroj kaj reciproke.

2.5. Korporacioj

Korporacio estas kiu ajn grupo de personoj, kiuj identigas sin per nomo kaj agas kune. Jen kelkaj ekzemploj: asocioj; institucioj, firmaoj, administraciaj, militaj aŭ religiaj institucioj, muzik-ensembloj kaj artismaj grupoj.

Ektas ankaŭ korporacioj tiuj portempaj kunvenoj de personoj, organizitaj por komuna celo sub distinga nomo, kiel kongresoj, seminarioj, koncilioj, ekspozicioj, komercaj foiroj, artismaj festivaloj, sportaj konkuroj, ktp.

La instrukciojn pri kongresoj, ĉar tre specifaj tipoj de portempaj korporacioj, oni donos en la rubriko Kongresoj.

2.5.1. Elekto de la preferata formo

Ĝenerale, elektu la nomon en la formo kaj lingvo plej uzata de la korporacio en siaj eldonaĵoj.

Universala Esperanto-Asocio

Internacia Fervojista Esperanto-Federacio

Preferu konvencian nomon anstataŭ la oficialan se ĝi estas pli ofte uzata de la korporacio.

Aguas de Albacete

varianto: Sociedad Industrial Aguas de Albacete

Atlético de Madrid

varianto: Club Atlético de Madrid

Registru komencan artikolon kiel parton de la preferata nomo de la korporacio se tiel ĝi aperas en siaj eldonaĵoj.

La Perdita Generacio

La Kompanoj

2.5.1.1 Informfontoj por elekto de la preferata nomo

Prenu la nomon de la korporacio el kiu ajn fonto. Preferu oficialajn fontojn de la korporacio mem, eldonitaj aŭ aŭspiciitaj de ĝi. Konsideru tiaj la oficialajn retejojn de la korporacioj.

2.5.1.2 Transskribo de la preferata nomo

Respektu la uzon de majuskloj, minuskloj kaj signoj tiel, kiel ili aperas ofte ligitaj al la korporacio

E@I

variantoj: Esperanto@Interreto, Edukado@Interreto

Sekvu la ortografiajn regulojn de la devenlando de la korporacio pri la uzado de majuskloj. Ĝenerale, oni skribas majuskle ĉiun plensignifan vorton de la korporacia nomo, escepte en la francaj, italaj, rusaj kaj svedaj korporacioj, en kiuj nur la unuan vorton oni skribas majuskle.

Eŭropa Esperanto-Unio

Union française pour l'espéranto

Istituto centrale per il restauro

2.5.1.3 Nomoj en malsamaj formoj

Elektu la nomon, kiun la korporacio pli ofte uzas por paroli pri si mem. En la kazo, ke neniu el la malsamaj formoj estas pli ofta, elektu la plej mallongan, se ĝi sufiĉas por taŭge identigi la korporacion.

EURATOM

variantoj: EKAE, Eŭratomo, *Eŭropa Komunumo pri Atomenergio*

Ne elektu la mallongan formon, tamen, se temas pri inicialoj aŭ sigloj ne sufiĉaj por identigi la korporacion bone aŭ se la akronimo ne bone prononceblas.

Amnestio Internacia

varianto: AI

Confederación General del Trabajo

varianto: CGT

2.5.1.4 Nomo en malsamaj lingvoj

Se la korporacio identigas sin en malsamaj lingvoj, elektu la oficialan nomon.

Universidade de Santiago de Compostela

Euskal Herriko Gazte Orkestra

Congregatio Romanae et Universalis Inquisitionis

Kaze, ke la korporacio havas diversajn oficialajn lingvojn kaj unu el ili estas Esperanto, elektu ĉi lastan kiel preferatan. Faru same se Esperanto ne estas oficiala lingvo sed la korporacio estas konata en Esperantio per esperanta nomo[54].

Unesko

Unuiĝintaj Nacioj

Se la oficiala lingvo de la korporacio estas en ne latina alfabeto, elektu formon en alia lingvo kun latina alfabeto. Preferu Esperanton se tio eblas.

Zaozhuang-a Universitato

Se ne ekzistas formo en Esperanto aŭ en alia lingvo kun latina skribo, transliteru la nomon laŭ la responda ISO-normo de transliterado.

En la kazo de internaciaj korporacioj, historiaj institucioj, religiaj aŭ kavaliraj ordenoj, ktp., elektu la esperantan formon, se ĝi ekzistas.

Katolika Eklezio

Franciskanoj

Ordeno de la Templanoj

Registru aliajn formojn kiel variantojn.

[54] Ĉi tiu parto ne estas RDA-regulo, sed utilos por unuecigi la politikon de ĉiuj Esperanto-bibliotekoj.

2.5.2. Konstruo de alirpunktoj por korporacioj

KERNA

MARC 21 pri aŭtoritatoj: 110

2.5.2.1 Ĝenerala regulo

Uzu la preferatan nomon por la konstruo del la alirpunktoj en rekta formo (unua indikilo, valoro = 2), krom se temas pri korporacio el unu el la subaj kategorioj.

110 2# $aKomunista Partio de Sovetunio

110 2# $aBulgara Esperantista Asocio

110 2# $aCentro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj

110 2# $aEsperanto-eldonejo Oskar Ziegler

110 2# $aPersone

Aldonu, se necese, la oportunan terminon al la preferata nomo, laŭ la indikoj en Aldonaĵoj al la preferata nomo.

2.5.2.2 Administraciaj korporacioj

Registru korporacion apartenantan al kiu ajn administracia nivelo, inkluzive de leĝodonaj korpusoj, armeo kaj juraj organismoj, antaŭatan de la jurisdikcia termino (unua indikilo, valoro = 1), kie ĝi plenumas siajn funkciojn. Konsultu en la responda sekcio kiel registri la jurisdikcioj n.

110 1# $aHispanio.$bComisaría Regia del Turismo

110 1# $aUsono.$bDepartment of the Army

110 1# $Francio. $bMinistère de la culture

Tamen, registru en rekta ordo la publikajn korporaciojn kun kultura, scienca kaj socia karaktero kaj ĝenerale tiujn, kiuj ne ekzercas ajnan pure registaran agon.

110 2# $aInternacia Esperanto-Muzeo (Vieno)

110 2# $aBiblioteca Nacional de España

110 2# $aInstituto Nacional de Estadística (Hispanio)

110 2# $aMuseo de Arte Contemporáneo de Castilla y León

2.5.2.3 Religiaj korporacioj

Por la nomoj de religioj, konfesioj, ordenoj aŭ religiaj societoj, konstruu la alirpunkton:

- Per la konvencia aŭ mallonga formo prefere ol per la oficiala formo.
- En Esperanto, se ĝi ekzistas kaj estas uzata en eldonaĵoj de la korporacio aŭ citita en referencverkoj.

110 2# $aKatolika Eklezio

110 2# $aOomoto

110 2# $aOrdeno de la Rozkruco

110 2# $aJezuitoj

En la kazo de diocezoj, vikariaj kaj patriarkaj jurisdikcioj, kaj aliaj ekleziaj provincoj, uzu la nomon en la oficiala lingvo, antaŭata de la preferata nomo de la eklezio al kiuj ili apartenas.

110 2# $aKatolika Eklezio.$bDiócesis de Sevilla

Registru la nomon de la preĝejoj kaj aliaj konstruaĵoj por la religia aktivado en rekta ordo.

110 2# $aCathédrale Notre-Dame de Paris

110 2# $aWestminster Abbey

Por konstrui la alirpunkton de ekleziaj postenoj agantaj en oficiala rolo, uzu, antaŭata de la nomo de la konfesio aŭ religia jurisdikcio, la nomon de la posteno en Esperanto, se ĝi ekzistas, la jarrangon de la posteno kaj la personan nomon kun la minimumaj identigaj elementoj.

110 2# $aKatolika Eklezio.$bPapo (1903-1914: Pio la 10a)

110 2# $aKatolika Eklezio.$bPapo (2013- : Francisko)

2.5.2.4 Subordigitaj korporacioj

Subordigita korporacio estas korporacio, kiu estas integra parto de pli granda korporacio, kun kiu ĝi havas hierarkian rilaton de pli malalta rango. Krom se ĝi apartenas al iu el la subaj kazoj, registru ĝin en rekta formo.

110 2# $aInstitución "Fernando el Católico"

varianto:

410 2# $aConsejo Superior de Investigaciones Científicas (España). $bInstitución "Fernando El Católico"

Registru subordigitan korporacion sekve de la hierarkie supera korporacio en jenaj kazoj:

- Administraciaj korporacioj, kiel la antaŭe viditaj, kiuj subordiĝas al la jurisdikcio.
- Religiaj korporacioj, kiel la antaŭe viditaj, kiuj subordiĝas al la konfesio.
- Tiuj korporacioj, kies nomoj enhavas terminon indikantan subordigon (departemento, servo, sekcio, grupo… kaj iliaj ekvivalentoj en aliaj lingvoj). Redaktu varianton en rekta formo.

110 2# $aMondpaca Esperantista Movado.$bSovetia Sekcio

410 2# $a*Sovetia Sekcio de Mondpaca Esperantista Movado*

110 2# $aAsocio de Sovetiaj Esperantistoj.$bUkraina Respublika Filio

410 2# $aUkraina Respublika Filio de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj

- Fakultatoj, areoj kaj universitataj katedroj

110 2# $aUniversitat de Barcelona.$bÀrea de Dret Internacional Públic

- Korporacioj, kies nomoj enhavas la nomon de la supera korporacio

110 2# $aMuseo del Prado. $bAsociación de Amigos

[nomo de la korporacio: Asociación de Amigos del Museo del Prado]

- Korporacioj, kies nomoj ne sufiĉas por taŭga identigo, ĉar ĝi simplas, temas pri nura geografia, kronologia aŭ numera nomo, aŭ ili bezonas de la nomo de la supera korporacio por esti taŭge identigataj.

110 2# $aCentro de Estudios Políticos y Constitucionales (España).$bBiblioteca

110 2# $aUniversidad de Zaragoza.$bConsejo Social

110 1# $aHispanio.$bTribunal Supremo.$bSala de lo Contencioso-Administrativo

110 1# $aHispanio.$bCortes Generales.$bServicio de Estudios y Publicaciones

- Leĝodonaj korpusoj kun pli ol unu ĉambro.

110 1# $aHispanio.$aCortes Generales.$bSenado

110 1# $aHispanio.$aCortes Generales.$bCongreso.$Comisión de Asuntos Exteriores

- Ambasadejoj en aliaj landoj aŭ institucioj, kies alirpunkton oni konstruas kun la lando aŭ institucio, sekvata de la nomo de la korporacio en ties lingvo kaj la nomo de la lando aŭ urbo en kiu ĝi situas en Esperanto.

110 1# $aHispanio.$bEmbajada(Italio)

[Alirpunkto por la ambasadejo de Hispanio en Italio]

110 2# $aUsono.$bEmbassy (Hispanio)

110 2# $aKatolika Eklezio.$bApostolica Nuntiatura (Hispanio)

- Kongresoj kun ĝenerala nomo, kiu inkludas la nomon de la organiza korporacio. Vidu ankaŭ la sekcion Kongresoj.

110 2# $aSociedad Española de Medicina de Emergencias.$bCongreso Nacional$n(7º.$d1995.$cOviedo)

- Satelitaj simpozioj, ktp., kiuj estas parto de pli granda evento. Vidu ankaŭ la sekcion Kongresoj.

111 2# $aCongreso Nacional de Sanidad Penitenciaria$n(2º. $d1999 .$cBarcelona).$eSimposio Satélite Roche

Kiam la supera korporacio, siavice estas subordigita al alia(j) korporacio(j), konstruu la alirpunkton kun la minimumaj elementoj necesaj por taŭge identigi ĝin.

110 1# $aHispanio.$bDirección General de Acción Social

Varianto:

410 1# $aHispanio.$bMinisterio de Asuntos Sociales.$bDirección General de Acción Social

2.5.2.5 Ŝtatestroj

Por konstrui la alirpunkton de ŝtatestroj agantaj en oficiala rolo, registru, antaŭata de la nomo de la responda jurisdikcio, la nomon de la posteno en Esperanto, se ĝi ekzistas, la jarrangon de mandato kaj la personan nomon kun la minimumaj identigaj elementoj.

110 1# $aHispanio.$bReĝino (1833-1868: Isabel la 2a)

110 1# $aFrancio.$bPrezidanto (2007-2012 : Sarkozy)

2.5.2.6 Jurisdikcioj

Laŭ RDA, jurisdikcio estas teritorio regata de leĝo, regularo, konstitucio, tribunala sentenco aŭ alia leĝaro promulgita de oficiala korporacio.

Uzu la jurisdikcion en la kazo de administraciaj korporacioj, kies alirpunkto devas komenci per la jurisdikcia termino, kie ili ekzercas sian leĝodonan povon. Vidu la sekcion Administraciaj korporacioj.

Registru la jurisdicción laŭ la plej ofte citita formo, eĉ se ĝi ne estas la oficiala.

110 1# $aĈilio

[oficiala nomo: República de Chile (Respubliko de Ĉilio, Ĉilia Respubliko]

Registru la esperantan formon, se ĝi ekzistas. Uzu kiel referencfontojn *la Liston de rekomendataj landnomoj*[55] (Akademio de Esperanto, 2009), la *Dekan oficialan aldonon al la Universala Vortaro*[56], (Akademio de Esperanto, 2023), kaj la retan *PIV*[57].

Londono

Beograd o

Nov-Delhio

En la kazo de landoj kun pluraj akceptitaj formoj, elektu tiun, kiun ĉiam uzos via katalogo kaj faru varianton por la alia formo. Konsilindas krei aŭtoritatan rikordon pri geografia nomo por kontroli la uzendan formon en ĉiuj bezonataj kazoj:

Ekzemple: Germanio/Germanujo

Se vi elektas la formon Germanio[58] kiel preferatan, metu la alian kiel varianton kaj inverse.

La MARC-kampoj de la aŭtoritata formato por registri geografiajn terminojn estas X51.

151 #4 $aGermanio

451 #4 $aGermanujo

Aŭ inverse:

151 #4 $aGermanujo

451 #4 $aGermanio

Se vi ne trovas la esperantan formon de la bezonata geografia nomo en unu el la cititaj fontoj, uzu la nomon en la origina lingvo, transliteritan en la kazo de nelatinaj skriboj.

Góra Świętej Anny

Ávila

Norderney

Metu aldonaĵojn al la jurisdikcia nomo en la kazoj en kiuj eblas konfuziĝo kun alia jurisdikcio aŭ kun alia geografia loko. En la unua kazo, metu la necesan aldonaĵon al la plej granda jurisdikcia nivelo.

---

[55] https://www.akademio-de-esperanto.org/decidoj/landnomoj/listo_de_rekomendataj_landnomoj/index.html
[56] https://www.akademio-de-esperanto.org/decidoj/10oa.html
[57] https://vortaro.net/
[58] Biblioteko Juan Régulo Pérez elektis uzi la formojn –io por landoj. Prikonsideru tion se vi ĉerpas rikordojn el ties aŭtoritata katalogo sed decidis uzi la formon -ujo.

110 1# $aNov-Jorko

110 1# $aNov-Jorko (Ŝtato)

[Ĉi-kaze, la nomo sen aldonaĵo rilatas al la urbo]

En la kazo de homonimio kun alia geografia loko, aldonu la nomon de la geografia loko, kiu plej bone identigos ĝin.

110 1# $aKordovo (Hispanio)

110 1# $aKordovo (Argentino)

La regularo permesas meti aldonaĵon nur al la geografia loko situanta en malsama loko de la biblioteka lando. Do, argentinaj bibliotekoj povus meti aldonaĵon nur al la hispana urbo kaj la hispanaj bibliotekoj, nur al la argentina urbo:

110 1# $aKordovo

110 1# $aKordovo (Hispanio)

[En la kazo de argentinaj bibliotekoj, la urbo sen aldonaĵo implicite respondas al la argentina urbo]

110 1# $aKordovo

110 1# $aKordovo (Argentino)

[En la kazo de hispanaj bibliotekoj, la urbo sen aldonaĵo implicite respondas al la hispana urbo]

2.5.2.7 Aldonaĵoj al la preferata nomo

Kiel ĝenerala normo, aldonu nenion al la preferata nomo se ĝi sufiĉas por identigo.

Se tio necesas, metu la aldonaĵojn parenteze en Esperanto sekvante la preferatan nomon. Se bezonatas pli ol unu aldonaĵo, disigu ilin per punkto. Rimarku, ke en la kazo de administracia korporacio, la jurisdikcia aldonaĵo jam antaŭas la nomon de la korporacio.

110 2# $aConsejo Superior de Investigaciones Científicas (Hispanio)

110 1# $aMeksiko.$bMinisterio de lo Interior

Jen la kazoj de bezonataj aldonaĵoj:

- Nomoj de korporacioj, kies nomoj ne donas ideon de korporacio, aŭ kiuj povas konfuziĝi kun nomo de persono, titolo, koncepto, ktp. Aldonu mallongan specifan terminon, kiuj klarigu ilian naturon (ekzemple, *Asocio, Eldonejo…)*

  110 2# $aEsperanto (Eldonejo)

  110 2# $aAntaŭen (Asocio)

  Se ne eblas kontrekitigi la agadon, aldonu la terminon *Firmao*:

  110 2# Adolfo Domínguez (Firmao)

  Aldonu *Muzika ensemblo, Artisma grupo*, ktp., al ĉi tipo de korporacioj, krom se laŭ iliaj nomoj eblas konjekti ilian agadon. Se ne eblas konkretigi la agadon, aldonu la terminon *Grupo*.

  110 2# $aEsperanto (Muzika ensemblo)

  110 2# $aBarbuloj (Muzika ensemblo)

110 2# $aB.O.S.T. (Literatura grupo)

110 2# $aLondona Esperanto-Ĥoro

- Nomoj de korporacioj, kiuj bezonas teritorian klarigon por taŭge identigi ilin.

110 2# $aConfederación General del Trabajo (Hispanio)

110 2# $aInstituto Geográfico Militar (Argentina)

110 2# $aFrauenkirche (Dresdeno, Germanio)

- En la kazoj de homonimio aŭ tre similaj nomoj uzu la aldonaĵojn, kiuj pli bone aljustiĝas al la korporacio (geografia loko, dato, rilata korporacio aŭ tipo de korporacio)

110 2# $aSanta Liga (1495-1498)

110 2# $aSanta Liga (1570-1573)

110 2# $aReal Sociedad Económica de Amigos del País (Cádiz)

110 2# $aReal Sociedad Económica de Amigos del País (Jaén)

En la kazo de lernejoj kaj religiaj konstruaĵoj, kutime aldonu la geografian lokon, eĉ se ne ekzistas homonimio.

110 2# $aColegio Público Nuestra Señora del Rosario (Hellín)

110 2# $aInstituto de Educación Secundaria Cuatro Caminos (Don Benito)

2.6. Kongresoj kaj aliaj portempaj korporacioj

Portempaj korporacioj estas grupoj kaj eventoj okazantaj de tempo al tempo, kiel kunsidoj, kongresoj, ekspedicioj, ekspozicioj, festivaloj kaj foiroj.

Aparte gravas por Esperanto-bibliotekoj la kongresoj, tial instrukcioj baziĝos sur ili, sed kaze ke vi devas katalogi alitipan portempan korporacion, la instrukcioj estas similaj.

Por povi konsideri, ke iu kunsido estas kongreso, ĝi devas havi formalan nomon. Temas pri formala nomo se ĝi estas skribita majuskle, indikas la temon de la kongreso kaj uzas en la nomo terminojn kiaj kongreso, seminario, renkontiĝo, kunveno ktp. Ankaŭ prikonsideru ĉu la kunsidon oni celebras aŭ planas celebri regule. Tro ĝeneralan nomon kiel “internacia kongreso” ĝenerale oni ne traktas kiel estanta kongreso el kataloga vidpunkto.

2.6.1. Elekto de la preferata formo

La portempaj korporacioj kutime prezentas sian formalan nomon laŭ tre nestabila maniero. Elektu la formon, kiu plej bone reprezentas la aron de kongreseldonoj, kun prefero de la plej modernaj. Konsultu, se ĝi ekzistas, ilian oficialan retejon.

Elektu la preferatan nomon de la kongresoj sekvante la kriteriojn por la elekto de la preferata nomo de korporacio.

Expolingua

Varianto:

Congreso Internacional Expolingua

Se la nomo aperas en pluraj lingvoj, registru la esperantan formon, se ĝi ekzistas. Ankaŭ se ĝi estas konata laŭ tiu formo en esperantaj medioj[59]. Male, registru la oficialan formon plej abundan.

Koncilio Vatikana

Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo

Biennale di Venezia

Se la preferata nomo inkludas la jaron de celebrado, elektu nur la nomon:

Expolingua

[en la fontoj aperas Expolingua 2001, Expolingua 2002….]

Se la preferata nomo inkludas la lokon, kie la kongreso okazas, konsideru ĝin parto de la nomo:

Beograda Lingvistika Seminario

2.6.2. Konstruo de alirpunktoj por kongresoj

KERNA

MARC 21 pri aŭtoritatoj: 110, 111

El kataloga vidpunkto estas du tipoj de kongresoj:

- Kongresoj kun ĝenerala nomo, kiu inkludas la nomon de la organiza korporacio. Kodigu ilin en la kampo 110.

110 2# $aInternacia Fervojista Esperanto Federacio.$bKongreso

[En la fonto: Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto Federacio]

110 2# $aInternacia Katolika Unuiĝo Esperantista.$bKongreso

[En la fonto: Kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista*]*

110 2# $aSennacieca Asocio Tutmonda.$bKongreso

[En la fonto: SAT-Kongreso]

- Kongresoj, kies nomoj ne inkludas nomon de iu organiza korporacio. Kodigu ilin en la kampo 111.

111 2# $aUniversala Kongreso de Esperanto

111 2# $aHispana Kongreso de Esperanto

2.6.2.1 Variantoj

Se iu kongreso prezentiĝas laŭ diversaj nomoj, registru la variantojn de nomoj ne preferataj:

111 2# $aUniversala Kongreso de Esperanto

411 2# $aUniversala Kongreso

411 2# $aUniversala Esperanto-Kongreso

411 2#$aUK

59 Aldonata kondiĉo por Esperanto-bibliotekoj ne konsiderata en RDA.

411 2# $aInternacia Kongreso de Esperanto

410 2# $aUniversala Esperanto-Asocio.$Kongreso

111 2# $aIberia Kongreso Esperantista

411 2# $aKongreso de Iberiaj Esperantistoj

2.6.2.2 Aldonaĵoj

La nomo de ĉiu eldono de iu kongreso devas enhavi sekvajn aldonaĵoj se ili ekzistas aŭ eblas koni ilin. Prenu la necesajn datenojn el kiu ajn fonto.

- Ordinala numerado en arabaj ciferoj, en Esperanto (2a, 10a, …) ($n)
- Jaro de la celebrado (1987). Eblas aldoni plurajn se necese (2005-2006) ($d)
- Loko, kie oni celebris la kongreson, en Esperanto. Eblas aldoni plurajn lokojn se necese. (Prago-Vieno). En la kazo de virtualaj kongresoj, registru *Reta*, kiel geografia loko ($c)

110 2# $aInternacia Fervojista Esperanto-Federacio.$bKongreso$n(22a.$d1970.$cRimini)

111 2# $aUniversala Kongreso de Esperanto$n(29a.$d1937.$cVarsovio)

111 2# $Virtuala Kongreso de Esperanto$n(2a.$d2021.$cReta)

2.6.2.3 Tipoj de rikordoj

En la kazo de kongresoj, indas krei du tipojn de rikordoj. Unu, kiun oni povas nomi “patrina” aŭ “trunka”, sen aldonaĵoj, resuma aŭ kontrola de la diversaj nomoformoj de la kongreso se estas pluraj. Ĉi tiu estas la vera aŭtoritata rikordo de la kongreso kaj en ĝi eblas klarigi ĉion pri nomoformoj, rilatoj kaj kiu ajn alia dateno grava laŭ la opinio de la kataloganto. Kaj aliajn simplajn, konsistantajn nur el alirpunkto por ĉiuj el la diversaj okazigoj de la kongreso kun la necesaj aldonaĵoj por distingi unu disde la aliaj.

111 2# $aUniversala Kongreso de Esperanto

411 2# $aUniversala Kongreso

411 2# $aUniversala Esperanto-Kongreso

411 2#$aUK

411 2# $aInternacia Kongreso de Esperanto

410 2# $aUniversala Esperanto-Asocio.$Kongreso

[Trunka rikordo pri la Universala Kongreso]

111 2# $aUniversala Kongreso de Esperanto$n(3a.$d1907.$cKembriĝo)

111 2 # $aUniversala Kongreso de Esperanto$n(6a.$d1910.$cVaŝingtono)

111 2# $aUniversala Kongreso de Esperanto$n(22a.$d1922.$cHelsinko)

111 2# $aUniversala Kongreso de Esperanto$n(44a.$d1959.$cVarsovio)

111 2# $aUniversala Kongreso de Esperanto$n(94a.$d2009.$cBjalistoko)

[Alirpunktoj el sendependaj rikordoj por diversaj okazigoj de la kongreso]

2.7. Verkoj

Por fari alirpunkton pri verko en bibliografia rikordo, (nome, por identigi la enhavatan verkon en iu risurco) oni devas krei aŭtoritatan rikordon por tiu verko. Same, se temas pri traduko.

Krom se vi deziras katalogi strikte laŭ RDA, ĝenerale, vi bezonos krei aŭtoritatan rikordon por la verko nur en jenaj kazoj:

- La ĉeftitolo ne koincidas kun la preferata titolo de la verko (ĉi tio inkludas tradukojn)
- La titolo de la verko varias en la diversaj eldonaĵoj.
- Ĝi estas bezonata kiel alirpunkto pri temo.

2.7.1. Elekto de la preferata formo

2.7.1.1 Ĝeneralaj kriterioj

Elektu la titolon –en ĝia originala lingvo—per kiu la verko estas plej konata en la publikigitaj risurcoj aŭ en la referencfontoj. Respektu la ortografion propran al ĉiu lingvo:

> Shakespeare, William. King Lear
>
> Schiller, Friedrich. Der neefe als onkel
>
> Szilágyi, Ferenc. La liberiĝo de la juĝisto
>
> Frithiofs saga
>
> Till Eulenspiegel
>
> Imitatio Christi

Se la titolo estas en ne latina skribo transliteru ĝin laŭ la responda ISO-normo. Sed por verkoj antaŭ la 16ª jarcento, se estas titolo en Esperanto, elektu tiun formon kiel preferatan.

> Mil kaj unu noktoj
>
> Homero. Odiseado

Ne registru alternativan titolon kiel parton de la preferata titolo, registru ĝin kiel titolvarianton

> Bulthuis, H. J. Jozef kaj la edzino de Potifar
>
> Titolvarianto: Idoj de Merkuro kaj Eroso
>
> *[Titolo sur la preferata informfonto: Jozef kaj la edzino de Potifar aŭ Idoj de Merkuro kaj Eroso]*

2.7.1.2 Informfontoj

Konsideru la ĉefajn informfontojn por ĉiu tipo de risurco. En presita teksto, preferu la titolpaĝon. Registru la titolojn kun malsamaj formoj el aliaj fontoj kiel variantoj.

> Fernández, Miguel. El la sonoraj soloj
>
> *[Titolvarianto sur la kovrilo: El miaj sonoraj soloj]*

En la kazo de ne esperantaj verkoj, akceptu la formon, kiu aperas en la responda nacia biblioteko. Plej ofte eblas koni tiun preferatan formon ankaŭ pere da la Aŭstria Nacia Biblioteko[60] kaj de VIAF[61] *(Virtual International Authority File* = Virtuala Internacia Aŭtoritata Datenaro).

Molière. L'avare

2.7.2. Konstruo de la alirpunktoj por verkoj

2.7.2.1 Preferata titolo por anonimaj verkoj

MARC 21 pri aŭtoritatoj: 130 $a, $l

La preferata titolo de la verko konstituas la ĉefan alirpunkton.

130 0# $aEgils saga Skallagrímssonar

Por konstrui la aŭtoritatan alirpunkton de traduko, aldonu la lingvon en kiun ĝi estas tradukita, en Esperanto:

130 0# $aEgils saga Skallagrímssonar.$lEsperanto

2.7.2.2 Preferata titolo por verkoj kun konata aŭtoro

2.7.2.2.1. Personoj

MARC 21 pri aŭtoritatoj: 100 $a, $t, $l

Kiam ekzistas persona responsa aganto pri la kreado de verko, konstruu la aŭtoritatan alirpunkton, kiu reprezentas la verkon per kombino de:

• La aŭtoritatan alirpunkton, kiu reprezentas la aŭtoron de la verko.

• La preferatan titolon de la verko.

100 1# $aDickens, Charles.$tBattle of life

100 1# $ aDevjatnin, V. N.$tVerkaro

2.7.2.2.2. Korporacioj

MARC 21 pri aŭtoritatoj: 110 $a, $t, $l

Kiam ekzistas korporacia responsa aganto pri la kreado de verko, konstruu la aŭtoritatan alirpunkton, kiu reprezentas la verkon per kombino de:

• La aŭtoritatan alirpunkton, kiu reprezentas la korporacion.

• La preferatan titolon de la verko.

110 2# $aKatolika Eklezio.$bPapo (1958-1963: Johano la 23a).$tPacem in terris

[60] https://search.onb.ac.at/primo-explore/search?vid=ONB&lang=de_DE
[61] https://viaf.org/

2.7.2.2.3. Kongresoj

MARC 21 pri aŭtoritatoj: 110, 111 $a, $t

Kiam ekzistas kongresa responsa aganto pri la kreado de verko, konstruu la aŭtoritatan alirpunkton, kiu reprezentas la verkon per kombino de:

• La aŭtoritatan alirpunkton, kiu reprezentas la kongreson.

• La preferatan titolon de la verko

111 2# $aKoncilio Vatikana$n(2a.$d1962-1965)$tConstitutio dogmatica de Ecclesia

2.7.2.3 Preferata titolo por tradukoj

MARC 21 pri aŭtoritatoj: 100, 110, 111 $l

Por konstrui la preferatan titolon de traduko, en kiuj ajn el la antaŭaj kazoj, aldonu la lingvon de la traduko, en Esperanto:

100 1# $aDickens, Charles.$tBattle of life.$lEsperanto

100 1# $aSzilágyi, Ferenc $tLa liberiĝo de la juĝisto.$lHispana

100 1# $aLu, Xun.$tNoveloj.$lEsperanto

110 2# $aKatolika Eklezio.$bPapo (1958-1963: Johano la 23a).$tPacem in terris.$lEsperanto

111 2# $aKoncilio Vatikana$n(2a.$d1962-1965)$tConstitutio dogmatica de Ecclesia.$lEsperanto

En la kazo de tradukoj, kiuj ricevis malsamajn titolojn, eblas fari titolvariantojn por helpi la identigon kaj retrovon.

100 1# $aCervantes Saavedra, Miguel de.$tEl curioso impertinente.$lEsperanto

400 1# $aCervantes Saavedra, Miguel de.$tLa malprudenta scivolulo

400 1# $aCervantes Saavedra, Miguel de.$tLa impertinenta scivolulo

100 1# $aShakespeare, William.$tThe tempest.$lEsperanto

400 1# $aShakespeare, William.$tLa tempesto

400 1# $aShakespeare, William.$tLa ventego

2.7.2.4 Preferata titolo por parto(j) de verko

MARC 21 pri aŭtoritatoj: 100, 110, 111 (+$t), 130, $k, $l (se temas pri traduko)

2.7.2.4.1. Unu parto

Se la parto havas identigan titolon, tiu estu la ĉefa alirpunkto. Registru titolvarianton kun la komuna titolo. Eblas ankaŭ starigi rilaton de tuto-parto

100 1# $aCervantes Saavedra, Miguel de.$tEl curioso impertinente

400 1# $aCervantes Saavedra, Miguel de.$tDon Quijote de la Mancha.$pEl curioso impertinente

500 1# $iEnhavata en (verko):$aCervantes Saavedra, Miguel de.$tDon Quijote de la Mancha

100 1# $aTolkien, John Ronald Reuel.$tThe fellowship of the ring

400 1# $aTolkien, John Ronald Reuel.$tThe lord of the rings.$n1,$pThe fellowship of the ring

400 1# $aTolkien, John Ronald Reuel.$tThe lord of the rings.$pThe fellowship of the ring

500 1# $iEnhavata en (verko):$aTolkien, John Ronald Reuel.$tThe lord of the rings

Se la parto ne havas identigan titolon, uzu la komunan titolon sekvatan de la termino por identigi la parton se ĝi ekzistas, en la sama lingvo kiel tiu de la titolo kaj registru la numeron de la parto per arabaj ciferoj.

100 0# $aHomero.$tOdiseado.$nKanto 1

100 1# $aVergilio.$tBucolica.$n4

2.7.2.4.2. Du aŭ pli da partoj

Se la partoj estas sinsekve numeritaj, registru la terminon por nomi la partojn en singularo kaj en la sama lingvo kiel la titolo, kun la sinsekva numerado en arabaj ciferoj.

100 0# $aHomero.$tOdiseado.$nKanto 1-6

100 1# $aLucrecio Caro, Tito.$tDe rerum natura.$nLiber 1-3

100 1# $aVergilio.$tBucolica.$n1-4

Se la partoj ne estas numeritaj aŭ la numerado ne estas sinsekva aŭ ili ne koincidas kun la originala disdivido de la aŭtoro (temas pri fragmentoj aŭ kombinaĵo de fragmentoj kaj ĉapitroj), registru la titolon de la verko sekvatan de la konvencia kolektiva titolo *Elektaĵo* por identigi la partojn.

100 0# $aMolière.$tGeorge Dandin.$kElektaĵo.$lEsperanto

100 1# $aLermontov, Mihail.$tGeroj našego vremeni.$kElektaĵo.$lEsperanto

130 0# $aTill Eulenspiegel.$kElektaĵo.$lEsperanto

2.7.2.5 Specialaj kazoj

2.7.2.5.1. Sanktaj libroj

En la kazo de la Biblio kaj aliaj sanktaj libroj, elektu titolon en Esperanto se ĝi ekzistas[62].

130 0# $aBiblio

130 0# $aKorano

2.7.2.5.1.1. Partoj de la Biblio

La partoj dependas ĉiam de la komuna titolo Biblio. Se vi disponas nur la Malnovan aŭ la Novan Testamenton, registru la partoj jene:

130 0# $aBiblio.$pMalnova Testamento

130 0# $aBiblio.$pNova Testamento

Se vi havas nur parton de, siavice, tiujn ĉefajn partojn, registru tiujn partojn dependante rekte de Biblio. Jen kelkaj ekzemploj:

Malnova Testamento

130 0# $aBiblio.$pNombroj

130 0# $aBiblio.$pPsalmaro

130 0# $aBiblio.$pSentencoj

130 0# $aBiblio.$pPredikanto

130 0# $aBiblio.$pKanto de la kantoj

Nova Testamento

130 0# $aBiblio.$pEvangelioj

130 0# $aBiblio.$pEvangelio laŭ Johano

130 0# $aBiblio.$pEvangelio laŭ Luko

130 0# $aBiblio.$pEvangelio laŭ Marko

130 0# $aBiblio.$pEvangelio laŭ Mateo

Se vi havas parton de unu el tiuj libroj identigita per numera divido, aldonu la ĉapitron per romanaj ciferoj kaj la versojn per arabaj ciferoj.

130 0# $aBiblio.$pPredikanto,$nIII, 1-8

Se temas pri elektaĵoj de unu el la partoj de la Biblio aŭ de individua libro aŭ de grupo de libroj, registru la specifan titolon plej laŭan al la elektaĵo kaj aldonu la terminon *Elektaĵo*.

130 0# $aBiblio.$kElektaĵo

130 0# $aBiblio.$pMalnova Testamento.$kElektaĵo

[62] En ĉi verkoj, kreitaj de multaj aŭtoroj, laŭlonge de multaj jaroj kaj ofte en pluraj lingvoj, estas tre malfacile determini, kiu estas la strikte originala titolo. Temas pri kompromisa konvencio pro praktikaj kialoj. Ĉiu biblioteko starigas la preferatan titolon de tiuj verkoj en la lingvo de sia katalogo.

130 0# $aBiblio.$pPsalmaro.$kElektaĵo

130 0# $aBiblio.$pEvangelioj.$kElektaĵo

En kiu ajn el la antaŭaj kazoj, aldonu la lingvon se temas pri traduko:

130 0# $aBiblio.$kElektaĵo.$lEsperanto

130 0# $aBiblio.$pMalnova Testamento.$kElektaĵo.$lEsperanto

130 0# $aBiblio.$pPsalmaro.$kElektaĵo.$lEsperanto

130 0# $aBiblio.$pEvangelioj.$kElektaĵo.$lEsperanto

2.7.2.5.2. Traktatoj

Por traktatoj inter du aŭ pli el la sekvaj:

- naciaj registaroj
- interregistaraj organizoj
- la Sankta Seĝo (Vatikano)
- aliaj jurisdikcioj kun la povo subskribi traktatojn

registru kiel preferata titolo (laŭ la suba ordo de prefero):

- la oficialan titolon de la traktato (uzu la formon en Esperanto se ĝi ekzistas eĉ se ĝi ne estas la oficiala nomo[63]).
- mallongan titolon aŭ citaĵon de la titolo uzata en la jura literaturo.
- kiun ajn alian nomon laŭ kiu la traktato estas konata.

Aldonu la daton de la traktato kiel aldonaĵo al la preferata titolo. Redaktu titolvariantojn en aliaj lingvoj.

130 0# $aTraktato de Versajlo$d(1919)

430 0# $aTraité de Versailles$d(1919)

430 0# $aVersailles Treaty$d(1919)

430 0# $aVertrag von Versailles$d(1919)

430 0# $aTratado de Versalles$d(1919)

2.8. Noto pri konsultitaj fontoj

2.8.1. Ĝeneralaĵoj

MARC 21 pri aŭtoritatoj: 670

Redaktado de noto pri la fonto de kie oni prenas la informon estas deviga, kiam oni kreas aŭtoritatan rikordon, por konsideri ĝin komplete redaktata. Ĝi havas duoblan celon:

[63] En ĉi tipoj de eldonaĵoj ne estas nur unu lingvo, kiun oni povas konsideri la oficiala, ĉar la verko aperis samtempe en la lingvoj de la subskribantaj landoj. Ĉiu el ili konsideras, en sia katalogo, ke la preferata formo estas tiu en la propra lingvo. Sed traduko en Esperanto de tiuj verkoj devigus nin elekti inter unu el la samrangaj oficialaj lingvoj por starigi la preferatan formon. Fakte, tio estus pli strikte laŭa al RDA, sed estus malfacile alveni al interkonsento. Tial, mi proponas escepte en ĉi tiu kaj similaj kazoj, uzi, pro praktikaj kialoj, la Esperantan formon kiel preferata titolo.

- Pravigi la elekton de la preferata formo de la nomo kaj de ties variantoj.
- Havigi al la kataloganto referencan informon pri la alirpunkto, ĝia uzo, historio, ktp., kaj kiu ajn alian informon utilan por la ĝusta atribuado de verkoj.

Estas neniu oficiala regulo pri tio, kiel redakti ĉi noton, krom la specifaĵoj de la formato. La subaj indikoj estas orientaj, por atingi certan unuecigon en la priskriboj.

2.8.2. Redaktado de la notoj

Ne ekzistas reguloj pri la nombro aŭ amplekso de la notoj pri fontoj, sed la sperto montras, ke la notoj tro longaj kaj sen afer-tuŝa informo ne vere utilas. Tial klopodu, ke ili estu mallongaj kaj vere informaj. Rimarku, ke la celo de aŭtoritata katalogo ne estas havi enciklopedian karakteron, sed esti ilo utila por la kataloganto kaj la esploristo.

Ĉiu noto konsistas el du partoj: la citado de la fonto (670 $a) kaj la registrado de la informo trovita en ĝi (670 $b). Uzu malsaman kampon 670 por ĉiu fonto uzata.

En la esperantaj kazoj la plej oftaj fontoj estas la risurcoj mem, kiujn oni katalogas; referencverkoj, kiaj enciklopedioj; kaj retaj fontoj kiel personaj aŭ korporaciaj retejoj, VIAF kaj Vikipedio.

por tio necesas Krom la pravigo de la preferata akceptita formo, jenaj datenoj estas ankaŭ gravaj:

Pri personoj

La diversaj bibliografiaj identecoj en la kazo de pseŭdonimoj kaj de ĉiuj variantoj de la nomo reprezentataj en la risurco. Tio helpas la ĝustan atribuadon kaj malhelpas la duobligon de aŭtoritatoj.

Ene de ĉiu noto pri fonto, oni fidele respektu la formon uzatan en la ĉefa informfonton kaj la variantojn aperantajn en la aliaj fontoj. La noto enhavu la trovitan biografian informon, kiu faciligas la identigon de la persono: kompleta nomo, geografiaj aŭ lingvaj variantoj, loko kaj dato de naskiĝo, ktp.

Pri korporacioj

Ĉefa nomoformo kaj variantoj, dato de fondiĝo, rilato kun aliaj korporacioj, gravaj historiaj ŝanĝoj, celoj, ktp.

Pri kongresoj

Variantoj, organizaj korporacioj, ofteco, ktp.

2.8.2.1 Citado de la fontoj

Bibliografian fonton oni citas per la titolo kaj la eldondato de la risurco, kiu provizas la informon.

Bibliografiaj fontoj

670 ## $aEkzercaro de la lingvo internacia Esperanto, 1910;$b(…….)

670 ## $aEl la sonoraj soloj, 1996;$b(……..)

670 ## $aLlengua auxiliar internacional Esperanto , 1905;$b(……..)

Citu la referencverkojn laŭ la formo laŭ kiuj ili estas pli konataj se ĝi ŝanĝiĝas respekte de la oficiala formo. En ĉi tipoj de verkoj ne necesas registri la daton de publikigo, krom se temas pri eldonoj kun aktualigita enhavo

670 ## $aEnciklopedio de Esperanto, 1979$b(……..)

Citu la retajn fontojn kun la indiko TTT[64] antaŭ la nomo de la konsultita fonto se povas esti dubo, ke la fonto estas reta. En aliaj kazoj, kiel katalogoj de bibliotekoj, VIAF kaj Vikipedio, kiuj ĉiam estas retaj, tio ne necesas.

Bibliotekaj katalogoj

Citu ĝin laŭ la nomo per kiu la biblioteko estas konata, kun la indiko "katalogo", kaj la dato de konsulto.

670 ## $aBiblioteko Juan Régulo Pérez, katalogo, 24-4-2024$b(……..)

En la kazo de naciaj bibliotekoj, skribu NB, la landon kaj la indikon "katalogo".

670 ## $aNB Aŭstrio, katalogo, 10-6-2003 $b(……..)

670 ## $aNB Pollando, katalogo, 10-6-2003 $b(……..)

670 ## $aNB Japanio, katalogo, 10-6-2003(……..)

En la kazo de la aŭtoritata katalogo VIAF, uzu la akronimon:

670 ## $aVIAF, 10-6-2003 $b(……..)

Retpaĝaroj kaj sociaj retejoj

670 ## $aTTT Originala Literaturo Esperanta, 23-12-2013 $b(……..)

670 ## $aTTT UEA, 18-9-2013 $b(……..)

670 ## $aTTT Vinilkosmo, 1-8-2016 $b(……..)

670 ## $aRetejo de la aŭtoro, 2-9-2013 $b(……..)

670 ## $aVikipedio, 15-4-2013 $b(……..)

Retpoŝtaj mesaĝoj kaj aliaj rektaj komunikoj

Oni indikos la formon de komunidado kaj la daton, kiam ĝi okazis:

670 ## $aRetpoŝta mesaĝo de la aŭtoro, 1-2-2014 $b(……)

670 ## $aInformo alportita de fakulo, 18-8-2015 $b(……)

670 ## $aTelefona parolado kun familiano, 12-8-2015 $b(……)

2.8.2.2 Redaktado de la trovita informo

Registru en la subkampo $b la informon trovitan en la fonto citita en $a. La subkampo konsistas el

1. Lokaliza termino de la konkreta fonto, kie troviĝas la informo

670 ## $a … $btitolpaĝo (L. L. Zamenhof)

670 ## $a … $bpaĝo 7 (naskiĝis en 1950, en Granada)

670 ## $a … $bkovrilo (Georg Bûchner)

670 ## $a … $bkolofono (Hirosima Esperanto-Centro)

Ĉi termino ne necesas en referenverkoj alfabete ordigitaj

[64] Tut-Tera Teksaĵo, angle *World Wide Web, WWW*.

670 ## $aPIV $b(Sofoklo)

2. Trovita informo
   La trovita informo aperos inter parentezoj kaj komencos per la formo de la nomo eĉ se ĝi jam aperis en alia fonto. Laŭeble, la citaĵo estu klara kaj konciza.
   - Se ĝi estas en alia lingvo, traduku ĝin esperanten
   - Se la informon oni prenas el du malsamaj partoj de la dokumento, uzu du malsamajn parentezojn kun siaj respektivaj terminojn.

670 ## $aEl la sonoraj soloj, 1996;$btitolpaĝo (Miguel Fernández) paĝo 7 (naskiĝis en 1950, en Granada)

- Se la informo troviĝas en la citita fonto ($a), ne necesas registri ĝin denove en $b.

670 ## $aProgramo de la Unua Kongreso de Iberiaj Esperantistoj, 1923

2.8.2.3 Ekzemploj

Jen sube kelkaj praktikaj, iom kompleksaj ekzemploj:

100 1# $aZamenhof, L. L.

400 1# $aZamenhof, Lejzer Ludwik

400 1# $aZamenhof, Ludwik Lazar

400 1# $aЗаменгоф, Людвик Лазарь

400 0# $aDoktoro Esperanto

400 0# $aUnuel

670 ## $aEkzercaro de la lingvo internacia Esperanto, 1910;$btitolpaĝo (L. L. Zamenhof)

670 ## $aVIAF, 22-3-2015;$b(Zamenhof, L. L. 1859-1917; Zamenhof, Ludwik; Zamenhof, Lejzer Ludwik; ktp.)

670 ## $aVikipedio, 22-3-2015;$b(D-ro Esperanto, pseŭdonimo de Zamenhof, L. L.; Unuel estis pseŭdonimo de Ludoviko Zamenhof. Ĝi estis mallongigo de Unu el la popolo. Zamenhof uzis ĝin ĉefe kiel aŭtoro de cionismaj aŭ homaranismaj verkoj)

110 2# $aE@I

410 2# $aEsperanto@Interreto

410 2# $aEdukado@Interreto

670 ## $aManlibro pri instruado de Esperanto, 2009;$btitolpaĝo (E@I, Edukado@Interreto)

670 ## $aVikipedio, 14-9-2017;$b(E@I (elparolu "e-ĉe-i"; oficiala nomo, ia. mallongigo de Edukado ĉe Interreto kaj Esperanto ĉe Interreto))

111 2# $aKongreso de Iberiaj Esperantistoj

411 2# $aIberia Kongreso Esperantista

411 2# $aIberia Kongreso de Esperanto

411 2# $aCongreso de Esperantistas Ibéricos

511 2# $aDiskutanta Kunveno de Esperantistoj de Iberiaj Landoj

511 2# $aHispana Kongreso de Esperanto

670 ## $aProgramo de la Unua Kongreso de Iberiaj Esperantistoj, 1923

670 ## $aBoletín del 2.º Congreso de Esperantistas Ibéricos = Bulteno de l' 2a Kongreso de Iberiaj Esperantistoj, 1924

670 ## $aKongreslibro, samtempe gvidilo tra Andaluzio, 1925;$btitolpaĝo (IIIa Iberia Kongreso Esperantista)

670 ## $aVikipedio, 18-4-2024;$b(Iberia Kongreso de Esperanto. La 1a, 2a kaj 3a Iberia Kongreso de Esperanto estas enkalkulitaj respektive kiel la 3a, 4a kaj 5a Hispana Kongreso de Esperanto)

3. KREADO DE RIKORDO PRI LA EKZEMPLERO EN KOHA

3.1. Enkonduko

Lasta fazo de katalogado estas registri la informon pri la ekzempleroj, kiujn via biblioteko disponas el la katalogita eldonaĵo. Tio permesas retrovi la risurcojn en la bretaro.

Se via biblioteko posedas plurajn ekzemplerojn de la sama eldono, vi devas krei tiom da rikordoj, kiom da ekzempleroj estas. Gravas ne **konfuzi ekzempleron kun volumo** de la eldonaĵo. Ekzemple, se iu risurco konsistas el tri volumoj, tiu triopo konstituas unu ekzempleron.

Unu ekzemplero konsistanta el unu volumo



Unu ekzemplero konsistanta el tri volumoj

Ĝenerale, oni registras la opon kune en la sama rikordo pri la ekzemplero. La afero povas funkcii tamen, iom malsame en Koha, kiel ni vidos poste.

En la registroj pri la ekzemplero oni registras la informon rilatan nur al la konkretaj kopioj, kiujn disponas nia biblioteko. Kiel ni vidis en la ĉapitro *Enkonduko en RDA'n*, la ĉefaj atributoj de la ekzemplero estas:

Identigilo: strikodo, signaturo *NEPRA*

Deveno: registro de la antaŭaj posendantoj

Stato de la ekzemplero: difektita kovrilo, difektita bindaĵo, acida papero…

Limigo de aliro: nur en la sidejo, nur por la membroj...

La sola deviga atributo estas la signaturo, numero aŭ kodo, kiu indikas la fizikan lokon ene de la biblioteka bretaro kie troviĝas la risurco, sed la aliaj informoj povas esti ankaŭ tre utilaj por efika mastrumado de la kolekto.

Ne ekzistas vere komunaj normigitaj konvencioj por la kreado de rikordoj pri la ekzemplero kaj RDA ankoraŭ estas en disvolvo ĉi-rilate. Ĉiu biblioteko elektas la signaturan sistemon plej taŭgan al siaj kolektoj kaj bezonoj kaj decidas kian kroman informon aldoni por faciligi la serĉadon al siaj uzantoj. Cetere, kelkaj mastrumsistemoj, kiel Koha, donas ĉi tian informon en speciala kampo ene de la bibliografia rikordo, alirebla pere de speciala formularo.

Trovu en ĉi ĉapitro instrukciojn pri tio, kiel registri la informon pri la ekzemplero en Koha. Minimuman informon pri la formato, trovu en la sekcio *Rikordo pri la ekzemplero* de la gvidilo *Formato MARC 21*,

kaze ke la mastrumsistemo, kiun vi uzas ja permesas krei tiun tipon de rikordoj. Pri aliaj sistemoj kun insertitaj kampoj pri ekzempleroj en la bibliografia rikordo, vi devas mem studi ties karakterizaĵojn. Verŝajne ili funkcios simile al Koha.

3.2. Kampo 952 de Koha

Koha uzas la lokan kampon 952 por registri la informon pri la ekzemplero, kiu estas bazita ĉefe sur la kampoj 561, 563 kaj 852 de la MARC-formato. Ĉi kampo estas ripetebla kaj oni devas uzi malsaman kampon por ĉiu ekzemplero disponebla.

Ĉefaj subkampoj

Mi lasas en la angla la nomojn de la subkampoj, ĉar ĉi parto de Koha ne estas plene tradukita en Esperanton kaj tiuj estos la etikedoj, kiujn vi trovos en la programo dum katalogado. Mi tradukas nur la valorojn por bildigi la tipon de informon kodigeblan. Kompletigu la teknikan informon se necese en la *Wiki* de Koha pri ĉi kampo[65].

En la subkampoj kun elekteblaj valoroj eblas traduki aŭ ŝanĝi ilin aŭ aldoni pliajn en certaj kazoj. Alivorte, eblas agordi la sistemon por laŭigi ĝin al viaj bezonoj.

$0 – Elsark-stato (Withdrawn status)

La implicitaj valoroj de la listo estas:

0 = "" (ne elsarkita)

1 = 'Elsarkita' *(uzenda se oni elsarkis la libron el la kolekto sed deziras pluteni la spuron de ĝi en la katalogo)*

La valoro “0” estas la preskaŭ ĉiam uzenda, ĉar ĉiuj ekzempleroj el la kolekto estas neelsarkita, ĉar ĉeestaj en ĝi. La valoro “1” uzeblas, kiam la ekzemplero ne plu troviĝas en la kolekto sed ial oni deziras plu teni ĝian spuron en la katalogo. Tio, kompreneble, ne bezonatas. Se libro estas elsarkita, ĝi povas malaperi el la katalogo senplie kaj la valoro en la subkampo $0 estos ĉiam “0”.

$1 – Perd-stato (Lost status)

La implicitaj valoroj estas:

0 = "" (ne perdita)

1 = 'Perdita'

2= 'Longe prokrastita redono'

3 = 'Perdita kaj repagita'

4 = 'Mankas'

$3 – Materialoj specifitaj (Materials specified)

Specifaj numeroj de seriaĵoj aŭ plurpartaj ekzempleroj, kiujn oni disponas.

[65] https://wiki.koha-community.org/wiki/Holdings_data_fields_(9xx)

La ĝisnunaj versioj de Koha ne videbligas ĉi kampon en la retkatalogo, pro tio necesas kelkaj agordoj en la folioj XSLT.

La kampo estas aparte utila por seriaĵoj (gazetoj, ktp.), ĉar ĝi permesas detaligi la disponeblajn numerojn.

Jen bildo montranta, kiel oni vidas ĉi kampon en la administra inferfaco. En la ekzemplo, aperas la disponeblaj jarkolektoj de certa gazeto kaj, interkrampe, la numeroj disponeblaj de ĉiu jaro:

Speco de ekzemplero	Aktuala biblioteko	Hejmbiblioteko	Kolekto	Signaturo	Statuso	Last seen	Date accessioned	Date last borrowed	Strikodo	Numero de kopio	Materialoj specifitaj
Periodaĵo	Biblioteko Juan Régulo Pérez	Biblioteko Juan Régulo Pérez	Kolekto de HEF	MG/sk-1	Available (Ne pruntebla)	19.10.2015	19.10.2015			1	1924 (80, 82, 84-85, 87-89, 91-92), 1925 (93-103), 1926 (105-115), 1927 (116-127)

$4 – Damaĝ-stato (Damaged status)

La implicitaj valoroj estas:

0 = "" (ne damaĝita)

1 = 'Damaĝita'

$5 – Restriktoj en la uzo (Use restrictions)

La implicitaj valoroj estas:

0 = "" (sen restriktoj)

1 = 'Restrikta'

$7 – Ne pruntebla (Not for loan)

La implicitaj valoroj estas:

-1 = 'Mendita' *(la libro estas mendita sed ankoraŭ ne alveninta al la biblioteko)*

0 = "" (disponebla por pruntoj)

1 = Ne pruntebla

2 = Bibliotekista kolekto

$8 – Kodo de la kolekto (Collection code)

La kodo de la kolekto provizas plian rimedon por disdividi la bibliotekan kolekton en kategoriojn (ekzemple, fikcio, referenco, infanlibroj, ktp.). Utila ankaŭ por raportoj kaj statistikoj.

$a – Hejmbiblioteko (Home library)

La kodigita valoro por ĉi kampo devas esti agordita en la administra parto.

$b – Aktuala biblioteko (Current library)

La kodigita valoro por ĉi kampo devas esti agordita en la administra parto. Plej ofte la valoro koincidas kun la valoro de la subkampo $a.

$d – Akirdato (Date acquired)

La dato, kiam la ekzemplero estis akirita (JJJJ-MM-TT). Aŭtomate generita kun la dato kiam oni kreis la rikordon pri la ekzemplero.

$e – Akirfonto (Source of acquisition)

Eblas registri ĉi tie informon pri tio, kiel vi akiris la ekzempleron: aĉetita, donacita (inkludante la nomon de la donacinto kaj la daton), ktp.

$i – Inventar-numero (Inventory number)

Se vi disponas ĝin kaj trovas interesa ĝian registradon. Temas pri numero, kiun kelkaj bibliotekoj povas doni al la ekzemplero en registrolibro aŭ inventaro.

$o – Signaturo (Koha full call number)

Deviga subkampo. Registru ĉi tie la signaturon de la ekzemplero.

$p – Strikodo (Barcode)

Koha disponas modulon pri cirkulado (mastrumado de pruntoj). La sistemo pritaksas ĉi subkampon necesa por bone kontroli la pruntojn. Maksimume 20 karaktroj.

$t – Kopinumero (Copy number)

Aŭ numero de ekzemplero. Por ekzempleroj, kiuj havas la saman surbretan lokon kaj signaturon, ekzemple. Ankaŭ por identigi la diversajn volumojn de la sama ekzemplero se vi kreis apartan rikordon por ĉiu volumo (vidu sube).

$x – Nepublika noto (Non-public note)

Informo pri la ekzemplero utila por la kataloganto aŭ la prizorganto de la biblioteko. Ĝi ne videblas en la retkatalogo, nur videbla de kataloganto.

$y – Speco de ekzemplero en Koha (Koha item type)

La kodigitaj valoroj por ĉiuj tipo de materialoj (libroj, periodaĵoj, partituroj, diskoj, ktp.) devas esti agorditaj en la administra parto. La valoron oni registras en la kampo 942 $c de la bibliografia rikordo kaj ĝi estas aŭtomate inkludita en la subkampo 952$y de la ekzemplera rikordo. Sed ĝi estas mane modifebla se necese.

$z – Publika noto (Public note)

Registru en ĉi kampo tiun informon pri la ekzemplero, kiun vi ne povis registri en la specifaj kampoj kaj kiu povas esti interesa por la uzanto. Ekzemple, ekzempero subskribita de la aŭtoro, sigeloj aŭ ekslibrisoj, kunbindita kun aliaj verkoj, antaŭa signaturo se la volumo okupis antaŭe alian lokon en la bretaro, ktp.

Jen bildo pri la formularo kun la diversaj kampoj kaj, kiel ekzemplo, la respondaj datenoj de iu ekzemplero el Biblioteko Juan Régulo Pérez:

0 - Withdrawn status	
1 - Lost status	
2 - Source of classification or shelving scheme	Universal Decimal Classification
3 - Materials specified (bound volume or other part)	
4 - Damaged status	
5 - Use restrictions	
7 - Not for loan	0
8 - Collection code	Kolekto de HEF
a - Home library	Biblioteko Juan Régulo Pérez
b - Current library	Biblioteko Juan Régulo Pérez
c - Shelving location	
d - Date acquired	05.07.2019
e - Source of acquisition	Donacita de Grupo Esperantista Vigués Paco kaj Amo, 2019
f - Coded location qualifier	
g - Cost, normal purchase price	
h - Serial Enumeration / chronology	
i - Inventory number	
j - Shelving control number	
o - Full call number	6978
p - Barcode	lbx2019hef006978
t - Copy number	1
u - Uniform Resource Identifier	
v - Cost, replacement price	
w - Price effective from	2019-07-05
x - Non-public note	
y - Koha item type	Libro
z - Public note	Kun gluita ekslibriso kaj sigelo de: Círculo Mercantil. Biblioteca

En la subkampoj kun sagetoj, la valoroj estas elekteblaj el disfaldebla menuo.

Jen la sama rikordo en la retkatalogo:

Speco de ekzemplero	Aktuala biblioteko	Kolekto	Signaturo	Numero de kopio	Statuso	Notoj	Redondato	Strikodo
Libro	Biblioteko Juan Régulo Pérez	Kolekto de HEF	6978 (Foliumu breton)	1	Havebla/j	Kun gluita ekslibriso kaj sigelo de: Círculo Mercantil. Biblioteca		lbx2019hef006978

3.3. Specialaj kazoj

3.3.1. Faktaj volumoj

Temas pri tiuj volumoj, kiuj enhavas diversajn presaĵojn kunbinditajn ne de eldonejo sed de la posedanto mem.

Ĉiu el la enhavataj eldonaĵoj postulas apartan bibliografian rikordon. Sed la fakta volumo ricevas nur unu signaturon. Por identigi la diversajn eldonaĵojn ene de tiu artefarita kunbindaĵo, ĝenerale oni aldonas parenteze numeron indikantan la situon de ĉiu verko ene de tiu kunbindaĵo.

Ekzemple, la volumo kun signaturo 2696 estas artefarita kunbindaĵo enhavanta ses presaĵojn. En la rikordo pri la ekzemplero de la eldonaĵo kiu situas en la kvina loko oni aldonas parenteze la numeron 5.

o - Full call number 2696 (5)

Por klarigi la cirkonstancon redaktu publikan noton kun jena aŭ simila frazo: Kunbindita kun aliaj verkoj.

z - Public note Kunbindita kun aliaj verkoj

Se vi disponas plurajn ekzemplerojn de la sama eldonaĵo kaj ne ĉiuj estos fakte kunbindita, tio facile videblos en la respondaj rikordoj.

Speco de ekzemplero	Aktuala biblioteko	Kolekto	Signaturo	Numero de kopio	Statuso	Notoj	Redondato	Strikodo
Libro	Biblioteko Juan Régulo Pérez	Kolekto de HEF	2696 (5) (Foliumu breton)	1	Havebla/j	Kunbindita kun aliaj verkoj | Sigelo: "Esperantista Grupo Sevilja"; Sigelo: "Universala Esperanto-Asocio. Delegito"		lbf5x0000hef002696yy
Libro	Biblioteko Juan Régulo Pérez	Kolekto de HEF	sk-7/23 (Foliumu breton)	2	Havebla/j	Antaŭa signaturo: 2709		lbx0000hefsk7x2709yy

3.3.2. Plurvolumaj eldonaĵoj

Kvankam teorie eblas registri en la sama rikordo la informon pri la diversaj volumoj de plurvoluma eldonaĵo, foje Koha ne sufiĉe flekseblas por kolekti ĉiujn necesajn datenojn de ĉiu volumo.

Tial, povas esti interese, por kelkaj bibliotekoj, krei unu rikordon por ĉiu volumo, indikante en la subkampo $t al kiu ekzemplero aŭ kopio apartenas ĉiu volumo.

Unu rikordo por ĉiuj volumoj de plurvoluma ekzemplero

En la subkampo $3 oni indikas la disponeblajn volumojn. La problemo estas, ke, implicite, ĉi subkampo ne videblas en la retkatalogo. Videbligi ĝin postulas manipuladon de la folioj XSLT, ne facile realigebla por nefakuloj.

En ĉi ekzemplo, temas pri eldonaĵo konsistanta el 3 volumoj. Ĉiu volumo alvenis al la biblioteko laŭ malsama vojo, la unua donacita de John Smith kaj la dua kaj tria donacitaj de Mary Shelley. Tion oni registras en la subkampo $e.

Registru la signaturon en la subkampo $o. Se la signaturo estas sinsekva por la tri volumoj, registru la sinsekvon.

En subkampo $t indiku pri kiu ekzemplero temas.

0 - Withdrawn status	
1 - Lost status	
2 - Source of classification or shelving scheme	Universal Decimal Classification
3 - Materials specified (bound volume or other part)	V. 1-3
4 - Damaged status	
5 - Use restrictions	
7 - Not for loan	0
8 - Collection code	
a - Home library	Biblioteko Juan Régulo Pérez
b - Current library	Biblioteko Juan Régulo Pérez
c - Shelving location	
d - Date acquired	17.05.2024
e - Source of acquisition	Volumo 1 donacita de John Smith, 1998; volumoj 2-3 donacitaj de Mary Shelley
f - Coded location qualifier	
g - Cost, normal purchase price	
h - Serial Enumeration / chronology	
i - Inventory number	
j - Shelving control number	
o - Full call number	4150-4152
p - Barcode	
t - Copy number	1
u - Uniform Resource Identifier	
v - Cost, replacement price	
w - Price effective from	2024-05-17
x - Non-public note	
y - Koha item type	Libro
z - Public note	

Jen kiel videblas la informo en la retkatalogo:

Speco de ekzemplero	Aktuala biblioteko	Signaturo	Numero de kopio	Statuso	Redondato	Strikodo
Libro	Biblioteko Juan Régulo Pérez	4150-4152 (Foliumu breton)	1	Havebla/j		

Unu rikordo por ĉiu volumo de la ekzemplero

Se la signatur-sistemo, kiun vi uzas estas tro kompleksa aŭ vi kutime donas multajn informojn pri la ekzempleroj kaj registri ĉion en la sama rikordo povas igi ĝin konfuza, verŝajne preferindas uzi unu rikordon por ĉiu volumo, kun la kondiĉo ne forgesi **klare registri al kiu ekzemplero respondas ĉiu volumo.**

Jen ekzemplo de duvoluma eldonaĵo, el kiu la biblioteko posedas po du ekzemplerojn, ĉiu el ili apartenanta al malsama kolekto.

En ĉi biblioteko la signatur-sistemo konsistas el sinsekvaj numeroj, kiuj estas asignitaj al la volumoj laŭ ordo de alveno. La du volumoj de la unuaj ekzempleroj alvenis kunaj, tial ili havas sinsekvaj numeroj, sed la du volumoj de la dua ekzempleroj alvenis en malsama momento, sekve do, ili ne situas sinsekve en la bretaro. Por faciligi la identigon de la volumoj oni aldonis parenteze al la signaturo la volumnumeron.

Speco de ekzemplero	Aktuala biblioteko	Kolekto	Signaturo	Numero de kopio	Statuso	Redondato	Strikodo
Libro	Biblioteko Juan Régulo Pérez	Kolekto de HEF	2243 (v. 1) (Foliumu breton)	1	Havebla/j		lbx0000hef2243v1mi
Libro	Biblioteko Juan Régulo Pérez	Kolekto de HEF	2244 (v. 2) (Foliumu breton)	1	Havebla/j		lbx0000hef2244v2mi
Libro	Biblioteko Juan Régulo Pérez	Kolekto de MEL	0570 (v. 1) (Foliumu breton)	2	Havebla/j		lbx0000mel0570v1yy
Libro	Biblioteko Juan Régulo Pérez	Kolekto de MEL	0605 (v. 2) (Foliumu breton)	2	Havebla/j		lbx0000mel0605v2yy

Elektu la sistemon plej konvenan al via biblioteko, sed sekvu ĉiam la saman kriterion.

Apendico: Informfontoj en monografioj

Jen la ĉefaj fontoj de informoj en monografioj:



KOVRILO SPINO TITOLPAĜO DE LA SERIO





ALDONA TITOLPAĜO PAĜO DE KREDITOJ AŬ DORSO DE LA TITOLPAĜO



JOHAN HAMMOND ROSBACH

FAJREJO

Skizoj kaj noveloj

EDIZIONI EVA

ELDONO GABRIELLI

"FAJREJO"
de Johan Hammond Rosbach
estas la 25-a volumo sub la marko

PLEJADO

Presfino: oktobro 2002
en la Presejo Pontone - Cassino (Frosinone - Italujo)
laŭ komisiono de Eldonoj Eva

Finito di stampare nel mese di ottobre 2002
dalla Tipografia Pontone di Cassino (Frosinone)
per conto delle Edizioni Eva

TITOLPAĜO KOLOFONO

La bildoj montriĝas en la sama ordo, kiel ili aperas en la koncerna libro.

Ĝenerale, la ĉefa fonto de informo estas la titolpaĝo.

Rimarku, ke la paĝo de kreditoj ĉi-kaze troviĝas fronte al la titolpaĝo, sed tre ofte ĝi aperas malantaŭ la titolpaĝo, tial ĝi ricevas ankaŭ la nomon "dorso de la titolpaĝo". En kelkaj eldonaĵoj ĝi situas en la fino de la libro.

La aldona titolpaĝo ne troviĝas en ĉiuj eldonaĵo. Ankaŭ ne la kolofono.

Apendico: Risurcoj en nelatinaj skriboj

Katalogado de risurcoj en nelatinaj skriboj povas esti sufiĉe kompleksa por prizorgantoj de Esperanto-bibliotekoj. Malfacilaĵoj venas unuflanke de la eventuala nescio de la koncerna lingvo kaj, aliflanke, de la probabla manko de la necesa klavaro por tajpi la karaktrojn de tiu lingvo.

Per la nunaj teknologioj, la dua malfacilaĵo estas pli malpli solvita. Multaj mastrumsistemoj disponas alternativajn klavarojn kaj ili estas ankaŭ facile troveblaj en la reto.

Ankaŭ disponeblas en la reto transliteriloj kaj tradukiloj, kiuj povas helpi en la solvado de la unua malfacilaĵoj, sed ne ĉiam oni certas pri ilia ĝusta funkciado.

La plej simpla solvo

La plej simpla solvo, se vi troviĝas antaŭ lingvo, kiun vi ne konas aŭ kies skribon vi ne povas reprodukti per via klavaro, estas bazi la katalogadon sur alternativa informfonto malsama de tiu, kiu devintus esti la preferata fonto.

Ekzemple, ni supozu, ke temas pri risurco en la araba kaj vi ne konas tiun lingvon, nek povas tajpi ĝin per la rimedoj, kiujn vi disponas. Sed la datenoj necesaj por katalogado aperas en Esperanto aŭ en alia lingvo transskribebla de vi en alia parto de la risurco. Prenu tiun parton kiel preferatan fonton de informo kaj klarigu per notoj tiun cirkonstancon.

245 10 $aAl vértice de la arena /$aJulia Piera ; traducción, Abdul Hadi Sadoun

500 ## $aTitolo prenita el la kolofono

546 ## $aTitolpaĝo kaj teksto en la araba

Se ne ekzistas tiu alternativa fonto por ĉerpi la bezonatajn datenojn, redaktu titolon, kiu povus reprezenti la enhavon, se tio eblas, kaj skribu ĝin interkrampe.

245 00 $a[Broŝuro en araba lingvo kun adresaro de Esperanto-asocioj]

$a546 ## $aTitolpaĝo kaj teksto en la araba

Transliterita rikordo

Se temas pri lingvo, kiun vi facile povas transliteri, donu la transliteritajn datenojn sekvante la instrukciojn necesajn por tiu risurco.

245 10 $aÈsperanto-russkij slovar' :$bokolo 26000 slov : s priloženiem kratkogo grammatičeskogo očerka èsperanto /$csostavil E. A. Bokarev

264 1# $aMoskva :$bSovetskaâ Ènciklopediâ,$c1974

Por pluraj lingvoj estas diversaj normoj de transliterado. Mi rekomendas uzi ĉiam la respondan ISO-normon. Jen la plej oftaj:

Kirila – ISO 9

Greka- ISO 843

Araba – ISO 233

Ĉina – ISO 7098

Japana – ISO 3602

Korea – ISO 11941

Se vi ne disponas aliron al la normoj, por kelkaj lingvoj eblas uzi ĉi transliterilon: https://www.translitteration.com

Atentu ĉiam uzi la normon ISO kiam disponeblas pli ol unu sistemo.



Rikordoj en pluraj skriboj

MARC 21, apendico D[66], donas du eblecojn por krei rikordojn en pluraj skriboj.

Modelo A

La Modelo A proponas katalogi la risurcon donante la informon transliteritan en latinaj karaktroj kaj en la origina skribo. Tio donas la ŝancon al la uzanto trovi ĝin en la katalogo per du malsamaj klavaroj.

La kataloga laboro estas iom pli kompleksa ĉar oni devas ripeti la saman informon en du malsamaj skriboj. Registru la transliteritajn datenon en la kutimaj kampoj kaj la datenojn en la originala skribo en diversaj kampoj 880 laŭ la subaj instrukcioj.

Priskribaj kampoj

Donu la originalan skribon de la informo, kiun vi registris transliteritan en la sekvaj kampoj:

245 Titolo kaj mencio pri respondeco

246 Titolvarianto

250 Mencio pri eldono

260 Mencio pri publikigado.

[66] https://www.loc.gov/marc/bibliographic/ecbdmulti.html

490 Mencio pri serio

En la ceteraj priskribaj kampoj la originala skribo ne nepras, sed ĝi konsilindas ankaŭ en la kampo 505.

En la kampo 880 oni ripetas la tutan informon aperintan en la responda kutima kampo eĉ se nur parto de ĝi aperas en nelatinaj karaktroj.

Oni konsilas ordigi la kampojn laŭ tipo de skribo, tiel ke ĉiuj informoj en unu skribo aperu kunaj, sed fakte, tio dependas de la mastrumsistemo kaj ne ĉiuj permesas tion.

100 1# $aBokarev, E. A.$eaŭtoro

245 10 $6**880-01**$aÈsperanto-russkij slovar' :$bokolo 26000 slov : s priloženiem kratkogo grammatičeskogo očerka èsperanto /$csostavil E. A. Bokarev

264 1# $6**880-02**$aMoskva :$bSovetskaâ Ènciklopediâ,$c1974

300 ## $a488 paĝoj ;$c18 cm

880 10 $6**245-01/(N**$aЭсперанто-русский словарь :$bоколо 26000 слов : с приложением краткого грамматического очерка эсперанто /$ссоставил Е. А. Бокарев

880 1# $6**264-02/(N**$aМосква :$bСоветская Энциклопедия,$c1974

Konstruo de la alternativa grafika reprezento

En la kampoj kun latinaj karaktroj

La kampoj rilataj al aliaj kampoj 880, komenciĝas per la rilatiga subkampo $6, kiu havas jenan strukturon:

$6 880-apernumero (du ciferoj)

Ekzemple:

245 10 $6880-01$a[latina skribaĵo] /$c[latina scribaĵo]

01 signifas, ke la kampo 245 estas la unua apero de rilatoj starigitaj inter kutimaj kampoj kaj kampoj 880.

En la kampoj kun nelatinaj karaktroj

La kampoj 880 komenciĝas per la rilatiga subkampo $6, kiu havas jenan strukturon:

$6 ligita kampo-apernumero (du ciferoj)/identokodo de la skribaĵo/identokodo de orientigo de la skribaĵo

Identokodoj de la skribaĵo:

Kodo	Skribaĵo
(3	Araba
$1	Ĉina
(N	Cirila
(S	Greka
(2	Hebrea

Ekzemple:

880 10 $6245-01/(N$a[cirila skribaĵo] /$c[cirila skribaĵo]

01 signifas, ke ĉi kampo 880 estas la unua apero de rilatoj starigitaj inter kutimaj kampoj, ĉi-kaze 245, kaj kampoj 880.

La kodo pri orientigo de la skribaĵo oni uzas nur kiam ĝi iras de dekstre maldeskren → /r

Ekzemple:

880 10 $6245-01/(3/r$a[araba skribaĵo] /$c[araba skribaĵo]

Modelo B

Se vi preferas sekvi la modelon B, transskribu la priskribajn elementojn de la bibliografia rikordo en la skribo de la risurco. Registru en Esperanto, ĉar ĝi estas la lingvo de la katalogo, la ceterajn (fizika priskribo, notoj, temoj, ktp.)

880 10 $aЭсперанто-русский словарь :$bоколо 26000 слов : с приложением краткого грамматического очерка эсперанто /$ссоставил Е. А. Бокарев

880 1# $aМосква :$bСоветская Энциклопедия,$c1974

300 ## $a488 paĝoj ;$c18 cm

Alirpunktoj

En ambaŭ kazoj, la akceptita formo estos ĉiam en la latina transliterita formo, ĉar la lingvo de la katalogo, Esperanto, havas latinan alfabeton.

Oni ne kreos por ili respondan 880-kampon. La varianton por la originala skribo oni donos en kampo 4XX de la aŭtoritata rikordo.

Rikordo pri aŭtoritato: formo de la aŭtoritata alirpunkto en latina aŭ transliterita skribo.

La aŭtoritata formo de la persona aŭ korporacia nomo estas ĉiam en la latina skribo. La nelatinan formon de la nomo en alia skribo oni donas en kampo 4XX.

La informon en la kampo 670 oni redaktos ĉi-maniere: registru en $a, la titolon de la verko, tiel kiel ĝi aperas en la kampo 245 de la bibliografia rikordo (transliteritan, se vi elektis la modelon A); en $b unue aperos la nomo en la originala skribo kaj, apartigita per identosigno (=), la transliterita formo de la nomo.

100 1# $aBokarev, E. A.

400 1# $aБокарев, E. A.

670 ## $aÈsperanto-russkij slovar’, 1974$b(E. A. Бокарев = E. A. Bokarev)

Apendico: Terminoj kaj kodoj pri funkcioj

La sekva listo enhavas la terminojn pri funkcioj plej ofte uzeblajn en la alirpunktoj de bibliografiaj rikordoj pri esperantaj eldonaĵoj . Per ili oni starigas la rilaton inter la diversaj intervenaj agantoj kaj la risurco.

La dua kaj tria kolumnoj montras la korespondaĵojn kun la MARC-kodoj kaj MARC-terminoj[67] ekvivalentaj al la esperantaj terminoj. La lasta kolumno klarigas, kiam necese, la uzadon de la termino.

La tabelo estas ampleksigebla laŭbezone.

Funkcio (eo) $e	MARC-kodo $4	MARC-termino (en)	Noto pri uzado
adaptinto	adp	adapter	Uzata kaj por tekstaj kaj por muzikaj verkoj. En ĉi lasta kazo, temas nur pri la kantoteksto. Se la adapto temas pri la muziko, uzu: *aranĝisto*
adresato	rcp	addressee	Persono, familio aŭ korporacio, al kiu estas adresita la korespondaĵo enhavata en la risurco.
aktoro	act	actor	
alia	oth	other	Tre malofte uzenda, nur kiam oni ne trovas taŭgan funkcion en la MARC-listo.
antaŭa aŭtoro	ant	bibliographic antecedent	Persono aŭ korporacio respondeca pri risurco sur kiu baziĝas la nuna katalogata risurco. Tio povas esti taŭga por adaptaĵoj, daŭrigoj, sekvoj, indeksoj, ktp.
aranĝisto	arr	arranger	Por reverkado de muzika verko por malsama medio de interpretado aŭ por modifado de la verko por la sama medio, tiel ke la muzika substanco de la origina komponaĵo restas esence senŝanĝa. Por pli ampleksa modifo, kiu rezultigas la kreadon de nova muzika verko, uzu: *komponisto*.
arkitekto	arc	architect	
artisto	art	artist	Responsulo pri la kreado de verko per la konceptado kaj efektivigo de originala grafika dezajno, desegnaĵo, pentrado ktp. Por ilustrintoj de libroj preferu: *ilustrinto*.
atribuita aŭtoro	dub	dubious author	Uzata por sekundaraj alirpunktoj de anonima verko, kiu estas atribuita al iu aŭtoro en la risurco.

[67] http://www.loc.gov/marc/relators/relaterm.html

Funkcio (eo) $e	MARC-kodo $4	MARC-termino (en)	Noto pri uzado
aŭtoro	aut	author	Persono, familio aŭ korporacio respondeca pri la kreado de teksta verko, sendepende de la tipo de medio en kiu ĝi prezentiĝas (ekz., presita, legitaj, elektronika aŭ pertuŝa teksto) aŭ de la ĝenro. Uzu ĝin ankaŭ por personoj, ktp., kiu kreas novan verkon per reverkado aŭ adaptado de alies verkoj se la modifo konsiderinde ŝanĝis la naturon kaj enhavon de la originalo.
aŭtoro de la aldona komentario	wac	writer of added commentary	Por kontribuanto al la verko per interpreto aŭ kritika klarigo de la originala verko.
aŭtoro de la aldona materialo	wam	writter of accompanying material	Por responsulo de la akompana materialo de aŭdovida aŭ sona registraĵo.
aŭtoro de la aldona teksto	wat	writer of added text	Por la aŭtoro de komplementa teksto de neteksta risurco, ekz., foto-klarigoj, priskriboj de mapoj, ktp.
aŭtoro de la dialogoj	aud	author of dialog	Por respondeculoj pri la dialogo aŭ parola komento en filmo aŭ sonregistraĵo.
aŭtoro de la epilogo	aft	author of afterword, colophon, etc.	
kantoteksta aŭtoro	lyr	lyricist	Por aŭtoro de la kantotekstoj en voĉaj verkoj nescenejaj (ekz. teksto de kanto); por scenejaj verkoj, uzu: *libretisto*.
direktisto	cnd	conductor	Direktistoj de orkestroj, ĥoroj, muzikensembloj, bandoj, ktp.
editoro	edt	editor	Persono, kiu pretigas por publikigo la verkon de alia, ĝenerale mortinta aŭtoro, reviziante aŭ klarigante la enhavon, ekz., aldonante enkondukon, notojn aŭ kritikan tekston.
eldoninto	pbl	publisher	Persono aŭ korporacio respondeca pri la eldonado, de risurco.
fotografisto	pht	photographer	
ilustrinto	ill	illustrator	Kontribuanto, kiu kompletigas la ĉefan enhavon de risurco per desegnaĵoj, diagramoj, fotoj, ktp. Se la enhavo de la verko estas ĉefe arta, uzu la terminojn: *artisto* aŭ *fotografisto*.
instrumentisto	itr	instrumentalist	Ludanto de muzika instrumento.

Funkcio (eo) $e	MARC-kodo $4	MARC-termino (en)	Noto pri uzado
interpretisto	prf	performer	Persono, kiu prezentas muzikon, aktoras, dancas, parolas, ktp, ofte en muzika aŭ drama prezento.
intervjuinto	ivr	interviewer	Intervjuanto, raportisto, balotenketisto aŭ iu alia informkolektanta aganto.
intervjuito	ive	interviewee	Persono, kiu respondas al intervjuanto, kutime raportisto, balotenketisto, aŭ iu alia informkolekta agento.
kantisto	sng	singer	
kartografo	ctg	cartographer	
kompendiinto	abr	abridger	Uzata por la aŭtoro de resumoj, ktp., kiam la ĉefa alirpunkto estas la originala aŭtoro.
kompilinto	edt	editor of compilation	Respondeculo pri la elekto kaj kunmetado de verkoj aŭ partoj de verkoj de unu aŭ pluraj aŭtoroj. Uzu: *aŭtoro*, por la ceteraj publikaĵoj en kiu la vorto “kompilinto” donas ideon pri ĉefa aŭtoreco de la risurco: kompilintoj de bibliografioj, de vortaroj, ktp.
komponisto	cmp	composer	
konceptinto	ccp	conceptor	Persono aŭ korporacio respondeca pri la origina ideo sur kiu baziĝas iu verko.
redaktoro	pbd	publishing director	Kunordiginto, direktoro aŭ komplilintoj de verko kolektiva, kiu certigas ĝian koherecon aŭ kontinuecon. Ĉi tio inkluzivas ĉefredaktorojn, redaktorojn de gazetoj, ktp.
libretisto	lbt	librettist	Por aŭtoro de la teksto en voĉaj verkoj scenejaj; por nescenejaj verkoj, uzu: *kantoteksta aŭtoro*.
muzikisto	mus	musician	Kiam ne eblas precizigi la specon de muzika kontribuo.
omaĝito	hnr	honoree	Persono, familio aŭ organizo omaĝita per verko (festlibroj, ktp.)
organizinto	orm	organizer	
prologinto	aui	author of introduction, etc.	
rakontisto	nrt	narrator	
redaktinto	red	redaktor	Redaktas aŭ ordigas la tekston, sed ne havas intelektan respondecon en la risurco.
reĝisoro	fmd	film director	

Funkcio (eo) $e	MARC-kodo $4	MARC-termino (en)	Noto pri uzado
respondeca korporacio	isb	issuing body	Uzata kiam la korporacio havas respondecon en la risurco sed ĝi ne havas specifan funkcion (organizan, sponsoran, ktp.)
reviziinto	rev	reviewer	
skriptisto	aus	screenwriter	
skulptisto	scl	sculptor	
sponsoro	spn	sponsor	
tradukinto	trl	translator	

Praktikaj ekzemploj

Bibliografiaj rikordoj

Trovu sube praktikajn ekzemplojn de katalogado laŭ RDA. En ili ne aperos la kampoj rilataj al la temindeksado aŭ klasifikado, ĉar tiu taskoj ne estas la objekto de ĉi manlibro.

Per normala graso mi markis la kampojn kernajn, nome, devigajn por krei bibliografiajn rikordojn . Per griza tipografio aperas ankaŭ tiuj konsilindaj.

Se vi redaktas kompletan rikordon, la valoro de la pozicio 000/17 devas esti blanko (#). Se vi redaktas la rikordon je minimuma nivelo, la valoro de tiu pozicio devas esti “7”. Vidu ankaŭ la rubrikon Kompleksaj MARC-kampoj kaj kampoj de numeroj.

La unua kazo, unu el la plej simplaj, kiun povas alfronti kataloganto estas klarigita kun amaso da detaloj; en la sekvaj nur la novaj aspektoj aŭ la pli kompleksaj estas klarigataj.

KAZO 1: Okuloj


OKULOJ

STAFETO
BELETRAJ KAJEROJ
POEMOJ NOVELOJ DRAMOJ ESEOJ
28


OKULOJ
Libro originale verkita en esperanto

Kovrilo de Jan Schaaf Jr.

Imprenta Gutenberg — La Laguna (Tenerife)
Depósito Legal TF 57 1967



MARJORIE BOULTON

OKULOJ

NOVELARO

J. RÉGULO ELDONISTO LA LAGUNA
MCMLXVII



OKULOJ
estas la 57ª volumo sub la marko
STAFETO

...

Eldonaĵombro: 1000 ekz.—Presofino: Sept. 1967

Informfontoj laŭ ordo de apero en la eldonaĵo: titolpaĝo de la serio, paĝo de kreditoj aŭ dorso de la titolpaĝo, kiu ĉi kaze aperas fronte al la titolpaĝo, titolpaĝo kaj kolofono. La kovrilo kaj la spino, ĉi-kaze alportas nenion plian al la registrenda datenaro.

Komentoj

Temas pri eldonaĵo enhavanta nur unu verkon kun nur unu responsa aganto. La preferata fonto de informo estas la titolopaĝo.

Rikordo

000 00569nam#a2200193#i#4500

003 ES-MaBJR

005 20240524193055.0

008 240524s1967####sp#||||#||||#000#j#epo#d

040 ## $aES-MaBJR$bepo$cES-MaBJR$erda

100 1# $aBoulton, Marjorie$eaŭtoro$4aut

240 10 $aOkuloj

245 10 $aOkuloj :$bnovelaro /$cMarjorie Boulton

264 #1 $aLa Laguna :$bJ. Régulo Eldonisto,$cMCMLXVII [1967]

300 ## $a177 paĝoj ;$c19cm

336 ## $aTeksto$2rdacontent

337 ## $asenpera$2rdamedia

338 ## $aVolumo$2rdacarrier

490 0# $aStafeto. Beletraj kajeroj ;$v28

Kampo 000

La valoroj de preskaŭ ĉiuj pozicioj aperas implicite, ni bezonas atenti nur jenajn:

06 Tipo de rikordo: la valoro devas esti “a” ĉar temas pri teksta materialo.

07 Bibliografia nivelo: la valoro debas esti “m” ĉar temas pri monografio.

017 Nivelo de kodigo: la valoro devas esti” #”, ĉar oni katalogas laŭ kompleta nivelo, tio estas, ke oni disvolvos maksimuman nivelon de informo surbaze de la priskribata dokumento.

018 Formo de priskriba katalogado: la valoro devas esti “i”, ĉar ni aldonas la ISBD-interpunkcion.

Kampo 003 - Identigilo de la kontrolnumero

Ĉi tie aperas la MARC-kodo de la biblioteko. Ĝi registriĝas aŭtomate se oni agordis la programon.

Kampo 005 – Dato kaj horo de la lasta modifo de la rikordo

Aŭtomate generita de la sistemo. En la ekzemplo, la lasta modifo okazis la 24an de majo de 2024 je la 19a horo, 30 minutoj kaj 55 sekundoj.

Kampo 008 - Informkodoj de fiksa longeco. Ĝenerala informo

Pozicioj 00-05: dato de eniro en la sistemo. Temas pri la dato de katalogado kaj ĝi estas aŭtomate generita de la sistemo. En la ekzemplo tiu dato estas la 19an de majo de 2024.

Pozicio 06: tipo de dato. La valoro kodigenda estas “s”. Ĝi indikas, ke la kvar ciferoj, kiuj aperas en la sekva pozicio, prenita el 264$c, estas unika kaj certe konata dato.

Pozicioj 07-10: unua dato. La valoro ĉi-kaze estas 1967, kiu estas la eldondato aperanta en 264$c. Oni kodigas ĝin kun arabaj ciferoj, malgraŭ tio, ke en la eldonaĵo la dato aperas en romanaj ciferoj.

Pozicioj 11-14: dua dato. Ĉar temas pri unika eldondato, ĉi pozicioj estas plenigitaj per blankoj (#)

Pozicioj 15-17: loko de eldono aŭ produktado. La valoro estas “sp”, kiu estas la MARC-kodo por la lando Hispanio, loko, kie la eldonisto havas sian sidejon.

Pozicioj 18-21: ilustraĵoj. Kiel eblas konstati en 300$b, ĉi eldonaĵo ne havas ilustraĵojn. En la unua pozicio aperas # (sen ilustraĵoj), la ceteraj prezentas la valoron|.

Pozicioj 22-27: diversaj aspektoj, kiujn ne necesas kodigi kaj kies implicitaj valoroj donitaj de la sistemo (# aŭ |) sufiĉas por niaj bibliotekoj.

Pozicio 28: oficiala eldonaĵo. Ĉar ne temas pri oficiala eldonaĵo, la valoro en ĉi pozicio devas esti #.

Pozicio 29: kongreso. Ne temas pri kongresa eldonaĵo, do la valoro devas esti 0.

Pozicio 30: *omaĝo.* Ne temas pri omaĝa eldonaĵo, do la valoro devas esti 0.

Pozicio 31: indekso. La eldonaĵo ne enhavas indekson, do la valoro devas esti 0.

Pozicio 32: ne difinita. Lasu la implicitan valoron (# aŭ |) donitan de la sistemo

Pozicio 33: literatura formo. Ĉar temas pri kolekto de noveloj, la kodigenda valoro estas j.

Pozicio 34: biografio. La eldonaĵo ne estas biografiaĵo, do la valoro devas esti #.

Pozicioj 35-37: *lingvo.* La lingvo de la eldonaĵo estas Esperanto, do la MARC-kodo responda al ĝi estas epo.

Pozicio 38: modifita rikordo. Lasu la implicitan valoron (# aŭ |) donitan de la sistemo. Ĉi-kaze, #.

Pozicio 39: fonto de la katalogado. Ĉi pozicio informas pri la biblioteko, kiu realigis la katalogadon. En la kazo de esperantaj bibliotekoj, la valoro devas esti ĉiam "d".

Rimarku, ke Koha prezentas la blankojn sen la simbolo #

008 - FIXED-LENGTH DATA ELEMENTS--GENERAL INFORMATION	
fixed length control field	151118s1967 sp |||| |||| 00| j epo d

Kampo 040 – Fonto de la katalogado

Ĉi kampo donas informon pri la centro, kiu kreas la rikordon, kaj eventuale pri tiu, kiu poste modifas ĝin.

En la subkampo $a aperas la MARC-kodo de la biblioteko, kiu kreis la rikordon. En la subkampo $b oni informas pri la lingvo uzata de la biblioteko por la katalogado de la rikordo. En la kazo de la Esperanto-bibliotekoj, kutime tiu lingvo estas Esperanto, do la kodo estu "epo". En la subkampo $c aperu la kodon de la centro, kiu transskribis la rikordon en formaton legeblan per komputilo. Ĉi kaze estas la sama, kiel la centro aperinta en $a. Kaj fine, en la subkampo $e, oni kodigas la katalogan regularon, ĉi-kaze, "rda".

Kampo 100 – Ĉefa alirpunkto. Nomo de persono

Temas pri verko de unika aŭtoro, do la ĉefa alirpunkto de la rikordo devas esti ties nomo, kodigenda en la kampo 100.

Indikiloj:

1a - Ĉar temas pri nomo enhavanta familinomon, ĉi lasta estas la unua elemento registrendan. La valoro de la una indikilo devas esti 1

2a – Ne difinita. Kodigu nenion ĉi tie.

Subkampoj:

La unua subkampo $a enhavas la familinomon sekvatan de la persona nomo de la aŭtorino de la verko: *Boulton, Marjorie*

La subkampo $e starigas la rilaton inter la nomo registrita en 100 kaj la verko pere de termino. En ĉi kazo, la termino uzenda estas *aŭtoro*.

La subkampo $4 starigas la rilaton inter la nomo registrita en 100 kaj la verko pere de kodo. La kodo uzenda ĉi-kaze estas *aut.*

Kampo 240 – preferata titolo por verko kun konata aŭtoro

En ĉi kampo oni registras la preferatan titolon de la verko.

Indikiloj:

1a - La unua indikilo devas esti 1, ĉar ekzistas kampo 100 kiel ĉefa alirpunkto.

2a – La titolo ne komenciĝas per artikolo. La cifero 0 indikas, ke la sistemo devas alfabetigi la titolon komencante per la unua karaktro.

Subkampoj:

En la subkampo $a aperas la preferata titolo de la verko: *Okuloj.*

Rimarku, ke ĉi-kaze, la preferata titolo de la verko estas sama kiel la ĉeftitolo de la eldonaĵo. Laŭ tio indikita en *Ĉeftitolo kiel ĉefa alirpunkto*, en ĉi kazo, eblas ne registri la kampon 240.

Kampo 245 – Mencio pri titolo kaj mencio pri respondeco

En ĉi kampo oni transskribas la ĉeftitolon de la eldonaĵo, aliajn datenojn rilatajn al la ĉeftitolo kaj la mencion pri respondeco. La preferata fonto de informo por transskribi la datenojn estas la titolpaĝo.

Indikiloj:

1a - La unua indikilo devas esti 1, ĉar ekzistas kampo 100 kiel ĉefa alirpunkto.

2a – La titolo ne komenciĝas per artikolo. La cifero 0 indikas, ke la sistemo devas alfabetigi la titolon komencante per la unua karaktro.

Subkampoj:

En la subkampo $a estas registrita la ĉeftitolo: *Okuloj*.

La formato MARC 21 havigas plurajn funkciojn al la subkampo $b, tial la interpunkcio povas varii depende de la enhavo de la subkampo. En ĉi kazo, temas pri titolaldono: *novelaro*, sekve, do, la interpunkcio asociita devas esti dupunkto (:)

En ĉi kazo la mencio pri respondeco konsistas nur el unu aŭtoro. Ĝin oni registras en la subkampo $c, tiel kiel ĝi aperas en la ĉefa informfonto: *Marjorie Boulton*. La interpunkcio asociita al ĉi subkampo estas ĉiam klinita streko (/).

Kampo 264 – Mencio pri publikigo

Ĉar la tri atributoj rilataj al la eldonejo estas konataj, nur tiujn oni transskribas. La informo pri presisto, ĉeesta en la paĝo de kreditoj, ne necesas ĉi-kaze.

Indikiloj:

1a - La valoro estas #, ĉar ne aplikeblas al monografio aliaj valoroj.

2a – La valoro devas esti 1, ĉar oni transskribos la datenojn rilatajn al la eldonisto.

Subkampoj:

En la subkampo $a oni transskribas la lokon de eldono. Sur la titolpaĝo, preferata fonto de informo, oni vidas, ke ĝi estas *La Laguna.* Fine de la subkampo aperas la interpunkcio, kiu enkondukas la sekvan sukampon. En $b oni transskribas la nomon de eldonisto tiel, kiel ĝi aperas en la titolpaĝo: *J. Régulo Eldonisto.* Fine de la subkampo aperas la interpunkcio, kiu enkondukas la sekvan sukampon. En $c oni transskribas la eldondaton tiel, kiel ĝi aperas en la fonto, per romanaj ciferoj *MCMLXVII*. En ĉi kazoj, oni devas aldoni interkrampe la daton per arabaj ciferoj [1967].

Kampo 300 - Fizika priskribo

Ĉar la indikiloj ne estas difinitaj en ĉi kampo, ambaŭ entenas blankon (#)

En la subkampo $a estas registrita la lasta paĝo numerita sekvata de la termino “paĝoj”: 177 paĝoj. La libro ne estas ilustrita, do nenio estas registrita en $b. La alto de la libro estas 18,8 cm. Ĉar estas decimaloj oni altigas la ciferon ĝis 19 kaj tion oni registras en la subkampo $c uzante la metrikan simbolon “cm”.

Kampo 336 – Tipo de enhavo

Temas pri normala teksto, la valoro en la subkampo $a estas do: *Teksto* kaj en $2 *rdacontent.* Se agordita en la sistemo, ĝi registriĝus aŭtomate.

Kampo 337 – Tipo de medio

Ĉar oni bezonas neniun medion (aparaton aŭ perilon) por aliri la tekston, la valoro en $a estas: senpera kaj en $2 *rdamedia.* Se agordita en la sistemo, ĝi registriĝus aŭtomate.

Kampo 338 – Tipo de portilo

La teksto troviĝas en portilo kun formo de volumo. La valoro, do en $a estas: *volumo* kaj en $2 *rdacarrier.* Se agordita en la sistemo, ĝi registriĝas aŭtomate.

Kampo 490 – Mencio pri serio

La titolo de la serio aperas kaj en la titolpaĝo de la serio kaj en la kovrilo. La preferata fonto de informo por la serio estas la titolpaĝo de la serio, do oni prenas ĝin de tie, kie krome aperas ankaŭ la subserio, la titolaldono de la subserio kaj la numerado de la subserio.

Indikiloj:

La valoro de la 1° indikilo estas 0, ĉar oni ne kontrolas la serion (nome, oni ne kreas aŭtoritatan rikordon por kontroli la diversajn formojn, kiujn povas prezenti la seio)

La valoro de la 2a entenas blankon.

Subkampoj

En $a oni transskribas la titolon de la serio: *Stafeto*. Ĉar la numerado respondas al la subserio, ĉi lasta registriĝas en la sama subkampo $a, post punkto: *Beletraj kajeroj*. La titolaldono de la subserio (*poemoj, noveloj, dramoj, eseoj*) ne necesas por identigi ĝin, do oni ne transskribas la titoladonon. La numerado de la subserio, *28*, estas registrita en la subkampo $v, kies interpunkcio estas registrita fine de la antaŭa subkampo.

KAZO 2: Alico en Mirlando







Lewis Carroll
ALICO EN MIRLANDO

La titolo de la originalo:
"Alice in Wonderland"

Serio *Mondliteraturo*; Vol 8

La unua eldono:
Bookleaf Publishing, 1996
La dua eldono
Sezonoj, 1999

Tradukis el la angla lingvo *Donald Broadribb*
Internaj bildoj de *John Tenniel*
La kovrilon pentris *Larisa Jakovleva*
Enpaĝigis *Aleksander Korjenkov*
Korektis *Halina Gorecka*

Carroll, Lewis (ps. de Charles Lutwidge Dodgson)
Alico en Mirlando: Fabelo / Tradukis el la angla Donald Broadribb. — 3a eldono. — Kaliningrado: Sezonoj, 2004. — 80 paĝoj. — (Serio *Mondliteraturo*; Vol 8)

© Traduko en Esperanto Donald Broadribb, 1996.

Informfontoj laŭ ordo de apero en la eldonaĵo: titolpaĝo de la serio, titolpaĝo kaj paĝo de kreditoj aŭ dorso de la titolpaĝo.

Rikordo

000 00569nam#a2200193#i#4500

003 ES-MaBJR

005 20240524193055.0

008 240524s1999####ru#a|||#||||#000#f#epo#d

040 ## $aES-MaBJR$bepo$cES-MaBJR$erda

041 1# $aepo$heng

100 1# $aCarroll, Lewis$eaŭtoro$4aut

240 10 $aAlice's adventures in Wonderland.$lEsperanto

245 10 $aAlico en Mirlando /$cLewis Carroll ; tradukis el la angla lingvo Donald Broadribb ; internaj bildoj de John Tenniel

250 ## $a3a eldono

264 #1 $aKaliningrado :$bSezonoj,$c2004

264 #4 $c©1996

300 ## $a78 paĝoj :$bilustraĵoj (blankanigraj);$c20cm

336 ## $aTeksto$2rdacontent

337 ## $asenpera$2rdamedia

338 ## $avolumo$2rdacarrier

490 0# $aMondliteraturo ;$vvolumo 8

700 1# $aBroadribb, Donald$etradukinto$4trl

700 1# $aTenniel, John$eilustrinto$4ill

Komentoj

Eldonaĵo enhavanta tradukon de nur unu verko, kun pluraj responsaj agantoj. La preferata fonto de informo estas la titolpaĝo.

Kampo 041 – Lingvo

Ĉar temas pri eldono de tradukaĵo, estas du lingvoj implikitaj. En la kampo 008 oni registris la kodon de la lingvo de la risurco: epo (Esperanto). Ĉar ne eblas kodigi la lingvon de la originalo en tiu sama kampo, endas registri tiun informon en la kampo 041.

La valoro de la 1a indikilo estas 1, ĉar la risurco estas traduko. La valoro de la 2a estas blanko, ĉar la kodo apartenas al MARC-kodaro pri lingvoj.

En la subkampo $a oni registras la lingvokodon de la teksto de la risurco, *epo*, kiu devas koincidi kun la valoro registrita en 008. En la subkampo $h, la kodon de la originala lingvo, *eng*.

La informoj pri lingvo(j) ĉe 008, 041 kaj $l de la priverka alirpunkto devas esti kongruaj.

Kampo 100 – Ĉefa alirpunkto. Nomo de persono

Vidu klarigon ĉe la Kazo 1.

Rimarku, krome, ke temas pri pseŭdonimo. Se vi deziras registri tiun cirkonstancon, faru tion en la responda aŭtoritata rikordo.

Kampo 240 – Preferata titolo por verko kun konata aŭtoro

En ĉi kampo oni registras la preferatan titolon de la verko aŭ de la traduko. Ĉi-kaze, nepre oni devas registri ĝin ĉar la preferata titolo de la verko (Alice in Wonderland) ne estas la sama kiel la ĉeftitolo (Alico en Mirlando). Krome, oni devas aldoni la subkampon $l por identigi la tradukon.

Indikiloj:

1a - La unua indikilo devas esti 1, ĉar ekzistas kampo 100 kiel ĉefa alirpunkto.

2a – La titolo ne komenciĝas per artikolo. La cifero 0 indikas, ke la sistemo devas alfabetigi la titolon komencante per la unua karaktro.

Subkampoj:

En la subkampo $a aperas la preferata titolo de la verko: *Alice in Wonderland.* En la subkampo $l aperas la lingvo de la traduko: *Esperanto*

Kampo 245 – Mencio pri titolo kaj mencio pri respondeco

La preferata fonto de informo por transskribi la datenojn rilatajn al la ĉeftitolo kaj la mencio pri respondeco estas la titolpaĝo. Ĉi-kaze, tie aperas la ĉefa mencio pri respondeco, la aŭtoro, kaj unu sekundara mencio, la tradukinto. Krome, en la dorso de la titolpaĝo aperas pliaj mencioj. Ilia transskribado ne estas deviga kaj dependas de la elekto de ĉiu biblioteko. Ĝenerale, oni transskribas nur la respondecon pri arta aŭ intelekta laboro. Oni taksas ke dezajnado de kovrilo, empaĝigo, korektado, ktp estas teknikaj laboroj kaj ilin ne transskribas en la rikordo.

Indikiloj:

1a - La unua indikilo devas esti 1, ĉar ekzistas kampo 100 kiel ĉefa alirpunkto.

2a – La titolo ne komenciĝas per artikolo. La cifero 0 indikas, ke la sistemo devas alfabetigi la titolon komencante per la unua karaktro.

Subkampoj:

En la subkampo $a estas registrita la ĉeftitolo: *Alico en Mirlando*. Ĉi-kaze, ne estas titolaldono, do oni finas la registradon de informon per la interpunkcia signo, kiu enkondukas la mencion pri respondeco (/).

En la subkampo $c oni registras la menciojn pri respondeco. La ĉefa estas tiu pri la aŭtoro, *Lewis Carroll*, la ceterajn, pri tradukinto kaj desegnisto oni registras, disigante ilin per punktokomo (;) kaj la samaj vortoj per kiu la eldonaĵo prezentas ilin: *tradukis el la angla lingvo Donald Broadribb **;** internaj bildoj de John Tenniel.*

Kampo 250 – Mencio pri eldono

Oni registras nur la mencion pri eldono rilatan al la eldonaĵo, kiun oni katalogadas. En la dorso de la titolpaĝo aperas la mencioj de la du antaŭaj eldonoj. Ili ne interesas por priskribi la nunan eldonon. La mencio pri la nuna eldono aperas en la tiel nomata "Katalogado en Publikigo[68] (KIP)", skiza kataloga slipo, kiun foje eldonistoj inkludas en la eldonaĵo. Tie, la mencio aperas jene: *3a eldono,* do tiel oni transskribas ĝin en la rikordo.

Ĝenerale, tiu KIP ne estas konsiderata fidinda fonto, ĉar ofte la katalogado estas farita antaŭ ol la fabrikado de la libro kaj ĝi povas enhavi malĝustaĵojn. Ĉi-foje, la informo ŝajnas kongrua kaj uzebla.

[68] Angle*: Cataloguing in Publication (CIP)*; hispane*: Catalogación en Publicación (CEP)*

Kampo 264 – Mencio pri publikigo

La mencioj pri eldonloko kaj eldondato aperas en la preferata fonto de informo. La mencio pri la eldonejo aperas nur en la KIP.

Indikiloj:

1a - La valoro estas #, ĉar ne aplikeblas al monografio aliaj valoroj.

2a – La valoro devas esti 1, ĉar oni transskribos la datenojn rilatajn al la eldonisto.

Subkampoj:

En la subkampo $a oni transskribas la lokon de eldono. Sur la titolpaĝo, oni vidas, ke ĝi estas *Kaliningrado.* Fine de la subkampo aperas la interpunkcio, kiu enkondukas la sekvan sukampon. En $b oni transskribas la nomon de eldonisto tiel, kiel ĝi aperas en fonto, ĉi-kaze temas pri la KIP: *Sezonoj.* Fine de la subkampo aperas la interpunkcio, kiu enkondukas la sekvan sukampon. En $c oni transskribas la eldondaton, kiu aperas en la titolpaĝo: *2004.*

Kampo 264 – Kopirajto

En la dorso de la titolpaĝo aperas mencio pri la kopirajto de la traduko.

Indikiloj:

1a - La valoro estas #, ĉar ne aplikeblas al monografio aliaj valoroj.

2a – La valoro devas esti 4, ĉar oni transskribos daton pri kopirajto.

Subkampo:

En la subkampo $c aperas registrita la kopirajta dato antaŭata de la signo ©.

Kampo 300 - Fizika priskribo

Ĉi-kaze, rimarku krome, ke la verko estas ilustrita per blankanigraj desegnoj. Tion registru en la subkampo $b: *ilustraĵoj (blankanigraj)*. Ĉiuj subkampoj finiĝas per la enkonduka interpunkcio de la sekva subkampo.

La informo, kiun vi donas en 300$b estu kongrua kun la informo de 008, pozicio 18. Ĉi lasta estu “a” (ilustraĵoj) aŭ | (oni ne intencas kodigi)

Kampo 490 – Mencio pri serio

La serio aperas menciita trifoje en la risurco, laŭ tri malsamaj manieroj:

En la titolo de la serio:

> Serio
>
> MONDLITERATURO
>
> Volumo 8

En la dorso de la titolpaĝo:

> Serio Mondliteraturo; Vol 8

Kaj en la lasta nenumerita paĝo:

Libroserio “Mondliteraturo”

La preferata informfonto por la serio estas la titolpaĝo de la serio, se ĝi ekzistas. Do la informo estas prenita de tie, kaj kun la formo laŭ kiu ĝi aperas tie. Rimarku, ke la vorto “serio” en tiu fonto havas nur enkondukan karakteron ĉar ĝi troviĝas en malsama alineo kaj havas malsaman litertipon. Tio signifas, ke “serio” ne estas parto de la preferata titolo de la serio: *Mondliteraturo,* tial oni ne transskribas ĝin en $a. La numerado aperas kun la enkonduka vorto *volumo.* Tion oni respektas en $v.

Indikiloj:

La valoro de la 1a estas 0, ĉar oni ne kontrolas la serion (nome, oni ne kreas aŭtoritatan rikordon por kontroli la diversajn formojn, kiujn povas prezenti la serio)

La valoro de la 2a entenas blankon.

Kampoj 700 – Sekundaraj alirpunktoj. Nomoj de personoj

En la mencio pri respondeco de la kampo 245, oni transskribis, krom la ĉefan mencion pri aŭtoreco, du pliajn menciojn de agantoj en rilato al la risurco. Por ili oni kreis sekundarajn alirpunktojn kaj aldonis informon pri la tipo de rilato, kiun ili havas kun la risurco.

La kampoj 700 funkcias kiel la kampo 100. Do, la indikiloj kaj subkampoj similas al tio jam registrita tie.

Kvankam en Esperanto-bibliotekoj konsilindas krei sekundarajn alirpunktojn por esperantaj agantoj, laŭ RDA nur estas kerna la ĉefa alirpunkto, tial ĝi aperas grize.

KAZO 3: Du junaj fraŭlinoj


HISPANA ESPERANTO-BIBLIOTEKO
HISTORIO - ARTO - LITERATURO - TRADICIO - BELAJ NATURAĴOJ K. C.

DU JUNAJ FRAŬLINOJ
KAJ
KORNELIINO
DU NOVELOJ EL LA BONEKZEMPLAJ DE
MIĤAELO DE CERVANTES
(TUTMONDFAMA AŬTORO DE «KIĤOTO»)
TRADUKITAJ DE
JULIO MANGADA ROSENÖRN

PREZO: 1'75 Fr. sv.
(TRI RESPONDKUPONOJ)

ADRESO:
GLORIETA DE BILBAO, 5. – MADRID
HISPANUJO


PREMIJO TORRENT KAJ KONP.
Válgame Dios, 6
MADRIDO-HISPANUJO
1937

Informfontoj laŭ ordo de apero en la eldonaĵo: titolpaĝo kaj paĝo 4 de la kovrilo aŭ dorso de la kovrilo.

Rikordo

000 00569nam#a2200193#i#4500

003 ES-MaBJR

005 20240524193055.0

008 240524s1927####sp#||||#||||#000#d#epo#d

040 ## $aES-MaBJR$bepo$cES-MaBJR$erda

041 1# $aepo$hspa

100 1# $aCervantes Saavedra, Miguel de$eaŭtoro$4aut

240 10 $aNovelas ejemplares.$kElektaĵo.$lEsperanto

245 10 $aDu junaj fraŭlinoj ;$bkaj Korneliino : du noveloj el la bonekzemplaj /$cde Miĥaelo de Cervantes (tutmondfama aŭtoro de “Kiĥoto”) ; tradukitaj de Julio Mangada Rosenörn

264 #1 $a[Loko de publikigo ne identigita] :$b[eldoninto ne identigita],$c[1927]

264 #3 $aMadrido-Hispanujo :$bPresejo Torrent kaj Kompio.,$c1927

300 ## $a70 paĝoj ;$c20cm

336 ## $aTeksto$2rdacontent

337 ## $asenpera$2rdamedia

338 ## $avolumo$2rdacarrier

490 0# $aHispana Esperanto-biblioteko

700 12 $aCervantes Saavedra, Miguel de.$tLas dos doncellas.$lEsperanto

700 12 $aCervantes Saavedra, Miguel de.$tLa señora Cornelia.$lEsperanto

700 1# $aMangada Rosenörn, Julio$etradukinto$4trl

856 41 $uhttp://hdl.handle.net/11013/4434$yDisponebla en Bitoteko

Komentoj

Ĉi-kaze la risurco estas kompilaĵo de verkoj de unu aŭtoro. Ĝi enhavas du verkojn de la sama aŭtoro. La kompilaĵo ne havas kolektivan titolon, do, la titolo de la unue menciata verko en la titolpaĝo rolas kiel ĉeftitolo de la risurco. La preferata fonto de informo estas la titolpaĝo.

Kampo 100 – Ĉefa alirpunkto. Nomo de persono

Rimarku, ke en la fonto aperas nomoformo malsama de tiu preferata por ĉi aŭtoro en la responda nacia biblioteko kaj en VIAF. Se vi deziras registri tiun formon kiel varianton, faru tion en la responda aŭtoritata rikordo.

Kampo 240 – Preferata titolo por verko

Se la kompilaĵo ne ricevis nomon de la aŭtoro mem, sed ĝi estas konata laŭ difinita titolo en la referencfontoj, tiu titolo rolas kiel preferata titolo de la kompilaĵo. Ĉ-kaze temas pri *Novelas ejemplares*. Tamen, ni ne havas tiun kompilaĵon kompleta, nur parton de ĝi. Tion oni devas kodigi en la subkampon $k *(Elektaĵo)*. Fine, oni devas aldoni la subkampon $l por identigi la tradukon.

Indikiloj:

1a - La unua indikilo devas esti 1, ĉar ekzistas kampo 100 kiel ĉefa alirpunkto.

2a – La titolo ne komenciĝas per artikolo. La cifero 0 indikas, ke la sistemo devas alfabetigi la titolon komencante per la unua karaktro.

Subkampoj:

En la subkampo $a aperas la preferata titolo de la kompilaĵo: *Novelas ejemplares.* En la subkampo $k la indiko, ke temas nur pri kelkaj: *Elektaĵo* kaj en $l aperas la lingvo de la traduko: *Esperanto*

Kampo 245 – Mencio pri titolo kaj mencio pri respondeco

La preferata fonto de informo por ĉi kampo estas la titolpaĝo. Aperas menciataj la titoloj de la du verkoj enhavataj kaj la mencioj pri aŭtoreco kaj traduko.

Indikiloj:

1a - La unua indikilo devas esti 1, ĉar ekzistas kampo 100 kiel ĉefa alirpunkto.

2a – La titolo ne komenciĝas per artikolo. La cifero 0 indikas, ke la sistemo devas alfabetigi la titolon komencante per la unua karaktro.

Subkampoj:

En la subkampo $a estas transskribita la titolo de la unua menciita verko kiel ĉeftitolo de la risurco: *Du junaj fraŭlinoj*. La titolon de la dua verko oni transskribas en la $b inkludante la konjukcion kiu ligas gramatike ambaŭ frazojn. La interpunkcia signo indikanta ke tio registrita en $b estas plia verko de la sama aŭtoro, estas punktokomo kaj oni kodigas ĝin fine de la antaŭa subkampo. Same, fine de la subkampo $b oni registras la interpunkcian signon, kiu enkondukas la mencion pri respondeco (/).

La ĉefa mencio pri respondeco, tiu pri la aŭtoro, estas registrita tiel, kiel ĝi aperas sur la fonto: *de Miĥaelo de Cervantes (tutmondfama aŭtoro de "Kiĥoto").* Rimarku, ke oni transskribas ankaŭ la frazon akompanantan la nomon kiel parto de la mencio. La alian mencion, pri la tradukinto, oni transskribas tuj sekve kun disiga punktokomo (;): *tradukitaj de Julio Mangada Rosenörn*

Kampo 264 – Mencio pri publikigo

En la loko, kie kutime aperas la mencio pri publikigo aperas iu adreso (verŝajne de vendado aŭ distribuado), kiun oni preteratentu. Ne aperas eldonloko, eldonisto aŭ eldondato tie. Sur la dorso de la titolpaĝo aperas kompleta informo pri la fabrikado. Tio signifas, ke ĉar la ne estas eldondatenoj oni devas redakti du malsamajn kampojn 264 por doni la presdatenojn.

Unua kampo 264 (eldondatenoj)

Indikiloj:

1a - La valoro estas #, ĉar ne aplikeblas al monografio aliaj valoroj.

2a – La valoro devas esti 1, ĉar oni transskribos la datenojn rilatajn al la eldonisto.

Subkampoj:

En la subkampo $a oni transskribas la lokon de eldono, sed ĝi ne aperas en la risurco, tial oni registras interkrampe: *Loko de publikigo ne identigita*. Ĉar ne aperas la nomo de la eldoninto en la risurco, oni registras interkrampe en $b la esprimon *eldoninto ne identigita*. Ankaŭ ne aperas eksplicita mencio pri eldondato, sed ja aperas la dato de presado en la dorso de la kovrilo. Ne eblas senplie konsideri, ke ĝi estas la eldondato sed ja eblas dedukti, ke ambaŭ verŝajne koincidas, tial oni registras interkrampe tiun daton kiel probabla dato de eldono.

Dua kampo 264 (presdatenoj)

Ĉar la datenoj pri la eldoninto estas tre nekompletaj, endas registri ankaŭ la datenojn pri la presisto por bone identigi la eldonon.

Indikiloj:

1a - La valoro estas #, ĉar ne aplikeblas al monografio aliaj valoroj.

2a – La valoro devas esti 3, ĉar oni transskribos la datenojn rilatajn al la presisto.

Subkampoj:

La loko kie troviĝas la presejo estas *Madrido-Hispanujo.* Rimarku, ke oni aldonas la landon se ĝi aperas en la fonto apud la presloko. La nomo de la presejo estas *Presejo Torrent kaj Komp*^{io}. Oni respektas la mallongigon, ĉar ĝi aperas en la fonto. Ĉar Koha ne permesas superskribojn, ĝi estas registrita jene: *Kompio*. Ĉar la presdato estas eksplicite menciata, oni rekte transskribas ĝin en $c.

Kiel ĉiam, la interpunkcion de ĉiu subkampo oni registras en la antaŭa subkampo.

Kampo 490 – Mencio pri serio

Ĉar ne estas titolpaĝo de la serio, la titolpago iĝas la preferata informfonto por ĝi. La subserio: *Historio, arto, literaturo, tradicio, belaj naturaĵoj, k. c.,* ne necesas por bone identigi la serion, do, oni preterlasas ĝin. La serio ne havas numeradon.

Indikiloj:

La valoro de la 1a estas 0, ĉar oni ne kontrolas la serion.

La valoro de la 2a entenas blankon.

Subkampoj:

Nur bezonatas la subkampo $a por transskribi la titolon de la serio: *Hispana Esperanto-biblioteko*

Kampoj 700 – Sekundaraj alirpunktoj. Nomoj de personoj

La kampoj 7XX havas du rolojn depende de la dua indikilo. Se la dua indikilo havas la valoron blanko (#) temas pri sekundara alirpunkto por plia persono, kiu havas iun rolon rilate la risurcon. En ĉi kazo, la tradukinto kaj ĝi funkcias same kiel en la kazo 2.

Se la dua indikilo havas la valoron 2, nepre estos ankaŭ subkampo $t. Tio signifas, ke temas ne pri plia rilata aganto, sed pri verko enhavata en la risurco. Ĉi kompilaĵo enhavas du verkojn de Cervantes, kies respektivaj preferataj titoloj estas *Las dos doncellas* kaj *La señora Cornelia.* Tiuj titoloj

aperas kodigitaj en la $t de la respondaj alirpunktoj. Sed, ĉar temas ne pri la originala esprimo, sed pri traduko, en $l oni registras la lingvon de la traduko: *Esperanto.*

Kampo 856 - Elektronikaj lokalizo kaj aliro

Ĉar tiu risurco estas bitigita kaj disponebla en la reto, eblas informi pri tiu cirkonstanco kaj doni la retadreson pr faciligi la aliron.

Indikiloj:

La valoro de la 1a estas 4, ĉar la aliro al la elektronika risurco oni faras pere de Hiperteksto-Transiga Protokolo[69] (HTTP).

La valoro de la 2a estas 1, ĉar temas pri versio de la risurco.

Subkampoj:

En la subkampo $u oni registras la retadreson, kie eblas trovi la risurcon, kaj en la subkampo $y, la tekston, kiun oni vidas anstataŭ la adreson registritan en $u

KAZO 4: Vulkanismo kaj la vulkana regiono de Olot

Informfontoj laŭ ordo de apero en la eldonaĵo: titolpaĝo kaj paĝo 4 de la kovrilo aŭ dorso de la kovrilo.

Rikordo

000 00569nam#a2200193#i#4500

003 ES-MaBJR

[69] Angle: *Hypertext Transfer Protocol*

005 20240524193055.0

008 240524s1913####sp#||||#||||#000#d#epo#d

040 ## $aES-MaBJR$bepo$cES-MaBJR$erda

100 1# $aRosals, Johano$eaŭtoro$4aut

240 10 $aVulkanismo kaj la vulkana regiono de Olot (Katalunlando)

245 10 $aVulkanismo kaj la vulkana regiono de Olot (Katalunlando) :$bparolado farita dum IV Kongreso de K.E.F. okazinta en Olot 1913a /$aJohano Rosals

264 #1 $a[Loko de publikigo ne identigita] :$b[eldoninto ne identigita],$c[1913?]

264 #3 $aVilasar de Mar :$bElektra-Presejo,$c[1913?]

300 ## $a13 paĝoj ;$c20cm

336 ## $aTeksto$2rdacontent

337 ## $asenpera$2rdamedia

338 ## $avolumo$2rdacarrier

711 2# $aKataluna Kongreso de Esperanto$n(4a.$d1913.$cOlot)$erespondeca korporacio$4isb

856 41 $u http://hdl.handle.net/11013/162$yDisponebla en Bitoteko

Komentoj

La risurco enhavas originalan verkon en Esperanto. Temas pri dumkongresa parolado. La preferata fonto de informo estas la titolpaĝo.

Kampo 245 – Mencio pri titolo kaj mencio pri respondeco

En la titolpaĝo aperas la titolo de la parolado, kun subtitola klarigo pri la prezentado dum iu kongreso kaj la bezonataj datenoj por identigi ĝin.

Indikiloj:

1a - La unua indikilo devas esti 1, ĉar ekzistas kampo 100 kiel ĉefa alirpunkto.

2a – La titolo ne komenciĝas per artikolo. La cifero 0 indikas, ke la sistemo devas alfabetigi la titolon komencante per la unua karaktro.

Subkampoj:

En la subkampo $a estas transskribita la ĉeftitolo de la risurco: *Vulkanismo kaj la vulkana regiono de Olot (Katalunlando)*. La klariga titolaldono, en $b: *parolado farita dum IV Kongreso de K.E.F. okazinta en Olot 1913a.* La ĉefa mencio pri respondeco: *Johano Rosals*, en $c.

Kampo 264 – Mencio pri publikigo

Aperas neniu mencio pri publikigo (loko, eldoninto aŭ dato) en la loko de la titolpaĝo, kie kutime aperas tiu mencio. Sur la dorso de la titolpaĝo aperas informo pri la fabrikado, sed sen dato. Eblas

supozi, ke la parolado eldoniĝis en proksima dato ĉirkaŭ la celebrado de la kongreso. Tiu verŝajna dato aperas interkrampe kaj kun demando signo. Ĉar la eldoninto ne estas identigita, oni devas plenigi plian kampon 264 por registri la datenojn rilatajn al la presisto.

Unua kampo 264

Indikiloj:

1a - La valoro estas #, ĉar ne aplikeblas al monografio aliaj valoroj.

2a – La valoro devas esti 1, ĉar oni transskribos la datenojn rilatajn al la eldonisto.

Subkampoj:

Ĉar ambaŭ, eldonloko kaj eldoninto ne aperas en la risurco, en ambaŭ rilataj subkampoj oni diras, ke ili ne estas identigitaj. La eldondato, verŝajna, aperas interkrampe kaj kun demandosigno.

Dua kampo 264

Indikiloj:

1a - La valoro estas #, ĉar ne aplikeblas al monografio aliaj valoroj.

2a – La valoro devas esti 3, ĉar oni transskribos la datenojn rilatajn al la presisto.

Subkampoj:

La loko kie troviĝas la presejo estas *Vilasar de Mar;* la nomo de la presejo estas *Elektra-Presejo*. Ĉar la presdato ne estas eksplicite menciata, oni registras ĝin interkrampe kaj kun demandosigno en $c.

Kampoj 711 – Sekundara alirpunkto. Nomo de kongreso

Kvankam temas pri eldonaĵo rilata al iu kongreso, ne eblas krei ĉefan alirpunkton por la kongreso, kiel oni farus en la kazo de kompilaĵoj de la tuta prelegaro, ĉar la risurco enhavas nur unu paroladon de iu konkreta aŭtoro, kiu havas plenan respondecon pri ĝi.

Tamen, ja indas krei sekundaran alirpunkton por la kongreso, ĉar kadre de ĝi prezentiĝis la parolado.

En la titolpaĝo oni mencias la kongreson jene*: IV Kongreso de K.E.F.* Tio pensigas, ke temas pri unu el tiuj kongresoj, kiuj havas la nomon de respondeca la korporacio en la nomo de la kongreso: *Kataluna Esperantista Federacio. Kongreso.* Sed konsultinte la datenbanko de aŭtoritatoj, ni vidas, ke tiu formo aperas kiel varianto de la akceptata formo: *Kataluna Kongreso de Esperanto*.



Tiu lasta, do, estas la formo uzenda. Rimarku la uzon de la responda interpunkcio en la implikitaj kampoj.

KAZO 5: La divina commedia

DANTE ALIGHIERI

LA DIVINA COMMEDIA

LA DIA KOMEDIO

VERSIONE CON TESTO A FRONTE E COMMENTO IN ESPERANTO DI
ESPERANTO-TRADUKO FRONTA AL LA TEKSTO KAJ KOMENTARIO DE
GIOVANNI PETERLONGO

ILLUSTRAĴOJ POR « LA DIVINA COMMEDIA » DE
SANDRO BOTTICELLI
SANDRO BOTTICELLI

EDIZIONI SIEI MILANO



© 1979 S.I.E.I. MILANO

Informfontoj laŭ ordo de apero en la eldonaĵo: titolpaĝo kaj paĝo de kreditoj aŭ dorso de la titolpaĝo. La kovrilo alportas nenion plian al la registrenda datenaro.

Rikordo

000 00569nam#a2200193#i#4500

003 ES-MaBJR

005 20240524193055.0

008 240524s1979####it#a|||#||||#000#p#ita#d

040 ## $aES-MaBJR$bepo$cES-MaBJR$erda

041 1# $aita$aepo$hita

100 0# $aDante Alighieri$eaŭtoro$4aut

240 13 $aLa divina commedia

245 13 $aLa divina commedia /$cDante Alighieri ; versione con testo a fronte e commento in esperanto di Giovanni Peterlongo ; illustrazioni per “La divina commedia” di Sandro Botticelli = La dia komedio / Dante Alighieri ; Esperanto-traduko fronte al la teksto kaj komentario de Giovanni Peterlongo ; ilustraĵoj por “La dia komedio” de Sandro Botticelli

246 31 $aLa dia komedio

250 ## $aSeconda edizione speciale =$bDua speciala eldono

264 #1 $aMilano :$bEdizioni SIEI,$c[1979]

264 #4 $c©1963

300 ## $aLV, 709 paĝoj :$bilustraĵoj (blankanigraj);$c29 cm+$e 1 broŝuro (8 nenumeritaj paĝoj)

336 ## $aTeksto$2rdacontent

337 ## $asenpera$2rdamedia

338 ## $avolumo$2rdacarrier

490 0# $aSerie Oriente-Okcidente =$aSerio Oriento-Okcidento

500 ## $aTitolo de la aldona materialo: Lokoj kaj tempoj de la poemo / Clelia Conterno Guglielminetti

500 ## $aGardita en ujo

546 ## $aTeksto en la itala, traduko en Esperanto

700 02 $aDante Alighieri.$tLa divina commedia.$lEsperanto

700 12 $aConterno Guglielminetti, Clelia.$tLokoj kaj tempoj de la poemo

700 1# $aPeterlongo, Giovanni$etradukinto$4trl

700 1# $aBotticelli, Sandro$eilustrinto$4ill

Komentoj

Eldonaĵo enhavanta tradukon de nur unu verko, kun pluraj responsaj agantoj. La preferata fonto de informo estas la titolpaĝo.

Kampo 041 – Lingvo

La risurco enhavas verkon en sia originala versio en la itala kaj tradukon de la sama verko en Esperanto. Ĉar la tuta teksto estas en paralelo en ambaŭ lingvoj, kun la sama graveco kaj nenu el ili elstaras super la alia, en 008 oni kodigas la lingvon de la originala versio, ĉar ĝi aperas unue: *ita*.

En 041 oni devas kompletigi la informon pri la lingvoj rilataj al la risurco.

La valoro de la 1a indikilo estas 1, ĉar la risurco estas traduko. La valoro de la 2a estas blanko, ĉar la kodo apartenas al MARC-kodaro pri lingvoj.

En la subkampo $a oni registras la lingvokodon de la teksto de la risurco, sed ĉar la teksto estas en du lingvoj, oni devas ripeti la subkampon $a por kodigi la duan lingvon: *epo*,. La kodo de la unua subkampo $a devas koincidi kun la kodo registrita en 008. En la sukampo $h, registru la kodon de la originala lingvo, *ita*.

En ĉi kazo, indas klarigi la informon kodigitan en 041 per noto 546.

Kampo 100 – Ĉefa alirpunkto. Nomo de persono

Rimarku, ke la akceptita nomo estas en rekta formo kaj, sekve, la valoro de la 1a indikilo estas 0.

Kampo 240 – Preferata titolo por verko kun konata aŭtoro

Ĉar la risurco enhavas kaj la verkon en sia originala lingvo kaj tradukon, en ĉi kampo oni registras la preferatan titolon de la verko. Ĉi-kaze, kvankam, la preferata titolo de la verko koincidas kun la ĉeftitolo, oni registras la titolon de la verko kiel ĉefan alirpunkton la kampon 240, sekvante la instrukcion por Verkoj kaj tradukoj publikigitaj kune.

Indikiloj:

1a - La unua indikilo devas esti 1, ĉar ekzistas kampo 100 kiel ĉefa alirpunkto.

2a – La titolo komenciĝas per artikolo. La cifero 3 indikas, ke la sistemo devas alfabetigi la titolon komencante per la tria karaktro.

Subkampoj:

En la subkampo $a aperas la preferata titolo de la verko: *La dia commedio.*

Kampo 245 – Mencio pri titolo kaj mencio pri respondeco

Ĉi kampo prezentiĝas tre kompleksa kaj ni devas atenti plurajn instrukciojn. Ni vidas, ke la titolpaĝo, preferata fonto de informo, prezentas la informon paralele en la du lingvoj, do, oni devas transskribi la informon laŭ lingvaj blokoj. Sed la nomoj de la agantoj aperas nur unu fojon, tamen, kun la intenco esti legitaj dufoje, do, oni ripetas ilin en ĉiu bloko.

La informon oni transskribas laŭ la ordo de apero, unue en la originala lingvo kaj poste en Esperanto.

Indikiloj:

1a - La unua indikilo devas esti 1, ĉar ekzistas kampo 100 kiel ĉefa alirpunkto.

2a – La titolo komenciĝas per artikolo. La cifero 3 indikas, ke la sistemo devas alfabetigi la titolon komencante per la tria karaktro.

Subkampoj:

En la subkampo $a estas registrita la ĉeftitolo: *La dia commedio*. Tuj sekve aperas la mencio pri respondeco trankskribita rilata al la ĉeftitolo en $c.

Ĉar la formato ne permesas aldoni pliajn subkampojn post $c, ĉio cetera rilata al la paralela informo devas aperi en la sama subkampo $c.

Kampo 246 – Titolvarianto

Por faciligi la rekuperadon, la paralelan titolon oni registras en kampo 246.

Indikiloj:

1a - La unua indikilo devas esti 3, ĉar ne temas pri noto, sed pri aldona alirpunkto.

2a – La dua devas esti 1, ĉar temas pri paralela titolo

Subkampo:

La informon oni registras en subkampo $a.

Kampo 250 – Mencio pri eldono

La mencio pri eldono aperas paralele en la preferata fonto de informo. La unuan mencion oni kodigas en $a, la paralelan en $b.

Estas alia mencio pri eldono en la dorso de la titolpaĝo, sed ĝi ne temas pri plia mencio sed pli varianta formo de la jam registrita kja alportas nenion al la informo, do, oni preterlasas ĝin.

Kampo 264 – Mencio pri publikigo

La mencioj pri loko de publikigo kaj eldonejo aperas en la preferata fonto de informo. La mencio pri eldondato aperas en la dorso de la titolpaĝo, ligita al plia mencio pri eldono.

Indikiloj:

1a - La valoro estas #, ĉar ne aplikeblas al monografio aliaj valoroj.

2a – La valoro devas esti 1, ĉar oni transskribos la datenojn rilatajn al la eldonisto.

Subkampoj:

En la subkampo $a oni transskribas la lokon de eldono: *Milano*. En $b oni transskribas la nomon de la eldonisto kompleta: Edizioni SIEI. En $c oni transskribas la daton de publikigo, sed ĉar ĝi ne aperas eksplicite menciita kiel dato de publikigo nek ligita al tiu mencio, oni registras ĝin interkrampe.

Kampo 300 - Fizika priskribo

En la risurco aperas du sekvencoj de paĝnumerado, unu per romanaj ciferoj kaj la alia per arabaj. Oni registras ilin sinsekve en $a

La verko estas ilustrita per blankanigraj desegnoj. Tio estas registrita en la subkampo $b: *ilustraĵoj (blankanigraj)*.

Cetere, la risurco havas akompanan materialon. Tio estas registritra en $e, informante, plie, pri la nombro de paĝoj ĉar temas pri brosuro.

Kampo 490 – Mencio pri serio

La mencio pri la serio aperas en la titolpaĝo (ne estas titolpaĝo pri la serio), kaj tie, ĝi aperas en paralelaj lingvoj.

La vorto “Serio” aperas en la sama alineo kiel la titolo kaj kun la sama tipografio, oni , do, konjektas ke tiu vorto estas parto de la titolo.

Indikiloj:

La valoro de la 1a estas 0, ĉar oni ne kontrolas la serion (nome, oni ne kreas aŭtoritatan rikordon por kontroli la diversajn formojn, kiujn povas prezenti la serio)

La valoro de la 2a entenas blankon.

Subkampoj:

La titolo en la originala lingvo estas transskribita en $a. Por transskribi la paralelan bezonatas plia kampo $a.

Kampoj 500 – Ĝeneralaj notoj

La aldona materialo enhavas tekston kun propraj titolo kaj aŭtoro, kiuj povas esti interesaj por la uzanto. Ĝin oni registras en kampo 500, kun la sama interpunkcio, kiun ĝi havus en 245, se oni katalogus ĝin aparte.

Eblas redakti plian noton por indiki, ke la volumo estas gardita en ujo. Tiel oni pli fidele priskribas la fizikajn trajtojn de la risurco.

Kampoj 546– Noto pri lingvoj

Ĉar la informo registrita en 041 estas jam sufiĉe kompleksa, estas oportune klarigi ĝin per noto 546.

Kampoj 700 – Sekundaraj alirpunktoj. Nomoj de personoj

La risurco enhavas krom la originalan verkon, ankaŭ tradukon de ĝi. Ĉar temas pri io enhavata, la alirpunkto la valoro de la dua indikilo devas esti 2. Same, se oni deziras fari alirpunkton por la verketo enhavata en la akompana materialo.

En la alirpunktoj de agantoj rilataj al la risurcoj, la 2a indikilo havas la valoron blanko (#).

KAZO 6: El la Biblio



ESPERANTA
BIBLIOTEKO INTERNACIA

Tradukis
L. L. Zamenhof.

No. 6.
Prezo 0,10 Sm.

El la Biblio

Elektitaj ĉapitroj de la
Psalmaro, Sentencoj de Salomono kaj Predikanto
tradukitaj el la originalo de
Dro L. L. Zamenhof.

BERLIN.
Esperanto Verlag Möller & Borel
kaj korespondantoj en
Paris, London, Chicago, Kjöbenhavn, Warszawa, Barcelona,
Budapest, Moskvo, Genova, Hago, Ĝenevo.

Informfonto: La sola fonto de informo estas la titolpaĝo.

Rikordo

000 00569nam#a2200193#i#4500

003 ES-MaBJR

005 20240524193055.0

008 240524s1909####gw##|||#||||#000#p#epo#d

040 ## $aES-MaBJR$bepo$cES-MaBJR$erda

041 1# epohund

130 0# $aBiblio.$kElektaĵo.$lEsperanto

245 10 $aEl la Biblio :$belektitaj ĉapitroj de la Psalmaro, Sentencoj de Salomono kaj Predikanto /$ctradukitaj el la originalo de Dro L. L. Zamenhof

264 #1 $aBerlin :$bEsperanto-Verlag Möller & Borel,$c[1909?]

300 ## $a43 paĝoj ;$c15 cm

336 ## $aTeksto$2rdacontent

337 ## $asenpera$2rdamedia

338 ## $avolumo$2rdacarrier

490 0# $aEsperanta biblioteko internacia ;$vNo. 6

700 1# $aZamenhof, L. L.$etradukinto$4trl

Komentoj

La risurco enhavas elektaĵon de diversaj ĉapitroj el la Biblio.

Kampo 041 – Lingvo

Rimarku, ke la lingvo de la originala versio estas nedeterminita.

Kampo 130 – Unuforma titolo

La ĉefa alirpunkto estas la preferata titolo de la enhavata verko. Ĉar ĝi ne estas kompleta, sed temas nur pri diversaj ĉapitroj elektitaj, tion oni devas kodigi en $k. Fine, oni aldonas la lingvon de la traduko en $l.

Kampo 245 – Mencio pri titolo kaj mencio pri respondeco

En la preferata fonto de informo aperas la mencio pri tradukado dufoje. Laŭ la prezento ŝajnas, ke tiu aperanta sub la serio rilatas al la serio mem, sed ĝi ne necesa por identigi la serion. Oni transskribas nur la mencion pri respondeco ligitan al la mencio pri titolo.

Kampo 264 – Mencio pri publikigo

En la risurco ne aperas dato de publikigo. Ankaŭ ne alia dato (presado, kopirajto…) el kiu eblas konjekti ĝin. Esplorante en diversaj fontoj, ŝajnas verŝajna dato 1909. Oni registras ĝin interkrampe kaj kun demandosigno.

KAZO 7: La aventuroj de Huckleberry Finn



MARK TWAIN:

LA AVENTUROJ DE HUCKLEBERRY FINN

La bildrakonton verkis Tibor Cs. Horváth, desegnis Attila Dargay, esperanta teksto Tibor Vaskó



PRI MARK TWAIN, LIA VERKO KAJ TIU ĈI ADAPTAĴO

Mark Twain (lia vera nomo estis Samuel Langhorne Clemens) naskiĝis en 1835, kaj mortis 75-jara, en 1910. Li estas inter la unuaj usonaj verkistoj, kiuj sukcesis konkeri per siaj libroj ne nur la hejmlandan legantaron, sed certigis por si lokon en la mondliteraturo.

Li havis aventurplenan vivon. En 1856 li fariĝis konduktoro de ŝipo sur Missisippi. Tie li renkontis la homtipojn, kiuj poste aperos en liaj plej bonaj verkoj. El la ŝipista vivo li ĉerpis ankaŭ tiun pseŭdonimon: „mark twain" – kriia ŝipisto, konstatinte, ke la akvo estas sufiĉe profunda por navigado.

Ekde la komenco de la sesdekaj jaroj de la pasinta jarcento li laboris kiel ĵurnalisto, kaj tiam komenciĝis ankaŭ lia literatura kariero. La veran sukceson alportis por li „La aventuroj de Tom Sawyer", aperinta en 1876. Post ok jaroj li eldonas ankaŭ la daŭrigon de la grandsukcesa verko sub titolo „La aventuroj de Huckleberry Finn". Tiuj du romanoj estas ne nur la plej elstaraj kreaĵoj de la usona postnfana literaturo, sed omi legas ilin amase ĝis nun en la tuta mondo, tiel same infanoj, kiel plenkreskuloj. (Pasintjare HEA eldonis la bildrakontan version de „La aventuroj de Tom Sawyer".)

La ĉarmaj infanaj personaĵoj de Mark Twain kvazaŭ proponas sin por bildigo. Tiu cirkonstanco unuflanke faciligis la laboron de la desegniaro de tiu ĉi adaptaĵo, sed aliflanke ankaŭ malfaciligis ĝin, ĉar finfine ĉiuj legintoj formis sian imagon pri Tom, Huck, Jim kaj la aliaj. Attila Dargay varme esperas, ke liaj desegnaĵoj sukcesis kapti la esencon de la granda Mark Twain-verko, kaj ili plejeble respondas al tiuj imagoj, kiuj vivas en la memoro de legintoj de la plena romano.

Tiu ĉi adaptaĵo kompreneble nek povas, nek deziras anstataŭi la originalan verkon. Ĝi celas ĉefe tiujn esperantistojn, kiuj ĝum la infanaĝo legis la romanon, kaj nun volonte revivigos siajn tiamajn sentojn, kaj samtempe ankaŭ ekzerciĝos iomete en la esperantlingva legado. Tamen, se trovsiĝos kelkaj, por kiuj la jena bildrakonto signifos la unuan renkontiĝon kun la ĉefverko de Mark Twain, ili plej verfajne ne povos kontraŭstari la tenton serĉi la verkon en sia nacia lingvo, kaj konatiĝi ĝisfunde kun la plena verko.

Eldonis Hungara Esperanto-Asocio, 1982
Respondeca redaktoro: Vilmos Benczik. Respondeca eldonanto: Tibor Vaskó
ISBN 963 571 105 0 OKISZ Labor Nyomda 1446/82

Informfonto laŭ ordo de apero en la eldonaĵo: La fontoj de informo estas la titolpaĝo kaj la dorso de la titolpaĝo.

Rikordo

000 01008nam#a2200193#i#4500

003 ES-MaBJR

005 20190823193419.0

008 240707s1982####hu#a|||#||||#000#1#epo#d

020 ## $a963-571-105-0

040 ## $aES-MaBJR$bepo$cES-MaBJR$erda

041 1# epohhun

100 1# $aHorváth, Tibor Cs.$eaŭtoro$4aut

240 10 $aHuckleberry Finn kalandjai.$lEsperanto

245 10 $aMarc Twain, La aventuroj de Huckleberry Finn /$cla bildrakonton verkis Tibor Cs. Horváth ; desegnis Attila Dargay ; esperanta teksto de Vilmos Benczik

246 30 $aLa aventuroj de Huckleberry Finn

264 #1 $aBudapest :$bHungara Esperanto-Asocio,$c1982

300 ## $a28 paĝoj :$bĉefe ilustraĵoj (blankanigraj) ;$c24 cm

336 ## $aBildo senmova$aTeksto $2rdacontent

337 ## $asenpera$2rdamedia

338 ## $avolumo$2rdacarrier

700 1# $iAdaptaĵo de (verko):$aTwain, Mark.$tThe adventures of Huckleberry Finn

700 1# $aDargay, Attila$eilustrinto$4ill

700 1# $aVaskó, Tibor$etradukinto$4trl

Komentoj

Temas ĉi-kaze pri traduko de derivita verko: adaptaĵo en formo de komikso de la romano *The adventures of Huckleberry Finn,* de Marc Twain. Krome, la adaptaĵo estas verko en kunlaboro inter verkisto kaj artisto.

Kampo 100 – Ĉefa alirpunkto. Nomo de persono

Ĉar ne ekzistas ĉefa responsulo (eblas konsideri same gravaj la desegnoj kaj la teksto), la nomo de tiu nomata unuavice en la informfonto, Tibor Cs. Horváth, rolas kiel ĉefa alirpunkto.

Kampo 240 – preferata titolo por verko kun konata aŭtoro

La preferata titolo estas tiu, kiun la aŭtoro donis al sia verko en la hungara. Ĉar ĝi ne koincidas kun la ĉeftitolo de la risurco, oni devas registri ĝin. Krome, oni aldonas la subkampon $l por identigi la tradukon. La preferatan titolon de la verko oni ĉerpis el la katalogo de la Nacia Biblioteko de Hungario.

Kampo 245 – Mencio pri titolo kaj mencio pri respondeco

En multaj kazoj, la eldonaĵoj prezentantaj adaptaĵojn kutime metas la nomon de la aŭtoro de la originala verko kiel ĉefan mencion pri respondeco eĉ se tio ne respondas al la realo de la eldonaĵo. Ĉi-kaze, tamen, la prezento de la nomo de la originala aŭtoro volas iel indiki, ke de Marc Twain, la elektita verko estas La aventuroj de Huckleberry Finn, kaj la nomo de la aŭtoro kaj la titolo aperas disigitaj per dupunkto, kio pensigas nin pri pli intima rilato inter ambaŭ datenoj, kvazaŭ ĉio respondus al la sama atributo. Tial, eblas konsideri ĉion la ĉeftitolon (Marc Twain: La aventuroj de Huckleberry Finn), ĉar la vera mencio pri respondeco, tiu de la adaptaĵo, aperas poste.

Eblas anstataŭi la dupunkto per komo por malhelpi eventualan konfuzon, ĉar la dupunkto, kiel preskriba interpunkcio, enkondukas la titolaldonon.

Kampo 246 – Titolvarianto

Por faciligi la rekuperadon, la parton de la ĉeftitolo, kiu respondas al la titolo de la originalo oni registras en kampo 246.

Indikiloj:

1a - La unua indikilo devas esti 3, ĉar ne temas pri noto, sed pri aldona alirpunkto.

2a – La dua devas esti 0, ĉar temas pri parto de la titolo

Kampo 336 – Tipo de enhavo

Estas du tipoj de enhavo: desegnoj kaj teksto. Sed ĉar estas nur unu tipo de medio (senpera) ambaŭ tipoj de enhavoj registrendas en la sama kampo 336, sed en malsamaj subkampoj $a.

Kampoj 700 – Sekundaraj alirpunktoj. Nomoj de personoj

La rilaton inter la katalogata verko kaj tiu alia el kiu ĝi estas adaptaĵo oni starigas per la rilat-indikilo Adaptaĵo de (verko) en la subkampo $i. Tuj sekve, oni registras la aŭtoron kaj preferatan titolon de la originala verko.

Kampoj 700 – Sekundaraj alirpunktoj. Nomoj de personoj

La alirpunkto pri la ilustrinto estas ĉi-kaze konsiderata kerna, ĉar la desegnoj estas esenca parto de verko kaj ĝi ekzistas pro lia kunlaboro kun la aŭtoro de la teksto. En aliaj kazoj, la ilustraĵoj estas nur akcesoraj aŭ komplementaj.

KAZO 8: Plena vortaro de Esperanto


PLENA VORTARO
DE
ESPERANTO
VERKITA DE
Profesoro E. GROSJEAN-MAUPIN
Direktoro de la Sekcio: « Komuna Vortaro »
ĉe la Esperantista Akademio
A. ESSELIN, S. GRENKAMP-KORNFELD, Prof. G. WARINCHIEN
Membroj de la Lingva Komitato
UNUA ELDONO
19 30
SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
23, RUE BOYER, PARIS (XX)


Ĉiuj rajtoj rezervitaj por ĉiuj landoj
inkluzive Sovetlando.
Copyright by SAT 1930.

Informfontoj laŭ ordo de apero en la eldonaĵo: La fontoj de informo estas la titolpaĝo kaj la dorso de la titolpaĝo.

Rikordo:

000 00600nam#a2200193#i#4500

003 ES-MaBJR

005 20240708193419.0

008 240708s1930####fr#||||#||||#000#0#epo#d

040 ## $aES-MaBJR$bepo$cES-MaBJR$erda

100 1# $aGrosjean-Maupin, Émile$eaŭtoro$4aut

240 10 $aPlena vortaro de Esperanto

245 10 $aPlena vortaro de Esperanto /$cverkita de Profesoro E. Grosjean-Maupin, direktoro de la sekcio “Komuna Vortaro” ĉe la Esperantista Akademio, A. Esselin, S. Grenkamp-Kornfeld, Prof. G. Waringhien, membroj de la Lingva Komitato.

250 ## $aUnua eldono

264 #1 $aParis :$bSennacieca Asocio Tutmonda,$c1930

264 #4 $c©1930

300 ## $a517 paĝoj ;$c21 cm

336 ## $aTeksto $2rdacontent

337 ## $asenpera$2rdamedia

338 ## $avolumo$2rdacarrier

700 1# $aEsselin, A.$eaŭtoro$4aut

700 1# $aGrenkamp-Kornfeld, S.$eaŭtoro$4aut

700 1# $aWaringhien, G.$eaŭtoro$4aut

Komentoj

Temas pri verko en kunlaboro. En la titolpaĝo unu el la aŭtoroj aperas kiel ĉefa responsulo.

Kampo 100 – Ĉefa alirpunkto. Nomo de persono

En la verkoj en kunlaboro, la ĉefa alirpunkto estas la nomo de la ĉefa responsulo de la kreado de la verko, kaj se ne ekzistus ĉefa responsulo, la nomo de tiu nomata unuavice en la informfonto.[70]

Kampo 245 – Mencio pri titolo kaj mencio pri respondeco

En la transskribado de la mencio pri respondeco oni inkludas la terminojn esprimantajn devenon, titolon, profesion, postenon aŭ rangon.

[70] Tio estas grava ŝanĝo en RDA respekte de AACR. En ĉi lasta, kiam la kunlaborantoj esti pli ol tri aŭtoroj, oni konsideris la verkon anonima. Kalkulu je tio, se vi konsultas aŭ ĉerpas rikordojn el aliaj datenbankoj.

KAZO 9: Impresoj kaj raportoj





Informfontoj laŭ ordo de apero en la eldonaĵo: La fontoj de informo estas kovrilo kaj la titolpaĝo.

Rikordo:

000 00788nam#a2200193#i#4500

003 ES-MaBJR

005 20240708193419.0

008 240711s1925####sp#a|||#||||#10|#0#epo#d

040 ## $aES-MaBJR$bepo$cES-MaBJR$erda

111 2# $aKongreso de Iberiaj Esperantistoj$n(3a.$d1925. Kordovo)$eaŭtoro$4aut

240 10 $aImpresoj kaj raportoj

245 10 $aImpresoj kaj raportoj :$baldono al la kongreslibro /$cIIIa Iberia Kongreso Esperantista, Kordovo, 10-12a de majo 1925

246 14 $aRaporto de la III Iberia Kongreso Esperantista

264 #1 $a[Kordovo] :$b[eldoninto ne identigita],$c[1925]

264 #3 $aKordovo :$bPresejo La Puritana,$c1925

300 ## $a40 paĝoj :$bfotografaĵoj (blankanigraj) ;$c21 cm

336 ## $aTeksto $2rdacontent

337 ## $asenpera$2rdamedia

338 ## $avolumo$2rdacarrier

856 41 $uhttps://hdl.handle.net/11013/5250$yDisponebla en Bitoteko

Komentoj

Verko eldonita okaze de kongreso. Ĉar la titolaldono diras, ke temas pri “aldono al la kongreslibro”, eblas konsideri ĝin ankaŭ kongreslibro.

Kampo 111 – Ĉefa alirpunkto. Nomo de kongreso

La ĉefa alirpunkto de kongresa eldonaĵo estas la kongreso mem. Ĉi-kaze, la nomo de la kongreso devas esti kodigita en la kampo 111 ĉar la nomo de la organiza korporacio ne estas parto de la nomo de la kongreso. Ĉi kongreso prezentis plurajn formojn. Konsultinte la aŭtoritatan datenbankon, oni konstatas, ke la formo, kiu aperas en ĉi eldonaĵo estas la preferata.

Kampo 245 – Mencio pri titolo kaj mencio pri respondeco

La nomo de la kongreso estas la mencio pri respondeco, al kiu oni aldonas la informerojn pri numero, dato kaj loko de celebrado.

Kampo 246 – Titolvarianto

La titolo de la kovrilo ne estas la sama ol tiu de la titolpaĝo. Oni kreas alirpunkton por ĝi , por faciligi la rekuperadon ankaŭ laŭ tiu formo. La indikiloj, ĉi kaze estas respepektive 1 kaj 4.

Kampo 264 – Mencio pri publikigo

En la fonto ne aperas mencio pri la eldonanto, sed ja aperas kompleta mencio pri la presisto. Oni devas do redakti du malsamajn kampojn 264.

Unua kampo 264

Indikiloj:

1a - La valoro estas #, ĉar ne aplikeblas al monografio aliaj valoroj.

2a – La valoro devas esti 1, ĉar oni transskribos la datenojn rilatajn al la eldonisto.

Ĉar la kongresloko koincidas kun la presloko, eblas konjekti, ke la risurcon oni eldonis samloke, sed ĉar ne aperas pria mencio, oni donas la datenon interkrampe. Ĉar ankaŭ ne estas mecio pri eldoninto, oni registras interkrampe la esprimon *eldoninto ne identigita*. Same kiel en la kazo de la kongresloko, ne aperas eksplicita mencio pri la eldondato, sed ankaŭ ĉi-foje eblas konjekti, ke ĝi koincidas kun la presdato. Oni registras interkrampe tiun daton kiel probabla dato de eldono.

Dua kampo 264

Ĉar la datenoj pri la eldoninto estas tre nekompletaj, endas registri ankaŭ la datenojn pri la presisto por bone identigi la eldonon.

Indikiloj:

1a - La valoro estas #, ĉar ne aplikeblas al monografio aliaj valoroj.

2a – La valoro devas esti 3, ĉar oni transskribos la datenojn rilatajn al la presisto.

La mencio pri presado aperas kompleta en la informfonto, do oni simple transskribas ĝin.

KAZO 10: Du amosentaj noveloj



DU AMOSENTAJ
NOVELOJ

IMENLAGO de THEODOR STORM
MARUŜKA de MELA ESCHERICH

ELDONIS SVISA ESPERANTO-SOCIETO, BERN 1947



El germana lingvo tradukis
ALFRED BADER

Informfontoj laŭ ordo de apero en la eldonaĵo: La fontoj de informo estas la titolpaĝo kaj unu el la lastaj nenumeritaj paĝoj, kie aperas la nomo de la tradukinto.

Rikordo:

000 00861nam#a2200193#i#4500

003 ES-MaBJR

005 202407128193419.0

008 240712s1947####sv##|||#||||#00|#j#epo#d

040 ## $aES-MaBJR$bepo$cES-MaBJR$erda

041 1# $aepo$hger

245 00 $aDu amosentaj noveloj /$cel germana lingvo tradukis Alfred Bader

264 #1 $aBern :$bSvisa Esperanto-Societo,$c1947

300 ## $a41 paĝoj ;$c43 cm

336 ## $aTeksto $2rdacontent

337 ## $asenpera$2rdamedia

338 ## $avolumo$2rdacarrier

505 0# $aImenlago / Theodor Storm. Maruŝka / Mela Escherich

700 12 $aStorm, Theodor.$tImmensee.$lEsperanto

700 12 $aEscherich, Mela.$tMaruŝka.$lEsperanto

700 1# $aBader, Alfred$etradukinto$4trl

Komentoj

Temas pri kompilaĵo de verkoj de malsamaj aŭtoroj.

Kampo 245 – Mencio pri titolo kaj mencio pri respondeco

La ĉefa alirpunktoj en la kazoj de eldonistaj kompilaĵoj estas la ĉeftitolo de la eldonaĵo. Rimarku, ke ĉar ne estas alirpunkto 1XX, la unua indikilo devas havi la valoron 0.

Redaktu krome sekundarajn analizajn alirpunktojn por la enhavataj verkoj.

Kampo 505 – Noto pri enhavo

Oni redaktas noton pri la enhavataj verkoj. La valoro de la unua indikilo estas 0, ĉar tio indikas, ke oni registras la tutan enhavon de la risurco. Oni uzas la saman interpunkcion kiel oni uzus en la kampo 245 se ne ekzistus kolektiva titolo. Tio signifas, ke ambaŭ verkoj devas esti apartigitaj per punkto, ĉar temas pri verkoj de malsamaj aŭtoroj.

Kampoj 700 – Sekundaraj alirpunktoj. Nomoj de personoj

Kiel ni jam vidis, la kampo 7XX havas du rolojn depende de la dua indikilo.

La unuaj du kampoj, kies dua indikilo havas valoron 2, estas respektivaj alipunktoj por la du enhavataj verkoj kun konata aŭtoro. La valoro “2” de la dua indikilo signifas, ke la verkoj estas enhavataj en la risurco.

La kampo, kies dua indikilo havas valoron blanko (#) estas sekundara alirpunkto por plia persono, kiu havas iun rolon rilate la risurcon. En ĉi kazo, la tradukinto.

KAZO 11: La faraono









Informfontoj laŭ ordo de apero en la eldonaĵo: La fontoj de informo estas la titolpaĝo kaj la dorso de la titolpaĝo de la tri volumoj, ĉar la titolo kaj ceteraj datenoj, escepte de la numerado de la volumoj, koincidas en ĉiuj el ili.

Rikordo

000 00785nam#a2200193#i#4500

003 ES-MaBJR

005 20231227123108.0

008 240708s1957####pl#||||#||||#000#f#epo#d

040 ## $aES-MaBJR$bepo$cES-MaBJR$erda

041 1# epohpol

100 1# $aPrus, Bolesław$eaŭtoro$4aut

240 10 $aFaraon.$lEsperanto

245 13 $aLa faraono /$cBoleslaw Prus ; la romanon tradukis el la pola lingvo Kazimierz Bein (Kabe), la antaŭparolon kaj epilogon tradukis Isaj Dratwer

264 #1 $aVarsovio :$bEldonejo Polonia,$c1957

300 ## $3 volumoj (295 ; 357 ; 306 paĝoj) ;$c21 cm

336 ## $aTeksto $2rdacontent

337 ## $asenpera$2rdamedia

338 ## $avolumo$2rdacarrier

700 1# $aBein, Kazimierz$etradukinto$4ill

700 1# $aDratwer, Isaj$etradukinto$4trl

Komentoj:

Verko eldonita en tri volumoj sen apartaj titoloj por ĉiu volumo, do, la priskribo devas esti integra.

Kampo 245 – Mencio pri titolo kaj mencio pri respondeco

La ĉefa mencio pri aŭtoreco aperas en la titolpaĝoj, la mencioj pri tradukado, en la dorso de la titolpaĝo. Rimarku, ke ĉi lasta estas unu sola mencio, eĉ se temas pri du personoj, kiuj realigas malsamajn taskojn. Tial ambaŭ nomoj estas disigitaj per komo kaj ne per la preskriba interpunkcio (punktokomo), uzenda por enkonduki plian malsaman rolon en la mencio pri respondeco.

La teknikajn funkciojn (projektado de kovrilo kaj titolpaĝo, bindo) oni ne prikonsideras en la kataloga priskribo.

Kampo 300 - Fizika priskribo

Ĉar la volumoj havas sendependajn paĝnumeradojn kaj oni ne redaktis noton de enhavo (ĉar la volumoj ne havas apartan tijtolojn), oni registras la nombron da volumoj kaj indikas parenteze la nombron de paĝoj de ĉiu volumo disigante per punktokomo (;) la infomon respondan al ĉiu volumo.

Kampoj 700 – Sekundaraj alirpunktoj. Nomoj de personoj

Ĉar la sekundaraj alirpunktoj estas nomoj de personoj iel rilataj al la risurco, la valoro de la dua indikilo devas esti blanko (#).

Apartan klarigon meritas la preferata formo de la nomo de la unua tradukinto, Kazimierz Bein, kiu foje uzis la mallongigitan formon Kabe. Kvankam foje ĉi formo estis konsiderata pseŭdonimo, fakte, ne temas pri vera pseŭdonimo, ĉar la aŭtoro ne vere intencas kaŝi ŝin malantaŭ ĝin kaj multfoje ĝi aperas en kombino kun la kompleta nomo, kiel en ĉi eldonaĵo. Temas do, pri nomovarianto. Sed se tiel, stariĝas la demando, kiu estu do la preferata formo, tiu uzenda en ĉiuj alirpunktoj pri ĉi aŭtoro. Ĉar estas abundo de prezentoj en la pluraj informfontoj kaj ne restas klare kiel efektive la aŭtoro deziras konigi sin, oni uzu la kompletan formon. Tiu estas ankaŭ la kriterio de la biblioteko de Vieno, kiu uzas la kompletan nomon kiel preferatan.

KAZO 12: La mastro de l’ ringoj



Serio
MONDLITERATURO
Volumo 3

John Ronald Reuel
Tolkien

THE
FELLOWSHIP
OF THE RING

being the first part of
The Lord of the Rings

London
1954

John Ronald Reuel
Tolkien

LA
KUNULARO
DE L' RINGO

la unua parto de
La Mastro de l' Ringoj

Jekaterinburg
1995

John Ronald Reuel Tolkien
LA KUNULARO DE L' RINGO

Tradukis el la angla lingvo
William Auld

Redaktis, kompostis kaj enpaĝigis
Aleksander Korjenkov
Korektis
Halina Gorecka

TOLKIEN, J. R. R.
La Kunularo de l' Ringo: La unua parto de *La Mastro de l' Ringoj* / Trad. el la angla W. Auld; Enkond. A. Korjenkov; Postpar. C. Fettes. — Jekaterinburg: Sezonoj, 1995. — 544 p. — (Serio *Mondliteraturo*; № 3).

© Traduko *William Auld*, 1995
© Postparolo *Christopher Fettes*, 1995
© Enkonduko, aranĝo *Sezonaj*, 1995

Джон Рональд Руэл Толкин
Братство Кольца

(на языке эсперанто)

ISBN 5-7450-0457-6

Сдано в набор 26.11.1994. Подписано в печать 15.05.1995.
Формат 60x84/16. Объем 34 п.л. Тираж 500 экз.
Заказ 1540
Отпечатано с готовых диапозитивов
Типография: г. Верхняя Пышма, ул. Кривоусова,11.

Оригинал-макет изготовлен в издательстве "Урал-Советы" ("Весть"):
г. Екатеринбург, ул. Кирова,28.

Informfontoj laŭ ordo de apero en la eldonaĵo: Titolpaĝo de la serio, aldona titolpaĝo en la angla, titolpaĝo kaj dorso de la titolpaĝo de la tri volumoj. Por iom senpezigi la dokumenton, ni montras nur la fontojn de la unua volumo, sed la ceteraj estas similaj, kun la koncerna informo de la responda volumo.

Kvankam estas rekomendinde katalogi la trilogiojn analize, trovu sube ankaŭ la manieron fari tion integre, kaze ke iu biblioteko trovas ĉi formon pli oportuna, aŭ simple por scii kiel oni faras se bezonate.

A. INTEGRA PRISKRIBO KOMPLETA

Rikordo

000 00964nam#a2200193#i#4500

003 ES-MaBJR

005 20231227123108.0

008 240709m19951997ru#a||#||||#000#f#epo#d

020 ## $a5-7450-0457-6

040 ## $aES-MaBJR$bepo$cES-MaBJR$erda

041 1# epohengl

100 1# $aTolkien, John Ronald Reuel$eaŭtoro$4aut

240 14 $aThe lord of the rings.$lEsperanto

245 13 $aLa mastro de l' ringoj /$cJohn Ronald Reuel Tolkien ; tradukis el la angla lingvo William Auld ; postparolo, Christopher Fettes

246 15 $aThe lord of the rings

264 #1$aJekaterinburg :$bSezonoj,$c1995-1997

264 #4©1997

300 ## $a3 volumoj ;$c21 cm

336 ## $aTeksto $2rdacontent

337 ## $asenpera$2rdamedia

338 ## $avolumo$2rdacarrier

490 0# $aMondliteraturo ;$vvolumo 3-5

505 0# $aUnua parto. La kunularo de l' ringo (543 paĝoj., 1 mapo.) -- Dua parto. La du turegoj (429 paĝoj) -- Tria parto. La reveno de la reĝo (399 paĝoj)

700 1# $aAuld, William$etradukinto$4trl

700 1# $aFettes, Chistopher$eaŭtoro de la epilogo$4aft

Komentoj:

Verko eldonita en tri volumoj. Ĉiu parto havas propran titolon, do eblus fari jen integra, jen analiza priskribo.

Cetere, estas du titolpaĝoj. Unu el ili reprezentas la eldonon en la originala lingvo. La alia, la esperantan eldonon. Tio povas igi nin dubi, ĉu elekti la originalan titolpaĝon kiel integra parto de la preferata informfonto. Rigardante la enhavon, ni vidas, ke la eldonaĵo prezentas nur la esperantan tradukon, do, la preferata informfonto devas esti la esperanta, kiu cetere prezentas la datenon pri publikigo de la nuna risurco.

Kampo 008 - Informkodoj de fiksa longeco. Ĝenerala informo

Pozicio 06: tipo de dato. La valoro kodigenda estas “m”. Ĝi indikas, ke estas pluraj datoj kaj la du grupoj de kvar ciferoj, kiuj sekvas ĝin respondas al la unua kaj lasta jaroj de publikigo.

Pozicioj 07-10: unua dato. La valoro ĉi-kaze estas 1995, la dato de la unue publikigita volumo.

Pozicioj 11-14: dua dato. La valoro estas 1997, la dato de la laste publikigita volumo.

Kampo 245 – Mencio pri titolo kaj mencio pri respondeco

La komuna titolo, kiu reprezentas la tutan verkon, troviĝas en la titolpaĝo de ĉiu volumo. De tie, do, ni prenas ĝin, same kiel la ĉefan mencion pri respondeco. La alia mencio pri respondeco troviĝas en la dorso de la titolpaĝo.

Kampo 246 – Titolvarianto

La titolon en la aldona titolpaĝo oni registras kiel titolvarianto. La indikiloj uzendaj estas respektive 1 (estas noto kaj alirpunkto) kaj 3 (specifa por la titoloj de aldonaj titolpaĝoj).

Kampo 264 – Mencio pri publikigo

Ĉiu volumo publikiĝis en tri sinsekvaj jaroj. En $c oni registras la unuan kaj la lastan disigitan per streko.

Kampo 264 – Kopirajto

Ĉar oni faras integran priskribon, oni registras la plej ĵusan kopirajton el la aperintaj en la tri volumoj.

Kampo 490 – Mencio pri serio

Kvankam ĉiuj volumoj apartenas al la sama serio, ĉiu el ili havas propran numeron ene de ĝi. Ĉar la numerado estas sinsekva por la tri volumoj, oni registras la unuan kaj la lastan disigitajn per streko.

Kampo 505 – Noto pri enhavo

Kiam oni faras integran priskribon de plurvoluma risurco, kies partoj havas apartan titolon, oni starigas la rilaton inter la tuto kaj la partoj pere de noto pri enhavo.

En ĉi kazo, ĉar ni disponas la risurcon kompletan, la unua indikilo devas havi la valoron 0.

La partojn estu nomataj kiel ĝi estas prezentata en la risurco (Unua parto, Dua parto…). Tuj sekve, la titolon de la parto kaj parenteze, la paĝnombro de tiu parto. La informo de ĉiu volumo estas disigita de la informo de la sekva per duobla streko.

B. INTEGRA PRISKRIBO NEKOMPLETA

Rikordo

000 00964nam a2200265 i 4500

003 ES-MaBJR

005 20231227123108.0

008 240709m1995**9999**ru#a||#||||#000#f#epo#d

020 ## $a5-7450-0457-6

040 ## $aES-MaBJR$bepo$cES-MaBJR$erda

041 1# epohengl

100 1# $aTolkien, John Ronald Reuel$eaŭtoro$4aut

240 14 $aThe lord of the rings.$lEsperanto

245 13 $aLa mastro de l' ringoj /$cJohn Ronald Reuel Tolkien ; tradukis el la angla lingvo William Auld ; postparolo, Christopher Fettes

246 15 $aThe lord of the rings

264 #1$aJekaterinburg :$bSezonoj,$c**1995-**

264 #4©1995

300 ## $a**volumoj <1>** ;$c21 cm

336 ## $aTeksto $2rdacontent

337 ## $asenpera$2rdamedia

338 ## $avolumo$2rdacarrier

490 0# $aMondliteraturo ;$vvolumo 3

505 **1**# $aUnua parto. La kunularo de l' ringo (543 paĝoj., 1 mapo.)

700 1# $aAuld, William$etradukinto$4trl

700 1# $aFettes, Chistopher$eaŭtoro de la epilogo$4aft

Komentoj:

Antaŭaj komentoj validas ankaŭ por ĉi kazo. Sed rimarku, ke nun ni disponas nur la unuan volumon, kaj nur la informon pri ĝi eblas registri. La rikordo restas “malferma” kaj la informo kompletiĝos laŭ la ricevado de la sekvaj volumoj. Rimarku, graslitere, la elementojn indikantajn, ke la rikordo estas malferma.

Kampo 008 - Informkodoj de fiksa longeco. Ĝenerala informo

Pozicio 06: tipo de dato. La valoro kodigenda estas “m”. Ĝi indikas, ke estas pluraj datoj kaj la du grupoj de kvar ciferoj, kiuj sekvas ĝin respondas al la unua kaj lasta jaroj de publikigo.

Pozicioj 07-10: unua dato. La valoro ĉi-kaze estas 1995, la dato de la unue publikigita volumo.

Pozicioj 11-14: dua dato. La valoro estas 9999, ĉar la daton de la laste publikigita volumo ni ankoraŭ ne konas.

Kampo 264 – Mencio pri publikigo

Ĉar oni konas nur la daton de la unue publikigita volumo, oni registras ĝin sekvata de streketo, kun la intenco kompletigi ĝin ricevinte la sekvajn volumojn.

Kampo 264 – Kopirajto

Provizore, oni disponas nur la kopirajton el la unua volumo. Tiun oni registras. Ricevinte la sekvajn volumojn, oni kontrolu, ĉu la dato estas la sama aŭ oni devas ŝanĝi ĝin por ke aperu la plej ĵusa.

Kampo 300 – Priskribo

Temas pri risurco en pluraj volumoj, sed ankoraŭ ni ne disponas ĉiujn. Tial oni ne registras la tutan nombron de volumoj, nur tiun ĝis nun disponeblan, inter angulaj krampoj, por indiki, ke la informo estas provizora.

Kampo 490 – Mencio pri serio

Oni registras la numeron de la unua disponebla volumo kaj kompletigos la informon ricevinte la sekvajn.

Kampo 505 – Noto pri enhavo

Same, la rilaton parto-tuto oni starigas per la kampo 505.

En ĉi kazo, ĉar ni NE disponas la risurcon kompletan, la unua indikilo devas havi la valoron 1.

Oni registras nur la informon pri la disponebla volumo.

C. ANALIZA PRISKRIBO

Rikordo

000 00964nam a2200265 i 4500

003 ES-MaBJR

005 20231227123108.0

008 240709s1995####ru#a||#||||#000#f#epo#d

020 ## $a5-7450-0457-6

040 ## $aES-MaBJR$bepo$cES-MaBJR$erda

041 1# epohengl

100 1# $aTolkien, John Ronald Reuel$eaŭtoro$4aut

240 14 $aThe fellowship of the ring.$lEsperanto

245 13 $aLa kunularo de l' ringo :$bla unua parto de La mastro de l' ringoj /$cJohn Ronald Reuel Tolkien ; tradukis el la angla lingvo William Auld ; postparolo, Christopher Fettes

246 15 $aThe fellowship of the ring

264 #1$aJekaterinburg :$bSezonoj,$c1995

264 #4©1995

300 ## $a543 paĝoj, 1 mapo ;$c21 cm

336 ## $aTeksto $2rdacontent

337 ## $asenpera$2rdamedia

338 ## $avolumo$2rdacarrier

490 0# $aMondliteraturo ;$vvolumo 3

700 1# $aAuld, William$etradukinto$4trl

700 1# $aFettes, Chistopher$eaŭtoro de la epilogo$4aft

700 1# $iEnhavata en (verko):$aTolkien, John Ronald Reuel.$tThe lord of the rings

Komentoj:

En analiza priskribo, ĉiu volumo estas traktata sendepende kaj oni sekvas la ĝeneralajn regulojn de unuvolumajn monografiojn. Oni devas nur konsideri, ĉu la titolo de ĉiu volumo estas sufiĉe memstara por identigi la parton per si mem aŭ ĝi bezonas por tio la komunan titolon. Ĉi kaze, estas klare, ke la titolo de la parto estas sufiĉe identiga.

Kampo 008 - Informkodoj de fiksa longeco. Ĝenerala informo

Pozicio 06: tipo de dato. La valoro kodigenda estas “s”, unika dato de publikigo.

Pozicioj 07-10: unua dato. La valoro ĉi-kaze estas 1995, la dato de la unue publikigita volumo.

Pozicioj 11-14: dua dato. La valoro estas ####, ĉar ne estos informo por la dua dato.

Kampo 245 – Mencio pri titolo kaj mencio pri respondeco

La titolo de la parto estas memstara kaj ne bezonas la komunan titolon por esti komprenata, tial ĝi rolas kiel ĉeftitolo de la parto. Kaj ĉar la mencio pri la komuna titolo aperas en la titolaldono, ne necesas redakti noton por ĝi.

Kampoj 700 – Sekundaraj alirpunktoj. Nomoj de personoj

La rilaton inter la parto kaj la tuta verko oni starigas per alirpunkto kun la preferata titolo de la kompleta verko kaj la rilat-indikilo “Enhavata en (verko)”.

KAZO 13: Historio de Esperanto. Deveno kaj komenco, 1887-1900


EDMOND PRIVAT

HISTORIO DE LA LINGVO ESPERANTO

DEVENO KAJ KOMENCO

1887-1900

FERDINAND HIRT & SOHN EN LEIPZIG / 1923

ESPERANTO-FAKO

Informfonto: La informfontoj estas la titolpaĝo.

Rikordo

000	00964nam#a2200193#i#4500
003	ES-MaBJR
005	20231227123108.0
008	240712s1923####gw##||#||||#000#0#epo#d

040 ## $aES-MaBJR$bepo$cES-MaBJR$erda

100 1# $aPrivat, Edmond$eaŭtoro$4aut

240 10 $aHistorio de la lingvo Esperanto.$pDeveno kaj komenco, 1887-1990

245 10 $aHistorio de la lingvo Esperanto.$pDeveno kaj komenco, 1887-1990 /$cEdmond Privat

264 #1$aLeipzig :$bFerdinand Hirt & Sohn, Esperanto-Fako,$c1923

300 ## $a74 paĝoj ;$c21 cm

336 ## $aTeksto $2rdacontent

337 ## $asenpera$2rdamedia

338 ## $avolumo$2rdacarrier

Komentoj:

Ni disponas nur unu volumon de la verko. Kiel ni jam vidids antaŭe, en analiza priskribo, ĉiu volumo estas traktata sendepende kaj oni sekvas la ĝeneralajn regulojn de unuvolumajn monografiojn.

En ĉi kazo, la titolo de la parto ne estas sufiĉe memstara por identigi la parton per si mem. “Deveno kaj komenco, 1887-1990” povas temi pri kiu ajn historia okazaĵo. Cetere, ĝi troviĝas en la preferata informfonto same kiel la komuna titolo. Ĝi estas do dependa titolo, kiu bezonas la ĉeeston de la komuna por esti plensignifa.

Kampo 245 – Mencio pri titolo kaj mencio pri respondeco

Ĉar la titolo de la parto ne sufiĉas por identigi la risurcon, la ĉeftitolo estas kunmetaĵo de ambaŭ titoloj: la komuna, transskribita en $a kaj la parta, transskribita en $p. Ne estas numerado de la parto, tial la bezonata interpunkcio antaŭ $p devas esti punkto.

Kampo 264 – Mencio pri publikigo

En la fonto aperas Eldona Fako, kiel parto de la mencio pri publikigo, tial oni ĝin ankaŭ transskribas en $b.

KAZO 14: Ulenspieghel



ULENSPIEGHEL

tio estas

STRIGSPEGULO

pri liaj vivo, kaj fiaj agoj, kaj la strangaj aventuroj, kiujn li havis, ĉar li neniam evitis eblan friponaĵon

tradukis: P. Wolrug

kun ilustraĵoj el la antverpena eldono de ĉ. 1500

Vulpo · Amsterdam



ISBN 90 70074 01 X

dua preso

© 1967 Wouter F. Pilger

2

Informfonto laŭ ordo de apero en la eldonaĵo: La informfontoj estas la titolpaĝo kaj la dorso de la titolpaĝo.

Rikordo

000 00926nam#a2200193#i#4500

003 ES-MaBJR

005 20231227123108.0

008 240712s1967####ne#a||#||||#000#1#epo#d

020 ## $a90-70074-01-X

040 ## $aES-MaBJR$bepo$cES-MaBJR$erda

041 1# $aepo$hger

130 0# $aTill Eulenspiegel.$kElektaĵo.$lEsperanto

245 10 $aUlenspieghel, tio estas Strigspegulo :$bpri lia vivo, kaj fiaj agoj, kaj la strangaj aventuroj, kiujn li havis, ĉar li neniam evitis eblan friponaĵon /$ctradukis P. Wolrug ; kun ilustraĵoj el la antverpena eldono de ĉ. 1500

246 30 $aStrigspegulo

264 #1 $aAmsterdam :$bVulpo,$c1967

264 #4 $a©1967

300 ## $a15 paĝoj :$bilustraĵoj (blankanigraj) ;$c16 cm

336 ## $aTeksto $2rdacontent

337 ## $asenpera$2rdamedia

338 ## $avolumo$2rdacarrier

700 1# $aWolrug, P.$etradukinto$4trl

Komentoj:

Temas pri traduko de anonima verko, sed kvankam laŭ la prezento de la titolpaĝo eblus konjekti, ke temas pli la traduko kompleta, rigardante la enhavon oni konstatas, ke temas nur pri la traduko de kelkaj partoj.

Cetere, se oni konsideras la amplekson de la risurco, oni tuj rimarkas, ke nur 15 paĝoj ne povas konsistigi la tuton de la verko.

Kampo 130 – Unuforma titolo

La ĉefa alirpunkto estas la preferata titolo de la enhavata verko. Ĉar ĝi ne estas kompleta, sed temas nur pri diversaj ĉapitroj elektitaj, tion oni devas kodigi en $k. Fine, oni aldonas la lingvon de la traduko en $l.

Kampo 245 – Mencio pri titolo kaj mencio pri respondeco

Enestas alternativa titolo kiel parto de la ĉeftitolo, kvankam ĝi ne estas enkondukita de la kutima “aŭ” sed de “tio estas”.

Estas ĝenerala mencio pri ilustrado sen aldono de persona nomo kaj gramatike ligita al mencio pri eldono (antverpena eldono de 1500), kiu ne devas esti kodigita denove en kampo 250 ĉar temas pri klarigo de la mencio pri ilustrado.

KAZO 15: Judita



MARKO MARULIĆ

JUDITA

LIBRO UNUA

Hrvatski esperantski savez
Zagreb, 2018



ISBN: 978-953-6118-31-1
EAN: 9789536118311

Marko Marulić: Judita - Libro unua

prijevod / traduko:
Lucija Borčić

uredila / redaktis:
Marija Belošević

stručni suradnik / faka kunlaboranto:
Elda Doerfler

fotografija / foto:
Marija Belošević

grafička obrada / grafika aranĝo:
Ratimir Delorko

izdavač / eldonisto:
Hrvatski esperantski savez
(Kroata Esperantista Unuiĝo, Ilica 10, Zagreb)

tisak / preso:
Crograf, Jablanovec

© HES i IKUE

CIP zapis je dostupan u računalnome katalogu Nacionalne i sveučilišne knjižnice u Zagrebu pod brojem 001002610.

2

Informfonto laŭ ordo de apero en la eldonaĵo: La informfontoj estas la titolpaĝo kaj la dorso de la titolpaĝo.

Rikordo

000 00819nam#a2200193#i#4500

003 ES-MaBJR

005 20240712123108.0

008 240712s2018####ci##||#||||#000#p#epo#d

040 ## $aES-MaBJR$bepo$cES-MaBJR$erda

041 1# $aepo$hhrv

100 1# $aMarulić, Marko$eaŭtoro$4aut

240 10 $aJudita.$pLibro 1.$lEsperanto

245 10 $aJudita :$blibro unua /$cMarko Marulić ; tradukis, Lucija Borčić ; redaktis, Marija Belošević

264 #1 $aZagreb :$bHrvatski esperantski savez,$c2018

300 ## $a40 paĝoj ;$c15 cm

336 ## $aTeksto $2rdacontent

337 ## $asenpera$2rdamedia

338 ## $avolumo$2rdacarrier

700 1# $aBorčić, Lucija$etradukinto$4trl

700 1# $aBelošević, Marija$eeditoro$4edt

Komentoj:

Traduko en Esperanto de nur unu libro de verko konsistanta el ses. Antaŭ ol entrpreni katalogadon, oni devas esplori iomete por koni la intencon de la eldonisto, ĉar “libro unua” povas pensigi, ke temas pri eldonaĵo en pluraj volumoj, el kiuj ĝis nun eldoniĝis nur unu parto. Tamen, post legado de la antaŭteksto kaj konsultado de la informfontoj, oni alvenas al konkludo, ke la intenco de la eldoninto estis eldoni nur tiun parton de la verko. Ni troviĝas do antaŭ unuvoluma eldonaĵo enhavanta nur parton de verko.

Kampo 240 – Preferata titolo por verko kun konata aŭtoro

En ĉi kampo oni devas identigi la verkon. Ĉar la risurco enhavas nur unu parton (aŭ libron, tiel nomata en la originalo) el ses, kiuj konsistigas la kompletan verkon, kaj la parto ne havas identigan titolon, oni devas uzi la komunan titolon sekvatan de la termino por identigi la parton se ĝi ekzistas, en la sama lingvo kiel tiu de la titolo kaj registri la numeron de la parto per arabaj ciferoj.

Kampo 245 – Mencio pri titolo kaj mencio pri respondeco

Ĉi kampo rilatas al la titolo de la eldonaĵo. La ĉeftitolo estas “Judita”. Eblus dubi kiel trakti la frazon “libro unua”. Ĉar, kiel ni jam vidis, la intenco de la eldoninto ne estis publikigi la tutan verkon en pluraj volumoj, sed nur la unuan parton, ne eblas kodigi tiun frazon en $p, ĉar tio implicus, ke oni faras analizan priskribon de risurco konsistanta el pli da partoj. Fakte, tiu frazo rolas ĉi-kaze kiel klarigo de tio, kion oni trovos en la risurco, ne kiel efektiva indiko de numerita parto de la eldonaĵo. Tial oni kodigas tiun informon kiel titolaldonon.

Aŭtoritataj rikordoj

Por la bona funkciado de la programo, sufiĉas lasi en la kampoj 000 kaj 008 la valoroj, kiuj aperas implicite (ili aperas grize en la ekzemploj). Tamen, tre gravas uzi por ĉiu tipo de aŭtoritato la respondan formularon. Se, ekzemple, oni kreas aŭtoritaton de persono (100) en formularo de korporacio (110), kiam oni provos ĉerpi ĝin por ĝia uzado en bibliografia rikordo, ĝi estos ne trovebla.

Por ĉiu tipo de aŭtoritato vi trovos sube ekzemplojn de nura alirpunkto (sufiĉa en plej multaj kazoj) kaj de plene redaktita rikordo (kiam pli da informo pri la aŭtoritato estas bezonata por identigi ĝin aŭ gvidi la kataloganton).

Personoj

Nura alirpunto

Rikordo

000 00266nz a2200109n 4500

001 5282

003 ES-MaBJR

005 20190823205803.0

008 190823|| az|||aabn | a|c d

040 ## $aES-MaBJR$bepo$cES-MaBJR$erde

100 1# $aTrujillo Fernández, Gumersindo

Komentoj

Oni akceptas la implicitajn valorojn donitajn de la sistemo en la kampoj 000, kaj 008. La valorojn de 003 kaj 040 estas programeblaj kaj ne necesas tajpi ilin. La valorojn de 001 kaj 005 estas aŭtomate generitaj de la sistemo.

Oni kreis nur la alirpunkton (kampo 100), ĉar ĉi aŭtoro estas reprezentata en la katalogo nur per unu verko, ne estas homonimoj kaj sekve ne necesas doni pli da informoj por identigi ĝin.

Kompleta rikordo

KAZO 1: Pluraj nomovariantoj

Rikordo

000 00681nz a2200181n 4500

001 33

003 ES-MaBJR

005 20190107121756.0

008 090318n| az|nnaaba a aa**a** d

024 7# $ahttp://viaf.org/viaf/107554893$2viaf

024 7# $a0000000117791222$2isni

040 ## $aES-MaBJR$bepo$cES-MaBJR$erde

100 1# $aCamacho, Jorge

400 1# $aKamaĉo, Georgo

400 1# $aCamacho Cordón, Jorge

670 ## $aCelakantoj, 2004;$btitolpaĝ (Jorge Camacho) dorso de la titolpaĝo (Jorge Camacho Cordón) paĝo 118 (Jorge Camacho; n. en Zafra (España); en 1966)

670 ## $aLa majstro kaj Martinelli, 1993;$btitolpaĝo (Georgo Kamaĉo) paĝo 30 (n. en 1966 en Zafra)

Komentoj

La komentoj de la antaŭa kazo pri la kontrolkampoj kaj la kampo 040 validas por ĉi rikordo kaj ĉiuj ceteraj. Nur rimarku, ke se vi bone dokumentis la aŭtoritaton en la pozicio 008/33, la valoro “a” signifas, ke la aŭtoritato estas plene starigita (grase en la ekzemplo).

En la kampoj 024 estas registritaj du identigilojn por ĉi aŭtoro en du malsamaj sistemoj, VIAF kaj ISNI.

La preferatan formon de la nomo oni registras en la kampo 100 kaj en la kampoj 400 tiujn variantojn de la nomo uzitajn de la aŭtoro aŭ trovitajn en unu el la fontoj. La preferata nomo estas tiu, kiun plej ofte uzas la aŭtoro.

En la kampoj 670 oni citas la fontojn, de kie oni prenas la informon por starigi la aŭtoritaton. En ĉi kazo temas pri du bibliografiaj fontoj kaj en la subkampo $a oni citas la titolon kaj la daton de eldono. En la subkampo $b la specifajn lokojn ene de tiuj eldonaĵoj kaj la trovitajn nomoformojn plus kelkaj aliaj datenoj, kiuj povus esti interesaj por identigi la aŭtoron.

Povas esti, ke pro diversaj kialoj, vi ne plene redaktas la rikordon, sed ja bezonas registri variantojn de nomoj. Nu, tio ne gravas por la funciado de la sistemo. Minimume registru la kampojn 100 kaj tiom da 400 kiel bezonate.

KAZO 2: Pseŭdonimoj

En la kazo de pseŭdonimoj konsilindas ne krei nuran alirpunkton, sed ĉiam registri minimume la kampojn 100, 500 kaj 670. Cetere, oni kreu la aŭtoritatojn de tiom da bibliografiaj identecoj, kiom bezonataj.

Rikordo 1

000 00690nz a2200205n 4500

001 541

003 ES-MaBJR

005 20190107122117.0

008 151121|| az|||aabn | aa**a** d

024 7# $ahttp://viaf.org/viaf/50332375$2viaf

024 7# $a0000 0001 1511 4033$2isni

040 ## $aES-MaBJR$bepo$cES-MaBJR$erde

100 1# $aKalocsay, Kálmán

400 1# $aKalocsay, K.

400 1# $aKalocsay, Kolomano

500 1# $aPeneter, Peter

663 ## $aPor verkoj de ĉi aŭtoro verkitaj sub pseŭdonimo, vidu ankaŭ:$bPeneter, Peter

670 ## $aEzopa saĝo; 1956;$btitolpaĝo (K. Kalocsay)

670 ## $aVIAF, 21-11-2015:93;$b(Kalocsay, Kálmán, 1891-1976; seud., Peneter, Peter)

Rikordo 2

000 00538nz a2200157n 4500

001 542

003 ES-MaBJR

005 20190107122121.0

008 151121|| az|||aabn | aa**a** d

040 ## $aES-MaBJR$bepo$cES-MaBJR$erde

100 1# $aPeneter, Peter

500 1# $aKalocsay, Kálmán

663 ## $aPor verkoj de ĉi aŭtoro verkitaj sub reala nomo, vidu ankaŭ:$bKalocsay, Kálmán

670 ## $aLibro de amo ; 1969;$bdorso de la titolpaĝo (Peter Peneter)

670 ## $aVIAF, 21-11-2015:93;$b(Kalocsay, Kálmán, 1891-1976; seud., Peneter, Peter)

Komentoj

En ĉi kazoj, ambaŭ rikordoj estas komplementaj.

La unua rikordo temas pri la aŭtoro, kiam li verkas sub reala nomo kaj aperas ankaŭ kelkaj nomovariantoj uzitaj de li en diversaj eldonaĵoj. Krome estas la kampo 500, kie oni registras la pseŭdonimon.

La dua rikordo temas pri la aŭtoro, kiam li verkas sub pseŭdonimo. Krome estas la kampo 500, kie oni registras la realan nomon.

Tre gravas ĉi-kaze la kampo 663, kiu klarigas la rilaton inter la du bibliografiaj personecoj de la aŭtoroj en ambaŭ rikordoj.

Rimarku, ke en la unua rikordo ne aperas detale dokumentitaj la fontoj por la diversaj nomoformoj registritaj en la kampoj 400. Eblus tion fari citante ilin en pliaj kampoj 670, sed ĉar unu el cititaj fontoj estas VIAF, tio ne necesas, ĉar la rikordo pri la aŭtoro en tiu retejo detale registras ĉiujn nomovariantojn kaj tio sufiĉas por sendube identigi la aŭtoron.

KAZO 3: Homonimoj

En la kazo de homonimoj sufiĉus aldoni identigan elementon nur al unu el la aŭtoroj, sed konsilindas aldoni ĝin ankaŭ al la alia se eblas trovi la informon. Registru la bezonatajn kampojn 400, 500 kaj 670 en la respondaj rikordoj.

Rikordo 1

000 00459nz a2200145n 4500

001 5719

003 ES-MaBJR

005 20240916123520.0

008 161026|| az|||aabn | a|**a** d

040 ## $aES-MaBJR$bepo$cES-MaBJR$erde

100 1# $aDumas, Alexandre$d(1802-1870)

400 1# $aDumas, Alexandre,$cpatro$d(1802-1870)

670 ## $aLa grafo de Monte-Kristo, 2010;$btitolpaĝo (Alexandre Dumas)

670 ## $aVIAF, 16-9-2024;$b(Dumas, Alexandre, 1802-1870)

Rikordo 2

000 00451nz a2200145n 4500

001 2685

003 ES-MaBJR

005 20240916123546.0

008 161026|| az|||aabn | a|**a** d

040 ## $aES-MaBJR$bepo$cES-MaBJR$erde

100 1# $aDumas, Alexandre$c(1824-1895)

400 1# $aDumas, Alexandre,$cfilo$d(1824-1895)

670 ## $aLa kolomba premio, 1909;$btitolpaĝo (Alexandre Dumas)

670 ## $aVIAF, 16-9-2024;$b(Dumas, Alexandre, 1824-1895)

Komentoj

Ambaŭ aŭtoroj havas la saman nomon, por identigi ilin en la katalogo kaj bone atribui al ili la respektivajn verkojn oni devas aldoni al la nomo identigan elementon. Ĉi-kaze, la datojn de naskiĝo

kaj morto. Ĉar ni konas la datojn de ambaŭ aŭtoroj, oni aldonas ilin al ambaŭ. La preferata nomo de ĉi aŭtoroj inkluzivas, do, la datojn.

Verkoj / Tradukoj

Kiel vidite en *Titolo de verko*, en la rubriko pri *Alirpunktoj*, se la preferata titolo de la verko ne koincidas kun la ĉeftitolo de la eldonaĵo, oni devas krei alirpunkton pri la verko.

Nura alirpunkto

KAZO 1: Traduko de anonima verko

Rikordo

000 00259nz a2200109n 4500

001 4163

003 ES-MaBJR

005 20190107123722.0

008 170616|| az|||aabn | a|c d

040 ## $aES-MaBJR$bepo$cES-MaBJR$erde

130 #0 $aHasanaginica.$lEsperanto

Komentoj

Por identigi la tradukon de la bosnia popolbalado *Hasanagaino* sufiĉas aldoni al la preferata titolo de la verko en sia originala lingvo *Hasanaginica* la lingvon de traduko en la kampo 130. Oni akceptas, kiel en la antaŭaj kazoj, la implicitajn valorojn, kiujn donas la sistemo en la kampoj grize prezentataj de la ekzemplo.

KAZO 2: Traduko de verko kun konata persona aŭtoro

Rikordo

000 00265nz a2200109n 4500

001 953

003 ES-MaBJR

005 20190107122351.0

008 160207|| az|||aabn | a|c d

040 ## $aES-MaBJR$bepo$cES-MaBJR$erde

100 10 $aAdamson, Hendrik.$tAuli.$lEstona

Komentoj

Same, kiel en la kazo de traduko de anonima verko, la maniero identigi la tradukon estas aldoni la lingvon de traduko al la preferata titolo de la originala verko. La diferenco estas, ke ĉi-kaze, la verko havas konatan aŭtoron kaj oni devas registri la informon en kampo 100.

KAZO 3: Traduko de verko kun korporacia aŭtoro

Rikordo

000 00315nz a2200109n 4500

001 2886

003 ES-MaBJR

005 20190107123213.0

008 161106|| az|||aabn | a|c d

040 ## $aES-MaBJR$bepo$cES-MaBJR$erde

110 2# $aKatolika Eklezio.$bPapo (1958-1963: Johano la 23a)$tPacem in terris.$lEsperanto

Komentoj

Same kiel antaŭe, nur ĉi-kaze la aŭtoro estas korporacio.

Kompleta rikordo

KAZO 1: Originala verko ricevis malsaman ĉeftitolon en malsamaj eldonoj

Rikordo

000 00450nz a2200145n 4500

001 2475

003 ES-MaBJR

005 20190107122206.0

008 151130|| az|||aabn | a|c d

040 ## $aES-MaBJR$bepo$cES-MaBJR$erde

100 10 $aAuld, William.$tPaŝoj al plena posedo

400 10 $aAuld, William.$tPaŝoj al kompleta posedo

670 ## $aPaŝoj al plena posedo, 1968

670 ## $aPaŝoj al kompleta posedo, 2023

Komentoj

Ĉi-kaze, temas pri elpensita ekzemplo. Se la sama originala verko aperas sub malsamaj titoloj en la diversaj eldonoj, oni devas decidi kiu estas la preferata titolo por tiu verko. Ĝenerale, oni elektas tiun laŭ kiu la verko estas pli konata aŭ pli citata en la referencverkoj, aŭ tiu formo unue aperinta.

Rimarku, ke tio implicas en unu el la bibliografiaj rikordoj registri la preferatan titolon en 240 ĉar la preferata titolo ne koincidas kun la ĉeftitolo.

En la bibliografiaj rikordoj:

Eldondato: 1968

100 1# $aAuld William

245 10 $aPaŝoj al plena posedo /$cWilliam Auld

Eldondato: 2023

100 1# $aAuld William

240 10 $aPaŝoj al plena posedo

245 10 $aPaŝoj al kompleta posedo /$cWilliam Auld

KAZO 2: Traduko de verko ricevis malsaman ĉeftitolon en malsamaj eldonoj

Rikordo

000 00450nz a2200145n 4500

001 664

003 ES-MaBJR

005 20190107122206.0

008 151130|| az|||aabn | a|c d

040 ## $aES-MaBJR$bepo$cES-MaBJR$erde

100 10 $aAndersen, Hans Christian.$tDen lille havfrue.$lEsperanto

400 10 $aAndersen, Hans Christian.$tLa virineto de maro

400 10 $aAndersen, Hans Christian.$tLa marvirineto

670 ## $aLa virineto de maro, 1907

670 ## $aLa marvirineto, 1962

Komentoj

La titolo de la verko de Andersen ricevis du malsamajn tradukojn en Esperanto. Oni registras tiujn formojn en du malsamaj kampoj 400, kiuj estas variantoj de la preferata titolo de la tradukoj registrita en la kampo 100. Oni redaktas la respondajn kampojn 670 por pravigi tiujn variantojn. Ĉar la informo troviĝas en la titolo mem de ĉiu traduko, ne necesas redakti subkampon $b.

KAZO 5: Verko atribuita al pluraj aŭtoroj

Rikordo

000 00562nz a2200157n 4500

001 3977

003 ES-MaBJR

005 20240925184541.0

008 170512|| az|||aabn | a|c d

040 ## $aES-MaBJR$bepo$cES-MaBJR$erde

130 #0 $aImitatio Christi

400 00 $aThomas à Kempis.$tImitatio Christi

400 10 $aGerson, Jean.$tImitatio Christi

430 #0$aDe imitatione Christi

670 ## $aLa imitado de Kristo, 1952; titolpaĝo (de Thomas Hemerken à Kempis)

670 ## $aNB Hispanio, katalogo, 12-5-2017 (Imitatio Christi, verko foje atribuita a Jean Gerson, ĝenerale al Thomas à Kempis)

Komentoj

Kiam iu verko estas atribuita al pluraj aŭtoroj oni devas serĉi ties preferatan titolon en la ĉefaj katalogoj aŭ en referencverkoj. En ĉi kazo, oni konsideras la verkon anonima, ĉar ne certas kiu estas la vera aŭtoro. Por gvidi la kataloganton rekomendindas redakti aŭtoritatan rikordon por la verko kaj poste nuran alirpunkton por la traduko, se ĝi estas bezonata por la bibliografia rikordo.

Korporacioj

Nura alirpunkto

Rikordo

000 00264nz a2200109n 4500

001 2236

003 ES-MaBJR

005 20190107122930.0

008 160811|| az|||aabn | a|c d

040 ## $aES-MaBJR$bepo$cES-MaBJR$erde

110 2# $aArgentina Esperanto-Instituto

Komentoj

Vidu komentojn en antaŭaj similaj kazoj.

Kompleta rikordo

Kazo 1: Antaŭaj kaj postaj korporacioj

Rikordo

000 01020nz a2200193n 4500

001 373

003 ES-MaBJR

005 20240506194001.0

008 151021|| az|||aabn | a|**a** d

040 ## $aES-MaBJR$bepo$cES-MaBJR$erde

110 2# $aHispana Esperanto-Asocio

410 2# $aHEA

410 2# $aAsociación Esperantista Española

410 2# $aSociedad Española Esperantista

510 2# waaZamenhofa Federacio

510 2#wbaHispana Esperanto-Federacio

670 ## $aHispana Esperanto-Gazeto, 1931$b(órgano oficial de la Asociación Esperantista Española = oficiala organo de Hispana Esperanto-Asocio)

670 ## $a¿Qué es el esperanto?, 1930$b(Sociedad Española Esperantista = Hispana Esperanto-Asocio)

670 ## $aVikipedio, 17-9-2017 $b(Hispana Esperanto-Asocio, HEA. Ĝiaj precedencoj estas la Sociedad Española para la Propaganda del Esperanto (HSppE) en 1903, kaj dum la Unua Mondmilito, la Zamenhofa Federacio. Ĝia heredinto estas la nuna Hispana Esperanto-Federacio

Komentoj

Krom la variantaj nomoformoj, foje estas tre utile por gvidi la kataloganton aldoni ankaŭ la precedencan kaj postan korporaciojn. Tion oni faras per la subkampo $w en la kampo 510. Por antaŭaj korporacioj, la valoro devas esti “a”; por postaj korporacioj, la valoro estu “b”.

Kazo 2: Papo aganta oficiale nome de la Eklezio

Rikordo

000 00650nz a2200169n 4500

001 2885

003 ES-MaBJR

005 20190107123213.0

008 161026|| az|||aabn a ana d

024 7# $ahttp://viaf.org/viaf/121009982$2viaf

024 7# $a0000 0000 8484 1560$2isni

040 ## $aES-MaBJR$bepo$cES-MaBJR$erde

110 2# $aKatolika Eklezio.$bPapo (1958-1963: Johano la 23a)

500 0# $aJohano$bla 23a,$cPapo

670 ## $aLa surtera paco, 1963$b(encikliko de Lia Papa Moŝto Johano XXIII)

670 ## $aVIAF, 26-10-2016; (Catholic Church. Pope (1958-1963 : John XXIII); Iglesia Católica. Papa (1958-1963 : Juan XXIII) ... ktp.)

Komentoj

Ĉi-kaze, la papo agas en oficiala rolo nome de la Eklezio. Temas do, pri subordigita korporacio, kies preferatan formon oni konstruas kun la nomo de la konfesio en $a kaj la nomo de la posteno en $b.

Oni kreas sekundaran alirpunkton kun la nomo de la papo.

Kongresoj

Memoru, ke la kazo de kongresoj, indas krei du tipojn de rikordoj. Unu, kiun oni povas nomi "patrina" aŭ "trunka", sen aldonaĵoj, resuma aŭ kontrola de la diversaj nomoformoj de la kongreso se estas pluraj. Krom en certaj okazoj, tiuj ne estas uzataj kiel alirpunktoj sed kiel gvidilo por la kataloganto por krei ĉiam laŭ la sama maniero la alirpunktojn rilatajn al la konkretaj okazigoj de tiu kongreso.

La dua tipo konsistas el nura alirpunkton konstruita surbaze de la preferata nomo de la kongreso plus la necesaj aldonaĵoj por distingi unu disde la aliaj.

Memoru ankaŭ, ke tiujn kongresojn, kies nomoj enhavas la nomon de la organiza korporacio oni konstruas kiel subordigita korporacio.

Kompleta rikordo

KAZO 1: Kongreso kies nomo enhavas la nomon de la organiza korporacio

Rikordo

000 00356nz a2200133n 4500

001 5680

003 ES-MaBJR

005 20240423192900.0

008 240423|| az|||aabn | a|c d

040 ## $aES-MaBJR$bepo$cES-MaBJR$erde

110 2# $aInternacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.$bKongreso

410 2# $aILEI.$bKongreso

411 2# $aKongreso de ILEI

670 ## $aKongreslibro, 2018$btitolpaĝo (51a Kongreso de ILEI)

Komentoj

La preferata formo de la kongreso konsistas el la organiza korporacio en $a kaj la vorto *Kongreso* en $b, kiu rolas kiel subordigita korporacio.

Oni registras ankaŭ la necesajn alirpunktojn kun variantoj de la preferata formo inkluzive de la nomo en rekta formo en kampo 411.

KAZO 2: Kongreso kies nomo ne enhavas la nomon de la organiza korporacio

Rikordo

000 01062nz a2200181n 4500

001 5559

003 ES-MaBJR

005 20231105133511.0

008 231103|| az|||aabn | a|c d

040 ## $aES-MaBJR$bepo$cES-MaBJR$erde

111 2# $aUniversala Kongreso de Esperanto

410 2# $aUniversala Esperanto-Asocio.$bKongreso

411 2# $aUniversala Kongreso

411 2# $aInternacia Kongreso de Esperanto

411 2# $aUK

670 ## $aWWW UEA, 20-9-2016$b(Universala Kongreso)

670 ## $aVikipedio, 20-9-2016$b(Universala Kongreso de Esperanto (UK); Ĝis la 8-a kongreso (1912) oni nomis ĝin "Internacia", ekde la 9-a (1913) "Universala"; Alfred Michaux organizis la unuan Universalan Kongreson en Boulogne-sur-Mer. Komence la antaŭa kongreso decidis pri la okazigo de posta, kaj oni aranĝis en 1906 laŭ propono de Hippolyte Sebert Konstantan Komitaton de la Kongresoj. Ekde la Helsinko-sistemo en 1922/1923 la kongreson organizis ICK, kaj ekde 1933/1934 UEA. Dum la skismo la kongresoj estis organizataj de Internacia Esperanto-Ligo (IEL).)

Komentoj

Ĝi estas kreita en la kampo 111, sed oni aldonas ankaŭ la varianton kiel subordigita korporacio en la kampo 410.

Nura alirpunkto

KAZO 1: Kongreso kies nomo enhavas la nomon de la organiza korporacio

Rikordo

000 00298nz a2200109n 4500

001 1484

003 ES-MaBJR

005 20190107122617.0

008 160401|| az|||aabn | a|c d

040 ## $aES-MaBJR$bepo$cES-MaBJR$erde

110 2# $aSennacieca Asocio Tutmonda.$bKongreso$n(24a.$d1951.$cStokholmo)

Komentoj

En la diversaj eldonoj de iu kongreso, sufiĉas krei la alirpunkton kun la preferata nomo por tiu kongreso kaj la konkretajn datenoj (numero, dato kaj loko de okazigo) de tiu eldono. Rimarku, ke la alirpunkton oni kreas en la kampo 110.

KAZO 2: Kongreso kies nomo ne enhavas la nomon de la organiza korporacio

Rikordo

000 00287nz a2200109n 4500

001 5678

003 ES-MaBJR

005 20240421090946.0

008 240421|| az|||aabn | a|c d

040 ## $aES-MaBJR$bepo$cES-MaBJR$erde

111 2# $aGermana Esperanto-Kongreso$n(26a.$d1948.$cMunkeno)

Komentoj

Same kiel en la antaŭa ekzemplo. Rimarku nur, ke la alirpunkton oni kreas en la kampo 111.

Glosaro

Antaŭteksto: La paĝoj antaŭ la ĉefteksto: antaŭparolo, enhavtabelo, titolpaĝo, ktp.

Antaŭtitolo: *S*ekundara titolo, kutime konsistanta el klariga aŭ limiga frazo, kiu antaŭas la ĉeftitolon por ĝin klarigi.

Bibliografio: 1. Sistema listo de verkoj de specifa aŭtoro aŭ pri difinita temo, aŭ kiuj kunhavas unu aŭ plurajn komunajn trajtojn (lingvo, formo, periodo, eldonloko, ktp). 2. En la kunteksto de akademia publikigo, listo de referencoj al fontoj cititaj en la teksto de artikolo aŭ libro, aŭ proponita de la verkinto por plua legado, kutime aperanta ĉe la fino de la verko.

Ĉeftitolo[71]***:*** Titolo propra de la risurco, nome, la titolo en la formo, kiun ĝi havas en la preferata fonto de informo de la eldonaĵo. La ĉeftitolo povas inkludi alternativajn titolojn kaj la numeron de la parto aŭ sekcio kaj la nomon de ĉi lasta, sed ne paralelajn titolojn aŭ titolaldonojn. En la risurcoj enhavantaj plurajn sendependajn verkojn oni konsideras, ke la ĉeftitolo estas la kolektiva titolo. En la risurcoj enhavantaj plurajn sendependajn verkojn en kiuj ne estas kolektiva titolo, la titolo de la unua verko rolas kiel ĉeftitolo de la tuta risurco.

Esprimo: Intelekta aŭ arta realigo de verko en litera-cifera formo, muzika notacio, sono, bildo, objekto, ktp, aŭ ajna kombinaĵo de tiuj formoj.

Ekzemplero: Konkreta kopio de iu manifestiĝo. En la kazo de plurvolumaj monografio, ekzemplero konsistas el tiom da eroj, kiom da volumoj havas la eldonaĵo.

Faksimilo: Reproduktaĵo, kiu simulas la aspekton de la originalo, sen redukto aŭ pligrandigo, kaj reproduktas ekzakte ties enhavon.

ISBD-interpunkcio: interpunkcio preskribita de la normo ISBD (*International Standard Bibliografic Description* = Internacia Norma Bibliografia Priskribo) kiel rimedo por rekoni kaj montri la diversajn datenajn elementojn kaj igi ilin kompreneblaj sendepende de la lingvo de la priskribo.

Inventaro: 1. Kronologia registro de ĉiuj bibliografiaj eroj, kiuj eniras bibliotekon. 2. Rezulto de la procezo kontroli ĉiujn erojn sur la bretoj de biblioteko kontraŭ listo de posedaĵoj por identigi tiujn mankantajn aŭ nekontrolitajn kaj anstataŭi aŭ elsarki ilin.

Kaŝnomo: Vidu: *Pseŭdonimo*

Katalogado en Publikigo (KIP): Skiza kataloga slipo, kiun foje eldonistoj inkludas en la eldonaĵo.

Katalogo: Aro de bibliografiaj rikordoj pri la risurcoj posedataj de biblioteko aŭ alia institucia kolekto, priskribitaj kaj ordigitaj laŭ reguloj.

Kolofono: En malnovaj manuskriptoj aŭ libroj, fina peco, ofte ornamita, kiu donas informojn pri la nomoj, datoj, lokoj de kopiado aŭ presado. En modernaj libroj, sekvante la tradicion de la malnovaj, mencio printata je la fino de la teksto kun informo pri la nomo de la presisto, kaj loko kaj dato de presado. Tiu informo estas ofte nun metata sur dorso de la titolpaĝo aŭ paĝo de kreditoj.

Komplementa informo pri la titolo*:* Vidu: *Titolaldono*

---

[71] Angle: *title proper*; hispane: *título propiamente dicho* aŭ *título propio*; france: *titre propre.*

Komponanto: Aparta unuo de intelekta enhavo, ene de pli granda risurco.

Konvencia kolektiva titolo*:* Titolo uzata kiel preferata titolo por kompilaĵo enhavanta du aŭ pli da verkoj de persono, familio aŭ korporacio.

Kunmetaĵo**:** Manifestiĝo, kiu enhavas plurajn esprimojn. Plej multaj risurcoj kolektitaj de bibliotekoj estas kunmetaĵoj. Ekzemple: monografioj kun pluraj sendependaj eseoj de malsamaj agantoj, monografioj, kie la verko estas esprimita en paralelaj lingvoj, monografioj kun aldona informo en formo de prologoj, ilustraĵoj aŭ indeksoj, aro de individuaj verkoj kunmetitaj de eldonisto aŭ editoro, seria eldonaĵo, ktp..

Manifestiĝo: Tuŝebla konkretigo de esprimo de verko: aro de ekzempleroj produktitaj.

Monografio: 1. Eldonaĵo enhavanta kompletan tekston kaj/aŭ ilustraĵojn en unu volumo aŭ limigita nombro da ili. En la kazo de elektronikaj monografioj anstataŭ volumoj estas CD-ROMoj, PDF-oj, ktp. 2. Studo pri certa parto de scienco aŭ iu aparta temo.

Priskribo integra: Priskribo en kiu la risurco estas priskribita kiel tutaĵo.

Priskribo analiza: Priskribo, kiu priskribas parton de pli granda risurco.

Pseŭdonimo: Pseŭdonimo aŭ kaŝnomo estas fikcia personeco per kiu aŭtoro kaŝas la respondecon pri iu verko

Represo: Denova presado de eldonaĵo surbaze de la sama pres-formilo aŭ matrico kiel la unua preso.

Reproduktaĵo: Ekzakta kopio de risurco laŭ la enhavo kaj la formo, sed ne nepre laŭ la dimensioj.

Respondrapida kodo (QR-kodo): Tipo de dudimensia strikodo disvolvita por esti rapide malĉifrebla. La literoj *QR* estas mallongigo de la anglaj vortoj *Quick Response* (rapida respondo).

Risurco**:** En RDA, kiu ajn el la entoj de la unua grupo (*verko, eksprimo, manifestiĝo* kaj *ekzemplero*), produktoj el la intelekta aŭ arta kreado. Risurco povas esti integra unuo, kompilaĵo aŭ komponanto de tiu unuo. Plej ofte signifanta en ĉi manlibro *manifestiĝo,* nome, eldonaĵo, en kiu ajn formato aŭ medio.

Seriaĵo: Risurco publikigita en sinsekvaj partoj, kiuj kutime prezentas numeradon kaj ne havas antaŭplanitan finon (ekzemple, gazeto, monografia serio aŭ ĵurnalo). Estas inkluditaj en ĉi kategorio la risurcoj kun karakterizaĵoj de seriaĵo (sinsekvaj emisioj, numerado kaj ofteco), sed kies daŭro estas limigita en la tempo (ekzemple, bultenoj de eventoj, kiel la kongresaj kurieroj publikigitaj kadre de la Universalaj Kongresoj) kaj la reproduktaĵoj de seriaĵoj.

Serio: Aro de apartaj risurcoj rilataj unu al la aliaj per tio, ke ĉiu risurco havas, aldone al sia propra titolo, kolektivan titolon aplikatan al la aro kiel tutaĵo, kun aŭ sen numerado.

Signaturo: Kodo presita sur etikedo fiksita al la ekstero de objekto en biblioteka kolekto, kutime al la malsupra parto de spino de libro (aŭ alispeca materialo), kiu povas esti ankaŭ presita aŭ manskribita sur etikedo ene de la objekto. Ĝi informas pri la ĝusta loko sur la breto de la specifa kopio de la risurco, kiun disponas la biblioteko.

Strikodo**:** Surgluebla presita etikedo enhavanta maŝinlegeblajn datenojn (plej ofte temas pri litera-cifera kodo, unika por ĉiu ekzemplero, kiu identigas ĝin) ĉifritajn en vertikalaj linioj de egala longo sed varia dikeco, kiuj povas esti legitaj per optika skanilo. Strikodoj estas uzitaj ĉefe en bibliotekoj por identigi la ekzemplerojn kaj faciligi ilian pruntadon per elektronikaj rimedoj. Tiu kodo anstataŭas la

registro-numeron, uzitan kiam oni realigis la registradon de ekzempleroj mane. Nuntempe, kelkaj mastrumsistemoj permesas generi ĝin aŭtomate.

Subtitolo: *S*ekundara titolo, kutime konsistanta el klariga aŭ limiga frazo, kiu sekvas la ĉeftitolon por ĝin klarigi.

Titolo: Vorto aŭ vortoj per kiuj risurco estas konata, kiu ofte referas al ties enhavo.

Titolaldono[72]***:*** Vorto aŭ frazo aŭ aro de karaktroj, kiuj aperas en rilato aŭ subordigitaj al la ĉeftitolo de la risurco kaj kompletigas aŭ precizigas ĝin. La titolaldono povas ankaŭ aperi en rilato aŭ subordigita a la paralelaj titoloj, al la variantoj de la ĉeftitolo, al la titoloj de la partoj kaj al la titoloj de la unuopaj verkoj enhavataj en la risurco. Aliaj titolaldonoj povas kvalifiki, klarigi aŭ komplementi la titolon al kiu ili aplikeblas, aŭ indiki ties karakteron, enhavon, ktp., de la risurco aŭ la verkoj en ĝi enhavataj, aŭ montri la kialon aŭ okazon, kiam ĝi publikiĝis. Ĝi inkludas subtitolojn kaj antaŭtitolojn, sed ne inkludas titolvariantojn.

***Titolo alternativa*:** Dua titolo de verko kunigita al la unua plej ofte pere de la konjunkcio "aŭ", aŭ ties ekvivalento en aliaj lingvoj.

***Titolo ĉefa*:** Vidu: *Ĉeftitolo*

Titolo de la kapo[73]***:*** 1. Titolo presita supre de la unua paĝo de la teksto, kiu, en foresto de titolpaĝo, kiel ofte okazas ĉe seriaĵoj, estas uzata kiel titolo de la risurco. (caption title, título de la cabecera). 2. Supra parto de la unua paĝo, kie aperas la titolo, komponisto, aŭtoro ktp. en la kazo de presita muziko aŭ teksto kaj komencaj kadroj en kiuj aperas la datumoj por la identigo de la filmo en la kazo de filmoj.

Titolo de la marĝeno[74]***:*** Titolo, mallongigita aŭ ne, de la libro kiu ripetiĝas ĉefe en la supra marĝeno de kelkaj eldonaĵoj.

Titolo dependa*:* Parto de la ĉeftitolo de sekcio aŭ suplemento, specifa de tiu sekcio aŭ suplemento, kiu bezonas komunan titolon por esti plene komprenata.

Titolo kolektiva*:* Ĉeftitolo de risurco enhavanta plurajn sendependajn verkojn kun propraj titoloj.

Titolo kolektiva konvencia*:* Vidu: *Konvencia kolektiva titolo.*

Titolo komuna*:* Parto de la ĉeftitolo, kiam ĝi konsistas ankaŭ el dependa titolo.

Titolo kuranta: vidu: *Titolo de la marĝeno*

Titolo paralela*:* Titolo en alia lingvo aŭ skribo prezentata kiel sama aŭ ekvivalenta al la ĉeftitolo.

Titolo preferata*:* Titolo aŭ formo de titolo elektita por identigi verkon. La preferata titolo ankaŭ estas la bazo por la aŭtoritata alirpunkto reprezentanta tiun verkon.

Verko: Diferencigita intelekta aŭ arta kreaĵo.

Volumo: Unu aŭ pli da folioj kune binditaj por konstitui individuan unuon.

---

[72] Angle: *other title information*; hispane: *información complementaria del título*; france: *complèment de titre*.
[73] Angle: *caption title*; hispane: *título de cabecera*; france: *titre de départ*
[74] Angle: *running title*; hispane: *titulillo* aŭ *título de margen*; france: *titre courant*